



**I** NTERNACIA  
**K** ONGRESA  
**U** NIVERSITATO

**63-a SESIO**

**Havano, Kubo**  
**17 – 24 julio 2010**

**José Antonio Vergara (red.)**



**Universala Esperanto-Asocio**



## Enhavo

|  |     |
|--|-----|
| Antaŭparolo .....  | 2   |
| La rektoro .....   | 4   |
| IKU 1 Humphrey Tonkin: <i>Shakespeare en multlingva mondo</i> .....  | 5   |
| IKU 2 Duncan Charters: <i>Ĉu difineblas karakterizaj trajtoj de etnaj kaj preteretnaj kulturoj?</i> .....            | 17  |
| IKU 3 M. Rafaela Urueña Alvarez: <i>Protektado de la Medio kaj daŭropova evoluo</i> .....                            | 26  |
| IKU 4 KADOJA Hidenori: <i>Kion signifas la enkonduko de Lingvaj Rajtoj por la Esperanta movado?</i> .....            | 40  |
| IKU 5 Jane Edwards: <i>La kultura dinamiko de la kuba diasporo</i> .....   | 51  |
| IKU 6 Maritza Gutiérrez González: <i>Lingva diverseco en Latinameriko: defioj por daŭripova evoluo</i> .....         | 64  |
| IKU 7 Stefan MacGill: <i>Kien la Esperanta didaktiko?</i> .....  | 73  |
| IKU 8 Orlando E. Raola: <i>Neŭtrona difrakto: Apliko al esplorado de nanomaterialoj</i> .....                        | 87  |
| IKU 9 José Antonio Vergara: <i>Medicinaj sistemoj en interkultura dialogo: vojoj al plureco kaj tutmondiĝo</i> ..... | 102 |

## Antaŭparolo

**Mauro La Torre (1946-2010):**

**Zamenhofeca edukisto, intelekta heroo de la Esperanto-movado, IKU-profesoro**

Ni, la obstinaj subtenantoj de Esperanto, tiu ĉi kolektiva eduka iniciato jam plurgeneracia, senprecedenca ĉar kerne lingva kaj kunlabora trans ĉiuj limoj, foje havas la ŝancon kalkuli en niaj vicoj je homoj tiel intelekte rigoraj, elstare bonkoraj kaj profunde lojalaj al humanismaj valoroj, kiel Mauro La Torre, forpasinta la 25-an de marto ĉi-jare.

Pere de lia dumviva amiko kaj kolego Renato Corsetti, ni sciis ke okaze de lia funebra ceremonio, en universitata salono plena je studentoj, profesoroj, kamaradoj kaj amikoj, oni omaĝis lin per paroladoj pri liaj tri grandaj viv-temoj: Demokrata Lernejo, Edukscienco kaj Esperanto. Fakte Mauro La Torre mem, dum sia longdaŭra kaj sindona agado kiel socie engaĝiginta fakulo pri edukado, sukcesis brile ligi tiujn kampojn, kun mirinda kreemo, etika kohereco kaj larĝperspektiva inteligento.

Finstudinte matematikon en 1974, kun disertaĵo pri matematika lingvo-scienco, li laboris dum 15 jaroj en bazaj kaj mezgradaj lernejoj, kaj ekde 1987 ĉe la Edukscienca Laboratorio de la Tria Roma Universitato, gvide al estontaj bazlernejaj instruistoj, precipe pri aŭtomatigo de lernotaksado, komputikaj logiko kaj instruado, eksperimenta pedagogio. Li aparte interesiĝis pri didaktiko, terminologio, lingvopolitiko kaj aŭtomata tekst-analizo, kaj modele kontribuis al la Esperantaj kulturo kaj edukado ĝuste per tre altnivela, abunda produktado ĝuste en tiuj kampoj. Jes ja, ĉar kiel nelaciĝebla aktivulo sur la loka, landa kaj internacia ebenaĵoj de nia movado, li intense okupiĝis pri la instruado de la lingvo (kunverkante lernolibron, trejnante E-instruistojn, prezidante ILEI 1998-2003, ktp) kaj pri la fako Esperantaj Studoj (leksikaj kaj terminaj problemoj, aŭtomata analizado de tekstoj en nia lingvo, partopreno en la Akademio de Esperanto, ktp).

Instige efikas la fakto ke li persiste diskonigis la rezultojn de sia esplora kaj pripensa laboro sur tiuj studkampoj, ne nur per eseoj kaj aliaj tekstoj, sed ankaŭ per ofta kontribuado jen al Esperantologiaj Konferencoj kaj Konferencoj de ILEI, jen al tiu ĉi nia iaspeca Universitato de Esperantujo, kiel atestas la jena listo de liaj IKU-referaĵoj:

- *Personigitaj malĉeaj instrusistemoj* (Valencio, 1993)
- *Kiel difini lingvokonajn sojln-nivelojn?* (enkonduka lekcio por la unua AIS-kurso, *Enkonduko al komputiko*) (Tampere, 1995)
- *Desuprismo kaj desubismo en terminara laboro* (Adelajdo, 1997)
- *Kiaj edukmodeloj por la homidoj de la tria jarmilo?* (Zagrebo, 2001)
- *Ĉu komputilo helpas komprenon?* (Florenco, 2006)
- *Kiel savi lingvo-variecon per interlingva eduko?* (Roterdamo, 2008)
- *Nombrado: ilaro, vortaro, cifero* (Bjalistoko, 2009)

Mauro La Torre grave alportis, tute malarogante sed ĉiam trafe kaj afable, elementojn por alfronti kernajn problemojn de la movadaj teorio kaj praktiko, kaj estis unu el la homoj kiuj plej funde komprenis la emancipan valoron de Esperanto kaj ĝian potencialon por interkultura kompreniĝo. Tial, li proponis kaj kunstarigis la projekton Interkulturo kun la Surreta Lernejo Tibor Sekelj, por grandskale kunligi tra la mondo lerneajn klasojn per interreto.

Ni ĝoju ke antaŭ nur du jaroj li kaptis la ŝancon prelegi en IKU por detale prezenti sian etikan sintenon kiel homo kaj eduksciencisto, kritikan al la nuntempa tutmonda emo al kultura

ununiformigo kaj lingva unulingvigo de la infanaro. Plenkohere al la movadaj principoj esprimitaj de la Manifesto de Prago, en tiu prelego li pensinstige prezentis novan branĉon de la lingvo-didaktiko, nome interlingvan edukon, kiu okupiĝu pri la eduka aspekto de la lingvaj homaj rajtoj kaj lingva plureco (do inkluzive la rilatojn inter la lingvoj), kaj pri la lingvaj aspektoj de interkultura edukado. Konvinkite ke la lernado de aliulaj lingvoj valoras en si mem kaj utilas al alispecaj lernadoj, kaj inspirite de pasio por socia justeco li substrekis ke “nia koncepto koncernas ĉiujn klasanojn, sendepende ĉu ili apartenas al malplimultula aŭ plejmultula parto de la socio, ĉu ili naskiĝis en malpli aŭ pli riĉa lando: ĉar *ne* temas pri la alsimiligo de fremduloj, sed pri *ĉies* kompreno pri la plureco kaj **egalrajteco de la kulturoj.**” (IKU-libro 2008, p. 91-92)

Bedaŭrinde ni ne plu ĝuos novajn el liaj tiel inteligentaj kaj larĝanimaj kontribuoj, ekz. al la diskutoj pri la ĉi-jara temo de la Universala Kongreso de Esperanto (Interproksimigo de kulturoj). Tamen nin akompanu la admira certeco pri “lia intelekta kapablo, iniciatemo, sincera dediĉo al nia afero, malavareco kaj inkluzivemo, sinteno trankvila tamen kuraĝiga, interesiĝo pri la bonfarto de aliaj, komprenemo pri cirkonstancoj kiuj povis malfaciligi ies agadon kaj deziro ĉiel helpi por solvi tiajn situaciojn. Ĉio kune montras grandan homon kies kvalitoj restos eterne kun ĉiuj kiuj lin konis kaj kiujn li servis”, kiel skribis Duncan Charters, vicprezidanto de ILEI, reĝisoro de la ĉi-jara kongresa temo kaj mem IKU-prelegonto. Ni resumu dirante ke Mauro La Torre estis Zamenhofeca Esperanto-intelektulo.

Tial, kun emocio kaj honorsento, ni dediĉas tiun ĉi 63-an sesion de la Internacia Kongresa Universitato al lia kara, inspira memoro.

José Antonio Vergara  
estrarano de UEA pri scienca kaj faka agado

P:S: Krom igi publika altan pritakson al la laboro de la IKU-Komisiono, mi nepre esprimu mian plej sinceran dankon pro la nemalhavebla helpo en la redaktado de la IKU-libro al Pasquale Zapelli kaj Ionel Oneț, el la CO, kaj al mia estrara kolego Claude Nourmont, kiu denove prizorgis la tradukojn de la prelegoresumoj, kaj al la volontuloj kiuj faris kaj kontrollegis la tradukojn al la angla (Edmund Grimley Evans kaj Brian Moon, respektive) kaj franca (Jeanine kaj Yannick Dumoulin, reviziis Claude Nourmont). La anglalingvanoj kaj hispanlingvanoj mem provizis siajn unuopajn resumojn en siaj respektivaj gepatraj lingvoj, kaj mi tradukis la ceterajn en la hispanan.

## La Rektoro



### **Humphrey Tonkin**

Universitata profesoro pri humanistiko kaj Emerita Prezidanto ĉe la Universitato de Hartford, Usono, kie li instruas kursojn pri angla literaturo de la 16-a jarcento kaj pri lingvo kaj socio. Estas redaktoro de *Language Problems & Language Planning*, bibliografo de *Modern Language Association* kaj eksprezidanto de Usona Forumo pri Tutmonda Edukado. Eksprezidanto de Universala Esperanto-Asocio kaj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Membro de la Akademio de Esperanto kaj profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino. Verkis, artikole kaj libre, pri literaturaj temoj, pri Esperanto, pri usona lingvopolitiko kaj pri internacia edukado. Li multfoje prelegis en Internacia Kongresa Universitato.

## Shakespeare en multlingva mondo



### Humphrey Tonkin

Akademiano kaj iama prezidanto de UEA, estas Universitata Profesoro pri Humanistiko en la Universitato de Hartford, Usono. Liaj kontribuoj al la studado de la epoko de Shakespeare inkluzivas du librojn kaj abundajn artikolojn.

### Resumo

Same kiel la Internacia Lingvo rapide ekspansiis por fariĝi ne nur la lingvo de Zamenhof aŭ de d-ro Esperanto, sed la aŭtentike *internacia* lingvo Esperanto, la reputacio de Shakespeare kaj la scio pri liaj verkoj ekspansiis preter Stratfordo kaj Londono por fariĝi posedaĵo de la anglalingva mondo entute, kaj fine, dank' al tradukado, posedaĵo de la tuta terglobo. Samtempe kun tiu ekspansio, tamen, oni levas demandojn pri la identeco de tiu homo el Stratfordo.

Verdire, la atestoj pri la vivo kaj kariero de Shakespeare ne estas malmultaj. Aliflanke, la teatraj praktikoj de la epoko estis tiaj, ke foje estas malfacile decidi kiu aŭtoris kion, kaj la ŝekspiraj verkoj ne estas tiurilate escepto. Kontinua tradicio de ludado de Shakespeare daŭras de lia epoko ĝis hodiaŭ. Lia famo estis ligita al la ekspansio ankaŭ de la angla lingvo kaj ankoraŭ hodiaŭ estas foje utiligata por pruvi la superecon de la angla. Tamen en la 19-a jarcento liaj verkoj definitive saltis la lingvajn barilojn kaj komencis cirkuli en tute poliglota medio. La fakto, ke Zamenhof pruvis la efikecon de Esperanto per sinturno al verko en la angla, *Hamleto*, lia unua granda traduko, montras la komplikajn rilatojn inter statuso kaj lingvo: por atingi renomon por la internacia lingvo, paradokse necesis turni sin al la plej disvastiĝinta *nacia* lingvo. Ĉu do ni konsideru la verkojn de Shakespeare manifestiĝon de lingva imperiismo aŭ de universaleco de humanecaj valoroj? Certe estas, ke Shakespeare enpenetris per tradukoj la tutmondan konscion; en tiu senco li fariĝis proksimiganto de la kulturoj, parto de la tutmonda kaj tuthoma heredaĵo.

## Shakespeare in a multilingual world

### Summary

Just as the International Language expanded rapidly, to become not only the language of Zamenhof or of Dr. Esperanto, but the authentically *international* language Esperanto, so the reputation of Shakespeare and knowledge of his works expanded beyond Stratford and London to become the possession of the English-language world as a whole, and, finally, thanks to translation, the possession of the entire globe. Even as this expansion takes place, however, questions are raised about the identity of the man from Stratford. In truth, evidence on the life and career of Shakespeare is not especially limited. On the other hand, such were the theatrical practices of the day that sometimes it is hard to know who was the author of what, and in this connection the works of Shakespeare are no exception. A continuous tradition of Shakespeare performance stretches from his day to ours. His fame was linked also to the expansion of the

English language and even today it is sometimes used to prove the superiority of English. However, in the nineteenth century his works definitively crossed the barriers of language and began to circulate in a fully polyglot arena. The fact that Zamenhof proved the effectiveness of Esperanto by turning to a work in English, namely *Hamlet*, his first great translation, reveals the complicated relationship between status and language: to achieve renown for the international language, it was paradoxically necessary to turn to the most widespread *national* language. Should we then consider the works of Shakespeare a manifestation of linguistic imperialism or of the universality of humane values? Certainly, Shakespeare, through translation, has penetrated the global consciousness; in this sense he has brought the various cultures closer together and has become part of the heritage of the whole world and of all people.

## Shakespeare dans un monde multilingue

### Résumé

De même que la Langue Internationale s'est rapidement répandue pour devenir non seulement la langue de Zamenhof ou du Dr Esperanto, mais encore la langue véritablement internationale Esperanto, la réputation de Shakespeare et la connaissance de ses œuvres se sont répandues au-delà de Stratford et de Londres pour devenir la propriété du monde anglophone dans son ensemble, et enfin, grâce à la traduction, la propriété du monde entier. Parallèlement à cette expansion, pourtant, des questions se posent quant à l'identité de l'homme de Stratford. A vrai dire, les témoignages sur la vie et la carrière de Shakespeare ne manquent pas. D'un autre côté, les pratiques théâtrales de l'époque étaient telles qu'il est parfois difficile de déterminer qui a écrit quoi, et les œuvres de Shakespeare ne font pas exception. Il existe une tradition ininterrompue de représentation de Shakespeare qui s'étend depuis son époque jusqu'à la nôtre. Sa célébrité est liée aussi à l'expansion de la langue anglaise, et encore de nos jours, elle est parfois utilisée pour prouver la supériorité de l'anglais. Pourtant, au dix-neuvième siècle, ses œuvres ont définitivement franchi les barrières linguistiques et ont commencé à circuler dans un milieu totalement polyglotte. Le fait que Zamenhof ait prouvé l'efficacité de l'espéranto en se tournant vers une œuvre en anglais, *Hamlet*, sa première grande traduction, montre les relations complexes qui existent entre les langues et leur statut. Afin d'obtenir la reconnaissance pour la langue internationale, il a fallu paradoxalement avoir recours à la langue nationale la plus répandue. Doit-on donc considérer les œuvres de Shakespeare comme une manifestation d'impérialisme linguistique ou de l'universalité des valeurs humaines? Il est certain que Shakespeare a pénétré, par la traduction, la conscience universelle; en ce sens, il a rapproché entre elles les cultures et est devenu une part de l'héritage du monde et de l'humanité.

## Shakespeare en un mundo multilingüe

### Resumen

Así como la Lengua Internacional se extendió rápidamente, para llegar a ser no sólo la lengua de Zamenhof o del Dr. Esperanto, sino la lengua auténticamente *internacional* Esperanto, la reputación de Shakespeare y el conocimiento de sus obras se extendió más allá de Stratford y Londres, pasando a ser patrimonio del mundo anglófono en su conjunto, y finalmente, patrimonio de todo el mundo, gracias a las traducciones. Al mismo tiempo que esa expansión, surgen sin embargo interrogantes sobre la identidad de ese hombre de Stratford. En verdad, no escasea la evidencia sobre la vida y la carrera de Shakespeare. Por otra parte, las prácticas del teatro de la época eran tales, que a veces es difícil saber quién fue el autor de qué, y en esto las obras de Shakespeare no son una excepción. Una tradición continua de representación de

Shakespeare se mantiene desde sus días hasta hoy. Su fama está ligada también a la expansión de la lengua inglesa, y aún hoy en día se usa para probar la superioridad del inglés. Sin embargo, en el siglo diecinueve sus obras cruzaron definitivamente las barreras lingüísticas y comenzaron a circular en un medio totalmente políglota. El hecho que Zamenhof probó la eficacia del Esperanto remitiéndose a una obra en inglés, *Hamlet*, su primera traducción grande, muestra la compleja relación entre status y lengua: paradójicamente, para ganar reconocimiento hacia la lengua internacional, fue necesario remitirse a la lengua *nacional* más difundida. ¿Debemos entonces considerar a las obras de Shakespeare como una manifestación de imperialismo lingüístico o de la universalidad de los valores humanos? Ciertamente, Shakespeare penetró la conciencia global, mediante traducciones; en este sentido acercó a las culturas, haciéndose parte de la herencia del mundo y del hombre, en su conjunto.



## Shakespeare en multlingva mondo

Mia temo koncernas kazon de ekspansio aŭ transformiĝo de la piedspuro de granda verkisto. Mia deirpunkto estas la simileco, kiun tiu kazo montras kun la fondinto de Esperanto. Zamenhof, laŭ la atestoj modesta homo el relative nekonata angulo de la Rusa Imperio, kreis pseŭdonomon por si, kiu poste fariĝis la nomo de lingvo; kaj tiu lingvo poste disvastiĝis tra la tuta mondo. Shakespeare, homo el relative modestaj cirkonstancoj en meza Anglio, akiris por si jam dum la vivo reputacion kiel talenta dramverkisto. Tiu personeco de dramverkisto fariĝis kultura fenomeno de ĉiam kreskanta proporcio, ĝis ĝi transsaltis la limojn de la propra geografio kaj fariĝis tutmonda. Ĝi tutmondiĝis laŭ du diversaj trakoj. Unue, kiel fiksa elemento en la edukado de junaj britoj kaj sekve ankaŭ de la koloniaj elitoj, ĝi estis esenca perilo kaj portanto de la angla lingvo kaj la brita kulturo. Due, kaj samtempe kun tiu imperia ekspansio, ĝi ankaŭ transsaltis la lingvajn limojn, tiel ke ŝekspiraj tradukoj kaj prezentoj de liaj verkoj en tradukita formo fariĝis fenomenoj ne nur en si mem sed eĉ en la literaturoj al kiuj ili tradukiĝis.

La temo de nia nuna kongreso estas “interproksimigo de kulturoj.” Kvankam oni povus argumenti, ke Esperanto estas esence eŭropa kaj eŭroplingva afero, ne estus malfacile aserti – kiel ni kutimas aserti – ke Esperanto celas interproksimigon de kulturoj. Ĝi celas krei neŭtralan forumon en kiu la lingvoj kaj kulturoj de la mondo, kaj sekve la homaro mem, povas renkonti unu la alian en spirito de egaleco.

Sed la fenomeno Shakespeare? Ĉu oni povas argumenti, ke la verkoj de tiu dramisto, monde konataj kaj monde admirataj, preterlasis siajn originojn kaj fariĝis tutmondaj, kun varia valento en diversaj kulturoj, sed esence sendepende de siaj originoj? Oni ofte tiel argumentas.

Alternative, ĉu Ŝekspiro estas simple unu elemento en la tutmondiĝo de brita kaj usona kulturo, tiu homogenigo de la mondo kiu, laŭ multaj homoj, ne estas “natura” homogeniĝo de la kulturoj, sed trudita britusona normo, kiu senkompate forigas la kulturan diversecon (vidu ekzemple la verkojn de Robert Phillipson)? Mi volas en tiu ĉi prelego pridemandi tiujn asertojn. En du postaj prelegoj mi ekzamenos pli rekte la unuopajn verkojn, kiujn ni kutimas grupigi en la verkaron, kiu portas la etiketon Shakespeare.

Ne estas malsaĝe levi tiun demandon ĝuste en la nuna momento. Pli kaj pli ofte ni aŭdas voĉojn, kiuj nete deklaras, ke la angla lingvo fariĝis la Esperanto de la 21-a jarcento (kiel la aferon lastatempe priskribis kanada ĵurnalo[1]). Nova libro pri la angla (de Robert McCrum, konata populara komentariisto pri la angla) nomas ĝin tutsimple “Globish,” la tergloba lingvo.

Sed same kiel oni celas iom tro frue aboli Esperanton en la publika konscio, koincide ekflamas denove demando pri la aŭtoreco de la dramoj de Shakespeare. Ĉu vere tiu homo el Stratford verkis la dramojn, kiuj hodiaŭ portas la nomon Shakespeare? Surprize multaj relative inteligentaj homoj opinias la temon malferma al debato, aŭ eĉ jam decidita kontraŭ la poeto (vidu Shapiro 2010). Ĉu, do, kiam la angla (laŭ iuj homoj) jam konkeris la mondon, oni plu bezonas Ŝekspiron, unu el la elementoj en tiu konkero?

### Kelkaj biografiaj detaloj

Ni komencu ĉe la komenco, per la homo el Stratford. La unua dokumenta aludo al William Shakespeare estas la registro de lia bapto, kiu okazis la 26-an de aprilo 1564, en la preĝejo de la urbo Stratford-on-Avon. Li estas notita kiel la filo de John Shakespeare, homo pri kiu ni scias, ke li estis komercisto en la urbo, rekonata ĉefe kiel gantisto, kvankam estas aludoj al diversaj aliaj specoj de komerco (greno, ligno, lano, ne tre surpriza vario en tiu ĉi mezgranda kampara urbo). John fariĝis urbestro por iom da tempo, sed poste, ĉirkaŭ la jaro 1576, kiam William Shakespeare estis 12-jara, evidente falis en periodon de malprospero, el kiu li ree prosperiĝis en la mezaj 1590-aj jaroj, eble dank’ al la sukcesoj de la filo William. William estis lia plej aĝa filo. Venis poste du filinoj, fratinoj, do, de la poeto (el kiuj unu mortis kiel infano) kaj du filoj,

Richard kaj Edmund. Tiu frato Edmund fariĝis aktoro kaj mortis en Londono, postlasante kvar infanojn. La alia frato Richard vivis sian tutan vivon en Stratford kaj ŝajne ne edziĝis.

La dua firma dokumenta aludo al iu William Shakespeare okazas en la jaro 1582, kiam speciala rajtigilo estis eldonita de la loka episkopo por la geedziĝo de William Shakespeare kaj iu Anne Whateley. Plia dokumento de la posta tago aludas al estonta geedziĝo de William Shagspere kaj Anne Hathwey (literumo en la angla de la deksepa jarcento ne estis normigita). Ekzistas ĝenerala agnosko flanke de la historiistoj, ke la aludo al Anne Whateley estas simpla eraro pri la familia nomo fare de la koncerna skribisto – sed temas jam pri bela ekzemplo de ne tute konsekvenca dokumentado, kiu kvazaŭ hantas la biografion de nia Stratfordano. Se oni sufiĉe famas, eĉ la plej malgrandaj dubetoj povas fariĝi grandaj kazoj (konsideru la absurdajn demandojn pri la civitaneco de Prezidento Obama...). Registro de la geedziĝo mem mankas, kvankam tio en si mem ne estas aparte signifa: la preĝejaj registroj de tiu periodo estas tre nekompletaj, parte pro la simpla paso de la tempo, parte pro la amasa detruo de materialoj okaze de la civila milito en Anglio en la mezo de la deksepa jarcento.

La registroj de la 1580aj jaroj notas la naskiĝon de Susanna, la filino pri kiu Anne Hathaway estis evidente graveda kiam William Shakespeare edziĝis al ŝi, kaj la naskiĝon de la ĝemeloj Hamnet kaj Judith en 1585. Unu plia dokumento, en kiu William estas menciata kune kun la gepatroj (verŝajne ĉar la plej aĝa filo), rilatas al jura problemo koncerne hipotekon.

En 1592 la verkisto Robert Greene en unu el siaj verkoj pri la londona teatra vivo mencias malaprobe iun “Shake-scene” (“sku-sceno”), verŝajne aludo al nia poeto, kune kun parodia cito el unu el liaj verkoj. La postan jaron poemo de Shakespeare *Venuso kaj Adoniso* aperas kun lia nomo sur la titolpaĝo. Plia poemo, *La Perforto de Lucrecja*, same portas lian nomon en 1594.

Ekde 1594 la mencioj fariĝas pli oftaj. Jen Shakespeare kiel aktoro en la trupo de la Reĝa Ĉambelano (1594). Jen registro de la morto de la ĝemelo Hamnet Shakespeare 11-jara en Stratford (1596). Jen la asigno de blazono al Shakespeare en 1596 kaj en la sama jaro aludo al jura disputo (fakte ordono pri la civila aresto de Shakespeare, verŝajne ne plenumita). La postan jaron, Shakespeare aĉetas New Place (“Nova Rezidejo”) en Stratford, unu el la plej grandaj domoj en la urbo, kaj en 1598 estas plia aludo al tiu aĉeto, aludo al lia rolado en dramo de Ben Jonson, kaj nekompleta listigo de liaj verkoj en *Palladis Tamia*, verko de Francis Meres. Ĉiam pli abundas mencioj de Shakespeare kiel aŭtoro de tiu aŭ alia dramo, kiel komercisto pri nmoveblaĵoj en Londono kaj Stratford, kaj kiel posedanto de akcioj en diversaj teatraj iniciatoj en Londono. La preĝeja registrolibro de Stratford mencias diversajn okazaĵojn en la vivo de la familio Shakespeare: la edziniĝon de lia filino Susanna, la enterigon de lia patrino, la bapton de lia nepino. El ĉio ĉi ni povas kunteksi la vivon de homo kiu samtempe aktoras kaj verkas por la londona teatraro, sukcese investas rimedojn en teatraj entreprenoj, kaj fariĝas aktiva civitano en la propra naskiĝurbo – urbo ne tiel facile atingebla el Londono, cetere.

En epoko kiam la spuroj de ordinaraj homoj estis kutime nekompletaj, kiam urbaj registroj kaj aliaj juraj paperoj ofte perdiĝis, kiam komercaj intertraktoj pli-malpli ne postlasis signojn, kaj kiam eĉ la aferoj de la kortego memoriĝis ĉefe el klaĉoj en okazaj dokumentoj, la vivo de Shakespeare montras relative klarajn konturojn. Estas vere, ke ekzistas grandaj lakunoj (Kion Shakespeare faris dum la 1580aj jaroj? Ĉu eble nerektaj aludoj indikas, ke li pasigis iom da tempo ĉe katolika familio en Norda Anglio?) kaj kelkaj misteroj (Kial, kiam aliaj riĉaj civitanoj emis tion fari, Shakespeare ne testamentis monon por starigi publikan fonduson por, ekzemple, doni helpon al malriĉuloj, aŭ stipendiojn por ĉeesti la lokan lernejon? Kial lia testamento apenaŭ mencias lian edzinon, al kiu li ŝajne testamentis nur ilian “due plej bonan liton”?[2])

Estas vere, ke inter la ankoraŭ ekzistantaj kolektoj de korespondaĵoj de kelkaj notindaj homoj, ne troviĝas mencioj de nia poeto. Nek li aperas en taglibroj de la epoko – sed la fenomeno de la klaĉa taglibro estas fenomeno de pli posta epoko: la homoj de la epoko de Shakespeare ne emis pasigi sian tempon por tiaj frivolaj aktivaĵoj. Kaj se tiaj okazaj mencioj mankas, plejparte mencioj mankas ankaŭ de liaj kolegoj en la teatroj de la epoko. Nur unu larĝe detala registro de teatraj intertraktoj, la tiel nomata taglibro de Philip Henslowe, postrestas – sed

temas pri rivala trupo, kaj ĝi enhavas nur unu mencion de dramo eventuale de Shakespeare (la nomo Shakespeare mankas).

Seriozaj duboj pri la aŭtentikeco de Shakespeare havas relative mallongan historion: ili datiĝas de la deknaŭa jarcento. Kiel povus esti (oni ekdemandis) ke homo el provinca urbo, kiu ŝajne neniam frekventis universitaton kaj restis ekster la grandurba vivo de Londono tra sia tuta juneco, povus verki tiel konvinke pri kortegoj kaj reĝoj, pri foraj landoj? Kiel li povus krei tiel profundajn karakterojn, tiel riĉajn tekstojn, tiel rafinitan poezion? Kaj kial en siaj verkoj li ŝajne havas tiel negativan opinion pri la simplaj homoj de la strato, la needukitaj homoj, kiujn li ofte parodias aŭ prezentas malestime? Ĝenerale oni ne dubis nek dubas pri la ekzisto de iu Shakespeare, talenta komercisto kaj aktoro: la duboj rilatas al lia kapablo verki la dramojn atribuitajn al li. Ĉu eventuale iu alia homo, eble ligita al la kortego, utiligis la personecon de la aktoro, kun ties konsento, por publikigi verkojn politike riskajn, subfosajn?

Oni povas respondi tiujn demandojn je diversaj niveloj. Unue kaj ĉefe, la riĉa komplikeco de ŝekspira teksto estas tia, ke, eĉ se oni trovas aristokraton, plej delikate edukitan, kiu ja verkis la dramojn, tio nur montrus la apenaŭ kredeblan geniecon de tiu aristokrato... La genieco de Shakespeare ne kuŝas unuavice en lia klereco sed en lia imagopovo. La grandaj verkoj de Shakespeare, kiel *Hamleto*, *Otelo*, *Makbeto*, estus apenaŭ kredeblaj atingoj eĉ se ili venus de la plej verŝajna persono en la mondo (kia ajn tiu homo estu). Kaj se temas pri la personeco de Shakespeare, jes, ekzistas diversaj demandoj kaj strangaĵoj pri lia vivo, sed regas simila situacio ĉe aliaj homoj, ĉe kiuj oni ne pridemandas la strangaĵojn, ĉar ili, kontraste al Ŝekspiro, estas homoj historie malpli interesaj.

Kaj ĉu la verkoj de Shakespeare efektive prezentas la kortegojn de la fino de la 16-a jarcento aŭtentike? Apenaŭ. Ni scias relative multon pri la kortega vivo sub la Reĝino Elizabeta kaj ŝia posteulo la Reĝo Jakobo (la kariero de Shakespeare kovras la finon de la Elizabeta regno kaj la komencon de la Jakoba); la draste simpligitaj prezentoj en la tiutempaj teatraĵoj apenaŭ similis la realon. Tio eĉ ne estas la celo de la aŭtoro. La kortega vivo, kiun oni trovas en la historiaj dramoj de Shakespeare aŭ en la grandaj tragedioj, estas renkontebla en la dramoj de pluraj liaj samtempoj – notinde lia antaŭulo Christopher Marlowe kaj lia posteulo John Webster. Nenio aparte unika aŭ aŭtentika ĉi tie. Por konstrui siajn intrigojn, plejparte Shakespeare minis verkojn pri angla historio, kiujn li kaj liaj samtempoj havis je sia dispono: liaj intrigoj, precipe en la historiaj dramoj, proksime sekvas liajn fontojn. Samo validas ĉe la komedioj, kiuj kutime (kvankam ne ĉiam) havis identigeblajn fontojn. En tiu epoko, la celo ne estis verki originale, sed sekvi antaŭajn modelojn – re-prezenti ilin alivestitaj. Aŭtoro lerteco kuŝis ne en originaleco nek en travivata vivosperto, sed en kapablo efike adapti.

## Teatraj praktikoj

El nia vidpunkto en la 21-a jarcento, kiam ni valorigas aŭtentikan sperton, ni supozas tian imitadon manko. Hodiaŭ ni estas konvinkitaj pri du aferoj esence fremdaj al la 16-a kaj frua 17-a jarcento: originaleco (ju pli originala la intrigo, des pli bone), kaj aŭtentika sperto. Aŭtoro verku, ni diras, el propraj travivaĵoj. Tamen, ne nur tiuj du antaŭsupozoj estas falsaj en la ŝekspira kunteksto, sed ili eĉ mise prezentas la hodiaŭan artan situacion. Ĉu la aŭtoro de moderna muzika teatraĵo prezentita ĉe Broadway aŭ en eŭropa ĉefurbo elpensas el nenio (aŭ el propra sperto) sian verkon? *Les Misérables*, *Evita*, *Billy Elliot*? Ili estas apenaŭ la originalaj vivospertoj de siaj kreintoj. Ekzemple, ĉi-lasto, *Billy Elliot*, komencis sian vivon kiel filmo, estis adaptita kiel romano, kaj el la romano estis kreita la muzika teatraĵo. Kaj hodiaŭaj filmoj? Ofte ili havas tuje kaj facile identigeblajn antaŭulojn; do ne temas pure kaj nure pri originaleco, sed pri tio, kion oni povus nomi originala adaptado.

Apenaŭ necesas montri al la verkoj de aliaj eŭropaj landoj por trovi paralelojn: ĝenerale en tiu epoko oni valorigis imitadon kiel kriterion de sukceso. François Hardy en Francio aŭ Lope de Vega en Hispanio ofte havis siajn identigeblajn fontojn. Same inter la italoj. Kaj oni apenaŭ

turnus sin al Corneille kaj Racine por trovi originalecon de intrigoj: ĝuste la celo estis reinterpreti kaj samtempe daŭrigi la grekan kaj latinan tradiciojn. Se iu ajn karakterizo markas la anglan teatron de tiu epoko, temas pri la preteco de la verkistoj *ne* sekvi tiel proksime la tradiciojn, kaj ĉefe intermiksi la literaturajn modojn pli severe praktikatajn en Italio kaj, ĉefe, Francio.

Samkiel modernaj filmistoj kaj popularaj dramistoj, pelis la elizabetanojn la mono. En la komenco de la 16-a jarcento, kiam la profesio de aktoro apenaŭ komencis aperi, aktoroj estis dependaj je la rimedoj de tiuj, kiuj pretis dungi tutan trupon: en la stratoj kie oni ofte prezentis teatraĵojn oni apenaŭ povis postuli monon de simplaj preterpasantoj. Sed kiam en Hispanio oni eltrovis manieron limigi la eniron per kreo de fermitaj spacoj, la tielnomataj *corrales*; kiam en Francio kaj Italio oni kreis la unuajn teatrojn kun limigita enirejo; kaj kiam kelkajn jarojn poste oni tion faris en Anglio – oni kreis novan enspezeblon.[3] Tamen oni enspezas nur se la homoj venas; kaj homoj venas al teatro nur por spekti tion kion ili volas spekti – precipe se ili devas pagi. En Anglio, verkistoj ligitaj al teatraj trupoj (kiuj ofte samtempe aktoris aŭ alimaniere kunlaboris) verkis teatraĵojn ne laŭ iu romantika nocio de inspiro sed laŭ zorga atento al la publika gusto. Ili libere adaptis konatajn rakontojn, allogis la publikon ne per io tute nova sed per io, kion la publiko rekonos – la vivo de Julio Cezaro, la sensacia regno de Rikardo la Tria, la malnova rakonto pri konfuzitaj ĝemeloj. Verki el propra sperto, ne; verki el la sperto de la publiko, jes.

Kaj el kiu konsistis tiu publiko? La publiko kiu frekventis la londonajn teatrojn estis tre varia almenaŭ en la komenco de la kariero de Shakespeare kaj almenaŭ en la grandaj publikaj, subĉielaj teatroj de tiu epoko. Sed grava elemento (kaj la elemento, kiu pagis pli altajn sumojn por sidi en la teatraj galerioj) estis tamen edukitaj homoj – precipe la junuloj de la t.n. Kortumaj Domoj (Inns of Court), kie advokatoj ricevis sian trejnadon. La elizabetanoj estis entuziasmaj utiligantoj de la jura sistemo, kaj la advokata profesio prezentis bonajn eblojn por supreniri en la socio. Tiuj studentoj devis koni la francan lingvon ĉar ĝi estis ankoraŭ utiligata en certaj kortumoj; ili devis koni la latinan. La plej popularaj aŭtoroj de tiu periodo estis en pluraj kazoj latinaj – precipe Ovidio, Seneko kaj Cicerono. Ne surprize, do, ke la verkoj de Shakespeare plenas je eĥoj de tiaj verkistoj: tion la paganta publiko volis, kaj tion li liveris al ili.

Sed de kie li havigis al si la sciojn bezonatajn por tia verkado? Unue ni notu, ke la loka lernejo en Stratford utiligis bakalaŭrojn el la apuda universitata urbo Oksfordo. Ni ne scias kiajn kontaktojn Shakespeare havis kun tiu universitato, sed ili ne nepre estis nulaj. Se li ne studis tie, tio eble ŝuldiĝis al du faktoroj: la financaj malfacilaĵoj de la patro dum la periodo de la juneco de Shakespeare, kaj la gravediĝo kaj sekva edziniĝo de Anne Hathaway. Mi jam menciis du liajn samtempojn: Marlowe estis filo de ŝufaristo; li studis ĉe Kembriĝo dank' al stipendio. Webster estis filo de konstruisto de kaleŝoj; li plej verŝajne fariĝis advokata studento en Londono. Shakespeare apenaŭ estis la sola profesia verkisto de tiu epoko, kiu venis el relative humila origino.[4]

Due, ni notu, ke, alveninte Londonon, Shakespeare havis je sia dispono la riĉan londonan vivon; kaj kiel ambicia junulo kiu celis sukceson, li facile povus trempi sin en la intelekta kulturo de la ĉefurbo.

Jam dum sia vivo, Shakespeare fariĝis konata kaj admirata, almenaŭ laŭ la aludoj al li. Tiu unua, de Greene en 1593 (pri “shake-scene”), tute je la komenco de la kariero de Shakespeare, implicas rapidan sukceson de tiu kariero. La sukceso daŭris kaj intensiĝis. Kvankam lia morto en 1616 pasis sen rimarkinda atento (kontraste al tiu de pluraj samtempuloj), liaj amikoj kolektis liajn verkojn kaj ilin publikigis en granda pompa volumo en 1623, kun abundaj poeziaj dediĉoj. Ni scias, ke liaj teatraĵoj ne malaperis de la scenejo, sed estis relative ofte ludataj ĝis la fermo de la teatroj en 1642, kiam komenciĝis la civila milito.

Indas aldoni, ke pluraj dramverkistoj kaj homoj de la teatro gajnis konsiderindajn sumojn per tiu agado. En la 19-a jarcento, kiam duboj pri la aŭtoreco de la verkoj de Shakespeare unue ekestis, la nocio, ke la rafinita Shakespeare malpurigus siajn manojn per mono, ŝajnis al iuj

homoj nepensebla. Sekve, necesis trovi aristokratan verkanton de la dramoj. Sed verdire Shakespeare ne estis la sola homo el tiu epoko kiu riĉiĝis per la teatra profesio: li estis unu inter pluraj.

### La postmorta reputacio

La civila milito kaj la posta respubliko daŭris preskaŭ dudek jarojn, dum periodo kiam la prezento de teatraĵoj estis oficiale malpermesita. Kiam en 1660 la monarkio revenis kaj Karlo Dua surtroniĝis, la teatroj kiuj malfermiĝis en Londono estis forte influataj, laŭ koncepto, de la francaj teatroj, kiujn Karlo ekkonis dum sia ekzilo en Parizo. Unu el la du homoj, kiuj ricevis licencon por malfermi teatron, estis William Davenant, kiu pretendis esti (aŭ, pli precize, ne neis esti) la neleĝa filo de Shakespeare mem. La publika avido je teatraj spektakloj kaj la relativa manko de teatraĵoj por satigi tiun avidon necesigis revivigon de iamaj teatraj prezentoj, ĉefe teatraĵoj de Shakespeare, kiuj estis libere adaptitaj al la novaj gustoj de tiu periodo.

Samtempe la spuroj de la poezia Shakespeare (kontraste al la teatra) ankaŭ manifestiĝis en la verkoj de John Milton, puritana verkisto tute fremda al la teatra kulturo de la epoko, kiu tamen legis kaj studis la verkojn de Shakespeare, tiel ke la ŝekspira influo estas ĉie rimarkebla en la verkaro de Milton. Kaj ne nur Milton: multaj aliaj poetoj retrospektive rigardis al la ekzemplodona Ŝekspiro.

De tiu epoko ĝis hodiaŭ, la reputacio de Ŝekspiro daŭre ekspansiis. La grandaj profesiaj aktoroj kaj aktorinoj de la 18-a jarcento – epoko en kiu la nocio de grandaj aktoroj komencis difiniĝi en Anglio – ofte formis siajn reputaciojn surbaze de la kapablo ludi ŝekspirajn rolojn. Kiam fine de la 17-a kaj komence de la 18-a jarcentoj la modo viziti grandajn domojn fariĝis populara inter la supra meza klaso, Stratfordo fariĝis ofta celo de tiaj turismaj vojaĝoj. La tiama posedanto de la granda domo New Place, la iama hejmo de Shakespeare, sentis sin sieĝata de vizitantoj. Stratfordo fariĝis protestanta kaj sekulara versio de la katolika pilgrima celo. En 1769 la konata ŝekspira aktoro David Garrick organizis tutan Ŝekspiran Jubileon en Stratfordo. La fakto, ke angla pluvego malsekigis la tutan aranĝon, ne velkigis la entuziasmon pri Ŝekspiro kaj ŝekspiraĵoj. Kiam morusarbo laŭtradicie plantita de Ŝekspiro estis forhakita de la kolera posedanto de New Place (reage al la turista invado), la nombro de lignaj suveniroj skulptitaj el ĝi vaste superis la volumenon de la arbo.

Se Milton estis influata de Shakespeare, tiu influo ankaŭ daŭris tra la verkoj de la grandaj poetoj de la 18-a jarcento ĝis la romantikaj poetoj de la jarcentofino Wordsworth, Coleridge, kaj poste Byron, Shelley kaj Keats. La fakto mem, ke Ŝekspiro ne posedis universitatan diplomon kaj venis el la angla kamparo, fariĝis dum tiu epoko eĉ signo de merito: li estis, laŭ iuj Romantikuloj, poeto formita de naturo, edukita de la naturaj procezoj. Tiel, en la daŭra procedo de re-inventado de la homo Shakespeare, por akomodi lin al la bezonoj de la epoko, aperis nova Shakespeare, preskaŭ dia figuro, kvazaŭ produkto de la fortoj de la naturo.

Tiuj karakterizoj aparte kaptis la atenton de la grandaj germanaj romantikaj poetoj kaj dramistoj Goethe kaj Schiller. Precipe Schiller kreis verkojn, kiuj laŭ formoj kaj temoj proksime imitis Shakespeare. Serio de brilaj tradukoj de Shakespeare en la germanan (lingvo, kies poeziaj trajtoj pli similas tiujn de la angla poezio ol, ni diru, la franca aŭ la itala) baldaŭ igis Ŝekspiron preskaŭ germana aŭtoro – loko, kiun li ankoraŭ okupas. Similajn evoluojn oni notas en Rusio: Puŝkin konsideris Ŝekspiron la “patro” de Rusio, kaj Turgenev sugestis, ke Ŝekspiro “greftiĝis” en la rusan karnon kaj sangon. La diversaj lingvoj de meza Eŭropo, ekzemple la pola, dum la 19-a jarcento adoptis Ŝekspiron kiel la sian. Abundaj tradukoj aperis; eĉ oni povus diri, ke la maturiĝon de la tieaj literaturoj kutime akompanis tradukoj de Ŝekspiro en la koncernan lingvon.

En Italio, Shakespeare fariĝis stapla temo de operoj, ekzemple *I Capuleti e I Montecchi* de Bellini (1830), kaj tri grandaj verkoj de Giuseppe Verdi, *Falstaf*, *Makbeto* kaj *Otelo*. En Francio Gounod verkis sian version de la historio de Romeo kaj Julieta kaj Ambroise Thomas

sian version de *Hamleto* (1868) – por ne paroli pri abundaj aliaj orkestraj verkoj bazitaj sur Shakespeare el Germanio, Rusio kaj Francio.

## Shakespeare hodiaŭ

Ni ne forgesu, ke tiu interesiĝo, eĉ foje obsediĝo, pri la angla kulturo kaj la angla literaturo ne okazis en izolo, ne okazis pro io magia en la angla lingvo, kiu ne troviĝas ekster tiu lingvo. Ĝin akompanis, fakte ĝin certgrade kaŭzis, la kreskanta ekonomia potenco de Britio, kiu en la 19-a jarcento fariĝis la ĉefa industria potenco en la mondo. La statuso de la angla lingvo kreskis; sekve leviĝis ankaŭ la estimo al la angla literaturo. Ne temas pri simpla ekvacio, sed pri tre komplikaj interligoj inter la literaturo kiel inspiro kaj la literaturo kiel varo. Sed finfine literaturo, kaj precipe dramverkado, estas en si mem ekonomia aktiveco.

En nia propra epoko, la influo de Ŝekspiro etendiĝis preter Eŭropo. Ekzemple, du filmoj de la japana reĝisoro Kurosawa, *Ran* kaj *Sanga Trono*, brile japanigis siajn originalojn (respektive *Reĝo Lear* kaj *Makbeto*). Kurosawa ekzemplas mian temon aparte bone: Ĉu tiuj filmoj estas esence omaĝo al Shakespeare kaj, tra li, al la angla literatura kaj kultura tradicio, aŭ ĉu temas unavice pri la alproprigo de Shakespeare al la japana tradicio? Evidente ambaŭ – sed kio en tiu kultura paro dominas?

Retrospektive, se oni rigardas al la evoluoj en la 18-a kaj 19-a jarcentoj, iom post iom la atento al Shakespeare kvazaŭ disigis lin for de lia tuja historia kunteksto. Liaj samtempuloj – la aliaj dramistoj kaj teatruloj de la epoko – pli-malpli forgesiĝis, dum Shakespeare leviĝis al preskaŭ sanktula (eĉ dia, laŭ iuj asertoj!) nivelo. La legendo de Shakespeare, la ŝekspira mito, ligiĝis ankaŭ al alia forta mito – tiu de la glora epoko de la Elizabeta Anglio. La populara bildo de tiu epoko emfazis memstarecon (Anglio restis for de la eŭropa kontinento, ne enmiksiĝis en la tieaj militoj), liberecon (Anglio definitive formetis la katenojn de la eksterlande inspirita katolika religio kaj ties papoj), kuraĝan exploremon (la bravaj maristoj de tiu epoko eliris por embarasi la hispanojn kaj kolonii Nordamerikon). Ne malfacilas montri la historian dubindecon de tiu bildo kaj tiuj asertoj, sed ĝi estis bildo politike kaj kulture utila en la 19-a jarcento kiam Britio, denove regata de virina monarĥo, elpaŝis por krei sian imperion. Ŝekspiro kaj la brava reĝino Elizabeta fariĝis simboloj de leviĝanta Britio.

Hodiaŭ oni iom draste rektigas tiun mise pendantan bildon. Ni jam rimarkigis, ke ofta temo de ĵurnalista atento estas la pretendoj, ke tiu homo el Stratford ne estis la vera Ŝekspiro, sed nur kaŝas la identecon de iu kortegano. Maksimume tiuj pretendoj estas kreaĵoj el cirkonstancaj atestaĵoj, ne de aŭtentikaj pruvoj. Ili foje dependas de eltrovo de misteraj kriptografaĵoj supozeble troveblaj en la verkoj (la epoko ŝatis tiujn ludojn; do la ideo en si mem ne estus fantazia) aŭ sur iom drastaj reinterpretoj de obskurajĵoj en la biografio de Shakespeare aŭ eltrovo de supozataj paraleloj inter okazaĵoj en la dramoj kaj faktaj tiamaj eventoj

## La ŝekspira kanono

Sed ekzistas dua iom pli komplika demando, kiu nur obtuzigas la unuan. Tiu unua dependas de elkreo de mistera figuro, kiu verkis la verkojn de la supozata Ŝekspiro. Sed kion fari se montriĝus, ke la verkoj de Ŝekspiro estas en multaj kazoj kunlaboraj verkoj, verkitaj ne de nia poeto en sia figura mansardo londona, sed de pluraj teatraj tipoj laborantaj kune? Drastajn versiojn de tiu teorio oni plurfoje prezentis en pasinteco: inter la diversaj absurdaj ŝekspiraj herezaĵoj estas la nocio, ke, pro tio ke neniu homa menso povus krei tiel grandan aron da geniaj verkoj, evidente temis pri tuta teamo de verkistoj, kiuj prezentis siajn verkojn sub la nomo de Shakespeare (problemo en tiu teorio estas, evidente, eltrovi kredeblan motivon por tiel komplika literatura manovro).

Tiaj teorioj estas tute fantaziaj, sed malpli fantazia estas la konstato, ke la difino de la nocio de verkistoj estis en la kunteksto de dramoj de la ŝekspira epoko alia ol ĝi estas nun. La publiko, kiu regule vizitis teatrojn, estis relative malmultnombra. Sekve, la teatroj daŭre soifis je bonaj

teatraĵoj. Multaj tiuj teatraĵoj estis sendube verkitaj rapide, kvazaŭ laŭ mendo de la koncerna trupo. Por rapidigi la procedon, ne malofte duo aŭ eĉ pli da verkantoj laboris super difinita verko. Kaj la celo estis produkti ludeblan verkon, taŭgan por la membroj de la trupo, taŭgan por la ejo, kaj promesplenan se temis pri enspezoj. Eble la plej bona maniero kompreni la procedon estas reiri al mia antaŭa aludo al filmoj. Ĉu oni povas nomi difinitan homon la *verkisto* de filmo? Ekzistas iu aŭ iuj, kiuj verkis la tekston, sed finfine la filmo estas kunlabora afero – kaj tiu teksto tre ofte trairas ŝanĝojn dum la produkta procedo. Same estis en la epoko de Ŝekspiro. Sekve, serĉi iun aŭtentan pure ŝekspiran tekston estas en si mem serĉi kimeron.

Aldona problemo en la atribuado estas tio, ke oni ofte recikligis malnovajn dramojn, reverkante kaj reorganizante ilin. En tiu procedo, forgesiĝis la originala aŭtoro. Foje la titolo mem de la koncerna dramo ŝanĝiĝis. Ĉe la alia flanko de la kalkulo estas la simpla fakto, ke pli da teatraĵaj tekstoj perdiĝis ol transvivis.

Se dramo bone sukcesis sursceneje, ne malofte oni poste aperigis la tekston. Sed presa eldonado de la verkoj ne estis en si mem celo, sed flanka produkto. Plejparte tiuj eldonitaj kajeroj estis malmultekoste produktitaj, foje eĉ pirate. Se aperis la nomo de difinita verkisto sur la titolpaĝo, tiu estis bona indiko, ke tiu verkisto partoprenis la verkadon, sed ne nepre, ke li estis la sola verkanto – eventuale nur la plej bone konata kaj sekve plej alloga al eventualaj aĉetantoj. Krome, oni sendistinge utiligis originalajn tekstojn (do rekte de la mano de la verkinto), ludajn tekstojn (do, transskriboj por la prezento), aŭ eĉ la kolektitajn eldirojn de la unuopaj rolantoj (kiuj ne ricevis kompletajn tekstojn, sed nur la proprajn liniojn plus signalajn vortojn). En la prezenta procedo ofte okazis ŝanĝoj (same kiel okazas ĉe novaj teatraĵoj en nia propra epoko), tiel ke la fina rezulto povus sufiĉe longe forresti de la origina aŭtora intenco.

Lastatempe ekestis eta industrio inter ŝekspirologoj, nome la eltrovo de aldonaj verkoj, kiuj montras la manon de Shakespeare – do aldone al la kanona verkaro. Tiu aliro al la aŭtora demando estas pli proksima al la realo: minacas la koherecon de Shakespeare ne misteraj korteganaj pretendantoj, sed la iom malbela kaj malneta realo de elizabetanaj teatraĵaj prezentoj. Tamen, kiel en multaj aliaj komercaj sferoj, la deziro havi difinitan produkton ofte sufiĉas por ĝin aperigi: la kapablo de eĉ respektindaj fakuloj trovi la manon de Shakespeare en plej diversaj tekstoj (kutime per interna analizo de la lingvaĵo, en si mem tre neekzakta scienco) estas preskaŭ senlima.

Aktualaj esploroj de respektindaj esploristoj trovis pliajn indikojn, ke la ŝekspiraj teatraĵoj estis almenaŭ ĝis certa grado kunlaboraj. Jam delonge ni estas pli-malpli certaj pri tio, ke almenaŭ du verkistoj verkis la dramon *Periklo*: Shakespeare plus iu alia. Tiu verko, kvankam ĝi kutime portas la nomon de Shakespeare, ne aperis en la kolektita verkaro de 1623. Ankaŭ ne aperis tie *La Du Nobelaj Parencoj*, kutime atribuita al John Fletcher, kiu poste fariĝis la ĉefa verkisto por la trupo de Shakespeare, la tiel nomata King's Men, sed pri kiu Shakespeare preskaŭ certe kunlaboris. Kvankam malfrua verko *Henriko la Oka* ja aperis en la kolektita verkaro, ĝi preskaŭ certe estas rezulto de kunlaboro kun Fletcher. Ni jam delonge suspektas, ke certaj scenoj en *Makbeto* ne estis verkitaj de Shakespeare, kaj similaj duboj ekzistas koncerne la fruan tragedion *Tito Androniko* kaj la relative malfrua miksa verko *Timono de Ateno* (Vickers 2002).

Mi emfazu denove, ke tiuj atribuaj problemoj ne limiĝas al Ŝekspiro. Ĉe pluraj aliaj verkistoj (ekzemple Middleton, Marston, Dekker, pro citi nur tri el inter multaj) ili estas eĉ pli komplikaj ol ĉe Ŝekspiro. Henslowe, en sia “taglibro”, aludas al pluraj ekzemploj de tiaj kunlaboroj.

En lastaj jaroj, pli drastaj atribuoj okazadas. Iuj opinias, ke *La Dua Virgulina Tragedio*, de John Fletcher estas efektive *Kardenio*, la perdita verko de Shakespeare (menciita de iu lia samtempulo). Jam de la 18-a jarcento oni de tempo al tempo argumentas, ke la anonima dramo *Edvardo la Tria* (ekzistas iom multaj senatribuaj teatraĵoj el la ŝekspira epoko) estas verko de Shakespeare. Nun aldoniĝis la verko *Duobla Falso*, de kiu restas nur draste reviziita versio (de 1727, do pli ol jarcenton post la vivo de Shakespeare) de verko atribuita de la reviziantoj al

Shakespeare. La moderna redaktoro sugestas, ke tiu ĉi verko, en sia originala formo, povus esti la perdita *Kardenio* (vidu la artikoleon de Trifonĉovski en lastatempa numero de *Literatura Foiro*). Do, la sagao daŭras...

El ĉio ĉi ni povas konkludi, ke la aŭtoro, kiun ni nomas Shakespeare, kaj la verkaro, kiun ni nomas la ŝekspira verkaro estas pli fluidaj ol oni povus supozi.

## Literaturo kaj lingvo

La granda interesiĝo pri tiuj ĉi demandoj pri aŭtoreco estas parte produktoj de novaj aliroj al la scienca studado de Shakespeare, sed ĉefe produktoj de la alta statuso, kiun tiu verkisto ĝuas ne nur en la angla literaturo sed en la literaturo de la mondo. Tra la jaroj Shakespeare fariĝis signifa elemento en tio, kion oni povus nomi la kultura politiko de la anglalingva mondo. La logikistoj foje uzas la latinan esprimon *post hoc propter hoc*, post tio ĉi pro tio ĉi, do la metodo de argumentado en kiu oni asertas, ke se unu afero okazis post alia, ĝi okazis *pro* tiu antaŭa afero. En tiu ĉi kazo, oni foje argumentas, ke, se Ŝekspiro, tiu brila verkisto, verkis en la angla, sekvas ke la angla superas aliajn lingvojn. Sub la titolo “la lingvo de Shakespeare,” la angla lingvo sekve (eĉ se false) cirkulas en la mondo kun pli forta aŭtoritato. Kiam la angla imperio vastiĝis, Shakespeare akompanis ĝin; kaj kiam Usono ekestis kaj etendiĝis okcidenten, Shakespeare vojaĝis kun ĝi. Tiu ekspluatado de la persono de la poeto estis do parto de la lingva kaj kultura imperiismo de la anglalingvanoj. Lernejoj en foraj anguloj de la imperio studis (kaj ankoraŭ studas) sian Makbeton aŭ Hamleton. La granda vortprovizo de Shakespeare estis iel ligita al la supozata granda vortprovizo de la angla lingvo. Ĉion oni povis diri en la angla: Shakespeare pruvis tion. Tiel oni argumentis. Kaj, laŭ la populara supozo, Shakespeare ankaŭ inventis vortojn abunde: do, supozeble, li grave kontribuis al la *kreo* de la angla lingvo.[5]

Ĉiuj tiuj asertoj estas minimume kvalifikindaj: ili esprimas nur duonverojn. Sed ili fariĝis potencaj elementoj en la antaŭeniĝo de la angla lingvo. Eĉ Zamenhof, volante montri, ke Esperanto funkcias, turnis sin al tradukado de *Hamleto* por tion pruvi.

La fakto, ke Zamenhof, kreinto de neŭtrala lingvo, pruvis ĝian efikecon per sinturno al verko en la angla, montras la komplikajn rilatojn inter statuso kaj lingvo, kaj sekve inter la nocio

de kulturaj valoroj kaj ekonomio. Oni povas argumenti – kaj mi verŝajne tiel argumentus (kvankam kiel anglalingvano kaj fakulo pri Shakespeare mi apenaŭ estas senpartia) – ke Shakespeare jam sendependiĝis de siaj originoj kaj fariĝis parto de la kultura heredaĵo de la mondo. La ŝekspira teksto, radikiĝinta en la angla lingvo, tamen eskapis siajn originojn kaj surteriĝas en abundaj aliaj lingvoj; la ŝekspiraj intrigoj ne plu sidas ĉe la civitano de Stratfordo, sed fariĝis parto de la kolektiva konscio. Same kiel en Esperanto la tradukado estas ne disdividebla de la originala verkado, ĉar ambaŭ kontribuas al la evoluigo de la lingvo kaj la riĉigo de ĝia kulturo, same Ŝekspiro enpenetris per tradukoj la tutmondan konscion, kaj estas utiligata kaj rekreata laŭ plej diversaj kriterioj kaj por plej diversaj celoj. En tiu senco, kaj kiel ajn oni rigardas la aferon, Shakespeare fariĝis proksimiganto de la kulturoj, parto de la tutmonda kaj tuthoma heredaĵo.



## Cititaj verkoj

- Duncan-Jones, Katherine. 2001. *Ungentle Shakespeare*. London: Arden Shakespeare.
- McCrum, Robert. 2010. *Globish: How the English Language Became the World's Language*. New York: Norton.
- Phillipson, Robert. 2004. *Ĉu nur-angla Eŭropo?* Rotterdam: UEA.
- Phillipson, Robert. 1992. *Linguistic Imperialism*. Oxford: Oxford University Press.
- Shapiro, James. 2010. *Contested Will: Who Wrote Shakespeare?* New York: Simon & Schuster.
- Trifončovski, Ljubomir. 2010. Estas io el Ŝekspiro, tamen tie Fletcher plias.... *Literatura Foiro* 41/2: 86.
- Vickers, Brian. 2002. *Shakespeare, Co-Author*. Oxford & New York: Oxford University Press.

---

[1] Montreal Gazette, 18 majo 2010.

[2] Pri kelkaj tiaj demandoj, vidu ekzemple Duncan-Jones 2001.

[3] En Hispanio la Corral de la Cruz malfermiĝis en la nova ĉefurbo Madrido en 1579; sekvis la Corral del Principe en 1583. En Parizo oni starigis la t.n. Hôtel de Bourgogne en 1548. La unua fermita teatro en Londono estis verŝajne la Red Lion de 1567 (la frua teatra historio en Londono estas kontestata de fakuloj).

[4] Aliaj menciindaj ekzemploj: Edmund Spenser, filo de ŝtoffaristo, kaj Thomas Middleton, filo de brikisto.

[5] Ĝenerale tiu emo “krei” vortojn estas troigita. Estas vere, ke multaj vortoj unue aperas en la presitaj tekstoj de Shakespeare, sed pro lia famo la verkoj de Shakespeare emis konserviĝi. Do, facile povus esti, ke tiuj vortoj jam pli frue aperis en presita formo, sed la koncernaj presaĵoj perdiĝis. Eĉ pli verŝajne estas, ke la “novajn” vortojn Shakespeare prenis el jam ekzistantaj formoj en la parola lingvo, do ke tiuj vortoj cirkulis libere en la parola lingvo kaj estis unuafoje prenataj en la skriban lingvon fare de Shakespeare. Indas aldoni, ke Londono en la fino de la 16-a kaj komenco de la 17-a jarcentoj estis granda mikspoto de dialektoj: la nombro de loĝantoj rapide kreskadis dum tiu periodo pro elmigro de kamparanoj serĉantaj laboron.

# Ĉu difineblas karakterizaj trajtoj de etnaj kaj preteretnaj kulturoj?



## Duncan Charters

Katedra profesoro pri humanismaj studoj en la Departamento de Lingvoj kaj Kulturoj de la universitata Kolegio Principia en Elsah (Ilinojso, Usono). Li unue trejniĝis pri interkultura orientiĝo ĉe la Lernejo por Internacia Trejnado (SIT) en Vermonto. Kiel profesoro pri hispana lingvo, kulturo kaj literaturo, instruis klasojn pri la hispana kulturo, gvidis studentajn grupojn al Hispanio, kaj prezentis referaĵojn pri la instruado de kulturo kaj kulturaj valoroj ĉe profesiaj konferencoj de lingvoinstruistoj. Trejnas lingvoinstruistojn kaj oficiale ekzamenas universitatajn programojn por ilia instruarajtigo. Li estas prezidinto de ILEI kaj IEK, nun vicprezidanto ILEI kun respondeco pri universitata agado.

## Resumo

- AIS 1: Hispana kaj anglosaksa kulturoj: ĉu konfliktoj transponteblas?
- AIS 2: Laŭ kies kriterioj difiniĝu la kulturo aŭ kulturoj de la komunumo de Esperanto-parolantoj?

Diversaj akademiasaj disciplinoj kontribuis al la difino de kulturo kaj kulturoj. Ne nur antropologoj, sed esploristoj pri sociologio, historio, literaturo kaj aliaj studkampoj alportis siajn kriteriojn celante komprenon pri la fenomeno de la homa kulturo.

Kiam malsamaj grupoj difinas specifan kulturon, ĉu la samaj trajtoj menciigatas de personoj apartenantaj al la kulturo kaj ekster ĝi? Ĉu oni povas utile difini la kulturon de alia popolo sen stereotipoj kaj prijuĝado de ĉiuj individuoj laŭ jam formulitaj kriterioj? Per enketo farita dum multaj jaroj en la universitatnivela Kolegio Principia, diversaj grupoj difinis la usonan kulturon kaj ĝiajn karakterizajn trajtojn: unuajaraj studentoj el Usono, internaciaj studentoj el eksterlando, studentaj kandidatoj por instruarajtigo pri lingvoinstruado, plejparte emeritaj usonaj somer-programanoj. Kiujn kriteriojn indikis ĉiuj grupoj, kaj kio distingis inter la respondoj de usonanoj kaj neusonanoj, kaj inter generacioj en Usono? Kiel reagis la diversaj grupoj al la perceptoj de aliaj kiam ili ne kongruis? Ĉu la elektitaj kriterioj restis ĉe stereotipoj kaj ekskluzivis kulturajn variantojn observeblajn inter minoritatoj? La rezultoj montris surprizan kongruecon inter la vidpunktoj de la diversaj grupoj, konscion pri la danĝero de stereotipoj, kaj foje senton de diskriminacio esprimitan de grupo kiu konsideris sin ekster la akceptitaj normoj de la plimulto.

Sociologoj redifinis rason kaj etnismon por provi reliefigi historiajn antaŭjuĝojn kiuj ne cedis antaŭ modernaj sciencaj esploroj. De kio dependas sukcesa edukado al kompreno kaj toleremo de aliaj rasoj, etnoj, kulturoj, moroj? Kiom rolas intelekta kompreno, interagaj ŝokezercoj por ŝanĝi kulturajn sintenojn, enkultura orientiĝo kaj kontrolado pri kultura adaptiĝo dum restado en alia kulturo? Ĉu eblas difini laŭ universalaj valorosistemoj kriteriojn kiuj unuigas kaj ebligas interkomprenon trans kulturoj, etnoj kaj religioj? Ĉu eblas instrui komunan kulturon surbaze de ĝenerale akceptitaj valoroj kiel amo, vero, justeco, libereco, unueco, toleremo, respondeco kaj respekto al la vivo?

## **Can the characteristic natures of ethnic and supra-ethnic cultures be defined?**

### **Summary**

- AIS 1: Can conflicts between Hispanic and Anglo-Saxon cultures be bridged?
- AIS 2: Whose criteria shall we use to define the culture or cultures of the community of Esperanto speakers?

Various academic disciplines have contributed to defining culture and cultures. Besides anthropologists, researchers in sociology, history, literature, and other fields have brought their own criteria to understanding the phenomenon of human culture.

When different groups define a specific culture, are the same characteristics mentioned by people belonging to the culture and those from outside it? Can the culture of another people be usefully described using predefined criteria without stereotyping and judging all individuals belonging to the culture? Through a study conducted over many years at Principia College, various groups were asked to define “American (U.S.) culture”: freshmen from the U.S., international students from abroad, candidates for certification in language education, mainly retired Summer Sessioners. Which criteria were mentioned by all groups, and were there significant differences between generations and U.S. and non-U.S. students? How did the various groups react to the perceptions of the others when they were not in agreement? Did the chosen characteristics stay at the level of stereotypes and did they exclude variations observable among minorities? The results indicated a surprising level of agreement in the views of the different groups, an awareness of the dangers of stereotyping, and an occasional feeling of discrimination expressed by a group that felt itself outside the accepted norms of the majority.

Sociologists have redefined racism (racialism) and ethnicity in order to bring to our attention historical prejudices that have not yielded in the face of scientific research. On what does successful education for understanding and tolerance of other races, ethnicities, cultures, and mores depend? What role may be played by intellectual understanding or interactive shock role-play exercises in changing cultural attitudes; orientation when in another culture; and checking on cultural adaptation during residence in that culture? Is it possible to define, using systems of universal values, criteria which will unite and promote understanding across cultures, ethnicities, and religions? Can a common culture be taught on the basis of generally accepted values such as love, truth, justice, freedom, unity, tolerance, responsibility, and respect for life?

## **Peut-on définir les traits caractéristiques des cultures ethniques et para ethniques?**

### **Résumé**

- AIS 1: Cultures espagnole et anglo-saxonne: peut-on édifier des ponts par-dessus ces conflits?
- AIS 2: Selon les critères de qui faut-il définir la culture ou les cultures de la communauté espérantophone?

Diverses disciplines académiques ont contribué à la définition de la culture et des cultures. Non seulement des anthropologues, mais aussi des chercheurs en sociologie, histoire, littérature et autres domaines d'études, ont apporté leurs critères dans le but de comprendre le phénomène de la culture humaine.

Quand des groupes différents définissent une culture particulière, est-ce que les mêmes traits sont mentionnés par les personnes appartenant à cette culture et par des gens qui lui sont

extérieurs? Peut-on utilement définir la culture d'un autre peuple sans stéréotypes et sans juger tous les individus selon des critères déjà formulés? Selon une enquête menée pendant de nombreuses années à la faculté de l'université Principia, divers groupes ont défini la culture états-unienne et ses traits caractéristiques: étudiants de première année des Etats-Unis, étudiants internationaux venus de l'étranger, étudiants candidats à la licence d'enseignement des langues, retraités états-uniens fréquentant l'université d'été. Quels critères tous ces groupes ont-ils indiqués, et qu'est-ce qui différenciait les réponses des Etats-uniens de celles des étrangers, ou celles des différentes générations aux Etats-Unis? Comment les différents groupes ont-ils réagi aux perceptions des autres quand elles ne correspondaient pas? Est-ce que les critères choisis en sont restés aux stéréotypes et ont exclu les variantes culturelles observables parmi les minorités? Nous présenterons les résultats ainsi que les conclusions.

Des sociologues ont redéfini les notions de race et d'ethnisme pour tenter de mettre en relief les préjugés historiques qui n'avaient pas cédé devant les recherches scientifiques modernes. De quoi dépend une éducation réussie à la compréhension et à la tolérance d'autres races, ethnies, cultures, mœurs? Quel rôle jouent la compréhension intellectuelle, les exercices de choc interactifs pour changer les comportements culturels, ou l'orientation culturelle interne et le contrôle de l'adaptation culturelle quand on séjourne dans une autre culture? Est-il possible de définir, selon des systèmes de valeurs universels, des critères qui unifient et permettent la compréhension mutuelle par-delà les cultures, les ethnies, et les religions?

## **¿Pueden definirse las características de las culturas étnicas y supra-étnicas?**

### **Resumen**

- AIS 1: La cultura hispánica y la anglosajona: ¿hay puentes para resolver conflictos?
- AIS 2: ¿Según qué criterios han de definirse la cultura o las culturas de la comunidad de hablantes del Esperanto?

Varias disciplinas académicas han contribuido a la definición de cultura, o culturas. Junto a los antropólogos, investigadores de la sociología, historia y literatura han aportado sus criterios para comprender el fenómeno de la cultura humana.

Cuando distintos grupos definen una cultura específica, ¿son acaso mencionadas las mismas características por los individuos pertenecientes a ella y por quienes no? ¿Se puede definir la cultura de otro pueblo de una forma útil sin estereotipos, y sin juzgar a todos los que pertenecen a esta cultura según criterios ya formulados? Por medio de una encuesta llevada a cabo a lo largo de muchos años en la Universidad de Principia en EE.UU., pedí a distintos grupos que intentaran definir la cultura de EE.UU. y sus características: estudiantes estadounidenses de primer año, estudiantes internacionales de otros países, estudiantes candidatos para enseñar idiomas, estudiantes en su mayoría jubilados de un programa de estudios de verano.

¿Qué criterios indicaron miembros de todos los grupos, y qué diferencias había entre las respuestas de estadounidenses y no-estadounidenses, y entre los de distintas generaciones? ¿Cómo reaccionaron los grupos a las percepciones de otros cuando no estuvieron de acuerdo? ¿Los criterios seleccionados se limitaron a estereotipos, excluyendo variantes culturales que se podrían observar en grupos minoritarios? Los resultados demostraron una sorprendente coincidencia entre las visiones de los distintos grupos, conciencia del peligro de los estereotipos, y a veces una sensación de discriminación expresada por un grupo que se consideraba por fuera de las normas aceptadas de la mayoría.

Los sociólogos han redefinido los conceptos de raza y etnicidad con el fin de llamar la atención sobre prejuicios históricos que no han cedido ante la investigación científica. ¿De qué depende el éxito en la educación para la comprensión y la tolerancia de otras razas, grupos

étnicos, culturas, y costumbres? ¿Qué papel pueden tener la comprensión intelectual, los ejercicios interactivos de choque para cambiar actitudes culturales, una orientación durante la permanencia en otra cultura, y el seguimiento de la adaptación cultural durante la permanencia en esa cultura? ¿Es posible definir, según sistemas de valores universales, criterios de unidad que hagan posible la comprensión a través de las culturas, etnicidades y creencias religiosas? ¿Es factible enseñar una cultura de base común fundada en valores ampliamente aceptados tales como el amor, la verdad, la justicia, la libertad, la unidad, la tolerancia, la responsabilidad y el respeto por la vida?

## Ĉu difineblas karakterizaj trajtoj de etnaj kaj preteretnaj kulturoj?

La difino de kulturo kaj kulturoj okupis multajn esploristojn de diversaj akademiaj disciplinoj, kaj inde pritrakti nur tiun temon bezonus minimume kompletan prelegon se ne tutan kurson. Sufiĉu diri ke en ĉi tiu referaĵo mi interesiĝas ne tiom pri la tradicia kulturo de diakrona evoluo de kredaroj kaj kutimaroj, apero kaj foje malapero de monumentoj, herooj kaj ĉefverkoj. Antropologoj evidente atentis tiun evoluon, sed eble plej gravas studado pri la sinkrona kunekzistado de la diversaj evoluintaj kulturoj de la homaro kaj ilia reciproka influo en nia hodiaŭa mondo. Pri tiu temo ankaŭ okupiĝas kompreneble plej diversaj erudiciuloj kaj praktikantoj de plej diversaj sciencoj, artoj, kaj simpla dediĉita, homhelpema vivado: esploristoj pri sociologio, historio, literaturo kaj senfino da aliaj studkampoj. Ĉiu rajtas demandi sin ĉu tutmondiĝo venigos nin al fina kunfandiĝo de kulturoj, pere de kulturatencado, neatentemo pri la perdo de kultura individueco, aŭ simpla akceptado ke ni devos interkonsenti ke unu mondo signifas unu kulturon? Aŭ ĉu ni sukcesos tamen reteni la buntan diversecon de la homaj kulturoj kontraŭ tiu tendenco? Eble tiel ni profitos la avantaĝojn de perspektivo kiu certigas ke ni restos ĉiam observemaj, lernemaj, ĝuemaj de la varieco de niaj kunhomoj kaj iliaj sintenoj antaŭ la homa sperto, la misteroj de nia vivo, kaj la impeto komuniki pri ĝi. Kiel bone scias adeptoj de Esperanto kaj membroj de nia komunumo, neniel estas paradokse deziri komunikiĝi per unu sama lingvo, sur bazo de egaleco kaj reciproka amo kaj respekto, ĉar ĝuste tiu sinteno kondukas al kore sentebla deziro esplori diversajn vivperspektivojn, ne senti sin supera al aliaj grupoj aŭ individuoj, ĉiutage malfermi iom pli la okulojn kaj menson, kaj ĉiam pli kompreni la homan potencialon por fari bonon kaj kunvivi en harmonio. La historio montris ke tiu vojo estas nek la plej facila nek bedaŭrinde la plej kutima, sed por memori la usonan poeton Robert Frost, ni prenas intence la vojon ŝajne malpli vojaĝatan, sed efektive la plej sopiratan de la homaro.

Nu post via bonkora permeso de iom da bela filozofiado, venas nun la momento de raportado pri tre konkreta studo kiun mi faris dum pli ol tridek jaroj kiel profesoro en sama altlernejo usona, kie preskaŭ kvinono de la studentaro estas internacia, ne tre ofta fenomeno en malgrandaj usonaj universitatoj. La demando: kiel difini la tipan kulturon de Usono kaj de usonanoj? Kiam malsamaj grupoj difinas specifan kulturon, ĉu la samaj trajtoj menciigis de personoj apartenantaj al la kulturo kaj ekster ĝi? Ĉu oni povas utile difini la kulturon de alia popolo sen stereotipoj kaj prijuĝado de ĉiuj individuoj laŭ jam formulitaj kriterioj?

Mi komencis tiun studon antaŭ jardekoj en Principia College kiam mi trovis min en interesa situacio. Mi devis instrui klason por studentoj malsukcesintaj lerni lingvojn, ĉefe pro kombino de manko de kapablo kaj de motivoj lerni. La dekanato estis petinta ke mi instruui al ili Esperanton dum unu jaro, ĉar pro malsukceso en aliaj lingvaj klasoj ili ne povus ricevi diplomon se ni ne trovus ian manieron ŝanĝi la sintenon kaj lingve iomete sukcesigi ilin. Vidu, la plej malfacila klaso de mia kariero kaj vi ne trovos tiun grupon inter ni nun! Samhorare, tamen, alterne, mi instruis ankaŭ kurson pri metodoj instrui lingvojn kaj kurson pri la usona kulturo por studentoj el aliaj landoj. Mi parigis ĉiujn lingvostudentojn kun internaciaj, kaj planis foje kune instrui du el la tri klasoj. Kiam mi anoncis al la lingvomalsukcesintoj tiun planon, unu el la lernantoj demandis al mi serioze: “Kiun lingvon oni parolas en Afriko?” Jen la nivelo de konscio pri lingvoj kaj la mondo. Ni ne parolu pri iliaj postaj demandoj al la koncernaj afrikanoj el edukitaj urbaj familioj pri iliaj terkabanaj loĝejoj. Unu el la unuaj ekzercoj por la tri klasoj estis klopodi difini kio estas “usona kulturo” kaj kio kulture difinas usonanon. Nu, ni ne vere havas la tempon por plene fari tiun ekzercon nun, tamen prenu duonminuton por pripensi, aŭ prinoti laŭdezire, kio venas al vi en la kapon kiam vi pripensas usonan kulturon?

Bone, ni apenaŭ povas tuŝi ĉi tiun temon, evidente. Mi tamen reliefigu kelkajn konkludojn kiuj povus interesi. Ĉiuj grupoj, inkluzive postajn klasojn de somerkursanoj, klare indikis ke unu karakteriza trajto de usonanoj estas ilia kredo ke “ni estas la unuaj en la mondo”: Usono la plej bona lando, usonanoj la plej bona popolo. Kio interesas tamen ne estas la nura konstato: estas la sintenoj pri tiu konstato. La unuajaraj studentoj, memoru unufoje en la sepdekaj jaroj, estis tute konvinkitaj ke tio estas la objektiva vero. La pravigo esprimiĝis per la ideo ke “ĉiuj volas enmigri, neniŭ volas elmigri” kun la lingva konstato ke “ĉiuj en la mondo parolas la anglan aŭ lernas ĝin” (kaj pro tio kial ni lernu aliajn lingvojn!) kaj kompreneble sopiras al la sama usona kulturo kiun ni mem ĝuas. Por la internaciaj studentoj, tiu perceptita sinteno estis unu el la plej ĝenaj kaj ofendaj, ĉar ili ne povis ne pensi ke iliaj usonaj studentaj kunuloj kredas sin superaj. Foje senpripensaj rimarkoj de studentoj sen sperto vivi kun rasaj kaj kulturaj minoritatoj povis nur refortigi la ideon kaj krei situaciojn malfacile solveblajn. La kandidatoj por esti lingvoinstruistoj jam sufiĉe spertis tiajn antaŭjuĝojn de la kunuloj, kaj ne malofte enamiĝis al la pristudata kulturo tiom, ke ili revenis de studjaro eksterlande al sia propra lando kun multaj sindemandoj kaj eĉ severaj ĉagreniĝoj pri la hereditaj sintenoj, kaj deziro helpi ŝanĝi tiujn en la lingvoklasoj por kiuj ili prepariĝis instrui.

La plenaĝuloj kaj emeritoj ofte supraĵe esprimis la saman sintenon kiel la unuajaruloj, tamen estis pli pensemaj kaj foje havis spertojn eksterlande kiuj montris la valorojn de aliaj kulturoj kaj aliaj individuoj. Ili povis konstati ke la supraĵaj aspektoj de la kulturo ne donis feliĉon. Kelkaj, pli liberalaj, argumentis ke ĝuste tiu sinteno kaŭzis grandan parton de la problemoj kiujn suferis Usono en siaj internaciaj rilatoj. Nu, grava demando. Ĉu ŝanĝiĝis tiu bildo en la lastaj jaroj, aparte por la novaj studentoj de nia generacio?

Parte ne, kaj parte jes. Unuflanke, la usona kulturo daŭre resendadas al la heredaĵo de la “lando de libereco”, lando de abundo, jes, du el la plej menciitaj karakterizaj trajtoj, kaj al la ideo ke se vi estas preta laboregi (jen la laboretiko), vi povas havi ĉion kion vi deziras en ĉi tiu mondo, kaj tio, kompreneble, nur en Usono. Konkurenci kaj venki! Jen alia idealo kiu neeviteble sekvas tiun. La unua leciono kiun instruis al mi laboristo en mia unua laborejo en Usono estis tiel: “Duncan, vi ne plu estas en Anglujo. En Usono la mono estas kiel akvo. Vi havos kion vi deziras se vi pretas labori por ĝi”. Mi simple ne sciis kiel reagi al tio! Se vi energie agos, vi atingos. Eĉ kun geamikoj, preferinde estas ion fari kun ili, ne nur sidi kaj babili kaj ĝui la kunestadon. Tempo valoras, kaj oni uzu ĝin aktive kaj ĉiam planu por komenci novan agadon je la ĝusta horo, senkonsidere pri tio ĉu iu daŭre bezonas vian atenton. Je la alia flanko, tamen, mi tre dubas ĉu mi aŭdus hodiaŭ la diraĵon kiun mi ĵus citis pri la egaleco de monabundo kun akvoabundo. Post ekonomiaj krizoj, militperdoj, terorismo kaj naturkatastrofoj, malpli da homoj kredas ke Usono havas la solvon de ĉiuj problemoj de la mondo, kaj junaj usonaj studentoj estas tre realecaj pri la neceso ŝanĝi multajn antaŭsupozojn de la usonaj vivo kaj kulturo. Revenante al la feliĉo, interese estas ke unu el miaj profesoroj, usonano origine hispana, en unu klaso subite forte protestis ke la usona idealo de la rajto al “ĉasado de la feliĉo” estas terure misgvida kaj danĝera por la usonanoj, ĉar pro tio ili emas kredi ke la feliĉo estas celo kiun ili perlaboro aŭ perforte atingu, anstataŭ rezulto de neegoisma, sindona vivo.

Ankaŭ la ideo ke oni povas ĉion regi en la vivo ricevis sufiĉe fortajn batojn okaze de ekologiaj kaj aliaj katastrofoj. Se io misiras aŭ malnovas, oni ŝanĝu ĝin! (alia gvida principo de la kulturo). Ĉion oni povas solvi. Oni bezonas nur brilan ideon kaj laboremon por efektiviĝi ĝin. Ĉiuj grupoj kiuj respondis al mia tasko konsideris ke entreprenemo, individuismo kaj pragmatismo ege gravas en la ĉirkaŭanta kulturo. Multaj estimis la liberecon kiun donis tiu koncepto, tamen la internaciaj studentoj kredis ke manko de socia protektemo faris tion malavantaĝo kaj ili vidis en la socio suferadon de personoj kiuj ne ricevadis sociajn servojn kiel en aliaj kulturoj. Tiuj studentoj el eksterlando tiom pli rezistas la juĝemon kiun ili sentas en kelkaj usonanoj pri iliaj kulturoj, ankaŭ el morala vidpunkto. “Informiĝu kaj rigardu vin mem”, ili protestas.

Okazis sufiĉe grava kultura ŝanĝo antaŭ pli ol 30 jaroj, kaj ĝuste pro tio multaj el la trajtoj kiujn mi citis, kvankam herede ankoraŭ parto de la kulturo, komencas transformiĝi. Profesoro pri historio ĉe la universitato diris ke estis treege malfacile antaŭ 40 jaroj instrui pri la usona historio, ĉar ĉiuj prezidentoj estis por mezlernejaj instruistoj kaj iliaj lernejoj herooj kiuj povis nenion malbonan fari. Nun tiu problemo ne plu ekzistas, kaj oni povas kaj rajtas ekzameni la malfeliĉajn partojn de la usona historio kaj la ne tiel perfektajn karakterojn de kelkaj prezidentoj.

Mi aludos al unu alia karakteriza trajto kiu ŝajne restas, sed kiun aparte rimarkis la emeritoj: la malamo de la kulturo al ĉio malnova kaj maljuna. Eĉ gejunuloj, tamen, konsentas kaj aparte junulinoj. Atinginte 25 jarojn ili povas pensi ke ili jam troaĝiĝis, ne plu estas allogaj, kaj jam ne povos ĝui la vivon. Filmoj, televidprogramoj konstante gloras junecon kaj vigecon, kaj la maljunuloj iras al prizorgejoj kie ili ne ĝenu la pli junajn familianojn kaj ne estu videblaj (tiu estas stereotipo kiun mi aŭdis treege ofte de eksterlandanoj, kaj evidente tio ĝenas aŭ eĉ minacas alikulturajn familiajn valorojn, malgraŭ tio ke mi trovas la interpreton tro tordita por akcepti tiel kiel mi ĝin prezenti).

Kaj ni ne parolis pri la stereotipoj de usonaj filmoj kaj amaskulturo. Tro evidentaj! Mia sperto instruis ke multe misgvidas usonanojn kaj eksterusonanojn precize la stereotipoj kiujn mi detaligis ĉi tie. Kial? Ĉar oni pretervidas la individuecon kaj indulgas “antaŭmisperceptojn” kiel rimarkigis unu el miaj profesoroj. Kaj oni ne enkalkulas gravajn kulturajn nuancojn. “Usonanoj estas bruemaj, laŭtaj!” “Usonanoj estas amikemaj, malfermitaj!” Jes, tute prave, tamen kunteksta difino necesas: kiam oni deziras profundan konversacion kun multaj usonanoj, ili fariĝas silentemaj, embarasitaj, ne plu tiel malfermitaj. Tion rimarkis tra la jaroj centoj da internaciaj studentoj. Temas pri tio ke usonanoj fieras havi amason da geamikoj, sed intimeco kun kelkaj povas esti malfacila, kaj multaj ne tiom atentigas ekzemple politikon kaj filozofion. Tio neniel signifas ke usonanoj estas hipokritaj pri amikecoj aŭ baze neinteligentaj. Kiel ĉiuj homoj, ili povas esti treege saĝaj, fidelaj, sindonemaj familianoj, kolegoj, amikoj, kaj mi ofte miris pri la profunda sincero de ilia lojaleco. Tamen oni komprenu ke alikuntekste bonaj aspektoj de la kulturo povas tion kaŝi aŭ malfaciligigi. Ne utilas nur kritiki, sed se oni konas tiujn tendencojn, eblas kompensi, helpi, vidigi tion kio plej bonas en alia kulturo. Tiun aventuron mi ĉiam alte taksas.

Mi memoras du tiajn aventurojn en Hispanujo. Mi estis iam en duhora kvazaŭbatalo kun hispano pri personaj kaj religiaj kredaroj. Por mi tio estis terura sperto. Mi sentis min parole tute atakita. Tamen post kelkaj semajnoj amiko diris ke tiu hispano tiel alte taksis nian konversacion ke li laŭdis miajn ideojn al ĉiuj gekonatoj. Tiam mi komprenis ke hispanoj povas de la komenco konatiĝi enirante konfliktajn temojn, kaj oni neniel ofendiĝu pri tio. Ili deziras lerni de tia interparolado. Usonanoj ofte timas tion, kaj ne eniros konfliktojn por esti “toleremaj”. Tamen por hispanoj tia “toleremo” povas indiki tutan fidomankon pri la propraj ideoj kaj konvinkigoj, tute ne akceptabla situacio por vera homo kies kredoforto indu plenan akcepton de la vivofertaro. Persona ofendiĝo povas esti unu el la plej subfosaj trajtoj de la usona kulturo, ne nur eksterlande sed ankaŭ inter la usonanoj mem, kaj mi nun komprenas ke tre utilas praktika, situacisimula trejnado ĝuste pri tiaj kulturaj konfliktoj. Tio ne signifas ke mankas personaj ofendiĝoj en aliaj kulturoj (efektive oni tion suferas pli ol devus esti en la Esperanta), sed mi trovis tiun trajton iom ekstrema en miaj usonaj vivspertoj. Mi dufoje aranĝis kun kuzo, kiu instruis en Madrida altlernejo pri komerco, ke miaj studentoj eliru kun la liaj por konatiĝi kaj praktiki la anglan kaj hispanan lingvojn. Post la reveno de la unua grupo, miaj studentoj estis ravitaj kaj volis tuj aranĝi alian renkontiĝon. Jen finfine vera sperto kun gejunuloj de ilia aĝo! Tamen telefonvoko al mia kuzo malkaŝis tute alian impreson. Liaj studentoj neniam volis revidi la niajn, ĉar ili estis tro superfluaĵoj, volis paroli nur pri muziko, filmoj, vestaĵoj kaj modo, kaj aliaj ĉiutagaĵoj. Miaj studentoj sentis sin tre ofenditaj kiam mi devis komuniki al ili la rifuzkialon. En posta okazo, aliaj studentoj revenis kun samaj sentoj kiel mi post mia duhora batalado pri mia vivfilozofio. “Neniam faru tion al ni denove! Tiuj hispanoj



pasigis la tutan nokton atakante nin, niajn valorojn kaj nian usonan kulturon. Teruraj homoj!” Mi retelefonis al mia kuzo. Alia katastrofo, ĉu ne? Lia respondo: tute ne! Niaj studentoj volas k.e.p. baldaŭ renkontiĝi denove kun la viaj. Ili estis ravitaj. Unuafoje ili renkontis junajn usonanojn kiuj kapablas pensi! En ambaŭ kazoj, dua renkontiĝo ne okazis, malgraŭ tio ke mi intelekto informis pri tiaj kulturaj diferencoj en la orientiĝo. Kiam mi komencis uzi similitajn situaciojn, tamen, mi rikoltis pli da sukceso, kaj se studento renkontis situacion kiun ni antaŭpreparis, kaj sukcesis eviti la kulturan kaptilon, tiu tiom ĝojis kaj eksentis la internan ĝuon de transkultura interkompreniĝo.

En ŝlosila verko *Living in Latin America* (Vivi kaj loĝi en Latinameriko), Raymond Gordon montris ke kiam lernejoj kaj studentoj el Usono loĝis en latinamerikaj hejmoj, okazis en ĉiu kazo embarasa kvantego da kulturaj miskomprenoj inter la gastoj kaj la gastigantoj. Tiel multaj, ke oni neniel diru ke konduto en alia kulturo estas tute intuicia. Necesas intelekta kompreno, tamen tio ne sufiĉas pro la dumviva alkulturiĝo al nur unu kulturo, kaj la senorientiĝo kiun oni kutime spertas en kulturo nekonata. Utilas prepari lernejojn kaj studentojn antaŭ interkultura sperto, kaj treege utilas ŝoksituacioj en kiuj la lernantoj misinterpretas kaj sentas sin konfuzitaj, kondiĉe ke oni emocie subtenu ilin kaj montru kaj praktiku kiel elturniĝi aŭ korekti la problemon. El centoj da studentoj intervjuitaj, evidentiĝis post intervjuado de la familioj ke al neniuj mankis seriozaj komunikproblemoj pri la plej bazaj ĉiutagaj agoj, el kiuj multaj temis pri la simpla uzo de la banĉambro (kiam, kiom longe, haveblo kaj uzado de varma akvo, lavado de subvestaĵoj, uzado kaj pendigado de tiuj kaj de tukoj, kiom oni purigu kaj enordigu, ktp.). Certe esperantistoj vojaĝantaj per Pasporta Servo ne estas imunaj al tiaj problemoj, kaj utilis kulturaj gvidiloj je tiu nivelo. Tamen la Esperanta kulturo permesas kaj sufiĉe grandan komprenemon kaj flekseblon pri la kulturaj kutimoj de samideanoj, kaj oni ankaŭ kutimas al senĝena klarigado pri la vivkutimoj de la gastigantoj kaj pridemandado al la gastoj rilate necesajn informojn por harmonia kunloĝado. Se neniuj intencas ofendi kaj neniuj permesas al si ofendiĝi nur pro malsama kultura kutimo kiu tamen validas aliloke, la aranĝo normale funkcias kaj oni povas lerni el tio kaj ridi pri eventualaj mispaŝoj laŭ la percepto de la lokuloj.

Je tute alia nivelo estas baza principaro pri preterkultura komunikado, kaj ĝuste tio interesas nin, ĉar ni celas respekti kaj ĝui aliajn kulturojn kaj tamen senti bazan unuecon kiu fontas el amo kaj respekto al aliaj individuoj kaj al la respektindaj trajtoj de la kulturo kiun ili reprezentas. Se tio esprimiĝas kaj sukcese komuniĝas inter individuoj kulture tre diversaj, tiu sento kaj intuicio bagateligas precize la negravajn kulturajn diferencojn kiuj plej ĝenas aliajn personojn. Kiajn homojn tiuj ĝenas? Tiujn kiuj restis aŭ deziras resti enfermitaj en siaj kulturaj kredaroj kaj preferoj eĉ kiam ili vojaghas al plej malsamaj lokoj kaj interagas kun personoj de profunde malsamaj kulturoj. Se iu funkcio aŭ kutimo ne samas kiel la nia, ĝi ne povas esti tiel bona!

Ĉu eblas difini laŭ universalaj valorsistemoj kriteriojn kiuj unuigas kaj ebligas interkomprenon trans kulturoj, etnoj kaj religioj? Ĉu eblas instrui komunan kulturon surbaze de ĝenerale akceptitaj valoroj kiel amo, vero, justeco, libereco, unueco, toleremo, respondeco kaj respekto al la vivo?

Mi dum jaroj kunlaboris kun koleĝino kiu helpis pri orientiĝo kaj adaptiĝo de niaj internaciaj studentoj. Al ĉiu nova studento kaj studentino alveninta el kiu ajn lando de la mondo ŝi esprimis senpartie kaj senantaŭjuĝe sian respekton kaj amon, kaj deziron lerni ĉion kion ŝi povis pri ili kaj iliaj vivspertoj kaj defioj. Ŝi estis kompreneble amata de ĉiuj senescepte, neniun ofendis kaj ĉiujn povis konsili. Kiel kristano, ŝi insiste akceptis nur Kristecajn kvalitojn en sia pensado kaj en la pensado de la studentoj, kaj klarigis ke tiu vojo estas tute malfermita al ĉiuj laŭ siaj principoj, ĉu kredantoj aŭ ne. Temis pri granda humileco antaŭ la tasko kompreni aliajn, kaj pri la bonaj rezultoj kiujn ŝi atendis sperti de la interagado, kio nature favorigas la klimaton. Kiam ŝi vojaĝis, ĉiam ŝi preparis sin komprenante la plej altajn valorojn de la kulturo kiun ŝi intencis viziti. Plejofte ŝi ne regis la lingvon de la lando, tamen ĉiam lernis kelkajn ŝlosilajn frazojn por malfermi la pordojn, esprimi sian dankemon kaj indiki senton de amikema egaleco.

Inter la frazoj kiujn ŝi intence lernis estis “Mi amas vian landon!”. Kiam sincere esprimita kaj evidenta en la sinteno, intereso kaj konduto, tiu sento estas vojo al la koro de la gastigantoj.

Kiel esperantistoj, ni konas la “internan ideon” de Esperanto kaj la celon de la “homaranismo” de Zamenhof. Ne ĉiuj konsentas pri tio, kiom tiuj estu integritaj en la instruadon de la lingvo mem. Krome, ni ankoraŭ tre malfacile difinas nian “kulturon” kaj necesas atenti avertojn kiel tiujn de Jorge Camacho en sia artikolo “La esperanta malpopolo” aperinta en la festlibro por Humphrey Tonkin, *La arto labori kune*, eldonita ĉi-jare de UEA. Mi aŭdacas nun difini nek la Esperantan kulturon nek kian universalan kulturon per ŝi respegulu Esperanto. Tamen, interesas min la studoj de usona eks-profesoro kaj eks-ĵurnalisto Rushworth Kidder, kiu en kelkaj verkoj raportis siajn enketojn en diversaj kulturoj pri la valoroj kiujn la homoj kredas akceptindaj en ĉiuj kulturoj. Laŭ d-ro Kidder, nun direktoro de la *Institute for Global Ethics* (Instituto por Tergloba Etiko) en Maine, la valoroj plej akceptitaj en ĉiuj kulturoj inkluzivas la antaŭe menciitajn: amo, vero, justeco, libereco, unueco, toleremo, respondeco kaj respekto al la vivo. Se tiuj estas vere interkulturaj, ripetablaj kaj persistemaj, malfacilas argumenti kontraŭ tia kerno de universalaj valoroj. Eble unu el la plej gravaj taskoj estas kompreni kiel tiuj valoroj esprimiĝas tra la lensoj de diversaj kulturoj. Tiel ni povos enketi kaj demandi por lerni kaj kompreni kiel oni aktivigas en difinita mondparto aŭ etna grupo la amon al homfratoj inter individuoj, en familioj, en lernejoj, societoj kaj la socio ĝenerale. Kaj same pri la aliaj universalaj valoroj. Kiom ni povus lerni por pliriĉigi nian propran koncepton pri tiuj valoroj kaj iliaj asociitaj kvalitoj? Povas flui de la amo komprenemo, kompatemo, ĝentileco, neperfidemo, pacienco, senegoismo, nekoleremo, ĉio asociita kun la “Ora Regulo” trovata en multaj religioj kaj humanismaj kredaroj, deziro helpi kaj plibonigi la vivon de aliaj. Oni povas studi la specifajn formojn de tiuj esprimiĝoj de la amo en diversaj kulturoj, kaj per tio ni havos la bazon por pli da komprenemo, kaj pli granda sento de unuiĝo kun samtempa ĝuo de tiu diverseco el kiu ni mem povos lerni por progresi en niaj interhomaj rilatoj. Oni povas montri la rezultojn de neakcepto de tiuj valoroj, kaj instrui specife en klaskondiĉoj kiel pli bone aŭskulti, ne interveni por silentigi aliajn, reprezenti la opiniojn de aliaj kundiskutantoj, esti malfermita al ŝanĝo de opinio post akiro de pli da informoj. Gravas instrui interkulturajn rilatojn kaj interkompreniĝon, ĉar kiel atentigis Alvino Fantini, simpatianto de Esperanto kiu dum jardekoj estris la fakon pri lingvolernado ĉe la Lernejo pri Internacia Kunvivado (SIT) en la usona ŝtato Vermonto, tio kion oni lernas pri interkulturaj rilatoj multe helpas en ĝeneralaj interhomaj rilatoj, kaj inverse. Tiuj kapabloj estas pli parencaj ol oni antaŭe kredis, kaj urĝe necesaj en nia mondo, same loka kiel terglabe. Ni daŭre pensu pri tio, kian kulturon ni deziras vidi por ni mem kaj en la mondo? Ĉu ni daŭre identigas nin kun difinita, limigita homgrupo kaj ĝiaj valoroj ĉar ni sentas nin pli komfortaj kun ĝia lingvo, ĝia konduto, ĝia vivperspektivo? Aŭ ĉu nia identeco dependas pli de niaj propraj valoroj kiel ni evoluigis ilin en respektama kontakto kun aliaj? Kaj de la kvalitoj kiujn ni rekonas en ni mem kaj en aliaj membroj de plej diversaj kulturoj? Kaj de la kompreno kaj akcepto el kiu ajn kulturfonto de tiuj idealoj kiuj plej esence kaj plej profunde kongruas kun la niaj, kaj kun la intereso de la tuta homaro?

# Protektado de la Medio kaj daŭropova evoluo



## **M. Rafaela Urueña Alvarez**

Naskiĝis en Bilbao (Hispanio) 1942, kaj studis Juron en Valladolid, finante la karieron kun “eksterordinara premio”. En 1979 doktoriĝis pri Juro “cum laude”. Ekde 1986 ŝi estas profesorino pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Fakultato pri Juro de la Universitato de Valladolid. Aŭtoro de diversaj libroj kaj artikoloj, ĉefe pri Juro de la Maro, Medioprotektado kaj Eŭropa Unio. Membro de la Katedro “Jean Monnet” pri Komunuma Juro kaj fondinta membro de la Instituto pri Eŭropaj Studoj de la Universitato de Valladolid. Ekde 1960 ŝi aktivas en la E-movado, kaj de 1978 ĝis 1984 prezidis la Hispanan Esperanto-Federacion. En 1991, unua Prezidanto de la novkreita Internacia Esperanto-Asocio por Juristoj (EJA). Membro de UEA, Jura Asocio, Hispana Esperanto-Federacio kaj Akademio de la Sciencoj de San Marino.

## **Resumo**

Ene de la Jardeko (2005-2015) pri edukado por la daŭropova evoluo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN), la protektado de la medio estas esenca por la nunaj kaj la estontaj generacioj. Sed tiu protektado ne aperis en la fruaj tempoj de la ekzisto de UN, ĉar tiu temo ne maltraktivigis la internacian komunumon. En la sesa jardeko, oni subskribis la unuajn internaciajn traktatojn pri protektado de la maro, post kelkaj akcidentoj kaŭzigitaj de petrolŝipoj, kaj la internacia komunumo prenis konscion pri la problemoj de la ĉiaspekta poluado kaj la eblaj konsekvencoj por la biosfero, la planedo kaj la homaro. Sekvis gravaj konferencoj, nome, tiu de Stokholmo pri la Homa Medio de 1972, kaj tiu pri Medio kaj Evoluo, de Rio de Janeiro en 1992, tiu lasta finiĝinta per du nedevegaj tekstoj kaj du gravaj traktatoj: tiu pri Klimatŝanĝo kaj tiu pri Biologia diverseco. Post tiuj konferencoj sekvis tiu de Johannesburgo 2002, kie denove oni fiksas ke la ekonomia, socia evoluo kaj la protektado de la medio estas kompletigaj por la daŭropova evoluo.

Inter la diversaj aspektoj de tiu protektado, troviĝas la problemoj pri la tutmonda klimatsanĝo, sekvo de la poluado de la atmosfero kaŭzata de nia propra vivmaniero, kiu kunportas, inter aliaj konsekvencoj, la t.n. “acidan pluvon”, la reduktadon de la ozontavolo, kaŭzo de malsanoj por la homoj kaj vivantaj estaĵoj, kaj la varmigon de la planedo (forcejefikon)?

Alia grava problemoj estas la manko de akvo en la mondo. La akvo estas fonto de vivo kaj samtempe fonto de konfliktoj, kaj UN kaj FAO konstataj la fakton ke pli ol mil milionoj da personoj en la mondo havas nek kvon nek kloaksistemojn. La homa rajto al sana medio kaj al akvo, agnoskata en multaj internaciaj deklarioj kaj eĉ en naciaj konstitucioj, kolizias en la praktiko kun la problemoj kiel efektiviĝi tiun rajton.

Tio ofte kaŭzas militojn, kaj la t.n. verdajn konfliktojn, en diversaj partoj de la planedo. Videblaj estas ne nur en Mezoriento (riveroj Tigriso kaj Eŭfrato) kaj en Afriko, sed ankaŭ en aliaj kontinentoj.

## **Protection of the environment and sustainable development**

### **Summary**

In the context of the Decade of Education for Sustainable Development (2005-2015) designated by the United Nations, protection of the environment is essential for current and future generations. But that protection did not appear in the early part of the UN's existence because

the topic did not worry the international community. The first international treaties concerning protection of the oceans were signed in the 1960s after several accidents caused by oil tankers, and the international community became aware of the problem of pollution of all kinds and the possible consequences for the biosphere, the planet and mankind's development. Other important conferences followed, namely the 1972 Stockholm Conference on the Human Environment, and the Rio de Janeiro Conference on Environment and Development in 1992, the latter finishing with two non-binding texts and two important treaties: one on climate change and one on biological diversity. Those conferences were followed by the one in Johannesburg in 2002, where it was again confirmed that economic and social development and protection of the environment are complementary for sustainable development.

Among the various aspects of that protection there is the problem of global climate change, a consequence of atmospheric pollution caused by our own way of life, which brings with it, among other consequences, so-called “acid rain”, depletion of the ozone layer, a cause of illness for humans and other living things, and global warming (greenhouse effect).

Another major problem is the shortage of water in the world. Water is a source of life and at the same time a source of conflicts. The UN and its Food and Agriculture Organisation recognise that more than a thousand million people in the world have neither water nor sewerage systems. The human right to a healthy environment and to water, recognised in many international declarations and even in national constitutions, conflicts in practice with the problem of how to implement this right.

This often causes wars, and the so called green conflicts, in various parts of the planet. These are visible not only in the Middle East (the Tigris and Euphrates rivers) and in Africa but also on other continents.

## **Protection de l'environnement et développement durable**

### **Résumé**

Dans le cadre de la Décennie (2005-2015) pour l'éducation en vue du développement durable proclamée par les Nations Unies, la protection de l'environnement est essentielle pour les générations présentes et à venir. Mais cette protection n'est pas apparue dans les premiers temps de l'existence de l'ONU, car ce sujet ne préoccupait guère la communauté internationale. C'est dans les années soixante que furent signés les premiers traités internationaux sur la protection de la mer, après quelques accidents provoqués par des pétroliers, et c'est alors que la communauté internationale prit conscience du problème de la pollution sous tous ses aspects et des conséquences possibles sur la biosphère, la planète et le développement de l'humanité. S'ensuivirent d'importantes conférences, comme celle de Stockholm sur l'Environnement Humain en 1972, et celle de Rio de Janeiro sur l'Environnement et le Développement en 1992, cette dernière débouchant sur deux textes non coercitifs et deux traités importants: celui sur le changement climatique et celui sur la biodiversité. A ces conférences succéda celle de Johannesburg en 2002, où on établit de nouveau que le développement économique et social et la protection de l'environnement sont complémentaires au développement durable.

Parmi les divers aspects de cette protection se trouve le problème du changement climatique planétaire, consécutif à la pollution de l'atmosphère causée par notre propre mode de vie, qui comporte, entre autres conséquences, les “pluies acides”, la réduction de la couche d'ozone, cause de maladies pour l'homme et les êtres vivants, et le réchauffement de la planète (effet de serre).

Un autre problème important est le manque d'eau dans le monde. L'eau est source de vie et en même temps source de conflits, et l'ONU et la FAO constatent le fait que plus d'un milliard de personnes dans le monde n'ont ni eau ni système d'égouts. Le droit de l'homme à un environnement sain et à l'eau, reconnu dans nombre de déclarations internationales et même

dans des constitutions nationales, se heurte dans la pratique à ce problème: comment rendre ce droit effectif.

Cela cause souvent, en divers endroits de la planète, des guerres et ce que l'on appelle les « conflits verts », qui apparaissent non seulement au Moyen-Orient (le Tigre et l'Euphrate) et en Afrique, mais aussi sur d'autres continents.

## **Protección del medio ambiente y desarrollo sostenible**

### **Resumen**

Todos somos conscientes de la grave situación por la que atraviesa el medio ambiente, debido a los distintos tipos de contaminación a los que se ve sometido. Dañamos la biosfera, espacio en el que vivimos y los océanos en los que el zooplancton, el fitoplancton nutren la vida marina. Por eso hemos de cuidar el entorno a todos los niveles, local, nacional e internacional, pues la contaminación no conoce fronteras. Hay, sin embargo, espacios que están sometidos a la soberanía de varios Estados, por ejemplo, los grandes ríos o lagos internacionales y en estos casos, siempre es necesaria la debida cooperación interestatal.

La defensa del medio ambiente no ha comenzado sino hasta épocas recientes, en que dos fechas son esenciales: 1972 en que se celebró la Conferencia de Estocolmo y 1992 en que se reunió en Río de Janeiro la Conferencia sobre medio ambiente y desarrollo, ambas bajo los auspicios de Naciones Unidas. En esta última se firmaron el Convenio sobre el Cambio Climático y el de la Diversidad Biológica. Sentimos el cambio climático en el calentamiento global, por el que los glaciares retroceden, se eleva el nivel del mar, hay más enfermedades etc. y a la vez estamos haciendo desaparecer parte de las especies y de los ecosistemas.

Quizá la más llamativa es la contaminación de los mares, ya sea por los graves accidentes causados por los superpetroleros que surcan los mares, ya por vertidos voluntarios de hidrocarburos o por accidentes en las plataformas petrolíferas, como el de este año en el Golfo de Méjico. Naturalmente, hay otros tipos de contaminación, de las aguas dulces, contaminación química, por plásticos o baterías e incluso por residuos de todo tipo, siendo los más peligrosos los residuos radiactivos.

A nivel internacional existen muchos convenios para cada tipo de contaminación, pero es la Unión Europea la que desde 1972 ha dado normas más rigurosas, especialmente por medio de Directivas, para hacer cumplir dichos convenios.

Como afirma la Carta de la Tierra, debemos unirnos para crear un mundo que respete la naturaleza, para dejar a las generaciones futuras, una sociedad donde pueda mantenerse el desarrollo sostenible.

## Protektado de la Medio kaj daŭropova evoluo

Ni ĉiuj devas esti konsciaj pri la grava situacio de la medio, ĉefe dum la lastaj jardekoj. La mondo estas minacata de la industria funkciado, de la amasa konstruado de loĝejoj, ne ĉiam en la plej taŭgaj lokoj, nocaj gasoj, plastikaĵoj, nigraj tajdoj, kiuj kaŭzas malekvilibran evoluon kaj neelteneblajn situaciojn.

Tamen tiu konscio komenciĝis nur post gravaj poluaj akcidentoj okazintaj sur la tero, en la riveroj, en la aero kaj en la maroj. Ĉio ĉi kaŭzas fenomenojn kiel damaĝon al la ozontavolo, senarbarigon, klimatŝanĝon, akumuladon de rubaĵoj, perdon de biodiverseco kaj fine povas trafi la homan vivon.

Terminologie la medio estas malfacile difinebla. Oni parolas pri la medio aŭ la homa medio dum oni ne trovas jurajn tekstojn kun iu difino, sed estas multaj dokumentoj kun aludoj al la rilato inter la medio kaj la homoj.

Unesko aprobis la programon Homo kaj Biosfero (Man and Biosphere), uzante la terminon *biosfero* por nomi la tutan medion. La biosfero estas tiu parto de la tero en kiu koncentriĝas kaj evoluas la vivo. Temas pri fajna tavolo kiu ĉirkaŭas la teron, konsistanta el la malaltaj partoj de la atmosfero, la oceanoj, la surfaco de la tero, do tie kie vivo eblas. En la oceanoj, la vivo okazas tie kien eniras lumo, kiu permesas vivi al la fitoplanktono kaj zooplanktono, sed eĉ en la marfundoj estas vivestaĵoj.

Oni substrekas la devon konservi la interrilaton homo-medio, kiu devas esti ekvilibra por la postvivado de la homaro. En 1996 la Internacia Kortumo de Justico de la Unuiĝintaj Nacioj (UN) asertis ke “la medio ne estas abstrakta koncepto, sed la spaco en kiu vivas la homoj kaj de kiu dependas ilia vivkvalito kaj sano, eĉ tiu de la venontaj generacioj”. En la sama senco, la unua principo de la Deklaracio de Stokholmo 1972 tekstas jene: “la homo havas fundamentan rajton ĝui taŭgajn vivkondiĉojn kiuj permesu al li plenumi dignan vivon kaj bonfarton”.

Ĝuste por tiu celo, naskiĝis la t.n. Internacia Juro de la Medio, kun la celo gardi la postvivadon de la homaro, por la nunaj kaj estontaj generacioj. Tiel, la ŝtatoj ne estos la nuraj kiuj devas defendi ĝin, sed ankaŭ la internacia komunumo por ĝia komuna celo. Pro tio, la ŝtatoj, internaciaj organizoj kaj ni mem devas zorgi la sanon de nia planedo je la intereso de la tuta homaro.

Profesoro Kiss<sup>1</sup> opinias ke estas du tendencoj rilate la medion: la antropocentrismo, kiu submetas ĉion al la rapida utileco kaj al la ekonomio, favore al la nuna homo, kaj kiu pensas ke la tero estas sufiĉe ĵusa fenomeno kaj la rimedoj ankoraŭ ne estas elĉerpeblaj. Aliflanke, estas la ekocentrismo, nome kontraŭ la antaŭa aserto, ĝi defendas ke la homo estas parto de la medio kiun li devas gardi kiel tuton. La homo partoprenas la ĝeneralan ekosistemon.

Jam tre bone kaj klare estas difinita la koncepto pri poluado, ĝi ĉiam rilatas al la agado de la homo, rekte aŭ ne rekte, noca por la medio mem aŭ por la diversaj spacoj kiujn ĝi entenas.

Laŭ tio, kiu devas prizorgi la medion? Kompreneble, tio dependas de la loko kie okazas la poluado. Ĝenerale, se iu rivero aŭ la aero de urbo poluiĝas, la respondo devas esti je loka nivelo, sed se tio okazas je pli granda skalo, aŭ oni devas havi ĝeneralan normon por la tuta lando, la ŝtatoj estas tiuj kiuj havas ekskluzivajn kompetentojn sur siaj tera, mara kaj aera teritorioj.

Sed estas kelkaj spacoj de nia planedo kiuj ne estas submetitaj al la jurisdikcio de la ŝtatoj: alta maro, oceanaj fundoj, kelkaj internaciigitaj zonoj kiel la Antarkto, kaj la ekstertera spaco. Tiuj, ne dependantaj de ajna ŝtata jurisdikcio, devas esti protektataj kolektive, kiel komunaj spacoj (*res communis omnium*, laŭ la klasikaj internaciistoj). Vere apenaŭ estas aŭtoritato por defendi ilin. Nur por la maro, post la konvencio de Jamajko 1982, UN starigis la Aŭtoritaton por la Marfundoj kaj eĉ Maran Kortumon. Tamen, neniu defendas la eksteran spacon, kvankam vere nek la fiŝoj aŭ la migrantaj birdoj nek la poluado konas landlimojn.

---

<sup>1</sup> KISS, A. Ch. kaj BEURIER, J.-P. (2004) *Droit International de l'environnement* Pedone, Parizo.

Ankaŭ estas aliaj spacoj submetitaj al la suvereneco de pluraj ŝtatoj, kiam estas elementoj kun komuna ekologia valoro. Ekzemple, la grandaj riveroj kiuj trapasas plurajn landojn, lagoj, arbaroj, aŭ neanstataŭigeblaj ekosistemoj. Por tiuj kazoj oni devas ĉiam kunlabori kaj ĉefe Unesko pledas favore al ilia defendo.

Do, ni konstatas la gravecon de la translima poluado kiu estas tiu kiu komenciĝas en difinita lando kaj kies konsekvencojn oni povas sperti tre malproksime, translandlime.<sup>2</sup> Tiel okazis gravaj maraj akcidentoj, aŭ tiu de la nuklea centralo de Ĉernobilo, okazinta en 1986, kies poluado atingis la duonon de la eŭropaj landoj.

Oni devas antaŭvide eviti poluadon, kaj post iu akcidento, kunlabori por eviti pli da damaĝoj. Por alfronti la transliman poluadon, ne nur la najbaraj ŝtatoj devas subskribi traktatojn, sed ankaŭ la regionoj aŭ komunumoj situantaj ĉe unu kaj alia flankoj de la landlimo, se entute la konstitucio de difinita ŝtato ne malpermesas tion.

### **Historia evoluo de la jura defendo de la medio**

Oni povas paroli pri la prahistorio de la Internacia Juro de la Medio, en la senco ke la unuaj normoj, aperintaj komence de la 20-a jarcento, eĉ antaŭ la unua mondmilito, protektis nur la ekosistemojn kiuj havis ekonomian valoron aŭ utilecon. Ekzemple, la traktato de Parizo de 1903-1902 protektis la birdojn utilajn por la agrokulturo; la Konvencio de Vaŝingtono de 1911 ekestis por protekti la fokojn, utilajn por la peltvendejoj; la traktato inter Usono kaj Kanado 1909 pri protektado kontraŭ la translima poluado de la riveroj ktp.

La dua etapo, komenciĝas antaŭ la dua mondmilito kaj daŭras ĝis la sesdekaj jaroj. La diversaj normoj protektis la naturajn spacojn kaj la biologiajn rimedojn, kiel la traktato de Londono 1933 por konservi la flaŭron kaj la faŭnon en Afriko; kaj jam post la dua mondmilito la ŝtatoj eksubskribas multajn traktatojn por eviti diversajn poluadojn. Ekz. traktato de la Antarkto 1959 por la translimaj riveroj, poluadoj per ŝipoj; traktato de Moskvo pri atomprovoj en la atmosfero; traktato de la ekstera spaco, de 1967 ktp., krom multaj sentencoj kaj arbitraj decidoj pri tiuj ekologiaj temoj.

La vera ekologia erao komenciĝis en la fino de la sesdekaj jaroj kaj la komenco de la sepdekaj. La amasa konsumismo, la problemoj kaŭzitaj pro nafto, kaj grandaj poluadoj aperigis sciencan alarmon kaj novan verdan aŭ ekologian pensmanieron. Tiam oni subskribis multflankajn regionajn kaj internaciajn traktatojn.

Estas du datoj esencaj en la defendo de la medio: 1972 kaj 1992. La jaron 1972, iniciatite de UN, okazis la *Konferenco de Stokholmo pri la Homa Medio*, de la 5-a ĝis la 16-a de junio.<sup>3</sup> En ĝi kunsidis 113 reprezentantoj de ŝtatoj, multaj internaciaj organizoj kaj pli ol 400 neregistaraj organizoj. Ĝi estis fakte la unua tutmonda pintkunsido pri la medio.

La rezulto estis nedevigaj tekstoj kaj rekomendoj. La plej elstara el tiuj tekstoj estis unue, Deklaracio pri la Homa Medio, kiu enhavas preambilon kaj 26 principojn, kiuj, kvankam ne devigaj, estis kaj estas tre gravaj kaj de ĉiuj akceptitaj.

Due, ankaŭ grava estis la agadplano por la medio, kiu enhavas 109 deklariojn, por la interŝanĝo de informoj kaj ĉio rilata al la medioprotektado.

En tiu sama jaro oni kreis la Programon de UN por la Medio, per Rezolucio 2997(XXVII), kun administra konsilio kaj sekretario aganta kiel plenuma direktoro. Estante organizo de UN, ĝi financiĝas el la ĝenerala buĝeto de la Organizaĵo krom speciala fonduso por la medio.

Ni diras ke kvankam ne devigaj, tiuj tekstoj estis gravaj, ĉar post ili oni subskribis multajn specifajn traktatojn pri oceanoj, rubaĵo, atmosfero, nesalaj akvoj ktp.

Ankaŭ en tiu sama jaro 1972, en oktobro, kunsidis en Parizo la tieaj membroj de la Eŭropa Komunumo, kiuj decidis ekagi per la unua agadprogramo pri la medio, ĉar ĝis tiam estis nenio pri tiu temo en la eŭropa leĝaro.

<sup>2</sup> Estas internacia konvencio pri atmosfera translima poluado, je longa distanco, de Ĝenevo, 13 novembro 1979.

<sup>3</sup> Deklaracio de la Konferenco de UN pri la Homa Medio, 16 junio 1972.

La dua ŝlosila dato, kiel dirite, estas 1992. Dudek jarojn post la antaŭa konferenco, Unuiĝintaj Nacioj deziris fari bilancon, kaj alvokis al *la Konferenco pri Medio kaj Evoluo*, ĉi-foje en Rio de Janeiro (Brazilo).<sup>4</sup> Unue Svedio petis esti denove la sidejo de la konferenco, sed UN preferis kunsidi en Brazilo pro la tiea granda biodiverseco, jam en danĝero. Temis pri la dua tutmonda pintkunsido pri la medio.

La Komisiono de UN pri la Medio iniciatis la preparlaborojn post la publikigo en 1987 de la t.n. Informo Brundtland, pri “daŭropova evoluigo”. Estis la eksa ĉefministro el Norvegio, S-ino Gro Harlem Brundtland, kiu redaktis dokumenton enhavantan unuafoje la difinon de tiu nova esprimo, nuntempe vaste uzata.<sup>5</sup>

En tiu informo, oni difinas la daŭropovan evoluigon kiel *tiu kiu plenumas la nunajn bezonojn de la homaro, sen limigi la bezonojn de la estontaj generacioj plenumi la siajn*.

Novaj laborkunsidoj okazis de 1990 ĝis 1992, en Najrobio, Ĝenevo kaj Novjorko, kaj la decidojn oni akceptis per interkonsento. Fine, 176 ŝtatoj, 1.200 internaciaj organizoj kaj multaj neregistaraj organizoj kunsidis en la plej multnombra konferenco ĝis nun konata, ĉar eĉ ĉeestis 2.500 ekologiistaj grupoj.

Dum tiuj kunsidoj ne ĉio estis harmonia. La landoj de la Eŭropa Komunumo estis la plej aktivaj kaj defendaj de la daŭropova evoluigo. Usono ne bone akceptis la decidojn, dum la nordaj landoj el Eŭropo restis kun sendependaj iniciatoj. Kanado, Aŭstralio kaj Novzelando starigis propran grupon, kaj Japanio ne volis preni elstaran vidpunkton. Aliflanke, el la evoluantaj landoj, pli ol 137 ŝtatoj, estis sufiĉe aktivaj ĉefe Hindio, Malajzio kaj aliaj, dum la afrikaj landoj defendis nur siajn proprajn interesojn. La eksaj sovetiaj landoj, sendependaj ekde 1990, havis malbonan zorgon rilate la protektadon de la medio kaj ne rolis grave. La rezulto de tiuj kunsidoj estis tri nedevigaj tekstoj kaj du internaciaj traktatoj.

La Deklaracio de Rio pri Medio kaj Evoluo, konsistas el 27 nedevigaj principoj, kaj enhavas la koncepton pri daŭropova evoluigo kaj la rajto al sana medio por la nunaj kaj estontaj generacioj, la tutmonda solidareco, mildigi la malriĉecon, solvi la konfliktojn per pacaj rimedoj kaj la principo 27 fermas la deklaron rememorigante ke *la ekologia paco devas esti ankaŭ jura paco, kaj ke la militoj estas kontraŭaj al la daŭropova evoluigo*.

Ankaŭ oni subskribis dokumenton por la 21-a jarcento sen deviga jura valoro, konata kiel la Programo 21. Ĝi estas dokumento dividita en sekcioj, por agadoj kaj rimedoj por atingi daŭropovan evoluigon.

Devigaj tekstoj estas: **Konvencio pri la klimatsanĝo** kaj **Konvencio pri la Biodiverseco**.

*La traktato pri la klimatsanĝo* subskribita en Novjorko 1992,<sup>6</sup> estas iom nepreciza, kaj restis kiel bazo por venontaj traktatoj. Tamen ĝi enhavas gravajn difinojn. Ĝin sekvis diversaj protokoloj kiel tiuj el Kioto, Montrealo, kaj pluraj konferencoj kiel tiuj okazintaj en Balio en 2007 kaj en Kopenhago en decembro 2009, kaj la lasta kunsido en Koĉabambo (Bolivio) en aprilo ĉi-jare<sup>7</sup>.

La tutmonda klimatsanĝo estas difinita en la Konvencio, kiel “*klimatsanĝo kaŭzata rekte aŭ nerekte de la homa agado kiu difektas la tutmondan atmosferon kaj kiu adiciiĝas al la naturaj sanĝoj de la klimato, observitaj dum kompareblaj tempoperiodoj*”. Aliflanke, la klimato estas konsiderata *komuna heredaĵo de la Homaro*.

En tiu konvencio oni volis batali kontraŭ la t.n. tutmonda klimatsanĝo, forceja efiko kaj la acida pluvo.

La aktuala klimatsanĝo, laŭ la plej granda parto de la sciencistoj, ne okazas pro diversaj naturaj fenomenoj kiel en la pratempo, sed pro ni mem kaj nia vivmaniero. La sciencistoj

<sup>4</sup> Deklaracio pri Medio kaj Evoluo, 14 junio 1992.

<sup>5</sup> Fina informo de la Tutmonda Komisiono pri Medio kaj Evoluo de UN, 20 marto 1987, sub la titolo “Nia komuna estonteco”

<sup>6</sup> Konvencio de UN pri la klimatsanĝo, 9 majo 1992.

<sup>7</sup> I-a Tutmonda konferenco de la popoloj pri la klimatsanĝo kaj la rajtoj de la patrino tero (Paĉamama), 23-a aprilo 2010. Koĉabamba (Bolivio).



konstatis ke ekde la komenco de la 20-a jarcento, kaj ĉefe post la 7-a jardeko, la temperaturo de nia planedo altiĝis je  $0,7^{\circ}\text{C}$  averaĝe, ĉar en kelkaj sudaj partoj de la tero, tiu altiĝo estas pli ol tiu cifero. Ni certe pensas ke  $0,7^{\circ}\text{C}$  laulonge de kelkaj jaroj ne estas tro, tamen por nia biosfero tio signifas multe. Pro tio studante la klimaton kaj la vivon sur la tero, la altiĝo je unu centigrado estas tute grava fenomeno, nekonata en Eŭropo dum la lastaj 5.000 jaroj. Pro tio la celo nun estas ne atingi la nivelon de  $2^{\circ}\text{C}$  en la jaro 2050. Superi tiun ciferon kaŭzos terurajn fenomenojn kiel la mankon de akvo kaj nutraĵoj, ekstremajn meteorologiajn fenomenojn kaj gravan damaĝon de unikaj ekosistemoj.

Unu el la plej gravaj konsekvencoj de tiu klimatsanĝo estas *la varmigado de la terglobo*, la t.n. *forceja efiko*. *Forcejoj* estas tiuj ejoj kovritaj per plastikaĵoj aŭ vitraĵoj, kie oni produktas diversajn fruktojn kaj legomojn. Do, simile okazas en la klimato de nia terglobo, kiu post la homaj aktivaĵoj kaj poluado influas ne nur la flaŭron, faŭnon, naturajn estaĵojn, la oceanojn, sed eĉ la sanon de la personoj per tre diversaj malsanoj. La tera atmosfero estas komparebla kun la vitroj de giganta forcejo, kaj kvankam tiu fenomeno ne estas io nova, fakte ĉiam estis natura fenomeno, nuntempe ĝi estas multe pli forta pro la fakto ke ni estas ŝanĝantaj la atmosferon per kresko de la proporcio de la karbona dioksido.

La sciencaj opinioj kiel tiu esprimita de la Interregistara Komitato de UN pri Klimatsanĝo kaj specife subtenata de la naciaj sciencaj akademioj de la G8-nacioj, estas ke “la averaĝa tutmonda temperaturo kaj la varmigo observata dum la lastaj 50 jaroj estas atribuebla al la homa agado”. Malgranda plimulto de kvalifikitaj sciencistoj kontestas tiun vidpunkton, asertante ke la agoj de la homaro ne grave rolas en la lastatempa temperaturo ŝanĝo.

La konstato de tiuj ŝanĝoj nuntempe oni vidas pro la jenaj situacioj: *La glaĉeroj retroiras kaj leviĝas la nivelo de la oceanoj*.

*La montaraj glaĉeroj*, tiuj imponaj langoj de glacio kiuj staras en la ĉefaj montaroj de la planedo, estas speciale trafeblaj de la klimatsanĝoj, pro tio la glaĉeroj kaj la polusoj estas konsiderataj kiel gravegaj montriloj de tiu tergloba varmigo. Nur en Eŭropo, la Alpoj perdis dum la lasta jarcento proksimume trionon de sia glacio, kaj ekde 1980 perdis inter 20 kaj 30% de la restanta glacio. Kilimanĝaro degelas same kiel Groenlando kaj la frostigitaj teroj de la Siberia tundro, Kanado kaj Groenlando, kiuj enhavas muskon kaj likenojn post la lasta glacia epoko: post degelo ili diseriĝas en metano, gaso kies forcejefiko estas tre forta, kaj kaŭzas la rompon de naftoduktoj kaj vojoj en Siberio kaj Alasko.

*La duan konsekvencon oni sentas en la maroj*. La sciencistoj asertas ke ekde 1960, laŭ la informoj ricevitaj de la satelitoj, la marnivelo leviĝas pli ol 2 milimetroj jare proksimume, kaj ili atribuas tiun fakton al la klimatsanĝo, kiu degeligas la glaĉerojn kaj la polusojn. Konsekvence, tiu ekstra volumo da akvo iras al la maro kaj aliflanke la varma temperaturo ekspansiigas la oceanojn. Tiu leviĝo de la marnivelo havos dramajn rezultojn en kelkaj zonoj de nia planedo. Ekzemple, la insuloj de la Pacifiko povus malaperi dum la nuna jarcento, kaj fakte kelkaj el ili jam faris planojn por translokigi la loĝantaron aliloken.

Ankaŭ en Groenlando la sciencistoj konstatis ke ties glaciejoj varmiĝas de malsupre. La degelo de la tuta glacitavolo altigus marajn nivelojn tutmonde je proksimume 7 metroj, kaj insuloj kaj kontinentaj marbordoj subakviĝos kaj multaj homoj devus migri.

Fine, en la maro, oni perdos marajn speciojn, plimultigos la fitoplanktonon, kaj la temperaturo de la maro fariĝos pli alta.

Fine, kiel jam dirite, *ni havos klimatologiajn ekstremajn fenomenojn*.

Unu el la konsekvencoj de la tutmonda klimatsanĝo estas la plia ofteco de ekstremaj atmosferaj ŝanĝoj kaj katastrofoj rilataj al la klimato. Varmbatoj, uraganoj, inundoj pro pluvego ktp. ne nur en la zonoj kie kutime okazas tiuj fenomenoj, sed en aliaj kie neniam ĝis la nuna jarcento okazis, ekzemple, en Eŭropo.

Venos grandaj sekecoj, uraganoj, pluvegoj kaj inundoj en Aŭstralio, Novzelando, Nordameriko ktp.

Nova problemo kiun oni malkovris antaŭ jaroj estas la malpliigo de la molekuloj de ozono en la stratosfero, tio estas la informo de la sciencistoj pri la ekzisto de *truo en la ozontavolo*. La ozontavolo estas necesa ĉar ĝi filtras parton de la ultraviolaj sunaj radiadoj kiuj povas esti malbonaj por kelkaj vivformoj sur la tero. Se tiu ozontavolo havas truon, parto de la sunaj ultraviolaj radioj venos rekte sur la teron, kaŭzante gravajn konsekvencojn por la flaŭro, faŭno, kaj eĉ por la homa sano (haŭtan kanceron, okulajn malsanojn).

Forcejefikaj gasoj krom la menciita karbona dioksido estas la akvo, freono, metano ktp, malbonaj por la ozontavolo.

Post jaroj da studo, oni subskribis *Konvencion por la protektado de la ozontavolo*, en Vieno 22 marto 1985, kaj sekve la *Protokolon de Montrealo* en 1987. Poste la membroŝtatoj en la Konvencio pri la klimatsanĝo kunsidis en **Kioto (Japanio) en 1997** por antaŭenigi la solvon de tiu problemo, kaj subskribis la nomatan *Protokolo de Kioto*<sup>8</sup> ratifitan ankaŭ de Eŭropa Unio (EU) kaj de multaj ŝtatoj escepte de Usono kaj Aŭstralio. Fine, per la ratifo de Rusio ĝi ekvalidiĝis la 16-an de februaro 2005.

Tiu ĉi Protokolo enhavas la samajn principojn de la Konvencio, sed antaŭvidas normojn por faciligi la limigon kaj reduktion de nocaj gasoj kaj faciligi la daŭropovan evoluigon. La celoj de tiu Protokolo estas malsimilaj por la jam evoluantaj landoj, certe industriaj, kaj por landoj survoje al libermerkata ekonomio, do la evoluantaj landoj. La fakto ke la Protokolo ne limigas la liveradon de gasoj kun forceja efiko al la evoluantaj landoj, estis polemika temo, ĉefe en landoj kiel Hindio kaj Ĉinio, kun granda nombro da loĝantoj kaj kun evoluantaj ekonomioj. Krom tio, diskutibla estas ankaŭ la jam konata vendorajto de liveradoj de nocaj gasoj.

Nuntempe jam estas multaj sciencistoj kaj konferencoj en kiuj oni petas specialan kortumon por la defendo de la klimato kaj la medio, laste en la pintkunsido de Koĉabamba 2010, kiel iniciato por prezenti antaŭ Unuiĝintaj Nacioj.

**La Konvencio pri la Biodiverseco**, de junio 1992, enhavas gravajn principojn kiuj tre plaĉis al la evoluantaj landoj.

Oni difinas la biodiversecon kiel “*aron de specioj, ekosistemoj kaj genetika heredaĵo*”, asertante ke la biologia diverseco estas “komuna intereso de la Homaro”, ĉar se oni perdas la humidejojn, oni perdos speciojn kiuj restas sen habitato aŭ vivmedio sur la tero kaj en la maro. Biologiistoj asertas ke mortas inter dek mil kaj kvindek mil specioj jare, do la ekvilibro de la biosfero povas fali atingante la homojn.<sup>9</sup> Edward Wilson, unu el la kreintoj de la vorto “biodiverseco” agnoskas ke malaperas proksimume dudeksep mil specioj jare, do po sepdek du tage,<sup>10</sup> kaj aliaj estas en danĝero de malapero, pro la forlaso de la tradicia agrokulturo, amasa konstruado en la urboj kaj kamparo, senarbarigo, bruligado de arbaroj ktp.

La ekosistemoj, t.e. la vivlokoj kaj la specioj kiuj vivas en ili, estas tre variaj: maraj marbordoj, humidejoj, manglejoj, koralrifoj, insuloj, montaraj zonoj, tundro, tajgo, tropikaj arbaroj, dezertoj ktp, multaj el ili deklaritaj de Unesko “rezervoj de la biosfero”, pro ilia internacia graveco.

En la Konferenco pri Biodiverseco okazinta en Parizo 2005, la direktoro de la Programo de UN por la Medio Klaus Töpfer parolis pri 60.000 specioj en danĝero, krizo ne konstatita ekde la malapero de la dinosaŭroj.

Oni pledas por la transdono de teknologio al la evoluantaj landoj kaj racia uzo de la genetikaj rimedoj, kun partopreno de ĉiu ŝtato. Ne ĉiuj landoj subskribis tiun Konvencion. Fakte kelkaj el la plej gravaj landoj ne subskribis ĝin.

En Rio de Janeiro, oni iniciatis la laborojn por posta internacia konvencio pri la dezertigado kaj alia pri la arbaroj. La unua finfine estis adoptita jarojn poste, en 1994, kaj rilatas al tiu problemo pri dezertigado ĉefe en Afriko kaj ĉirkaŭ la Mediteraneo.<sup>11</sup>

<sup>8</sup> Protokolo de Kioto de la Konvencio de UN pri la klimatsanĝo, 11 decembro 1997.

<sup>9</sup> DELIBES, M. kaj DELIBRES DE CASTRO, M. (2005) *La tierra herida*. Destino. Barcelona.

<sup>10</sup> FOLĈ, R. (1998) *Ambiente, emoción y ética*. Ariel. Barcelona.

<sup>11</sup> Traktato de UN kontraŭ la dezertigado, 17 junio 1994.

Fine, internaciskale tre grava estas la Deklaracio de UN pri la Jarmila Pintkunsido, en la jaro 2000 ĝis 2015, kun diversaj objektivaj, inter ili, la sepa por garantii la elteneblecon de la medio.

Sekve, UN ankaŭ deklaris en 2002 la Jardekon pri Edukado al Daŭropova Evoluigo<sup>12</sup> kun la celo atingi tutmondan elementan edukadon en la jaro 2015, sekvante la planon de Johannesburgo pri daŭropova evoluigo. En Johannesburgo dum la somero de 2002 kunsidis ŝtatoj kaj NRO-j kune kun diversaj mediodefendaj grupoj, kaj decidis proklami jardekon de Edukado al Daŭropova Evoluigo. Oni elektis Uneskon kiel rektoron de tiu agadplano kaj petas de la Tutmonda Komerca Organizo agi kontraŭ la malriĉeco, per kvin agadsferoj: akvo kaj higieno, sano, energio, agrokulturo kaj biodiverseco. Oni agnoskis ke *la ekonomia, socia evoluoj kaj la protektado de la medio estas interdependaj kaj kompletigaj por la daŭropova evoluigo.*

La tiama Ĝenerala Sekretario de UN S-ro Kofi Annan, diris ke tiu konferenco ne volis starigi konfrontojn inter nordaj kaj sudaj landoj aŭ inter evoluantaj kaj neevoluantaj landoj, sed “Malgraŭ la popola penso, ambaŭ povas kunlabori”. Kial diris tion S-ro Annan? Evidente ĉar kiam en 1972 okazis la Konferenco de Stokholmo, la subevoluantaj landoj ne volis akcepti normojn por protektado de la medio pensante ke tio kaŭzos problemojn al ilia ekindustriigo, sed plej poste, jam en Rio de Janeiro 92, ili ne pensis same. Fakte, ili jam konstatis la efikojn de la poluado kaj komencis agi kune, sed ĉiam timante ne perdi la vojon al la propra industriigo.

Post tiu serio de konferencoj kaj traktatoj, oni eltiros kelkajn konsekvencojn: la graveco de la ŝirmado de la medio restas agnoskita. En ĉiu posta dokumento, agado aŭ traktato oni konsideras grava la median protektadon.

Antaŭe oni studis ĉiam la diversajn poluajn fontojn, laŭ la diversaj sferoj aŭ sektoro, dum nuntempe oni klopodas al la integriĝo de tiu protekto.

Aliflanke, la grandaj tutmondaj konferencoj montris ke por bone agi ne nur la ŝtatoj devas esti la aktoroj, kiel okazis dum la antaŭaj jarcentoj, sed ke oni devas roli same, kaj kune agi ŝtatoj kaj aliaj aktoroj kiel la Neregistaraj Organizoj kaj ekologiistaj asocioj, nuntempe tiel necesaj.

Alia konsekvenco estas ke iom post iom oni agnoskas la rajton al la informado pri la ekologiaj temoj, kaj tiel oni subskribis la Konvencion de Aarhus pri la aliro al la informado.<sup>13</sup> Nun oni konsideras la bezonon de la civitanoj esti informataj pri ĉiu temo rilatanta la medion en iliaj urboj kaj landoj.

Fine, la koncepto pri daŭropova evoluigo eniris en ĉiun kampon de la medio kaj de la vivo mem, kiel ekvilibra kaj solidara proceduro favore al la estontaj generacioj.

Multaj aliaj postaj internaciaj dokumentoj aperis, sed pro ĝia signifo por la 21-a jarcento, mi mencias la **Ĉarton de la Tero** (The Earth Charter), kiel deklaron pri valoraj principoj por pli justa, solidara kaj daŭropova socio en la nuna jarcento. La dokumento, posta al la aliaj jam menciitaj estis aprobita de la Ĝenerala Asembleo de UN en la jaro 1982, kaj oni ĝin lanĉis en la jaro 2000, kun la celo redakti konstitucion de la planedo, kaj ĝi estis la rezulto de partopreno de multaj gravuloj, Nobelpremiitoj, sciencistoj kaj ŝtatestroj.

La ĉefaj kvar principoj estas respekto al la tero kaj la vivo en ties tuta diverseco, kiel sankta devo, protekti la ekologian integrecon, resanigante la ekosistemojn kaj biologian diversecon, starigi socian kaj ekonomian justecon kontraŭbatalante malriĉecon, kaj etikajn postulojn; la kvara principo celas havi demokration kaj pacon, neniam perforton.

La Preamblo de la Ĉarto asertas tute klare ke “meze de la tre ampleksa diverseco de kulturoj kaj vivmanieroj, ni estas unu tera komunumo kun komuna celo”. S-ro Mihail Gorbaĉov asertis ke la mondo alfrontas tri ĉefajn defiojn, ĉiu el kiuj enhavas alian problemon, nome, la

---

<sup>12</sup> Rezolucio 57/254 de la Ĝenerala Asembleo de UN, de 20-12-2002. Ankaŭ UN-Info pri la Tutmonda Kunsido pri daŭropova evoluigo, Johannesburgo (Sudafriko) aŭgusto-septembro 2002.

<sup>13</sup> Konvencio de Aarhus pri la rajto kaj aliro al la informado, 25 junio 1998.

sekurecon kaj terorismon, la defion de la malriĉeco kaj la tria, la medioprotektadon. Sed tiu proceduro bezonos unue la sanĝon de la menso kaj koroj de la homoj.

Tiu ĉi grava teksto estas Deklaracio kaj ne estas deviga, kiel okazas al la plej granda parto de la medioprotektadaj tekstoj. Pro tio oni diras ke la Juro de la Medio estas malmola juro, plej ofte leĝe nedevisa.

Sed nun ni parolu pri aliaj eblaj damaĝoj al la medio:

Poluado estas videbla ankaŭ en la akvoj. La *nesalaj akvoj*, lagoj kaj riveroj, estas damaĝitaj pro plej diversaj poluadoj. Kiam tio okazas en urbo aŭ vilaĝo, estas la loka administrado kiu devas prizorgi tion, sed kiam temas pri internacia rivero, kiu trapasas plurajn landojn, estas jam transnacia problemo.<sup>14</sup> En la plej granda parto de la translimaj riveroj estas starigitaj specialaj komisionoj, kelkaj tre malnovaj, jam ekde la 19-a jarcento, kiel tiuj de Danubo kaj Rejno, kiuj traktas tiujn problemojn.

En Hispanio, estas landlimaj riveroj al Portugalio (Minho, Doŭro, Tejo kaj Gvadiana). Mi loĝas en la regiono Kastilio kie la rivero Doŭro fluas apud la landlimo de nordo suden. De ĉiam la problemoj pri la uzo de tiuj riveroj kaŭzis kelkajn problemojn, solvitaj pere de diversaj traktatoj inter Portugalio kaj Hispanio kaj lastatempe, ankaŭ per interregionaj interkonsentoj.

Plej videbla estas kutime la *poluado de la maroj*, plej ofte pro poluantaj akcidentoj, sed ankaŭ pro intencaj verŝaĵoj, aŭ eĉ pro la normala uzo de la maroj. Ni devas rememori ke en la maro evoluas ĉiu mara specio, estante la fitoplanktono, la zooplanktono kaj la bakterioj la bazo de la mara vivo. Necesaj estas tri elementoj por la mara vivo: lumo aŭ fotosintezo, saleco kaj temperaturo, sed ankaŭ oksigeno, nitrogeno, fosforo ktp. La maraj fluoj estas esencaj por movi la akvojn de la fundo al la surfaco kreante pli da planktono. La nutra ĉeno de la fiŝoj ekde la fito- kaj la zooplanktono, atingas fine la homon, kiu manĝas fiŝojn.<sup>15</sup> Pro tio la poluado de la maroj estas tiel grava.

La plej videbla el la maraj poluadoj estas tiu kaŭzata de la hidrokarbidoj kiuj damaĝas ne nur la maran faŭnon sed ankaŭ la maran flaŭron. Ni ĉiuj memoras pri la gravaj akcidentoj kaŭzitaj de grandaj petrolŝipoj kiuj ĉiutage transiras la marojn kiel Torrey Canyon, en 1967<sup>16</sup>, kiu estis la unua alarma signalo, poste Erika, Prestige ktp. Tiu poluo mortigas la fiŝojn ĝenerale pro manko de oksigeno, ĉar la nigra tavolo sur la surfaco malpermesas havi oksigenon kaj lumon, kaj la marajn birdojn pro malvarmo, ĉar la plumaro estas trempita de petrolo kaj perdas sian varmigan funkcion.

Oni povas polui la marojn ankaŭ per hidrokarbidoj, pere de la lavado de la balastaj rezervujoj de la petrolŝipoj, kvankam tiu tasko devas esti farata en la havenoj. Tamen por ne pagi, por ne atendi en la vico ktp estas tre ofte ke la maristoj lavas tiujn rezervujojn kun petrolrestaĵoj, verŝante ilin rekte en la maron.

Ankaŭ povas okazi poluado kiel rezulto de la ekspluatado aŭ esplorado de la mara subgrundo, kiel ĉi-jare okazis, en la meksikia Golfo, pro akcidento en petrolstrukturo situanta en la kontinenta breto aŭ en alta maro.

Se al tio ni aldonas intencajn kemiajn kaj alispecajn ŝutaĵojn kaj la bakteriologian poluadon kaŭzatan de la urbaj rubaĵoj, ni havos kompletan panoramon de la febleco kaj danĝero de la maraj akvoj.

Kompreneble mi ne volas tedi vin parolante pri la traktatoj ekzistantaj por ĉiu okazo, kiuj estas multaj kaj tre variaj. Pro tio, mi preferas klarigi ke por defendi la maron, estis tri universalaj konferencoj, la plej grava la Tria, kiu finiĝis per la *Konvencio de UN pri Juro de la Maro*, de Montego Bay (Jamajko) 1982<sup>17</sup>, kiu traktas ĉiujn poluadojn.

<sup>14</sup> Traktato pri la rajto uzi la internaciajn riverfluojn por aliaj celoj ol navigado, 21 majo 1997.

<sup>15</sup> AUBERT, M. (1968) *El cultivo del oceano*. Labor. Barcelona.

<sup>16</sup> QUENEUDEC, J.P. (1968) *l'incidence de l'affaire du Torrey Canyon sur le droit de la mer*. Annuaire Français de Droit International, p. 701.

<sup>17</sup> Tria Konferenco pri Juro de la Maro. Traktato de Montego Bay 10-12-1982 (A. Conf. 62/122).

Laŭleĝe, ŝirmi la maran medion dependas de la zono en kiu la poluado okazis. La ŝtatoj havas aŭtoritaton pri sia propra teritoria maro, t.e. dekdu mejloj ekde la marbordo, kaj en sia ekonomia ekskluziva zono, ĝis 200 maraj mejloj. En alta maro ĉiuj devas zorgi pri la medio, ĉar tiuj akvoj estas liberaj kaj uzotaj de ĉiuj, ĉu por navigado, ĉu por fiŝkaptado. Fine, la plej subaj oceanaj fundoj, kie jam ne estas vivantaj estaĵoj, sed ekonomie tre gravaj pro la mineraloj, estis agnoskitaj en la Konvencio de Jamajko kiel “*komuna heredaĵo de la Homaro*” per starigo de speciala aŭtoritato kaj kortumo<sup>18</sup> por ŝirmi ilin kaj reguligi ilian ekspluatadon.

Multaj aliaj poluadoj estas tiuj kemiaj, per plastikaĵoj, per piloĵoj aŭ baterioj (tiuj lastaj devas esti metitaj en speciala ujo) per nocaj gasoj, aŭ per aliaj rubaĵoj.

**Rubaĵo** estas ĉiuspeca foruzita, rompita objekto, senvaloriĝinta materialo, urbaj kaj industriaj defalaĵoj, forigendaj el la homa kaj industria medioj. Tiuj materialoj povas kaŭzi nocojn al la medio kaj al la homoj, ĉar la ĉiutaga vivo kaj ekonomia agado de la homo produktas gravajn defalaĵojn solidajn, fluidajn kaj gasajn, eĉ radioaktivajn atomrubaĵojn.

Pro tio oni rekomendas redukti, reuzi kaj recirkuligi la rubaĵojn (La 3 R).

Malfavoraj konsekvencoj de la defalaĵoj skiziĝas jene: la rubaĵo estas infekto-disvastiganto, per ĝiaj mikroorganismoj kiuj kaŭzas malsanojn; plimultigas la insektojn, malpurigas la grundojn kaj la aeron, malbeligas la estetikan pejzaĝon ktp.

Pro tio la sendanĝerigo estas nunaj sistemoj de aranĝoj, kies celo estas transformado de la danĝeraj materialoj en neŭtralaj. Ekde la komenco de la organizita rubaĵtraktado en homaj loĝlokoj ĝis la nuna tempo, elformiĝis tre larĝa skalo de sendanĝerigaj metodoj, ĉefe en la evoluintaj landoj, kiuj redonas la rubaĵigintajn materialojn al la medio kaj reutiligas ilin. Kompreneble, kiam, en antaŭaj tempoj, la homaro ankoraŭ uzis kaj reuzis la naturajn rubaĵojn, la naturo povis tiujn akcepti sen malfavoraj konsekvencoj. Sed la apero de artefaritaj materialoj kaj prilaboritaj produktaĵoj, kune kun la grandaj kaj amasaj loĝlokoj, alportis novajn problemojn. Nome: la naturo ne plu povas toleri la ŝarĝadon kaj ne povas perfekte regeneri sin. Se al tio ni aldonas la naciajn kaj internaciajn pli severajn leĝojn, pro ekonomiaj kialoj komencis elformiĝi novaj procezoj por rubaĵsendanĝerigo, kies celo estas ankaŭ iu utiligo de la rubaĵoj.

La reuzado komenciĝas per la kolekta metodo en fermataj rubujoj, kutime diverskoloraj por ĉiu forĵetaĵo, situantaj en centraj lokoj de urboj kaj vilaĝoj, kie oni metas la rubvazojn aŭ plastikajn sakojn. Tiu rubaĵkolektado estas sufiĉe higiena. Poste, diversaj urbomastrumadaj entreprenoj kolektas la rubaĵojn kaj demetas ilin en konvenajn lokojn. Ofte la demetitaj rubaĵoj estas kompaktigataj antaŭ ilia reutiligo. Ekzemple, papero, kartonoj, vitro ktp. En multaj okazoj, antaŭ la vendado de la preta produktaĵo oni faras postselektadon, apartigon de restaĵoj (betono, porcelano, ŝtonoj, vitro) por plibonigi la rezulton. Ofte oni bruligas la rubaĵojn. Tiu metodo havas avantaĝojn kiel ekonomion, la incineratoro povas esti interne de la urbo ktp, sed ankaŭ malavantaĝojn, kiel la altajn investkostojn, perturbojn por la aero ktp. Aliaj sistemoj estas la pirolizo, pervarma malkomponado de la rubaĵoj en fermitaj sistemoj kaj la hidrogenizado. Fine, la recirkuligo de la materialoj rezultigas gravan ŝparadon, ĉar la rubaĵoj enhavas multe da denove utiligeblaj materialoj.

La agrokulturaj defalaĵoj, urbaj rubaĵoj, kloakakvoŝlimoj ktp eblas produkti biogason, per prilaborado de organikaj sterkaĵoj, kiel reuzada metodo. Oni povas uzi subĉielan metodon, kiu daŭras longa tempo, aŭ fermitan sistemon. En Ĉinio kaj Hindio jam ekde la 60aj jaroj komenciĝis forta disvastiĝo de la uzo de apuddomaj malgrandaj biogasproduktiloj por kovri la bezonojn de energio de la unuopaj mastrumoj, surbaze de kuirejaj kaj ĝardenaj defalaĵoj. La nombro de tiaj instalaĵoj atingis jam 5 milionojn en Ĉinio kaj 2 milionojn en Hindio. En Eŭropo

---

<sup>18</sup> Statuto de la Internacia Kortumo pri Juro de la Maro, 10 decembro 1982 kaj ĝia reglamento de 28 oktobro 1997. La kortumo havas kiel sidejon Hamburgon (Germanio).

eĉ komence de la 80aj jaroj funkciis apenaŭ kelkaj miloj da similaj sistemoj, sed kun eksperimenta karaktero aŭ per eksperimentemaj privatuloj.<sup>19</sup>

Do, ni konstatas ke eblas reuzi preskaŭ ĉion.

Plej malfacile estas malaperigi la nukleajn rubaĵojn. Nuntempe la radioaktivaj rubaĵoj, ĉefe tiuj de granda aktiveco, estas vera prokrastita bombo kiun ni postlasas al la venontaj generacioj. Tiuj rubaĵoj estas konsekvenco de la prilaborado de la karburado en la nukleaj reaktoroj. Oni konsideras ilin je malgranda, duongranda kaj granda aktiveco. La unuaj havas malgrandajn nivelojn de radioaktiveco, kaj kutime oni gardas ilin en surfacaj ujoj. Ekzemple, estas tiuj produktataj en hospitaloj, industrio, papero, vestaĵoj en kontakto kun malgranda radiado. Tiujn pri duona aktiveco kutime oni solidigas en betono aŭ gudro antaŭ ilia forigo, aŭ oni enmetas en la nukleajn vrakejojn. La plej tiklaj estas la nukleaj restaĵoj de granda aktiveco.

Ni povas rememori ke antaŭ jaroj, ĉefe en la 50aj kaj 60aj jaroj, oni elĵetis ilin rekte en la maron, ĝuste en la submarajn fosojn, kiel tiu Atlantika, ene de hermetikaj rezervujoj aŭ cisternoj, laŭ la ideo ke tiel ne eblus korodo. Tamen, lasttempe, Greenpeace filmis tiujn supozeble hermetikajn ujojn kaj ĝi konstatis la komencon de korodo kiu ekrompas iliajn kovraĵojn. Tio estas tre grava kaj vere oni ne scias kion fari. Estis malpermesate plu ĵeti en la maron tiujn atomenergiajn restaĵojn, sed ĉiuj estas certaj ke tiu noca agado daŭras en alta maro.

La Internacia Organizo pri Atomenergio estas kompetenta konsili pri la taŭgaj ejoj kien oni povas ĵeti tiujn atomrestaĵojn, dum ĉiam estas malpermesata la ŝutado de atomenergiaj defalaĵoj de granda aktiveco.<sup>20</sup>

Internacie estas gravaj traktatoj pri la kontrolo de translimaj transportoj de danĝeraj rubaĵoj, kiuj estas kontrolataj per la Traktato de Baselo de 1989 kaj por eviti ilian transporton al Afriko oni subskribis la traktaton de Bamako (Malio) de 1991.<sup>21</sup> En 1995 oni subskribis ankaŭ la Konvencion de Waigani por malpermesi la importadon en la landojn de la regiono de Suda Pacifiko, de danĝeraj kaj nukleaj rubaĵoj, kaj por bone kontroli ilin.

La Traktato de Baselo estas la ĉefa teksto, kiu enhavas la normojn pri transporto, la deviga permeso de la importaj kaj eksportaj ŝtatoj, ktp dum la aliaj konvencioj estas regionaj.

Fine, ni parolos iomete pri la **protektado de la medio en Eŭropa Komunumo**.

Kompreneble, la originaj traktatoj, nome, Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo (1951) kaj la traktato pri la fondo de Eŭropa Komunumo kaj tiu pri Atomenergio (1957), enhavis nenion pri medioprotektado, ĉar en tiu momento neniu zorgis pri tio.

En 1972 Eŭropa Komunumo (EK) partoprenis la Konferencon pri la Homa Medio, en Stokholmo, kaj en oktobro de la sama jaro, en Parizo okazis la Pintkunsido de Ŝtatestroj kaj registarestroj, havante ekde tiam novajn objektivajn pri medioprotektado. Tiel komenciĝis serio de Programoj pri Medio, la unua de 22 novembro 1973, kun ĝeneralaj celoj, kaj pensante jam pri internacia kunlaboro. Sed, kompreneble, fakte ne estis en la traktatoj iu ajn artikolo por protekti la medion, do, ili uzis la artikolojn plej proksimajn por tiu celo, kaj ĉefe la tiaman art. 235 kiu permesis al la Komunumo agi, kiam estos necese plenumi difinitan celon, kvankam la traktato silentas.

Sekvis dua, tria kaj kvara Programoj, ĝis 1992, grava dato, ĉar la Traktato de Maastrichto kreis Eŭropan Union kaj samtempe agnoskas kiel objektivan la “politikon pri Medioprotektado”. Jam estis vera komunuma politiko, ne ekskluziva, sed komuna kun la membroŝtatoj.

---

<sup>19</sup> MOLNÁR, F. (1984) *Apliko de modernaj rubaĵsendanĝerigaj metodoj kaj la medioprotektado*. <http://freeweb.hu/eventoj/steb/industrio/rubaĵo/rubaĵo.htm>

<sup>20</sup> Aneksoj pri la Internacia Organizo pri Atomenergio, al la Traktato de Londono 29 decembro 1972. Vid. YTURRIAGA BARBERAN, J. *Aspectos jurídicos de la eliminación de residuos radiactivos en el mar*. en Problemas internacionales del medio ambiente. (1985) Universidad Autónoma de Barcelona. Barcelona.

<sup>21</sup> Traktato de Bamako 1991, pri la malpermeso importi en Afrikon, kaj pri la kontrolo de translimaj transportoj de danĝeraj rubaĵoj en Afriko.

Traktato de Baselo 22 marto 1989, pri kontrolo de la translimaj movadoj de danĝeraj rubaĵoj kaj ilia forigo.

La 5-a Programo pri Medioprotektado estis aprobita la 15-an de decembro 1992, kaj celas ankaŭ helpoj al la neevoluintaj landoj. Tiu Programo havas tre interesan titolon, nome *“Politiko pri Medioprotektado kaj daŭropova evoluo, kiu respektos la medion”*, kaj ekmarŝis laŭ la tendencoj de la Konferenco de UN pri Medio kaj Evoluo de Rio de Janeiro 1992. La termino *“daŭropova evoluo”*, naskiĝinta en Rio de Janeiro, estas ene de tiu programo kaj la sekvonta.

Fine, ankoraŭ ni estas en la sesa Programo pri medioprotektado, titolita ĉi-foje *“la estonto estas en niaj manoj”*, en kiu oni substrekas la bezonon agi je ĉiu nivelo: nacie, regione kaj internacie. Ĝi memorigas la bezonon zorgi pri la klimato, la biodiverseco, la rilato inter medio kaj sano, kaj limigi la rubaĵojn. Fine, oni asertas ke la protektado de la medio integriĝos en la aliaj komunumaj politikoj.

La sekvaj traktatoj de EU, nome Nico, Amsterdamo kaj la lasta el Lisbono, same aplikas tiujn celojn.

Sed kiel funkcias Eŭropa Unio tiucele? EU estas subjekto de Internacia Juro kaj havas la rajton subskribi traktatojn kaj aliĝi al ili. Kutime, EU, kiel antaŭe Eŭropa Komunumo, subskribas kaj aliĝas al jam ekzistantaj konvencioj pri protektado de ĉiu difinita spaco. Tiam tiuj subskribitaj konvencioj estas rekte aplikeblaj al la membroŝtatoj.

Tiu principo de la superrego de la eŭropunia kaj komunuma juro sur la membroŝtatoj estis ĉiam asertita de la Justica Kortumo de Eŭropa Unio.

Sed la membroŝtatoj devas apliki tiun leĝaron, kaj pro tio Eŭropa Komunumo kaj nun Eŭropa Unio uzas kutime Direktivojn. La eŭropunia derivita juro konsistas ĉefe el Reglamentej, Direktivoj kaj Decidoj. La Reglamenton oni uzas por ĝeneralaj celoj kaj por ĉiu lando de EU. Kompreneble, Reglamento estas tro ampleksa por fiksi al iu difinita membroŝtato normojn kiam okazis poluado de la aero, de la maro, aŭ alia problemo. Oni kutime uzas la Direktivojn, kiuj estas adresitaj al difinita ŝtato, kiu devas plenumi la celon de la normo, uzante la rimedojn kiujn la ŝtato konsiderus plej efikaj. Do, estas normo por plenumi libermaniere la celon. Ne gravas kiu aŭtoritato plenumos ĝin, sed ĉiam devas esti rekte aplikata pro la superrego de la eŭropunia juro.

Do, tra ĉiu internacia leĝo pri la medio, ni konstatas ke ni estas antaŭ neforta juro, plena de konferencoj jure nedevigaj, de rekomendoj, eblecoj, sed malmultaj devigaj tekstoj, escepte de la internaciaj traktatoj kaj la leĝaro de Eŭropa Unio. Kaj tamen ni estas defendantaj la klimaton kaj la biosferon, esencaj esprimoj de la Komuna heredaĵo de la homaro. Do ni havas gravan respondecon por la defendo de kolektivaj ekologiaj interesoj, kiujn oni devas defendi por la tuta homaro. Sed la demando ĉiam restas la sama. Kiu povas protekti la homaron kaj ĝian ekologian heredaĵon?

La plej granda parto de internaciistoj pensas pri Unuiĝintaj Nacioj. Sed la Ĉarto de la Organizo datiĝas de 1945, kaj tiam ne estis zorgoj pri nia temo, do ĝiaj instrumentoj aŭ organoj ne respondas al tiu celo. Kiu do zorgos, ĉu la Ĝenerala Asembleo? Ĉu la Konsilio pri Sekureco? Tiu ĉi lasta nur agos kiam estos en danĝero la paco kaj la internacia sekureco. Kaj certe tio povas okazi, ekzemple, pro gasaj emanadoj aŭ manko de akvo en la mondo, kiam pli ol mil milionoj da personoj ne havas aliron al akvo. Tio jam kaŭzas internaciajn konfliktojn, kaj oni bedaŭrinde atendas pli.

Jam en 1992 la tiam prezidanto de la Konsilio pri Sekureco asertis ke la nestabileco en la ekologia sfero jam estas minaco al la paco kaj internacia sekureco. Vere ne estas banala afero pripensi la rilaton inter tiuj celoj de la 1-a artikolo de la Ĉarto de UN, t.e. la defendo de la internacia sekureco, kaj la venontaj ekologiaj konfliktoj kiujn povas kaŭzi la diversaj mediaj problemoj. En tiuj okazoj certe devas agi la Sekureca Konsilio de UN.

Ĝis nun estas ĝenerale akceptita la rajto de la ŝtatoj enmiksi sin favore al la defendo de komunaj ekologiaj interesoj, tio estas, la *“rajto je ekologia enmiksiĝo”* eĉ en alta maro, se estas grava polua akcidento. Kiam iu internacia aŭtoritato aŭ organo havos tiun saman rajton?

Same multaj pledas por speciala kortumo por la Medio, ĝis nun ne ekzistanta.

S-ro Klaus Töpfer, membro de la Programo de UN por la Medio, rimarkante la rilaton inter medio, malriĉeco, kaj sekureco kaj paco, pledis por la kreo de “verdaj kaskuloj”, dirante ke li ne postulas de UN blukaskulojn por la konfliktaj ekologiaj situacioj, sed verdajn kaskulojn kiuj helpas en tiuj situacioj, purigante kaj riparante la damaĝojn al la medio.<sup>22</sup>

Nuntempe, oni observas praktike la konscion pri la medioprotektado en ĉiu laboro de la UN. La aktiva kunlaboro inter tiu ĉi Organizo, la registaroj, la neregistaraj organizoj, la scienca komunumo kaj la privataj sektoroj aperigas novajn sciencajn konojn kaj konkretajn agadojn por solvi la ekologiajn problemojn.

UN jam konsideras ke protekti la medion devas esti parto de ĉiu agado pri socia kaj ekonomia evoluo.

Kiel asertas la Ĉarto de la Tero, ni devas kuniĝi por krei daŭropovan mondan socion baziĝantan sur respekto kaj estimo al la naturo, sur universalaj homaj rajtoj, sur justeco kaj sur kulturo de paco. Pro tio survoje al tiu celo estas imperative ke ni, popoloj de la tero, transprenu respondecon pri la nunaj mediaj problemoj kaj por tiuj de la estontaj generacioj.

Ni estas ĉi tie, civitanoj de diversaj nacioj sed de unusola mondo, en kiu interplektiĝas lokaj kaj terglobaj aferoj. Sed se ni ne protektas la medion, ni ne lasos al la venontaj generacioj mondon kie estos realigata la daŭropova evoluo.

---

<sup>22</sup> “Verdaj kaskuloj por la mondo” estas humanitara organizo kreita de la germana ekologiisto Rupert Neudeck por helpi la rekonstruadon de loĝejoj en konfliktoj kiel tiuj de Irako, Afganio, Ĉeĉenio aŭ Bosnio, kaj volas prezenti ĝin, en tiuj okazoj, ankaŭ kiel forumon por dialogo inter kristanoj kaj musulmanoj. Ĝi kunlaboras kun la Programo de UN por la Medio.



# Kion signifas la enkonduko de Lingvaj Rajtoj por la Esperanta movado?



## KADOJA Hidenori

Nask. 1970. Finis la universitaton de Kyôto en 1991, poste magistran kaj doktoran kurson en la universitato de Nagoya, en la kampo de eŭropa sociekonomia historio mezepoka. Gastesploristo de la Svedia Instituto en la Universitato de Uppsala dum 2 jaroj. Studis ankaŭ sociolingvistikon. Nun prelegisto en Cujama ŝtata Kolegio de Teknologio. Ĉefredaktoro de la fakgazeto *Syakaigengogaku (Sociolingvistiko)*, 2001-. Ĉefverkoj: *Vikinga epoko* (2006); “De lingvaj rajtoj al planlingvo” en Maŝiko Hidenori (red.), *Lingvo, povo, diskriminacio. Emancipado de informo - malfortuloj el la vidpunkto de lingva rajto* (2006); “La strukturo de lego-skribo-kapablo” en *Sociolingvistiko*, IX (2009). Krome tradukas faklibrojn el la sveda kaj la angla en la japanan. Verkas ankaŭ en la kampo de edukosociologio kaj homrajtoeduko.

## Resumo

Post ĉirkaŭ 1990 la Esperanta movado enkondukis la novan koncepton, lingvaj rajtoj, en sian teorian bazon. La koncepto estas komprenita en diversaj manieroj, ekz. la rajto uzi la unuan lingvon, aŭ la rajto akiri iun loke hegemonian lingvon k.t.p. En la movado ĝi estis adoptita kiel la rajto partopreni egale en komunikado inter parolantoj kun interalie malsamaj unuaj lingvoj. Alivorte tio celas nuligi potenco-rilaton en komunikado por realigi lingvan egalismen. La potenco-rilato, kiu naskas lingvan kaj komunikadan hegemonion, sekve lingvan ekskluzivadon, estas la vera problemo. Se la Esperanta movado trovas sian universalan ekzistokialon en tia konstruo de sia teorio, la movado ĝisnuna ekhavas “novajn devojn” teorie postulitajn.

Kiel tre utila pontolingvo Esperanto povas egaligi internacian komunikadon kaj nuligi iun potenco-rilaton tie, sed tio ne signifas, ke la lingvo nuligas ĉiujn potenco-rilatojn, kiuj maljuste faras lingvo-diskriminacion, aŭ ke peresperanta komunikado ĉiam garantias justan komunikadon. Oni povas observi kelkajn fenomenojn lingvo-diskriminaciajn en Esperantujo. Ekz. bedaŭrinde Esperanta komunikado ne sukcesas elimini potenco-rilatojn inter la uzantoj. Konkrete ekz. lingve malaltnivela parolanto devas suferi ekskludadon el la komunikada areno, kaj etiketon kiel nekapabla komencanto malalte valorigita. Ege lerta kaj klera Esperanto-uzanto estas tute senkonscian akirinto de porkomunikada potenco, kiu tre ofte malebligas egalan kaj senpreman komunikadon. Ĉi tie oni trovas unuan problemon, pri kiu la movado devas trakti. Kiel ni povos nuligi tian potencon? Laŭ mia studo la unua ŝlosilo estas repensi la manieron de la Esperanta edukado, kaj la kompreno-manon de lingvo-kapablo. Krome oni povas trovi problemon en Esperanto mem kiel lingvo, rilate al lingvaj rajtoj. Esperanto enhavas seksan dualismen, kiu ligiĝas al seksa diskriminacio. Mi prelegos, kiel oni povas klarigi teorie pri tiaj fenomenoj, kaj kion la movado povas fari konkrete en ĉiutaga agado.

## What does the introduction of language rights mean for the Esperanto movement?

### Summary

Since about 1990 the Esperanto movement has introduced the new concept of language rights into its theoretical framework. The concept is understood in various ways, for example the right to use one's first language, or the right to acquire some locally dominant language, etc. In the

movement it was adopted as the right to equal participation in communication of speakers with different first languages. In other words, the aim is to abolish the power relationship in communication in order to realise language equality. The power relationship, which leads to hegemony in language and communication, and, as a result, language exclusion, is the real problem. If the Esperanto movement finds its universal *raison d'être* in such a structuring of its theory, the existing movement will acquire “new obligations” imposed by the theory.

As a very useful bridge language Esperanto can put international communication on an equal basis and abolish any power relationship there, but that does not mean that the language abolishes all power relationships that unjustly create language discrimination, or that communication using Esperanto always guarantees fair communication. One can observe certain phenomena of language discrimination in the Esperanto world. For example, unfortunately, Esperanto communication does not manage to eliminate power relationships between users. In particular, for example, a speaker with a low level of language competence has to suffer exclusion from the communication arena, being labelled as an incompetent beginner of low value. An extremely skilful and educated Esperanto user unconsciously acquires communicative power, which very often prevents equal and pressure-free communication.

Here one finds the first problem that the movement must deal with. How can we abolish this power? According to my study the first key is to rethink the manner of Esperanto education, and the way language ability is understood. Moreover, one can find a problem concerning language rights in Esperanto itself as a language. Esperanto contains a sexual dualism which is associated with sex discrimination. In my lecture I will explain how one can theoretically explain such phenomena, and what the movement can do about it in practice in its everyday activities.

## **Que signifie l'introduction des droits linguistiques pour le mouvement espérantiste?**

### **Résumé**

Depuis environ 1990 le mouvement espérantiste a introduit le nouveau concept de droits linguistiques dans sa base théorique. Le concept est compris de diverses manières, par exemple comme le droit d'utiliser sa langue maternelle, ou le droit d'acquérir une langue localement hégémonique, etc. Dans le mouvement il a été adopté comme le droit de participer équitablement à la communication entre locuteurs qui possèdent, entre autres, des langues maternelles différentes. Autrement dit, cela vise à éradiquer la relation de pouvoir dans la communication pour réaliser un égalitarisme linguistique. La relation de pouvoir qui donne naissance à une hégémonie linguistique et communicationnelle, et par suite à une exclusivité linguistique, est le véritable problème. Si le mouvement espérantiste trouve son motif d'existence universelle dans une telle construction de sa théorie, le mouvement actuel acquerra de “nouveaux devoirs” exigés par la théorie.

Comme langue-pont très utile, l'espéranto peut rendre équitable la communication internationale et en éradiquer une certaine relation de pouvoir, mais cela ne signifie pas que la langue éradique toutes les relations de pouvoir qui, injustement, créent la discrimination linguistique, ou que la communication par l'espéranto garantit toujours une communication juste. On peut observer quelques phénomènes de discrimination linguistique dans le monde de l'espéranto. Malheureusement, la communication en espéranto ne parvient pas à éliminer les relations de pouvoir entre les utilisateurs. Concrètement par exemple, un locuteur de faible niveau linguistique doit subir l'exclusion de l'arène de la communication et porter une étiquette de débutant incapable faiblement valorisé. Un utilisateur de l'espéranto très habile et cultivé est

quelqu'un qui a acquis, tout à fait inconsciemment, un pouvoir de communication qui empêche très souvent une communication équitable et sans domination.

On trouve ici un premier problème, que le mouvement doit traiter. Comment pourrions-nous éradiquer un tel pouvoir? Selon mon étude la première clé consiste à repenser la manière dont on enseigne l'espéranto, et la façon de comprendre la compétence linguistique. En outre on peut trouver un problème dans l'espéranto même en tant que langue, en rapport avec les droits linguistiques. L'espéranto contient un dualisme sexuel qui s'apparente à la discrimination sexuelle. Comment peut-on expliquer théoriquement de tels phénomènes, et que peut faire le mouvement concrètement dans son action quotidienne? Tel sera l'objet de ma conférence.

## **¿Qué significa la incorporación de los derechos lingüísticos para el movimiento en pro del Esperanto?**

### **Resumen**

A partir de 1990 el movimiento en pro del Esperanto incorporó un nuevo concepto en su base teórica, los derechos lingüísticos. El concepto es entendido de diversas maneras, por ej. el derecho al idioma materno, o el derecho a aprender un idioma localmente hegemónico, etc. En el movimiento se adoptó como el derecho a participar igualitariamente en la comunicación entre hablantes de idiomas maternos diferentes. En otras palabras, se propone anular la relación de poder en la comunicación, para hacer realidad el igualitarismo lingüístico. El verdadero problema es la relación de poder, que da origen a la hegemonía lingüística y comunicacional. Si el movimiento en pro del Esperanto encuentra su sentido universal de existencia en la construcción de una teoría tal, tendrá "nuevas tareas", demandas teóricas que atender.

Como un idioma-puente muy útil, el Esperanto puede igualar la comunicación internacional y anular allí alguna relación de poder, pero eso no significa, que el idioma anule todas las relaciones de poder que injustamente determinan alguna forma de discriminación lingüística, o que la comunicación mediante el Esperanto siempre garantice una comunicación justa. Pueden observarse algunos fenómenos de discriminación lingüística en el propio mundo del Esperanto. Por ejemplo, la comunicación en Esperanto lamentablemente no logra eliminar las relaciones de poder entre los hablantes. En concreto, un hablante de nivel bajo debe sufrir exclusión en la arena comunicacional, y ser etiquetado como un principiante incapaz, pobremente valorado, por ejemplo. Un hablante de Esperanto muy capaz y culto ha adquirido, sin estar consciente de ello, un poder para la comunicación, que muy a menudo dificulta una comunicación igualitaria y libre de presiones.

En esto radica un primer problema, que debería ser enfrentado por el movimiento. ¿Cómo podemos anular ese poder? Según mi investigación la primera clave consiste en repensar la educación para el Esperanto, y la manera de entender la solvencia en la lengua. Por otra parte, se puede detectar un problema en el Esperanto mismo en tanto idioma, relacionado con los derechos lingüísticos. El Esperanto contiene un dualismo según sexo, que se asocia a discriminación sexual. Me referiré a la manera de clarificar teóricamente estos fenómenos, y a qué puede hacer el movimiento concretamente en su acción cotidiana.

# Kion signifas la enkonduko de Lingvaj Rajtoj por la Esperanta movado?

## La celo de ĉi tiu prelego

Post ĉirkaŭ 1990 la Esperanta movado enkondukis la novan koncepton, *Lingvaj Rajtoj*, en sian teorian bazon. La celo de ĉi tiu prelego estas analizi kaj prezenti, kion la ideo signifas por la Esperanta movado sur la bazo de la plej nova esploro. Kio estas “Lingvaj Rajtoj”? Kian rilaton la movado kaj la koncepto havas? Kiel la koncepto ŝanĝas la movadon? Aŭ kiel la movado devas transformi sin enkondukinte la koncepton? Laŭ mia studo, en Esperantujo bedaŭrinde ĝis nun, tia esploro ne ekzistas, precipe studo de teoria flanko. Mi provis respondi tiujn demandojn uzante sociolingvistikan metodon. Eble “sociolingvistiko” ne estas memklara por multaj Esperanto-uzantoj. Simple dirite, en “lingvistiko” unue oni studas kun la fokuso preskaŭ nur sur lingvoj mem, sed en “sociolingvistiko” oni analizas lingvojn surbaze de la ideo, ke lingvo ĉiam estas sub forta influo de socioj kaj homoj. Ĝi aperis parte sur la bazo de kritikoj kontraŭ “lingvistiko sen socioj kaj homoj”. Sur tia starpunkto lingvostudo nepre postulas sociologiajn metodojn, kiuj estas nemankeblaj por klarigi diversajn fenomenojn de lingvoj.

## Kio estas Lingvaj Rajtoj?

La koncepto estas historie tre nova, kaj pro tio komprenata en diversaj manieroj. Ni ankoraŭ ne havas unu komunan difinon. La signifo grande varias laŭ uzantoj kaj esploristoj. Ekzemple kelkaj fokusas la unuan lingvon, alivorte gepatran lingvon. Laŭ la opinio oni povas klarigi la rajton konkrete ĉi tiel:

- A. 1. ĉiuj homoj rajtas sin identigi kun unu el la gepatraj lingvoj (aŭ kun pluraj gepatraj lingvoj), kaj la identigo povas esti agnoskita kaj respektata de aliaj homoj,
2. ĉiuj homoj rajtas lerni sian gepatran lingvon kiel parolan kaj skriban lingvon. (Tio signifas, ke minoritataj homoj rajtas edukiĝi en la gepatra lingvo.),
3. ĉiuj homoj rajtas uzi la gepatran lingvon en preskaŭ ĉiuj publikaj lokoj (inkluzive de lernejoj).
- B. ĉiuj homoj povas fariĝi parolantoj de du lingvoj: gepatra kaj oficiala, en la lando, kie la gepatra ne estas oficiala lingvo. (Se ili havas du gepatrajn lingvojn, ili povas fariĝi parolanto de tri lingvoj.)
- C. la ŝanĝo de gepatra lingvo estas libervola, ne deviga.

Laŭ ĉi tiu difino, la koncepto estas unue “rajto uzi la unuan lingvon”. La uzo de la unua lingvo kaj la agnosko de la rajto uzi ĝin estas konsiderataj kiel tre gravaj kondiĉoj por teni individuan identecon. Kiam homo komencas formi mondo-koncepton post sia naskiĝo, la unua lingvo estas rimedo, kiu ebligas al ni havi nian dignan proprecon. Tio ĉi estas konsiderata kiel la bazo por aserti, ke Lingvaj Rajtoj devas esti kalkulataj kiel unu el la homaj rajtoj.

Aliaj provizore difinas Lingvajajn Rajtojn alie:

“Lingvaj Rajtoj estas rajtoj, kiuj garantias kaj ne malpermesas al homoj kaj al hom-grupoj uzi iun ajn preferatan lingvon en la socia vivo.”

En la argumento la enhavo de la rajtoj estas “vivi en la socio” per “preferata lingvo”, ne nur per la unua lingvo.

Ĉiuokaze, la celo de Lingvaj Rajtoj estas reakirigi al la parolantoj de minoritataj lingvoj, identecon kaj samajn sociajn rajtojn kiel la parolantoj de la majoritataj lingvoj. Kiel multaj Esperanto-uzantoj bone scias, uzantoj de minoritataj lingvoj estas socie diskriminaciataj longtempe. Tio ĉi koncepto de Lingvaj Rajtoj estas teorie prava. Sed kiam oni intencas politike

trakti la aferon por efektive garanti la rajtojn, tio tuj renkontas malfacilan altan muron, ĉar, ĝenerale dirite, lingvo esence ne povas ekzisti kaj funkcii ĉe unu persono nek ĉe eta homgrupo. Lingvo ĉiam bezonas multe da “samlingvanoj”. Por ke la garantiado estu efektivigita, la minoritata lingvo estos intence lernata kaj uzata de ne-parolantoj de la koncerna lingvo. Nome, Lingvaj Rajtoj efektiviĝas ne “ĉe unu homo” sed “inter homoj”. Lingvaj Rajtoj havas sian konkretan kernon en rilatoj inter homoj.

Ekzemple por garanti Lingvajn Rajtojn de iu homo, kiu uzas minoritatan lingvon, tuta socio pagas multe da kosto por komunikado, tradukado kaj edukado. La koncepto de rajto postulas universalecon. Do, eĉ al unu persono Lingvaj Rajtoj devas esti politike garantiataj. En mult-lingva cirkonstanco, sufiĉa garantio de Lingvaj Rajtoj estas tute malebla. Ekzemple pripensu multiĝon kaj diversiĝon de enmigrintoj. Ĉi tiu problemo estas spertata ankaŭ de Eŭropa Unio. EU celas egalrajte trakti la lingvojn de la membro-ŝtatoj, sed laŭ mia penso la lingva politiko de EU nepre fiaskos aŭ jam fiaskis. Pro tiu ĉi “absoluta malebleco” Esperanto povas havi signifan rolon en la garantiado de Lingvaj Rajtoj.

### Esperanto kaj Lingvaj Rajtoj

La “MANIFESTO DE PRAGO de la Movado por la Internacia Lingvo ESPERANTO” estas tre konata por ni. Ĝi estis lanĉita en la jaro 1996. En la manifesto ni povas vidi, kiel reagis la homoj kun gvida rolo en la Esperanto-movado, al la nove aperinta koncepto de Lingvaj Rajtoj. En la manifesto oni priskribas ĉi-tiel:

5. Lingvaj Rajtoj. Ni asertas, ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por Lingvaj Rajtoj.
7. Homa emancipiĝo. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo – projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homa komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

En ĉi tiu manifesto oni klare bazas la signifon de Esperanto sur “rajtoj”. Nome, ĝi argumentas ke, kiel “universala komunikilo”, Esperanto, povas malgrandigi la “potenco-diferencojn inter la lingvoj”. La Esperanto-movado celas, ke malegaleco inter diversaj lingvo-parolantoj proksimiĝos al estingo. Tiel Esperanto kontribuos al la garantio de Lingvaj Rajtoj. La strukturo de la argumento tre verŝajne ne havas rompon. Grave ĉi-tie estas ke troviĝas granda diferenco inter la difinoj pri Lingvaj Rajtoj antaŭe montritaj kaj la lingvo-rajtiga plano de Manifesto de Prago. Iliaj kompreno-manieroj de la koncepto estas tute malsamaj.

Kelkaj esploristoj konsideras grave, ke ĉiuj povas ĝui publikajn servojn en sia unua lingvo sur la sama nivelo de la parolantoj de supera lingvo. Sed la Manifesto de Prago proponas uzi Esperanton en plurlingva cirkonstanco, anstataŭ la unuan lingvon. La unuaj celas “levi” malsuperan lingvon al la nivelo de supera lingvo, sed la lasta celas “limigi” la uzo-sferon de supera lingvo al la sama nivelo de malsupera lingvo, per la uzo de ponto-lingvo, Esperanto. Tio povas okazi en loko, kie troviĝas parolantoj de malsamaj lingvoj. Kiel ni jam supre vidis, “levi” ne povas eviti absolutan fiaskon. Do, limigi la uzo-sferon de supera lingvo estas unusola racia solvo.

Manifesto de Prago konsideras, ke prefere oni ne insistu “uzi sian unuan lingvon” en mult-lingva cirkonstanco. Se oni povas efektive komunikadi kun respekto egale al ĉiuj lingvanoj, oni devas kontentiĝi. Tiu ĉi sinteno staras eĉ kontraŭ la “rajto uzi lingvon, kiun oni volas uzi, por sia socia vivo, sen iaj ajn malhelpoj”. Nome, la bazo de Manifesto de Prago estas “rajto komunikadi egalrajte”, sed ne “rajto uzi lingvon, kiun oni volas uzi” aŭ ne “rajto uzi sian unuan lingvon”.

Lingvaj Rajtoj naskis vidpunkton trakti lingvon de la flanko de rajtoj. Kaj la bazo de Praga Manifesto progresigis unu paŝon la koncepton de Lingvaj Rajtoj. En tiu ĉi moderna epoko, en

kiu homoj facile moviĝas de lando al lando, se ĉiuj homoj insistus pri la “rajto ĉiam uzi lingvon, kiun oni volas uzi” aŭ sian unuan lingvon, oni devus ĉiam akompanigi interpretistojn, aŭ la homoj devus lerni ĉiujn lingvojn. Sed tio farus Lingvajn Rajtojn mal-efektivigeblaj surpapaĵoj. Manifesto de Prago venkis la “absolutan maleblecon” per kreiva “ŝovado” de la koncepto de rajtoj al “rajto egalrajte komunikadi”. Tiu ĉi “ŝovado” ne difektas la rilaton inter la unua lingvo kaj la identeco de la uzantoj. Ĉar ni ne povas pensi, ke la identeco de la uzantoj estas damaĝita, se ĝi estas sufiĉe agnoskita socie kaj ne estas devigata al granda malavantaĝo, eĉ se ĝia uzo-sfero en la socio estas relative limigita. Ĉi tiu punkto estas la unua konkludo de tiu ĉi prelego. Ĝi montras la signifon de la rolo de Esperanta movado. La movado tre saĝe kaj kreeme transformis la koncepton Lingvaj Rajtoj.

### **Lingvo-rajta valoro: la signifo de la enkonduko de la ideo Lingvaj Rajtoj**

La Esperanta movado bonorde sukcesis akiri universalan teorion bazon unuafoje, enkondukinte Lingvajn Rajtojn. Alivorte estas atestite, ke Esperanto havas valoron por ĉiuj homoj en la mondo, ankaŭ por ne-uzantoj de Esperanto. Ĝi ne estas ludilo de lingvo-amantoj, ĉar Esperanto trovis sian bazon en la koncepto de homaj rajtoj.

La universalan valoron, kiun Esperanto havas por garantii rajtojn al lingvo kaj komunikado, mi nomu *valoro por Lingvaj Rajtoj*, alivorte *laŭlingvo-rajta valoro*. Esperanto povas provizi la uzantojn per diversaj valoroj, inkluzive valoron por kontentigi *privatan* ĝuon. La enkonduko de la koncepto de *valoro por Lingvaj Rajtoj* ebligas al ni konscie distingi la multajn valorojn, kiujn Esperanto havas. Ekzemple, kiam movadanoj de Esperanto montras pozitivan flankon de Esperanto kaj rekomendas la lingvon, ili kutimas arbitre montri diversajn valorojn. Konkrete dirite, Esperanto utilas por garantii rajtojn; Esperanto estas interesa; per Esperanto oni povas vojaĝi malmult-koste, oni povas akiri eksterlandajn amikojn aŭ foje amantojn facile per Esperanto; Esperanto estas simple bela; aŭ Esperanto helpas lingvo-lernantojn de eŭropaj lingvoj k.t.p. La koncepto de valoro por Lingvaj Rajtoj funkcios por distingi la valorojn.

Kiel planita lingvo, Esperanto posedas du faktorojn, kiuj donas al ĝi valoron por Lingvaj Rajtoj. Ili ebligas al ĝi esti utila por garantii Lingvajn Rajtojn. La unua estas ke principe Esperanto ne havas homojn, kiuj parolas ĝin kiel sian unuan lingvon, nome denaksaj parolantoj. La alia estas ĝia facileco por lernado. Kion signifas la facileco? Por lerni Esperanton, oni devas prepari kaj dediĉi sian kapitalon, sed ĝi estas relative malgranda. La kosto por lernado estas dividebla en kelkajn elementojn. Nome, “kapablo, tempo kaj mono”. La rezulto de lingvo-lernado ricevas influon de la faktoroj. La unua estas lingva kapablo de la koncerna lernanto. La dua, tempo dediĉebla al la lernado. La tria, sufiĉa monrimedo, kiu ebligas al la lernanto dediĉi longan tempon kaj prepari bonan situacion por lernado. La fakto, ke la kosto estas malgranda, signifas, ke la grandeco de la preparita kaj dediĉita kosto, estas ne tre influebla al lernada rezulto, t.e. akirita kapablo de la lernanto. Minimuma lerno-kosto estas necesa kompreneble al ĉiuj homoj, same kiel ĉiuj bezonas minimuman materialon por teni la vivon. Kaj eĉ se ne ĉiuj, sed multaj homoj povas prepari minimuman lerno-koston. Do, lingvo, kiu postulas malmulte da kosto por lernado, povas relative egale garantii la atingon de la lernado. Nome, egaleco de ŝanco garantias la egalecon de rezulto.

Ĉi tie ni turnu nin denove al la valoro por Lingvaj Rajtoj, kiun Esperanto havas. La valoro donas al la lingvo funkcion, kiu ebligas pli egalrajtan komunikadon. Mi ripetas denove ĉi tie. La funkcio venas de “manko de la homoj, kiuj parolas ĝin kiel sian unuan lingvon” kaj “malgranda kosto por lernado”. Sed pli grava kerno de la diskuto estas, ke ju pli malgranda estas la kosto por lernado, des pli la egalrajtiga funkcio de Esperanto estos efektiva sur alta nivelo, kaj des pli la valoro de Esperanto por Lingvaj Rajtoj estos atinginta sur alta nivelo. Tiuj ĉi karakteroj de Esperanto preparas necesan kondiĉon por ebligi komunikadon, kiu plenumas Lingvajn Rajtojn. Esperanto certe taŭgas realigi Lingvajn Rajtojn, sed en la realigado, ni povas trovi diversajn gradojn. Ni tute ne povas diri “ĉio estas bonorda se ni esperantumas”.

Tiu ĉi teoria bazo de Esperanto, nome la mekanismo, kiu naskas universalan valoron de Esperanto, estas ekstreme simpla. Kvankam ofte ĝi ne estas prikonsciata, por movadaj aktivuloj ĝi estas preskaŭ memkomprenebla. Sed, laŭ mia vido, serioza problemo estas trovebla ĉi tie. Nome, troviĝas granda distanco inter la nuna reala stato de Esperanto-movado kaj la teoria bazo de Esperanto. Al mi ŝajnas, ke la movado ne ĉiam iras kun atento al la valoro por Lingvaj Rajtoj, kvankam Lingvaj Rajtoj donas socian kaj etikan bazon al la disvastigo de Esperanto. Kaj la movado ankaŭ ne ĉiam atentigas la mekanismon, kiu naskas valoron por Lingvaj Rajtoj. Alivorte, la “realo” kontraŭdiras al la “ideo”. Tiu ĉi kontraŭdiro aperas plej evidente en la sinteno de la Esperanto-movado la lernado de la lingvo. Pri tiu ĉi punkto ni traktu sekve.

### **Sinteno pri lernado de Esperanto laŭ la vidpunkto de la valoro por Lingvaj Rajtoj: Faltruo en la koncepto de laŭgrada progreso de lernado**

Kio estas la sinteno pri Esperanto-lernado, kiu kontraŭas al la teoria bazo de Esperanto? Konkize dirite, tio estas la sekva pensmaniero: “Lernado de Esperanto valoras. Do ju pli multe ni lernos, kaj ju pli lerta lingvo-uzanto ni fariĝos, des pli alta valoro estos atingita.” Laŭ tiu ĉi penso, relative alta lingva nivelo estas laŭdata, respektata kaj revata, sed male, relative malalta nivelo estas konsiderata kiel konkerenda, malbona, malrespektata stato. Tamen kie troviĝas problemo en tiu ĉi tre ĝenerala pensmaniero?

Se ni pensas ke “lerni intensive kaj akiri altan lingvan nivelon estas bona afero”, tio kondukas nin al la sinteno pli alte taksu lingvo-uzantojn, kiuj atingis altan nivelon. Tre lertaj Esperanto-uzantoj spertis “intensivan lernadon” kaj “amasan dediĉon de energio-materialoj por lernado”.

Tiun ĉi pensmanieron oni povas nomi *koncepto de laŭgrada progreso de lernado*. Unu el la konkretaj ekzemploj estas Lingva Ekzameno kaj Beletra Konkurso. Ili estas konstante okazigitaj de Esperanto-organizaĵoj. Ilia unua celo verŝajne estas publike laŭdi alt-nivelajn lingvo-uzantojn, per konkursado, la dua celo estas tiel stimuli lernantojn al pli alta nivelo. En la fono de tiuj ĉi eventoj videblas la koncepto de laŭgrada progreso de lernado. Tamen, tiuj ĉi pensmaniero kaj eventoj estas neakcepteblaj, se oni laŭeble grandigas la valorojn por Lingvaj Rajtoj, nome sociaj bazoj de Esperanto. “Laŭeble intensive lerni Esperanton” signifas, ke oni preparas kaj ŝutas al la lernado multe pli grandan kvanton da kosto ol “minimume necesan”. Tamen en tiu okazo la atingota valoro por Lingvaj Rajtoj nepre pli malgrandiĝos. Ju pli multe da superflua energio-materialo oni ŝutos, des pli la valoro por Lingvaj Rajtoj malaltiĝos, eĉ se oni gajnos tre altan kapablon por lingvo-uzado.

Ĉe la komenco de lernado la atingita valoro por Lingvaj Rajtoj estas 0. Komence, ju pli altan lingvan kapablon oni akiros, des pli alta fariĝos la atingita valoro por Lingvaj Rajtoj. Sed kiam la kvanto de energio-materialo por lernado multiĝas ĝis iu grado, la valoro por Lingvaj Rajtoj atingas la maksimumon, kaj poste la valoro daŭre malaltiĝas. La malaltiĝo estas laŭ la grandiĝo de la konsumkvanto de energio-materialo por lernado. Tio ĉi estas rezulto de la *troa aŭtoritateco kaj potenco*.

Ni konsideru konkrete. Novaj lernantoj progresas paŝon post paŝo, kaj ili spertos egalrajtan komunikadon en mult-lingva cirkonstanco. Ili forte sentos kun miro, ke ilia sfero de komunikado pli kaj pli grandiĝas. Ankaŭ ĉiuj ĉi tie spertis tion, mi kredas. Fakte la sperto turnis min al esperantologia studo. Oni povas klarigi ĉi tiun fenomenon ĉi tiel; la atingo de la valoro por Lingvaj Rajtoj naskas tiajn spertojn. Tiam ili rimarkos la diferencon inter lernadoj de Esperanto kaj aliaj fremdaj lingvoj. La kvanto de energio-materialo necesa por Esperanto estas multe malpli granda ol tiu por aliaj lingvoj. Sed kiam la sumo de energio-materialo por lernado superos iun gradon, la aminda sento de lernantoj perdiĝos. Ĉar la proporcio de konsumita energio kaj la atingo en la lernado de Esperanto fariĝas malgranda aŭ sama kiel tiu de ordinaraj lingvoj. Konstante lerni dekojn da jaroj, ellegi ĉiujn klasikaĵojn, kaj posedi ĉiujn Zamenhofajn esprimojn signifas NENION por la valoro por la Lingvaj Rajtoj, ĉar nur tre malmultaj homoj

disponas pri granda kvanto da energio-materialo por la lernado. Do, tio ĉi kontraŭstaras al la egalrajteco, kiun la Esperanto-movado volas realigi.

Troviĝas ankaŭ alia problemo ĉe “alta kapablo de lingvo-uzo”. Alta kapablo ebligas al la lerta uzanto stari sur supera pozicio en la komunikado. Alta kapableco fariĝas potenco en komunikado, ĉar lertaj uzantoj povas regi la komunikadon laŭ sia volo, utiligante “riĉan” esprimon, abundan vorto-provizon, fluan paroladon. Kontraste novaj lernantoj de Esperanto tute ne disponas je tio. Lertuloj havas multajn laborilojn en komunikado, sed mallertaj ne. Ĉi tie ni povas trovi akiradon de potenco en la komunikado. La diferenco de la nivelo de lingvo-uzo estas la diferenco de potenco en komunikado. Ju pli la diferenco grandiĝos, kaj ju pli la supereco altiĝos, lerta uzanto senkonscie akiros “troan potencon” en komunikado. Se oni intencas garantii Lingvajn Rajtojn en komunikado, tiu potenco malhelpas la efektivigon de la rajtoj. Alivorte, “alta nivelo de lingvo-uzo” estas komence favora por la efektivigo de la valoro por Lingvaj Rajtoj. Sed post la troa akirado de lingvo-kapablo tio ekhavas “inversan funkcion”. Tial post la maksimumiĝo, la valoro por Lingvaj Rajtoj konstante malgrandiĝas.

Kelkaj ĉi tie povos demandi min: “Kiel vi povas montri la maksimuman gradon, t.e. la plej propran kvanton de lernado kaj lingvo-kapablo. La grado estas tute arbitra kaj sensenca, se vi ne povas montri tion, ĉu ne?” Kompreneble konkretigi la plej konvenan gradon estas ne facile, kaj mi ne estas plene preta tuj fari tion. Sed oni povas atesti *la teorian ekziston* de la plej konvena grado, kaj ĉi tiu prelego celas atentigi Esperanto-movadon pri tio. Alivorte ĉi tiu studo donas al la movado, ĝis nun nekonitan novan taskon gravan, kiu koncernas Lingvajn Rajtojn.

Tiu ĉi fenomeno estas sama kiel tio, ke ne-denaskaj parolantoj malkuraĝiĝas antaŭ denaskaj parolantoj de la unua lingvo. Ne-denaskaj uzantoj falas sur malavantaĝan staton en komunikado. En la fono de tiu ĉi fenomeno kuŝas senkonscia diferenco de potenco. Denaskaj parolantoj ne intencas havi potencon, sed certe havas en si. Oni emas konsideri, ke inter la uzantoj de Esperanto ne naskiĝas potenca rilato, ĉar Esperanto estas lingvo, kiun ĉiuj devas lerni por posedi. Sed tiu ĉi penso kaŝas la potencon rilaton, kiu fakte troviĝas inter la uzantoj de Esperanto. Estas certe, ke inter la uzantoj de Esperanto ne troviĝas tia potenco-rilato, kian oni vidas inter la uzantoj de ne-planitaj lingvoj. Sed fakte alispeca potenco-rilato kreiĝas ĉefe pro “diferenco de la niveloj de lingvo-uzo”. Ĉu Esperanto-uzantoj kun malalta lingva nivelo ne timiĝos antaŭ altnivelaj uzantoj? Laŭ mia propra sperto, estas ne malofte, ke la vorto “komencanto” estas uzata por moki iun.

Tiu ĉi diskriminacio, klasifiki la lingvo-uzantojn laŭ ilia lingva nivelo, rekte kontraŭas al la ideo de la Esperanto-movado. Tamen en mia proksimo mi ne vidas kritikon al tiu diskriminacia sinteno. Kredeble, tio ĉi rezultis el la koncepto de laŭgrada progreso de lernado, kiu malalte taksas “esti novaj lernantoj”. En Esperanta komunikado, lertaj uzantoj ĝuas la “profiton”, ke ili povas pli altkvalite kaj pli laŭ-vole esprimi sin ol mallertaj uzantoj. Tiu ĉi malekvilibra rilato fariĝas faktoro, kiu malhelpas atingon de la valoro de Lingvaj Rajtoj. Do, la Esperanto-movado bezonas havi instru-planon, per kiu oni celu akiri la plej konvenan lingvan nivelon.

Kelkaj eble havos la sekvantan demandon. “Jaron post jaro ekde kiam la lernantoj komencis lerni Esperanton, ili *nature* fariĝas pli lertaj kaj kapablaj Esperanto-uzantoj. Ĉu ili ankaŭ estas malhelpantoj kontraŭ Lingvaj Rajtoj?” Certe iuj spertiĝos grade kaj povos fariĝi kapablaj. Sed kiel oni povas ekscii el la ekzisto de la termino “eterna komencanto”, fariĝi pli lerta kaj kapabla ne eblas sen konscia konsumado de energio-materialo por la lernado. Alie, laŭ ĉi tiu studo, ankaŭ tiaj laŭtempaj lertuloj povos funkcii kiel kontraŭantoj de Lingvaj Rajtoj, se ili komunikadas lingve kaj psikologie, premante malpli kapablajn Esperanto-uzantojn. Pli lertaj uzantoj estas pli fortaj kunpotencaj uzantoj. Ili havas rigoran devon konscie ne premi malpli fortajn uzantojn, se ili subtenas gardi Lingvajn Rajtojn.

Ni devas forlasi la antaŭjuĝon, ke “des pli bone, se ju pli multe ni lernos kaj ju pli lertaj ni fariĝos”. Ni devas klare koncepti, ke la antaŭjuĝo kontraŭas al la valoro de Esperanto por Lingvaj Rajtoj. Estas tre grave, ke ni nepre ne forgesu la ek-irpunkton “kian valoron Esperanto-



lernado havas”. Ni tendencas forgesi la plej gravan bazon, kiam ni volas rapide atingi altan lingvo-nivelon.

Kompreneble unuopaj homoj rajtas libere ŝuti iom ajn grandan kvanton da kosto por lerni Esperanton. Tiuj lernas Esperanton ne por la valoro de Lingvaj Rajtoj, sed por sia propra celo. Tamen tiuj personoj devas esti akre kritikitaj, se ili konsideras sian altan lingvo-nivelon, “realigo de valoro de Esperanto por Lingvaj Rajtoj”. Tre alta kapablo estas akirita per granda kvanto da kosto, tial tio tute ne havas rilaton kun “universala valoro”. Ni ne devas ignori la diversecon de la “valoro de Esperanto”. Ni ne devas konfuzi la realigon de valoro por Lingvaj Rajtoj kun privata valoro. Privata valoro ne havas universalecon. Se oni konfuzas du malsamajn valorojn, tio estas ago, kiu nuligas la valoron por Lingvaj Rajtoj.

Do, se la Esperanto-movado havas sian bazon sur la valoro por Lingvaj Rajtoj, ni devas senĉese kaj kritike reekzameni nin surbaze de la teoria fundamento. Ĉu ni ne vidas pozitive la ŝuton de granda kvanto da energio-materialo al la lernado? Aŭ ĉu la lernado de Esperanto ne devojiĝas al “la valoroj ne por Lingvaj Rajtoj”, sub la slogano de “la valoro por Lingvaj Rajtoj”. Tiu ĉi konfuzo de “diversaj valoroj” kutime okazas senmalice kaj senkonscie. Ne estas troigo, kiam mi diras, ke Esperanto-lernantoj ekspluatas Esperanto-movadon, nome ke ili havas subkonscian volon modifi la lernadon de Esperanto al “realigo de privata valoro”. Ni bezonas atentigi lernantojn de Esperanto pri tiu ĉi logo. Mi diru, ke seriozaj kaj bonkoraj Esperanto-lernantoj estas atentindaj, danĝeraj estaĵoj.

Kompreneble, celi kulturajn atingojn en la procezo de Esperanto-movado, tio ne bezonas esti neita. Ekzemple, disvolviĝon de literaturo, lertiĝon en lingvo-uzo. Sed se la kulturaj atingoj fariĝos ekskluzive ĉefaj celoj, la atingoj, kromaj derivaĵoj povas kontraŭstari kaj erozii la originan celon de Esperanto. Kulturaj atingoj plenumitaj de unuopuloj fakte havas “valoron”. Sed tiu ĉi valoro estas “privata valoro”, nur por manpleno da “riĉaj” homoj. Ĉi tie “riĉa” signifas ke tiuj povas prepari grandan koston por Esperanta lernado. Nur malmultaj riĉuloj povas ĝui la kulturajn atingojn. Por novaj Esperanto-lernantoj tiuj ĉi “kulturaj atingoj” estas aĵoj nur por gape rigardi. Kiel la rezulto de “altaj kulturaj atingoj”, se kreiĝas cirkonstanco, ke tro potencaj Esperanto-uzantoj malhelpas komunikadon por Lingvaj Rajtoj, la Esperanto-movado perdas sian signifon. Ni devas venki tiun ĉi problemon. La Esperanto-movado ĝis nun ne klare konceptas ĉi tiun problemon, pro manko de sufiĉa teoria esploro.

## **Konkretaj 2 taskoj de La Esperanta movado: “Luksaj vortoj”, idiotismo kaj komunikada stilo**

Ĝis-nuna argumento donas al ni 2 konkludojn. Unue ni bezonas ekzameni la nunan staton de la Esperanto-movado kaj la instruado, surbaze de ĝia teoria fundamento. Due ni ĉiam devas serĉi la vojon, kiu ebligas maksimume malgrandigi la koston por lernado. Tio maksimume grandigos la valoron por Lingvaj Rajtoj. Por tio gravas trovi ekvilibrantan punkton inter la valoro por Lingvaj Rajtoj kaj la kosto por lernado. Lerni aŭ lernigi la lingvon senkonsidere la punkton, estas tre danĝera ago, kiu subfosas la bazon de Esperanto-movado.

Sekve mi montras konkretajn problemojn, kiujn la movado kaj Esperanto enhavas.

Unu el ili estas la uzo de idiotismoj kaj malfacilaj vortoj. Ili estas senpripense enkondukitaj de grandaj naciaj lingvoj. Ni rekonstatu, ke Esperanto estas facile lernebla pro la planiteco kaj pro tio, ke ĝi ne havas privilegiajn denaskajn parolantojn. Tiuj ĉi karakteroj naskis la valoron de Esperanto por Lingvaj Rajtoj, kaj samtempe donis al Esperanto universalan kaj etikan bazon. Do, ni devas atenti, ke la facileco kaj malmultkosteco laŭeble ne perdiĝu, dum ni disvastigas kaj utiligas Esperanton. Sed, la nuna stato ne estas tia.

Ekzemple la nunaj eŭropaj lingvoj komune posedas multajn abstraktajn vortojn venintajn de la latina kaj greka lingvoj. Ankaŭ Esperanto senkritike enkondukis la vortojn. Ĉar ili ne estas vortoj faritaj per kunmetado de bazaj radikoj, ili estas tre “luksaj vortoj”. Oni devas aparte lerni ilin.

Ekzemple, etnografio, diplomatio, filozofio, kilometro k.t.p. Ĉar la signifo de tiuj ĉi vortoj estas malvasta, ili ne estas utilaj por formi novajn vortojn. Kaj ili ne estas ofte uzataj. Do, la lerno-efikeco de tiuj vortoj estas mizere malgranda. Nome “luksaj vortoj” difektas la facilecon kaj malmultkostecon de la Esperanto-lernado.

Tiu ĉi influo de modernaj eŭropaj lingvoj ne estas limigita nur pri vortoj. Idiotismoj kaj diversaj formalaj reguloj por komunikado eniris en Esperanton, kaj donis ne-necesajn ŝarĝojn al Esperanto-lernado. Ekzemple, la maniero de saluto, kiel manpremo; idiotismoj prenitaj el grandaj lingvoj, ekz. la esprimo, *de tempo al tempo*. Ĉu vi scias, ke ne ĉiuj en la mondo salutas uzante manojn? Ankaŭ mi forte sentas strangecon uzi manojn por saluti. Tio dependas de kulturoj aŭ kutimoj. Sed en Esperantujo, ĉirkaŭvidu en la kongresejo, multaj salutas per manoj! Kion tio signifas? Kultura malegaleco, kaj la kroma lernokosto por tiuj, kiuj ne salutas mane. Tio certe kontraŭas al lingvaj rajtoj. Oni povas trovi novan koloniismon, postkoloniisman staton tie.

Pri la ekzemplo de idiotismo, kiun mi menciis, iu povos demandi min. La demando, kiel montri la signifon *de tempo al tempo* sen la idiotismo? Tio estas facile solvebla, ĉar ni havas diversajn anstataŭantojn por esprimi. Ekzemple, *unu aŭ du fojojn semajne, ne ofte, nemultfoje* ktp. La problemo kuŝas en tio, ke sen provi aliajn esprimojn oni faras elekton, kiu kontraŭas al Lingvaj Rajtoj.

### Universaleco de rajtoj signifas kion?

Kiam ni ekzamenas la staton de Esperanto el la vidpunkto de la valoro por Lingvaj Rajtoj, aperas antaŭ ni la alia flanko, kiun ni devas rigardi. Tio estas, ke Lingvaj Rajtoj apartenas ĝenerale al homaj rajtoj. Kaj ke la rajtoj lingvaj kaj ceteraj homaj devas malhavi kontraŭdiron inter si. Se la Esperanto-movado havas sian bazon sur garantiado de la rajtoj, kaj se ĝi volas firme resti sur la bazo, ĝi ne povas ignori nek helpi atencojn kontraŭ iuj ajn rajtoj. Se ĝi metas sian bazon sur Lingvaj Rajtoj, sed restas indiferenta al la atenco kontraŭ rajtoj ne-lingvaj, ĝia bazo sur Lingvaj Rajtoj fariĝas ne valida.

Unu problemo kondukita de la argumento estas el-genr-igo de Esperanto. La nuna Esperanto montras virinecon per aldono de sufikso “in”, kaj premisas seksan dualecon. Nome ĝi havas ideologion, ke oni povas klasifiki la homojn en la du kategoriojn viran kaj virinan. Rememoru *transgenrecon, inter-seksan* kaj la komplike mult-tavolan strukturon de sekso. La ideo, ke oni povas ignori seksan minoritaton pro la absoluta minoritateco, estas diskriminacia, ĉar ĝi intence forpelas el la socio homojn kun iu aparta karaktero. Tiu ĉi karaktero kontraŭas al la egalrajteco de seksoj, kaj ni bezonas serĉi alternativan esprimon, same kiel en la kazo de “malfacilaj vortoj”.

Ekzemple la pronomoj por la tria persono “li / ŝi” kaj vortoj formitaj per sufikso “in”, “patrino / onklino”, ne estas esceptoj. Vi povos demandi. “Oni ne povas esprimi la koncepton, ŝi aŭ onklino, sen indiko de la sekso!” Sed la demandinto serioze eraras, ne komprenas la problemon. La problemo ne estas, *kiel* ni esprimu la vorton “ŝi”. Vera problemo estas “*kial* ni intencas fari la esprimon “ŝi”. Havi ideologion, ke ĉiuj homoj estas divideblaj en du partojn “viro / virino”, kaj esprimi virinan genron per aldono de sufikso -- tio ĉi estas duobla eraro. La duobla eraro formas seksan diskriminacion. Tio estas unu el la fundamentaj atencoj al homaj rajtoj. Ĉar la moderna socio staras sur dogmoj, nome seksa dualismo kaj aliseks-amismo, tiu ĉi diskriminacio estas enkondukita ankaŭ en lingvojn.

Fundamenti Esperanton per homaj rajtoj, kaj doni al ĝi altan etikon kaj universalecon. Tio estas nia grava atingo de la movado. Sed samtempe, tio ĉi nepre postulas de la movadanoj, rigardi diversajn diskriminaciojn en la moderna socio, kaj kritike reekzameni ne nur la lingvan sed la tutan socian vivon.

## **Konkludoj**

La teoria influo de Lingvaj Rajtoj estas tre granda. Ni enkondukis la koncepton en la movadon, kaj bonorde sukcesis akiri universalan kaj etikan bazon de Esperanto. Sed la enkonduko samtempe postulas de ni detale repensi kaj traekzameni Esperanton kaj la movadon.

Ni devas rekonstrui lernadon kaj instruadon de Esperanto sur la bazo de Lingvaj Rajtoj.

Ni devas rigardi kaj senigi diskriminaciojn, kiujn la nuntempa movado kaj Esperanto havas, sur la bazo de Lingvaj Rajtoj.

Ni devas memkritiki nian ĉiutagan komunikadon sur la bazo de Lingvaj Rajtoj.

Temas pri taskoj ne-eviteblaj, farendaj. Ili ne nur estas laboro de esperantologo, sed ankaŭ de ĉiuj Esperanto-uzantoj, kiuj gardas Lingvajajn Rajtojn.

## **Aldona rimarko al la karaj legantoj**

Ĉi tiu prelego baziĝas sur miaj jam aperintaj artikoloj en fakaj gazetoj kaj libroj, kies parte rekonstruita klarigo fariĝis ĉi tiu enhavo. La plej ĉefaj el ili estas en *Japana Esperantologio*, 2008, publikigita en Tokio, Japanio (ISSN 0918-5895) kaj en *Esperantologio / Esperanto Studies*, 2010, ĉi-jara, publikigita en Uppsala, Svedio (ISSN 1311-3496, papera versio; ISSN 1404-4749, komputilreta versio). La interesatoj de ĉi tiu prelego, bonvole referencu ilin kun pli detalaj koncernaj informoj kaj argumentoj. Oni povas legi la duan rete.

# La kultura dinamiko de la kuba diasporo: Kubo laŭ la kuba-usona imago



## Jane Edwards

Vicdecano pri Internaciaj Aferoj en la Universitato Yale, Usono, kaj specialisto pri la kulturoj de Latinameriko. Ŝi estas magistro de la Kembriĝa Universitato, Britio, kaj doktoro (pri folkloro) de la Universitato de Pensilvanio, Usono. Inter ŝiaj verkoj estas libro pri la internaciigo de la studprogramoj de usonaj universitatoj kaj pluraj studoj pri internaciaj interŝanĝoj.

## Resumo

La cirkonstancoj ĉirkaŭ elmigrado el Kubo en la 20-a jarcento, precipe al Usono, rezultigis kreiĝon de diasporaj komunumoj kun karakterizoj komplete malsimilaj al tiuj de aliaj komunumoj de karibaj elmigrintoj. Tiu ĉi studo ekzamenas ŝlosilajn okazintaĵojn en la historio de la kuba komunumo de la usona urbo Miami – ekzemple la boataron Mariel kaj la aferon Elian Gonzalez – kiuj malŝlosos la dinamikon de la rilatoj inter kubanoj en Kubo kaj kubanoj en Usono.

Esplorado de la literaturaj kaj filmaj verkoj de kubaj foririntoj, inkluzive de romanverkistoj Reinaldo Arenas kaj Cristina Garcia, kaj ankaŭ la komentariisto kaj poeto Gustavo Perez-Firmat, helpos identigi gravajn demandojn de tiu komunumo. Tiuj demandoj vaste transiras politikajn debatojn por fronti problemojn de genro kaj sekso, raso kaj klaso, kaj la konflikto inter nostalgio al la insulo kaj allogo de la kontinento. La potenca dinamiko de krea engaĝiĝo per muziko kaj filmo, aldone al la literaturo, subtenis kaj subtenas eksterordinare komplikan rilaton inter la kulturo de Kubo kaj tiu de la kuba diasporo.

## The cultural dynamic of the Cuban diaspora: Cuba in the Cuban-American imagination

### Summary

The circumstances surrounding emigration from Cuba in the 20<sup>th</sup> century, particularly to the United States, has resulted in the creation of diasporic communities with characteristics completely different from those of other Caribbean emigrant communities. This study examines key events in the history of the Cuban community in the U.S. city of Miami – for example the Mariel boatlift and the Elian Gonzalez affair – which unlock the dynamic of the relations between the Cubans of Cuba and Cubans in the United States.

Investigation of the literature and film of those who left Cuba, including the novelists Reinaldo Arenas and Cristina Garcia, and also the commentator and poet Gustavo Perez-Firmat, will help to identify significant questions in this community. These questions go far beyond political debates to address problems of gender and sex, race and class, and the conflict between nostalgia for the island and the attraction of the continent. The powerful dynamic of creative engagement through music and film, in addition to the literature, has supported and continues to

support an extraordinarily complex relationship between the culture of Cuba and that of the Cuban diaspora.

## **La dynamique culturelle de la diaspora cubaine: Cuba dans l'imaginaire cubano-étatsunien**

### **Résumé**

Les circonstances qui entourent l'émigration de Cuba au 20ème siècle, principalement vers les Etats-Unis, ont eu pour résultat la création de communautés de diaspora avec des caractéristiques complètement différentes de celles des autres communautés d'émigrés caraïbes. La conférencière examinera des événements clés dans l'histoire de la communauté cubaine de la ville états-unienne de Miami – par exemple l'exode de Mariel et l'affaire Elian Gonzalez – qui révéleront la dynamique des relations entre les Cubains de Cuba et les Cubains aux Etats-Unis.

L'étude des oeuvres littéraires et filmiques de Cubains exilés, incluant les romanciers Reinaldo Arenas et Cristina Garcia, ainsi que le critique et poète Gustavo Perez-Firmat, aidera à identifier d'importantes questions de cette communauté. Ces questions dépassent largement les débats politiques pour affronter les problèmes de genre et de sexe, de race et de classe, et le conflit entre la nostalgie de l'île et l'attrait du continent. La puissante dynamique d'engagement créateur par la musique et le film, en plus de la littérature, a soutenu et soutient une relation extraordinairement compliquée entre la culture de Cuba et celle de la diaspora cubaine.

## **La dinámica cultural de la diáspora cubana: Cuba en el imaginario cubano-estadounidense**

### **Resumen**

Las circunstancias que rodearon la emigración desde Cuba en el siglo XX, principalmente a los Estados Unidos, condujeron a la creación de comunidades en la diáspora con características completamente diferentes a aquellas de otras comunidades de emigrantes caribeños. Este estudio examina eventos clave en la historia de la comunidad de la ciudad estadounidense de Miami – por ejemplo, el puente marítimo del Mariel y el caso Elián González –, que revelarán la dinámica de las relaciones entre cubanos de Cuba y cubanos en los Estados Unidos.

La investigación de las obras literarias y filmicas de quienes dejaron Cuba, incluyendo a los novelistas Reinaldo Arenas y Cristina García, y también al crítico y poeta Gustavo Pérez-Firmat, permitirá identificar importantes cuestiones de esta comunidad. Estas cuestiones van mucho más allá de los debates políticos, para afrontar problemas de sexo y género, raza y clase, y el conflicto entre la nostalgia por la isla y el atractivo del continente. La poderosa dinámica de compromiso creativo en música y cine, además de la literatura, sostuvo y continúa sosteniendo una relación extraordinariamente compleja entre la cultura de Cuba y aquella de la diáspora cubana.

## La kultura dinamiko de la kuba diasporo: Kubo laŭ la kuba-usona imago

Jen ni troviĝas en la vera, fizika, fakta Havano, kiun oni povas trovi en monda orientiga sistemo GPS kaj kiu estas vojaĝcelo en la horaroj de fluglinioj kaj maraj krozlinoj.... Kiam ni vojaĝas ni tamen ankaŭ portas kun ni, apud tiu realo, internan, personan, imagitan vojaĝcelon. Se vi jam vizitis Havanon, vi eble alportas ĉi tien la kolorojn kaj gustojn kaj vidaĵojn de antaŭ unu jaro aŭ antaŭ unu jardeko, aŭ eble duonjarcento en la pasinteco, depende de la dato de via antaŭa vizito; aŭ eble vi alportas tiun Havanon, kiun vi konstruis el filmoj, el la poemoj de Martí aŭ Lezama Lima, aŭ la romanoj de Carpentier aŭ Cabrera Infante, aŭ la fotoj en la retpaĝaro Gocuba. La geografioj de niaj spertoj, la signifoj de tiuj geografioj estas ĉiam afero elnegocita, ĉu ne? Ni neniam alvenas senmakulaj al iu lando nomata Blanka Tabulo: ni ĉiam kunportas iuspecan personan mensan meblaron, kiun ni adaptas al tio, kion ni trovas surloke, aŭ kiu dominas la ornamaĵojn de la pejzaĝo, kiun ni dume enloĝas.

Mia hodiaŭa celo estas levi kelkajn demandojn pri la karaktero de la internaj pejzaĝoj nomitaj “Kubo” fare de kubaj usonanoj. Ĉiu ajn enmigrinto en iun gastigan landon laŭnecese elnegocas pejzaĝon, mondon, personan kaj socian historion de la lando, el kiu ŝi aŭ ŝia familio elmigris. Sed la historio de la rilato inter Kubo kaj Usono, kaj specife la karaktero de la kuba enmigro al Usono de post la jaro 1959, kreis unikan dinamikon rilate tiun imagitan Kubon prezentitan de kubaj usonanoj en literaturo kaj aliaj kulturaj formoj. Ni ĵetos rigardon al la efiko ĉe kubaj usonanoj de kelkaj faktoroj en tiu ĉi nodita kaj komplika historio; poste ni konsideros kelkajn signife reaperantajn elementojn en la Imagita Kubo, utiligante – iom arbitre – la romanon de 1992 de Cristina Garcia, *Sonĝi en la kuba*, kun helpo kiel vojevadilo ankaŭ de la pika kaj senrespekta voĉo de la aŭtoro kaj kritikisto Gustavo Pérez Firmat; kaj dumvoje ni pasigos iom da tempo en la internaj vivoj de kubaj usonanoj tra iliaj (anglalingvaj) poemoj, esperantigitaj tiucele de Humphrey Tonkin.

### Kubusonana esceptismo

Dum pluraj jaroj mi instruis kurson por universitataj studentoj pri tielnomata latinusona literaturo kaj kulturo. Ĉiusemestre ĉeestis iom da latinusonaj studentoj, el meksika, dominikana, gvatemala, portorika, perua, kuba devenoj. Plej ofte ili ĉeestis la kurson, instruatan de homo evidente neniel latinusona, ĉar ili volis lerni pli pri la propra kulturo kaj la kulturo de la lando, el kiu venis iliaj familioj – sed ankaŭ por lerni pri la aliaj kulturoj grupigitaj kun la propra en la ĝenerala kategorio “latina” aŭ “hispandevena.” Tiu grupigo estas bazita sur lingvo: temas pri usonanoj el hispanparolantaj landoj, sed kutime ne inkluzive de Hispanio mem, kvankam ne ekzistas plena konsento pri tio. La signifo kaj karaktero de latina identeco emas ŝanĝiĝi depende de loko (Teksaso, Miamo, Novjorko), depende de politika intenco, kaj depende de klaso kaj raso, generacio, eduka nivelo, ekonomiaj realaĵoj. Sed ene de tiu komplika kaj malstabila mozaiko de signifoj, oni rekonas unu aferon: inter la diversaj enmigrintaj grupoj el latinamerikaj landoj, la kubanoj estas esceptaj. Ili difinas sin kiel esceptajn, kaj ili estas tiel difinitaj, ĉu bone ĉu malbone, ankaŭ de aliaj latinaj grupoj, de la ĉefaj amaskomunikiloj, kaj de nelatinaj usonanoj.

Sed kio pri latinamerikaj landoj ĝenerale, el usona vidpunkto? Meksiko, en la historio kaj dinamiko de sia nacia rilato kun Usono, havas kiel ĉefan problemon tion, kion oni resumas: “tiel for de Dio, tiel proksima al Usono.” Ekzistas teritoriaj limoj, pribatalataj kaj prikontestataj; ekzistas la rivero Rio Grande; ekzistas la ekonomiaj malhavoj kiuj pelas meksikanojn trans tiun bordon. Ĉe portorikanoj, la esenca demando estas koloniismo kaj akomodigo al realaĵoj de la dudeka jarcento ene de ekzistantaj kaj ekaperantaj politikaj strukturoj. Portorikaj kaj meksikaj komunumoj en Usono estas en stato de konstanta renegado. Ĉe meksikaj usonanoj la plej aktuala defio en la konstanta batalo por la rajto labori kaj vivi ĉe la norda flanko de la limo

estas leĝo nove akceptita de la ŝtato Arizono en aprilo de la nuna jaro, laŭ kiu neporto de enmigraj dokumentoj estas krimo. Tiu leĝo donas al la polico larĝan povon haltigi kaj reteni homojn suspektatajn pri neleĝa ĉeesto en la lando. Kiel la ĵurnalo *New York Times* klarigas, oponantoj de la leĝo nomas ĝin malferma invito molesti hispandevenantojn kaj diskriminacii kontraŭ ili, senkonsidere pri ilia civitaneca statuso. La meksika kaj portorika komunumoj, same kiel la aliaj latinaj komunumoj, ĉiuj spertas iujn problemojn de iro kaj reveno; sed kompreneble, tio kio igis la situacion de la kuba-usona komunumo escepta estas la politika rilato inter Kubo kaj Usono de post la jaro 1959. Ĉiam ekzistas elmigraj komunumoj, sed la kuba-usona havas sian formon unikan, malgraŭ tio, ke ĝi havas elementojn komunajn al tiuj de orienteŭropaj elmigrintoj de la epoko de la malvarma milito, aŭ komunajn al la elmigraj komunumoj onde pelitaj el Meksiko kaj Centra Ameriko pro milito, katastrofo aŭ ekonomia kolapso.

Kubo havas histoririĉan pasintecon kiel objekto de usona deziro. Luis Pérez atentigas, ke usonaj prezidentoj ekde John Quincy Adams rigardis usonan posedon de Kubo kiel aferon de nacia sekureco, kiel “nemalhaveblan al la kontinueco kaj integreco de la (usona) Unio mem”; kaj en la deknaŭa jarcento oni rigardis Kubon kiel ŝlosilan elementon en la kreskanta obsedo pri demandoj de nacia sekureco. Ĉe multaj insulanoj, ekzistis ankaŭ alia speco de reciproka deziro por pli proksima interrilato – precipe inter tiuj kiuj vidis en la rilato eblecojn de komerca sukceso aŭ de eskapo el ekonomia subpremo. En la malfrua deknaŭa jarcento, eble dek procentoj de la enloĝantaro de Kubo, do 100.000 homoj, elmigris, precipe por eviti la militojn pri sendependeco. Plimulto de migrantoj al Usono estis tabaklaboristoj, kiuj venis al Usono por fabriki cigarojn. En la jaro 1900, ekzistis pli ol cent fabrikoj de cigaroj en Ybor City, urbo fondita de la kubano Vicente Martínez Ybor en marĉo apud Tampa, Florido; kaj okazis konstanta trafiko de dekmiloj da homoj inter Florido kaj Kubo – plejparte sen interveno de la landlimaj aŭtoritatoj. Floris en Kubo elito kun tre fortaj ligoj al Usono. Malpli ol centkvindek kilometroj apartigas Usonon kaj Kubon; por tiuj, kiuj havis sufiĉajn rimedojn, pendola vivado inter du lokoj estis tute ebla.

Pérez Firmat sugestas, ke, se temas pri nekubaj komercaj interesoj, Kubo funkciis kvazaŭ anstataŭanto por Latinameriko kiel tuto. Luis Pérez, siavice, montras la elstarecon de nordamerikaj kulturaj elementoj en la evoluo de la kuba socio en la dudeka jarcento: “Multaj aspektoj de kuba identeco, kaj la sento de estonteco kaj rolo en tiu estonteco, rekte rilatis al Usono.... Kuba bonfarto, specife ekonomia ekspansio kaj prospero, kaj sekve socia paco kaj politika ordo, estis dependa de Usono.”<sup>23</sup> Kaj dum la dudeka jarcento, fakte jam de la jaroj tuj post la Unua Mondmilito, Havano fariĝis la unuavica “tropika paradizo” por Usono – paradizo de alkoholo (precipe, kiam tiu estis malpermesata en Usono), vetado kaj prostituado, de senbrida mafieca ekspluatado, kaj genre kaj rase torditaj renkontiĝoj kun iu ekzotika Alio. Luis Pérez priskribas la aferon kiel “rumo, rumbo, romantiko, ruleto kaj vetkurado.” Ne necesas multe detali la aferon ĉi tie (kontakto min se vi deziras fontindikojn en filmoj kaj fikcio). Temas ne pri duraj faktoj, kiuj ne vivas en tiaj medioj, sed pri la konstruo de imagita Kubo komuna al ambaŭ flankoj de tiu centkvardek-kilometra divido.<sup>24</sup>

Tiu delonge establita ŝablono, konata al ni pro la bunta virtuala vivo de la popularaj muziko kaj filmoj de la 1950-aj jaroj, estis tranĉita de la Kuba Revolucio. Pro la karaktero de tiu tranĉo, ekestis, tra tri jardekoj, unike disduigita kaj komplika komunumo de kubanoj ekzilitaj, kubanoj enmigrintaj kaj fine iliaj kubusonaj familioj, precipe en Miamo.

---

<sup>23</sup> Pérez, Luis Jr. 1995. “The Circle of Connections: One Hundred Years of Cuba-U.S. Relations” (La cirklo de kunligoj: Cent jaroj da rilatoj inter Kubo kaj Usono) en Behar, Ruth (red.) *Bridges to Cuba/Puentes a Cuba* (Pontoj al Kubo). Ann Arbor: University of Michigan Press.

<sup>24</sup> Pérez Firmat, Gustavo. 2009. Havana Mañana: Cuba in the American Imagination (Kubo en la usona imago). <http://cubainfo.fiu.edu/>

215.000 kubanoj eliris Kubon al Usono inter 1959 kaj 1963. Tiuj elmigrintoj estis plej grandparte profesiuloj – advokatoj, kuracistoj, sciencistoj, komercistoj, oficiroj armeaj kaj policaj. Tridek ses procentoj de tiuj rifuĝintoj posedis universitatajn diplomojn, en epoko kiam nur kvar procentoj de la kubanoj finis eĉ la gimnazian studadon. Cetere, tiuj kubanoj estis ankaŭ plej grandparte blankaj aŭ helhaŭtaj – tre grava punkto se oni konsideras la realaĵojn de rasaj rilatoj kaj statuso en Usono. Pro la karaktero de la usona engaĝiĝo kun Kubo – unuavice subteno al Fulgencio Batista, la diktatoro kiu loĝis en Usono de 1944 ĝis 1952 kaj kiu estis instalita de Usono ĝis la revolucio de 1959 renversis lin; due, longperspektiva interesiĝo pri regado de Kubo pro celoj de nacia sekureco; trie, potencaj komunaj komercaj interesoj – ekzistis jam establita “speciala rilato” por tiu unua ondo de kubaj enmigrintoj. Krome, la usona registaro kredis, ke la reĝimo de Fidel Castro rapide falos, kaj ke la elita kuba ekzilitaro, tiam loĝanta en Miamo, regos la estontecon de Kubo. En 1966 la tielnomata Kuba Alĝustiga Akto, leĝo senprecedenca ĉe iu ajn alia latina grupo, konfirmis tiun unikecon: rifuĝintoj ricevis plej diversajn avantaĝojn, inkluzive de publika kaj medicina helpo, stipendioj, kursoj pri la angla, kaj helpo pri lanĉo de entreprenoj. Tiu grupo estis internen direktita, kun komunhelpaj programoj similaj al tiuj de eŭropaj grupoj de enmigrantoj al Usono en la deknaŭa jarcento – programoj, kiuj celis ekonomian progresigon de la komunumo.

Temis pri komunumo de ekzilitoj: kvankam monatoj fariĝis jaroj, la antaŭvido de renverso de Fidel Castro kaj triumfa reveno al Kubo (supozeble sub la usona flago) ne estis nur politika aspiro: ĝi difinis kaj hejtis la karakteron de la lando Kubo imagita el Miamo. Kubanoj en Miamo difinis sin laŭ la rememorata aŭ revidata altstatuseco, kiun ili antaŭe ĝuis en Kubo, kaj nutris sian koleron kontraŭ la perdo de proprietaĵoj kaj statuso kaŭzita de la revolucio.

Frataj organizaĵoj kiel la Fratoj de Savado, kiuj flugigis aviadilojn super la maro por savi tiujn kiuj fuĝis el la insulo perboate, kaj diversaj aliaj asocioj, ekzemple kluboj kaj asocioj de komercistoj, nutris starpunkton, kiu kvazaŭ asertis, “Ni fariĝos riĉaj kaj potencaj tie ĉi en Usono, prepare al nia reiro por rehavi nian justan hejmon.” Tiu starpunkto ankoraŭ hodiaŭ karakterizas la dirmanieron de tiu komunumo. Sed kiam fariĝis evidente, ke oni ne tuj renversos la revolucion, la antaŭvidoj de la komunumo de kubaj ekzilitoj, kaj de la iam privilegiitaj kubanoj kiuj restis en la insulo, ŝanĝiĝis. Pastro Bryan Walsh, kunfondinto de la sekreta programo Pedro Pan, klarigas, ke, laŭ la peto de kubaj familioj, la katolika eklezio lanĉis programon, laŭ kiu 14.000 kubaj infanoj estis senditaj al Usono inter 1960 kaj 1962, por “eviti marksisman-leninisman doktrinigon.”<sup>25</sup> Tiuj infanoj – plejparte viraj adoleskuloj – estis lokitaj en vartajn familiojn por atendi siajn gepatrojn. La kuba raketa krizo de oktobro 1962 ĉesigis la migradon el Kubo al Usono, kaj multaj tiuj infanoj restis en vartaj familioj (certe ne ĉiam kubanaj), aŭ en publikaj vartejoj, ĝis 1965. Carlos Eire, profesoro en la Universitato Yale kaj aŭtoro de la aŭtobiografio *Atendi neĝon en Havano* (kiu gajnis la Nacian Libran Premion) estis venigita al Usono pere de tiu programo. Li priskribas sian alvenon al varta familio jene:

Kaj mi estas sidanta en tiu sidoĉambro, kun tiuj agrablaj homoj, kaj mi cirkaŭrigardas kaj mia rigardo fiksiĝas ĉe la presita bildo de Picasso kun tri muzikistoj, kaj mi rigardas la bebojn kaj la hundon tie ekstere sur la teraso, kaj mi aŭskultas la homojn paroli la anglan, kaj mi rimarkas, ke la ekstera sunlumo estas iomete pli malhela ol la lumo en kiu mi kreskadis – sed nur iomete, kvazaŭ frakcio de frakcio.<sup>26</sup>

Estas malfacile imagi la etoson de situacio en kiu 14.000 mezklasaj infanoj estis libervole forsenditaj de siaj gepatroj por vivi en alia lando. La plej proksima paralelo estas eble tiu de la

<sup>25</sup> Walsh, Bryan. 2002. “Operation Pedro Pan” (Operacio Pedro Pan) en Hernandez-Miyares, Julio, Gaston Fernandez-Torriente k. Leonardo Fernandez-Marcane (red.), *Cuba: Exilio y Cultura: Memoria del Congreso del Milenio*. Asociacion Nacional de Educadores Cubano-Americanos. Miami, FL: Ediciones Universales.

<sup>26</sup> Eire, Carlos. 2003. *Waiting for Snow in Havana* (Atendi neĝon en Havano). New York: Free Press.



tielnomata evakuado de anglaj infanoj dum la Dua Mondmilito. La komplike interplektita historio de Kubo kaj Usono kreis senton de kronologia proksimeco aldone al la geografia: la gepatroj kredis, ke la aparteco ne povus esti longa, kaj ke pro la escepta rilato inter kubanoj kaj usonanoj la familioj estos baldaŭ reunuigitaj. Tamen, Carlos Eire kaj lia frato translokiĝis post naŭ monatoj el varta familio al institucio por perturbitaj knaboj, kie ili restis dum jaroj, ne monatoj. Lastatempe ekestis iom da diskutado, kaj televida programo, pri Operacio Pedro Pan. Ekzistas asocio de eksaj anoj Pedro Pan, kiuj kunvenas, diskutas, pridebatas kaj analizas siajn spertojn. Sed mi kredas, ke ni ankoraŭ ne plene harmoniiĝis kun la karaktero de tiu ĉi iniciato kaj kun la konstruo de elmigrado, kiun ĝi reprezentas. Infanoj transsendiĝis pere de la katolika eklezio por eviti difinitan ideologion, fare de gepatroj, kiuj ne plu kredas, ke iliaj privilegioj estos regajnitaj aŭ agnoskataj ĉe si, kaj kiuj jam posedas intiman kaj nuancitan scion de Usono, aŭ almenaŭ de imagita Usono. Kiel sekura kaj konata tiu Usono devus ŝajni por igi tian agon eĉ imagebla al gepatro? Tamen, kiam la insulo estas jam forlasita, ĝi treme brilas en la oceano, kaj la perdo estas neeltenebla. La libro de memoraĵoj de Carlos Eire, kiu rikoltigis al li la moknomon “dónde estan mis millones” (kie estas miaj milionoj) pro sia daŭra plorplendo pri perditaj riĉeco kaj privilegio, estas emblemo de la re-vidata aŭ reviziita Kubo de la unua ondo de ekzilitoj. Ĉe multaj tiuj ekzilitoj, la beleco de tio, kion oni perdis, ĝia valoro, kreskas monaton post monato, jaron post jaro, kaj la perdita hejmo fariĝas daŭre pli magia.

La estonteco, la “libereco” de la kubaj infanoj havas siajn fortajn resononj deponitajn de tiu sekreta operacio Pedro Pan. Vi eble memoras, ke je la usona Dankfesta Tago en novembro 1999, kvinjara kuba knabo estis savita el la maro post la renverso de la fuĝboato de lia patrino kaj ŝia kunulo kaj tiuj dronis. La patro de Elian en Kubo ne sciis, ke la patrino de la knabo planas tiun forfuĝon. Oni loĝigis Elian kun lia praonklo en Miamo, kaj la amaskomunikila batalo komenciĝis: Ĉu Elian estu resendita al sia patro aŭ restu en Miamo? La kondiĉoj de la debato estis jam fiksataj en la kuba-usona komunumo per la jam ekzistantaj kondiĉoj, kiuj rezultigis la eksterordinaran operacion Pedro Pan. Ideologio, la karaktero de la establita usona timo de komunismo, la sorto de infano en la rakonto de usona socio kie la sorto eĉ de ankoraŭ ne naskita infano povas esti decidata de instancoj anstataŭ de gepatroj, la interpreto de la rifuzo de la usona registaro malhelpi la resendon de Elian al lia patro kvazaŭ temas pri perfido – la emblema potencialo de tiu ĉi okazintaĵo meritas sian propran analizon. Ĉi tie mi volas sugesti nur la kunekziston de neceso de eskapo *el* Kubo kun profunda hejmsopiro *al* Kubo. Patrino kaj patrinlando, patro kaj patrolando – ne estas surprize, ke familioj kaj la torda disigo de familianoj konsistigas centran elementon en la rakontoj de la kuba-usona imago.

Kompreneble, tra la jaroj ekzilitoj fariĝas enmigrintoj. Kubanoj alvenas Usonon; ili ekloĝas en jam konata medio en komunumoj jam prosperaj kaj kun kreskanta politika potenco; ili saĝe uzas tion kion ili ricevas, kaj ili kreskigas komunumon dediĉitan al materia sukceso, al konservado de sia kulturo, kaj al reakiro de la perdita paradizo el kiu ili estas ekzilitaj. Sed kiam la idoj de tiu unua generacio kreskas, ili fariĝas tio kion Gustavo Pérez Firmat nomas la generacio 1,5 – tiu generacio kiu plejparte respondecas pri la kreo de kuba-usona kulturo. Diras Pérez Firmat en la enkonduko de sia verko *Vivo sur la streketo*<sup>27</sup>, “la homo 1,5 estas unika pro tio, ke, malsame ol pli junaj kaj pli aĝaj samlandanoj, li aŭ ŝi eventuale kapablas cirkuli en ambaŭ kulturoj kaj tra ambaŭ kulturoj – la nova kaj la iama.” Tiu generacio rekonas la mentalecon de ekzilo kiun karakterizis la unua postrevolucia ondo, ĝuas la avantaĝojn de la socia scio de tiu ondo kaj la subteno kiun ĝi ricevis de la usona registaro, kaj agnoskas la nedaŭrigeblan, eĉ hipokritan, rifuzon rekoni la ŝanĝitan realaĵon de la Kubo de kvindek jaroj post la revolucio.

Tamen, ĉe tiu generacio, ekzilo restas difina realeco. Edward Said sumigas la doloron de tiu kondiĉo: “Tuj preter la landlimo inter *ni* kaj *la eksterulo* estas danĝerplena teritorio de neaparteno; al tiu ĉi loko en primitivaj epokoj homoj estis forpelitaj, kaj en la moderna epoko

---

<sup>27</sup> Pérez Firmat, Gustavo. 1994. *Life on the Hyphen* (Vivo sur la streketo). Austin TX: University of Texas Press.

vastaj homaj gregoj nenifaradas kiel rifuĝintoj kaj dislokitaj personoj.”<sup>28</sup> Sed en la kazo de kubanoj en Usono, la ekzilon difinas elementoj konataj, daŭre ĉeestantaj, en lando kie la komunumo estis multilate enradikiĝinta jam antaŭ la pordo frapfermiĝis inter Miamo kaj la insulo. La hejmpaĝo de Pérez Firmat difinas tiun staton en la kunteksto de la lingvo:

La fakto, ke mi  
skribas al vi  
angle  
jam falsigas tion  
kion mi volis diri.  
Mia temo:  
kiel klarigi al vi  
ke mi ne apartenas al angla  
eĉ se ne al iu alia loko  
se ne ĉi tie  
en la angla.

La timon de interspaceco kiu eventuale konsistigas la defaŭltan emocian staton de ano de tiu generacio Gustavo Pérez Firmat enkadrigas en poemo en kiu la kvintesenca karibeeco (limeo estas pli ol frukto: ĝi estas spiritĉeesto, kolore, odore kaj akrece, ne nur guste) plenigas la sensojn de la leganto dum ĝi ensorbas kaj trankviligas la poeton:

### **Kuraco per limeoj<sup>29</sup>**

Mi plenigas mian domon per limeoj  
por teni la fantomojn for.  
Mi plenigas mian domon per limeoj  
por helpi min regi.  
Limeoj sur la kuirŝrankoj, sub la kuvo,  
en la lavabo.  
Mia fridujo estas plenŝtopita de limeoj  
(ne plu estas loko por viando kaj terpomoj).  
Ŝajnigante cepecon, ili pendas de la muroj.  
Kiel golfopilkoj ili libere kuras surtapiŝe  
(sed mi ne batus ilin for).  
  
Mi staplas ilin en florpotoj.  
Mi metas ilin sur librobretojn.  
Mi tenas ilin sur mia skribotablo, brakumaj al mia komputilo.  
Mi havas du limeojn en ĉiu tirkesto de ĉiu ŝranko  
en ĉiu ĉambro.  
Mi ne min banas, sed trempas.  
  
Nokte mi pensas pri iliaj kernoj, plumpaj kaj malsekaj.  
Mi imagas forpreni la ŝelon kaj premi  
ĝis ili krevas en miaj manoj.  
Mi gustumas la acidan sukcon gute sur la langon.  
Mi tremas.

---

<sup>28</sup> Said, Edward. 2000. *Reflections on Exile and Other Essays* (Konsideroj pri ekzilo, kaj aliaj eseoj). Cambridge, MA: Harvard University Press.

<sup>29</sup> Ĉiuj poemoj troviĝas en la angla en Suárez, Virgil kaj Delia Poey, red. 1996. *Little Havana Blues*. Austin TX: Arte Publica.

Poste mi pace dormas ene de verdaj limeaj songoj  
kaj, vekiginte, min sunumas en la limea lumo de l' mateno.

Sen limeoj, mi ne sciis  
kion entute fari.

Mi ne eltenus la solecon.

Mi krevus.

Sed en limeoj kuŝas saĝo, rutineco  
kiu mildigas mian boladon, frustrante al mi:  
pensu, trankvilu, pensu plue,  
kaj, je noktalveno, songu pri suko.

Dum du jardekoj post la revolucio, la komunumo ĉirkaŭ la urbocentro de Miamo, kie la hispanparolanta enloĝantaro kreskis ĝis 1980 al 580.000 homoj, konsistis el kubaj enmigrintoj, kiuj grandparte difinis sin per sia intenco reforpreni la insulon de la reĝimo de Castro. Aldoniĝis ankaŭ iliaj infanoj de la generacio 1,5, kiuj survojis al neaparteno kaj malakcepto de la premiso de la ekzilo. Tiu komunumo estis frape ŝanĝita de plia nekutima elmigra okazintaĵo – la ondo de elmigrado, kiun oni poste nomis la Boateliro Mariel. Inter aprilo kaj oktobro 1980, 125.000 kubanoj envenis Usonon rezulte de la premo de la kuba-usona lobio kontraŭ Prezidento Jimmy Carter, responde al ekonomia krizo en Kubo kiu igis 10.000 kubanojn serĉi azilon en la perua ambasadejo en Havano. La demografio de la enmigrintoj Mariel estis forte alia ol la ondo en la jaroj post 1959: la enmigrintoj Mariel estis plejparte malriĉaj, sen multa klerigo aŭ profesiaj lertoj, kaj (ni notu la komplikan karakteron de rilatoj inter la raso en Usono) ili estis plejparte nigruloj. Krome, la reĝimo Castro uzis la okazon por forigi homojn, kiuj ne kontribuis al la revolucia tagordo. Reinaldo Arenas, kiu estis ege talenta kaj rekonata verkisto en Kubo, sed kies samseksemo kaj ĝenerale subfosa konduto igis lin pario, priskribas la organizadon de la enboatigo en la haveno de Havano:

Antaŭ la enboatigo, ni estis dividitaj laŭ kategorioj kaj senditaj al malplenaj staplejoj: unu por la mensaj malsanuloj, unu por murdistoj kaj severaj krimuloj, alia por putinoj kaj samseksemuloj, kaj unu por junuloj, kiuj estis kaŝaj agentoj de la Ŝtata Sekureca Servo por enfiltriĝo en Usonon.<sup>30</sup>

Arenas havas sian propran politikan tagordon – sed la publika percepto kaj amaskomunikila pritrakto de la enmigrintoj Mariel estis tre malsimilaj al tiuj de la ondo post 1959. *Marielitos* (Marielanoj) ne eksplicite elpelitaj de Castro faris specifan elekton surbaze de ekonomia neceso, same kiel iam tion faris aliaj latinusonaj grupoj. Sed kvankam la demografia profilo ŝanĝiĝis ĉe tiu ĉi nova enmigra ondo, la propra bildo de la gvidantoj de la kuba-usona komunumo restis pli-malpli fidela al la antaŭmariela ŝablono. En sia libro *Latinamerikanoj*<sup>31</sup>, Earl Shorris ekzamenas priskribojn fare de kubaj-usonanoj pri la kvalitoj, kiujn ili asocias kun sia kubaneco, kaj konkludas, ke temas pri komunumo karakterizata de “*atrevimiento*” – kuraĝa, aŭdaca, agresema, diligenta. Li montras ankaŭ al memsubfosa spriteco, kaj al kvalito, kiun oni foje interpretas kiel arogantecon, sed kiun Shorris kredas pli bone priskribita kiel “sintrompo” – optimisma manko de fatalismo kombinita kun manko de tio, kion oni ofte priskribas en usona sociologia literaturo kiel orientiĝo al minoritateco. Mi emus argumenti, ke tiu manko de la fatalisma perspektivo ofte renkontata inter aliaj latinusonaj grupoj estas parte atribuebla al la rilato kun Kubo flanke de kubaj usonanoj. La persisto de la reĝimo Castro, konstruita kiel

<sup>30</sup> Arenas, Reinaldo. 1994. *Before Night Falls: A Memoir* (Antaŭ noktalveno: Memorajoj) Trad. Dolores M. Koch. New York NY: Penguin.

<sup>31</sup> Shorris, Earl. 1992. *Latinos: A Biography of the People* (Latinusonanoj: Biografio de la popolo). New York, NY: Avon.

nepenetrebla barilo en la ĝenerala kaj daŭre fortigata vizio de la komunumo, kreas ĉe ekzilitoj kaj elmigrintoj kvazaŭ perditan mondon. Tiu vizio de perdita Kubo daŭre kaptas ilian imagopovon kaj proponas al ĝi eskapon.

### **La interna Kubo**

Kion do oni imagas en tiu ĉi perdita insulo – insulo samtempe pli videbla kaj pli nevidebla pro la nepenetrebla kurteno kiun mallevis la manko de politikaj rilatoj inter tiu eta dorne insista nacio kaj ties giganta najbaro? Kiam, por pretigi tiun ĉi prelegon, mi komencis relegi *Sonĝi en la kuba*, mi markis dum la legado ĉiujn elementojn kiuj ŝajnis senescepte aperi, sendepende de la aĝo, politika konvinko, sekso aŭ elektita literatura formo de la kuba-usona imaganto. Mi estis devigata legi nur ĝis la 15-a paĝo, fine de la unua ĉapitro, titolita “Oceana Bluo,” por tuj renkonti aron da elementoj, kiuj bone helpus eventualan verkanton de pastičo pri la zorgoj de kubaj usonanoj. Tiu listo konsistas el (laŭ ordo de okazo, ne de signifo): la maro, El Lider, lingvo, apartigitaj familioj, santería kaj antikvaj aŭtomobiloj. La listo eble ne estus tre malsimila se temus pri portorikanoj. Mia argumento estas, ke, ĉar tiu komunumo estas tiel komplika (kiel ni ja konstatis), ekzistas centreco, reliefo, ligita al tiu ĉi stabila konstanta rakontado de la perdita – kaj iamaniere senŝanĝa – insulo. Mi konsentas, ke tiu ĉi aliro al la demando per serio de ŝlosilaj vortoj estas esence frivola, sed mia aserto estas, ke ekzistas en ĝi konkretaj kulturaj elementoj multnivelaj, kiuj povas servi plurajn celojn por multaj verkistoj, liverante al ili samtempe stenografajn mallongigojn kaj vojmapojn. Donu al mi turajn pintojn, tasojn da teo, solecajn infanojn, lumigitajn fenestrojn en vespero kaj formojn de parolo, kaj mi liveros al vi internan Anglion. La interna Kubo estas same trovebla en ŝlosilaj konceptoj. Temas pri hokoj sur kiujn pendigi la nekutiman mensan staton de elmigrinto kiu estas samtempe ekzilito, kaj la analizon kaj specifecon de perdo. Mi revenu mallonge al la listo.

### **La oceano**

Garcia komencas sian romanon *Sonĝi en la kuba* per avino Celia, kiu “ekipite de binoklo kaj portante sian plej bonan robon kaj perlogutajn orelingojn, sidas en sia vimena balancilo por gardi la nordan marbordon de Kubo.” La romano pritraktas la vivojn de Celia, ŝiaj filinoj (unu el kiuj elmigras en la unua ondo) kaj ŝia kuba-usona nepino. La domo de Celia situas apud la maro, parte (sendube) ĉar tio ebligas al la legantoj situigi la rakonton en la transiroj inter Kubo kaj Usono, kiuj formas grandan parton de la intrigo. Por doni al vi senton de la potenco de tiu imago de la insulo, mi prezentu al vi poemon de Pablo Medina (naskiĝinta en Havano, transirinta el Kubo al Usono en 1960) (Suarez k Poey 82). La multaj eblecoj prezentataj de la insula imago estos tuj evidentaj:

#### **Kubo**

Jen ĝi, la longa pruo  
karibea, sturmanta por frakasi  
la profilon de la mapo.  
Ĝi estas ŝlosilo, krokodilo, hoko,  
malruliĝanta demando,  
streĉita tendenaro, kiu kaptas  
bavaĵojn de la kontinento  
sub kiu ĝi porĉiame flosos.

La insula buŝo ridetas  
aŭ severas, kiu scias,  
staplita de malkreskaj intencoj  
sukerkano kaj sablo.

Tiel eta loko,  
insulo klina kontraŭ tristo  
meze de l' maraj intestoj,  
ludanta ŝajnigon  
reĝino de salakvo, vestita verde  
vokanta la poetojn al laŭdo,  
gvidantojn de Brustaj fanfaronoj,  
inventanta al si panteonon  
de tropikaj sanktuloj, vastan  
kaj profundan literaturon,  
epopean pasintecon rivalan al Romo.

Jen ĝi, ŝajniganta trembrilon  
super la kapoj de la popolo,  
neanta la teruron kiun ĝi sentas  
kiam neniu aŭskultas, neanta  
ke ĝi ĉiam preskaŭ dronas,  
ke ĝi povas nenium helpi, certe  
ne sin mem, kiu estas  
nur strio de tero inter mateno kaj nokto,  
inter kio estis kaj kio estos,  
inter la naskiĝo de espero  
kaj la morto de deziro.

### ***El Lider***

Fidel Castro estas kompreneble ĉiam en la centro de agado. Tiu Celia en la romano de Garcia, kiu funebras la perdon de la edzo kaj kiu elektis forlasi la insulon por iri al Novjorko, jene meditas pri tio, kio pelis ŝin al la strando:

...El Lider, en sia juneco stelulo kiel ĵetisto, apenaŭ maltrafanta basbalan karieron en Usono. Lia demoneca kurboĵeto allogis la atenton de ĉefligaj skoltistoj, kaj la teamo Washington Senators interesiĝis subskribigi lin, sed ŝanĝis sian decidon. Frustrita, El Lider iris hejmen, ripozigis sian ĵetobrakon, kaj komencis revolucion en la montoj.

La temo diskuto de la reĝimo, ĝia ekesto, ĝia naturo, kiel faligi ĝin, estas konstanta elemento en tiu literaturo. Dionisio Martinez, kies familio forlasis Kubon en 1965, unue al Hispanio kaj poste al Kalifornio, malkaŝas la universalan ĉeeston de tiu konversacio en la elvokive titolita "Historio kiel dua lingvo" (Suárez k Poey 79):

### **Historio kiel dua lingvo**

Mi kreskis aŭdante la esencon  
de konversacioj en la apuda ĉambro.  
Mia patro kaj amikoj konspiris  
en la apuda ĉambro. La nova reĝimo  
sukcesis, spite ilian komploton.  
La apuda ĉambro kutime malhelas. Homoj  
tie flustras. Vi aŭdas nur iome.  
Sufiĉon por scii kion celi aŭdi.  
Mi kredis, ke mi aŭdis murdon en la

apuda ĉambro. Sed estis la radio. Mi kredis ke mi aŭdis murdon ankoraŭ post frakaso de la radio en pecojn pro ĵeto kontraŭ la muro. Temis pri putino fine de longa tago. Familioj kiel mia ĉiam sukcesis havi unu-du putinojn kiel “bonajn” amikojn. Tio igis nin ŝajni malpli riĉaj, malpli kiel ajn riĉa signifas. En tiuj tagoj aferoj fariĝis la signifoj kiujn ni asignis al ili, ne inverse, ne kiel hodiaŭ. La apuda ĉambro signifis la ĉambron de la najbaroj. Se vi fikse rigardis, vi povis travidi la muron. La specifajoj de konversacio ne necesis por kompreni komploton aŭ konfeson; la obtuza vidaĵo tra la muro sufiĉis por pli-malpli scii kiel la putinoj enspezis, kiel la registaro povus malsukcesi, kiel unusola minaco tenus familion kune tra milito kaj subfoso. La najbara ĉambro igis nin tiaj kiaj ni fariĝis per longa ekziliĝo: malsukcesaj amantoj, ekspertoj pri mekaniko de aferoj, kiujn ni neniam lernis nomi.

### ***Lingvo***

Se temas pri duaj lingvoj, estas simple tromulto por diri. Ni lasu la temon al la posta diskuto. Celia, ĉe Garcia, ricevas leterojn de sia nepino Pilar en Bruklino en “hispana lingvaĵo, kiu ne plu estis la ŝia.” En la romano de Pérez Firmat *Ĉio krom amo*, la verkaro de profesoro pri la angla lingvo plenplenas je meditado pri la rilato de la dulingvulo al lingvoj. La lingvo okupas fundamentan lokon en la konstruo de imagita Kubo. Ne devi dulingvi estus profunde komforte.

### ***Dividitaj familioj***

Oni multe pristudis la gravecon de la familio en latinamerikaj kaj latinusonaj kulturoj; sekve ne estos surprize ke la karaktero de la rilatoj inter familianoj ĉeestantaj kaj familianoj forestantaj fundamentas la romanon de Garcia, same kiel ĉe multaj verkoj de kubaj-usonaj verkistoj. “Pro tio, pensas Celia, oni enterigos ŝian edzon en rigidan, fremdan teron. Pro tio, iliaj infanoj kaj iliaj genepoj estas nomadoj.” Carlos Eire alfrontas tiun temon ĝisfunde en siaj memoraĵoj, kaj la verko de la dramverkisto Omar Torres, *Memoroj de la familio de mia patro*, dramigas ion, kio jam estas senfine drameca. Jen la nemalhavebla temo de tiu literaturo.

### ***Santería***

Santería estas sinkreta religio, kiu kombinas afrikajn kaj katolikajn elementojn. Troviĝas tra *Sonĝi en la kuba* ritoj, preĝoj kaj antaŭsupozoj ligitaj al santería: unue kiam Celia “memoras ion, kion diris al ŝi santeristo antaŭ preskaŭ kvardek jaroj, kiam ŝi jam decidis morti: ‘fraŭlino Celia, estas malseka pejzaĝo en via manplato.’” Ĉar santería estis asociita kun la afrokubanoj, ekzistas multaj vehikloj por imagi kaj ekspluati tiun religian kompleksan por trakti aferojn de raso kaj klaso, historio kaj magio.

## **Muziko**

Celia devenas de supera mezklasa blanka origino, kaj ŝia edzo Jorge, en 1937 kiam ili translokiĝas al la domo apud la maro, aĉetas por ŝi pianon kaj “stokis ĝin per ŝiaj muzikaj laborkajeroj kaj vigligaj foliaroj da Raĥmaninov, Ĉajkovski kaj selekto de Chopin.” Tiu ĉi ne estas la muziko kutime minata en la interna pejzaĝo de la imagita Kubo: pli ofte tiu muziko estas populara muziko, precipe kongao, mambo, rumbó. Memoru pri Desi Arnaz kaj lia kongatamburo en la usona televida programo *I Love Lucy* en la kvindekaj jaroj. Vi certe konscias pri la amafero de la kinejoj kun tiuj formoj, kaj la enorma populareco de kubaj muzikistoj, kiu datiĝas de la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento. Ni povas noti en la lastaj jaroj la entuziasmon pri kubaj muziko kaj dancado en la romano de Oscar Hijuelos *La mamboreĝoj ludas kantojn de amo*. Tiu romano fariĝis en 1992 tre populara filmo, kun Armand Assanted kaj Antonio Banderas, nek unu nek la alia iel ajn kubano, sed ĉiucela latinusonano. Kiam mi instruis latinusonan literaturon, mi postulis, ke miaj studentoj faru lecionon pri mambo. Pérez Firmat havas belan ekzegezon pri tiu temo en sia *Vivo sur la streketo*. Pro tio, ke kuba muziko estas tiel vaste kaj tiel longe admirata (lastatempe vastskale en la muziko de Buena Vista Social Club), ĝi liveras riĉan fonton de figuroj, de kontestataj tekstoj kaj subtekstoj rilataj al koloniismo kaj ekspluatado, sed ankaŭ ĝojo kaj reakordiĝo.

## **Antikvaj aŭtoj**

“Felicia del Pino, kun kapo el pikila anarkio de miniaturaj rozkoloraj buktiloj, prembatas la klaksonon de sia De Soto 1952 dum ŝi alstiras la dometon apud la maro.” En neniu alia loko la politika historio havis tiel profundan efikon ĉe la aŭto kiel signifanto kiel en Kubo. Kubaj-usonaj verkistoj ne povas liberiĝi de la temo. La kialo evidentas: ĝi estas emblemo de rezisto kaj de kontestataj ambicioj, de lerteco kaj malhavo, de nostalgio kaj frustriĝo.

Mi ne parolis pri voluptaj virinoj, manĝaĵoj, sukerkano. Tamen, mi esperas, ke mi sukcesis proponi, ke la kuba-usona komunumo rajtas al kelkaj pretendoj al esceptismo – kaj ankaŭ sugesti, ke ekzistas konstruo de Kubo, kiu servas tiun komunumon, kaj kiu portas komplikajn kaj interesan rilaton al la vera Kubo, kie ni nun troviĝas.

Mi ankaŭ ne parolis pri cigaroj. Mi do finos per poemo pri maljunulo kiu fumas kubajn cigarojn aĉetitajn per usonaj dolaroj. Mi trovas ĝin emociiga, kaj mi esperas, ke vi same spertos ĝin: la poemo “Havana Blues,” de Wasabi Kanastoga (Suárez k Poey, 71):

### **Havana Blues**

He!  
Oldulo  
Sidanta tie  
Lule balance  
Tien-reen  
Frontportike.  
suĉanta je via Havana.

Luloseĝo  
Kantanta triste  
kontraŭ ligna planko.  
mordanta je via Havana.

Nove gladita  
Blua ĉemizo guayabera  
Montranta blankajn brustoharojn

Kaj ruĝan meleagran gorĝopendon.  
pensanta pri via Havana.

Malantaŭ vi  
Ruliĝas Ŝoseo 10  
Sen palmoj  
Sen mangujoj  
Sen rapide fluanta rivero  
Atinganta al via duaetaĝa  
Casa de campo  
Kolerigita de Ciklono Flora.  
ploranta por via Havana.

Tiel via monata barakto  
Rektigas la perturban korpon  
Kaj vi atendas de Onklo Sam  
La monatan viziton.  
mortanta pro via Havana.

He!  
Oldulo  
Via Havana ekos bruligi viajn lipojn  
Samkiel la antaŭaj  
Kaj ĉiuj kiuj venos poste  
Kaj ĉiuj kiuj venos poste.

Jam tridek kvin jaroj  
kalkule  
maljunulo.  
ne mortu pro via Havana.



# Lingva diverseco en Latinameriko: defioj por daŭripova evoluo



## Maritza Gutiérrez González

Kubanino, loĝanta en Havano. Ĵurnalistino, diplomiĝis pri ekonomiko en 1983 en la Havana Universitato. Ekstudis Esperanton en 1979. Aktivis ekde 1981 kiel Esperanto-instruanto. Ekde 1985 estrarano de Kuba Esperanto-Asocio. Ekde 1988 estras la Esperanto-redakcion de Radio Havano Kubo kaj ekde 2008 respondecas pri ĝia E-retpaĝo. Gvidis kursojn pri tradukarto kaj pli ol 20 jarojn okupiĝas pri tradukado. Elhispanigis la krimrakontaron *La forto de l'silento* (1990). Prelegis en klerigaj eventoj tutlandaj kiel EXPOLINGUA. Kunlaboras kun pluraj Esperanto-gazetoj, i.a. *Monato*. Komitatano A de UEA ekde 1999, estrarano 2004-2007, kunordiganto de la Amerika Komisiono de UEA ekde 2007. Prelegis en IKU en 2008.

## Resumo

La amerika kontinento estas granda lingva mozaiko kiu instigas multajn prilingvajn fakulojn sin demandi kiel administri tiun ĉi multlingvismon.

Kiajn kriteriojn sekvi por garantii la konservadon de la lingva diverseco kaj ekvilibra lingva ekologio ene de integriga spaco? Kaj sekve de la nunaj socipolitikaj evoluoj en la regiono, al kiaspeca integriĝo oni devas aliĝi: ĉu al inkluziva aŭ apartiga integriĝo?

Por granda parto de Ameriko kaj tre speciale por Latinameriko, la procezo de “eltrovo” kaj konkero komencita en 1492 altrudis la unuan grandan skismon en ĝian tutan hejmon, inkluzive de la lingva tradicia hejmo.

En la nuntempaj integriĝaj procezoj okazantaj en la regiono kaj kaŭze de la strategia karaktero de lingvoj oni sin demandas pri la defioj implicitaj en la lingvistikaj kaj alfabetigaj politikoj impulsataj de la registaroj?

Kiel kaj kiomgrade la novtipaj projektoj edukaj povus garantii la konservadon kaj protekton de la indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj? Ĉu la inkludo de tiuj ĉi lingvoj ene de ĝenerala projekto de daŭripova evoluo estas evidente prava? Ĉu realisma?

Jen kelkaj demandosignoj fronte al realo kiu evidencigas ne veran sci-konscion pri la stato kaj nombro da lingvoj ankoraŭ parolataj en la kontinento, tamen, oni povas aserti, ke la plimulto de indiĝenaj lingvoj, forte markitaj per infamio de longa koloniado, trovas sin reduktitaj al la kategorio de minoritataj lingvoj. Ĝis kiam?

## Language diversity in Latin America: challenges for sustainable development

### Summary

The American continent is a great language mosaic which leads many language experts to ask themselves how this multilingualism should be managed.

What criteria should be used to guarantee the preservation of language diversity and a balanced language ecology in an area of integration? And following the current socio-political developments in the region, what sort of integration should one adhere to: inclusive or differentiating integration?

For a large part of America and for Latin America in particular the process of “discovery” and conquest begun in 1492 imposed the first great schism in its home area, including its language tradition.

Because of the current integration processes in the region and the strategic character of languages one wonders about the challenges implicit in the linguistic and literacy policies pursued by governments.

How and to what degree could the new-style education projects guarantee the preservation and protection of indigenous languages and cultures? Is the inclusion of these languages within a general project of sustainable development obviously right? Is it realistic?

These are some of the questions raised by a reality that shows a lack of real awareness of the state and number of languages still spoken in the continent. However, it can be said that the majority of indigenous languages, strongly marked by the ignominy of a long colonisation, find themselves reduced to the category of minority languages. For how long?

## **La diversité linguistique en Amérique Latine: des défis pour un développement durable**

### **Résumé**

Le continent américain est une grande mosaïque linguistique qui conduit de nombreux spécialistes des langues à se demander comment administrer ce multilinguisme.

Quels critères suivre pour garantir la conservation de la diversité linguistique et d'une écologie linguistique équilibrée au sein d'un espace d'intégration? Et par suite des évolutions sociopolitiques actuelles dans la région, quelle sorte d'intégration doit-on privilégier: intégration inclusive ou ségrégative?

Pour une grande partie de l'Amérique et tout particulièrement pour l'Amérique Latine, le processus de “découverte” et de conquête initié en 1492 a imposé la première grande rupture dans tout son territoire, y compris en ce qui concerne son régime linguistique traditionnel.

Dans les processus d'intégration actuellement en cours dans la région et du fait du caractère stratégique des langues, on s'interroge sur les défis qu'impliquent les politiques linguistiques et d'alphabétisation impulsées par les gouvernements.

Comment et jusqu'à quel point les nouveaux projets éducatifs pourraient-ils garantir la conservation et la protection des langues et cultures indigènes? A-t-on raison d'inclure ces langues au sein d'un projet général de développement durable? Est-ce réaliste?

Voilà quelques points d'interrogation face à une réalité qui met en évidence le fait qu'on ne connaît pas vraiment l'état ni le nombre des langues encore parlées sur le continent; cependant on peut affirmer que la plupart des langues indigènes, fortement marquées par l'infamie d'une longue colonisation, se trouvent réduites au rang de langues minoritaires. Pour combien de temps?

## **Diversidad lingüística en América Latina: desafíos para un desarrollo sostenible**

### **Resumen**

El continente americano es un gran mosaico lingüístico que provoca en muchos especialistas interrogantes en cuanto a cómo administrar ese multilinguismo.

¿Cuáles criterios seguir para garantizar la conservación de la diversidad lingüística y un equilibrio en la ecología de las lenguas en el marco de un espacio integrador? Y como

consecuencia de los actuales procesos sociopolíticos en la región, a qué tipo de integración debemos vincularnos: incluyente o no?

Para una gran parte de América y especialmente para la América Latina, el proceso de “encuentro” y conquista iniciado en 1492 impuso el primer gran rompimiento en todo su hogar, incluyendo su reino lingüístico tradicional.

De tal manera, en los actuales procesos que tienen lugar en la región y a causa del carácter estratégico de las lenguas, nos preguntamos cuáles son los desafíos implícitos en las políticas alfabetizadoras y lingüísticas impulsadas por los gobiernos de la región.

De qué manera y hasta qué punto los proyectos educativos de nuevo tipo podrían garantizar la conservación y protección de las lenguas y culturas indígenas? Hasta qué punto es realista y correcta la inclusión de estas lenguas en un proyecto general de desarrollo sostenible?

# Lingva diverseco en Latinameriko: defioj por daŭripova evoluo

## Lingva diverseco en Latinameriko: faktoj kaj minacoj

En la mondo ekzistas nuntempe pli ol ses mil lingvoj, el kiuj proksimume duono riskas malaperi, kaj inter la landoj kun pli da minacataj lingvoj, Meksiko okupas la kvinan lokon kun 144 lingvoj en iagrada risko, laŭ raportao de *Atlaso de la endanĝerigitaj lingvoj en la mondo*.

Tiu ĉi procezo povas estis haltigita nur se la registaroj kaj parolanto-komunumoj adoptas urĝajn regulojn tiucele. Kiel sciante UNESCO havas programon rilate al lingvoj en risko malaperi, kies celo estas mobilizi la internacian kunlaboron por altiri la atenton pri tiu ĉi situacio kaj impulsi novecajn solvojn naskiĝontajn el la komunumoj mem, el oficialaj organismoj kaj fakuloj.

Laŭ *Atlaso de endanĝerigitaj lingvoj en la mondo*, dokumento ellaborita de la Organizaĵo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko), oni scias ke en Meksiko ne malaperis lingvoj ekde la dua duono de la 20<sup>a</sup> jarcento, sed inter la ekzistantaj lingvoj, estas 21 kies situacio estas kriza, aliaj 33 estas serioze endanĝerigitaj, 38 en danĝero kaj 52 vundeblaj, kio sumas 144 lingvojn. Tamen, la ekfunkciigo de diversaj politikoj favore al tiuj lingvoj, kreskigis la nombron da parolantoj de kelkaj indiĝenaj lingvoj de Meksiko, Kanado kaj Usono, raportas la Atlaso. Per tiuj politikoj oni celas revigligi lingvojn jam malaperintajn aŭ endanĝerigitajn.

La tria eldono de la Atlaso enkondukas esencajn ŝanĝojn en la klasifiko-kriterioj rilate al tiuj uzitaj en la jaro 2001, kiam ĝi konsideris ke lingvo estas “en danĝero” kiam la infanoj ne plu ĝin lernas en la familioj kiel gepatran lingvon, sed iĝas nur “pasivaj dulingvuloj”, tio estas, ĝin komprenas sed ne parolas.

La raporto mencias kvar nivelojn “de vivanteco”: vundebla, kiam la infanoj ĝin parolas sed nur en la familia etoso; en danĝero, kaj en serioza danĝero, kiam ĝin uzas personoj pli aĝaj; kaj en situacio kriza, kiam parolas ĝin malofte nur maljunuloj.

La Atlaso ankaŭ klarigas ke el la 6 mil lingvoj ekzistantaj en la mondo, pli ol 200 malaperis dum la lastaj tri generacioj, 538 estas en kriza situacio, 502 en serioza danĝero, 632 en danĝero kaj 607 en vundebla situacio.

Krome, oni montras la ekziston de 199 lingvoj kies parolantaro estas deko da personoj, kun la risko malaperi kiam forpasos la lastaj parolantoj, kio ja okazis al la lingvo *eyak* de Alasko.

Pli kaj pli kreskas la konscio en la mondo kaj aparte en diversaj institucioj ligitaj aŭ kunlaborantaj kun Unesko, ke por eviti la malaperon de lingvo oni devas krei kondiĉojn favorajn por ke la parolantoj daŭre ĝin uzu, estu “fieraj” pri la lingvo kaj instruu ĝin al la gefiloj.

En Ameriko, krom Meksiko, menciindas Brazilo kun 190 lingvoj riskantaj malaperi; temas pri lando kun granda lingva diverseco, kaj nuntempe oni klopodas ekfunkciigi politikojn edukajn kiuj favoras revigligon de multaj lingvoj.

En Ekvadoro, 20 lingvoj estas en danĝero, kvankam menciindas la revigligo de la centvorta lingvo *andoa* dum la lastaj dudek jaroj; kaj la lingvo *zápara*, tial ke ambaŭ estis, iel ajn, anstataŭitaj de la keĉua lingvo.

Aliflanke, Bolivio posedas 39 lingvojn en danĝero, unu el la plej malaltaj nombroj en la regiono, dum Peruo kalkulas je 62 la lingvoj en danĝero kaj Kolombio je 65.

Tial, la fakulino pri andaj lingvoj Marleen Haboud, pledas por “aldona dulingvismo” kiu inkluzivu lernadon de la nacia kaj la gepatra lingvoj por eviti ke oni forgesu la indiĝenajn lingvojn.

La aborigenaj lingvoj de latinameriko havas esence parolan karakteron, ĉar nur malmultaj popoloj (*aztekoj, majaoj*) sukcesis krei skribo-sistemon ĉefe piktografian, kiu depost la hispana konkero kaj la sekva altruda transkulturigo, malaperis.

La katolikaj misiistoj uzis la kastilian alfabeton por ellabori gramatikojn, nome katekismojn kun la celo faciligi la evangelian mision en tiu ĉi mondoparto.

Nur en pli proksima epoko oni klopodis oficialigi alfabetojn por kelkaj lingvoj kiel ekzemple la ajmara en la jaroj 1954 kaj 1969; por la keĉua lingvo oni tion faris en 1975, sed en la praktiko ne tre sukcese.

Oni povas diri, ke multe pli ol pasintece, la registaroj nun konscias pri la valoroj reprezentataj de lingvoj, certe netuŝebla valoro, sed implicita en la homa agado. Pro tio, ni ne devas miri kiam la nunaj potencaj landoj pli kaj pli uzas la malnovan armilaron de lingva altrudo por etendi siajn modelojn ekonomikajn, politikajn kaj ideologiajn.

Cetere, la rolo de la lingvoj kiel nepra ilo en la informadika socio, igas ilin veraj strategiaj pecoj de la nuntempaj politikoj. En la tiel nomata monda internacia ordo kiun oni altrudas al la socioj, lingvoj povas esti taksataj, laŭ la kazo, kiel objektoj ege altvaloraj aŭ kiel forĵetebla produkto.

Tiu ĉi alternativo pli krude rolas en nia plurlingva kontinento. Oni povas rimarki kiel la forta ĉeesto de la antikvaj amerindianaj lingvoj, vivantaj lingvoj de pluraj popoloj ne malpermesis eniron de aliaj lingvoj, des malpli la kresko de la kvar lingvoj firmiĝintaj kiel oficialaj lingvoj de la ŝtatoj en la kontinento.

Unuavide, tiu ĉi kunvivado, pli aŭ malpli paca, ne devus maltrankviligi nin. Tamen, la ideo ke iuj imagas integriĝon en kvarlingva sistemo, signifas preteratenton de la realo, kaj eĉ pretecon perforti la lingvaj rajtojn de pluraj komunumoj, kio per si mem konsistigus forgeson pri la fakto ke tiuj kvar lingvoj ne posedas la saman statuson. Sendube, regado de la usonangla lingvo same minacas la aliajn tri lingvojn, kvankam en malpli alta grado kompare kun la ceteraj lingvoj, kaj konsekvence, sentiĝas pli forta komuneco de intereso ĉe la aliaj lingvoj posedantaj longan rezisteman tradicion kiel simbolon de identeco-plureco.

Por ilustri ĉi-fakton oni povas citi kiel ekzemplon la revivigon de la lingvo *mohawk* en Kebekio, Kanado, la inkludon de indiĝenaj lingvoj en la programoj de dulingva interkultura edukado en plimulto de la latinamerikaj landoj kaj la oficialigo de la gvarania lingvo, amerindiana lingvo promociita kiel oficiala lingvo de Paragvajo.

### Lingva vivo-povo

Estas fakto ke granda nombro da lingvoj en la amerika kontinento riskas malaperi, situacio kiu pli kaj pli estas atentata de fakuloj kaj institucioj je landa, regiona kaj monda niveloj.

En tiu ĉi kunteksto oni komencis paroli pri la koncepto de lingva vivo-povo, t.e. la espero ke lingvo restu kiel gepatra lingvo de komunumo kun plimulto da personoj lernantaj ĝin kiel tian kaj la plenkreskintoj uzantaj ĝin en la ĉiutaga vivo, en la publikaj kaj familiaj rilatoj.

En tiu ĉi dimensio de vivo-povo, la lingvoj de Latina Ameriko estas pli rezistemaj ol la lingvoj de Norda Ameriko, kiel konstateblas en statistikaj raportoj.

|                       | Lingvoj vivo-povaj | Lingvoj ankoraŭ parolataj |
|-----------------------|--------------------|---------------------------|
| <b>Kanado</b>         | 4                  | 60                        |
| <b>Usono</b>          | 5                  | 175                       |
| <b>Centra Ameriko</b> | 250                | 300                       |
| <b>Suda Ameriko</b>   | 290                | 400                       |
| <b>Sumo</b>           | <b>549</b>         | <b>935</b>                |

Laŭ tiuj ĉi ciferoj oni povas antaŭvidi ke almenaŭ 50% el la lingvoj de Ameriko riskas malaperi. El tio rezultas la nunaj zorgoj kaj klopodoj priskribi, dokumenti kaj arkivi tiujn ĉi lingvojn antaŭ ilia kompleta formorto.

Aliaj kaŭzoj de tiu ĉi situacio obeas al la fakto ke oni ne eltrovis aliajn lingvojn genetike familiajn, ĉar ili malaperadis en la enorma forpaso de ties originaj etnoj laŭlonge de kolonia procezo altrudita al la regiono, kaj aliflanke, ĉar oni ne sukcesis ilin identigi kun aliaj pro

manko de lingvistikaj scioj aŭ ĉar pluraj el ili estas izolitaj lingvoj. Menciendas ke 10 el la 66 lingvoj de Kolombio kaj 6 el la 34 lingvoj amazoniaj estas izolitaj.

La problemaro de estingo-danĝero emas pli damaĝi la amerindianajn lingvojn kaj ties studemulojn, ĉar en Ameriko la gepatraj lingvoj rekte alfrontas la koloniajn lingvojn, dum restas en la memoro la grandaj ruinigoj kaŭzitaj de la eŭropa koloniado.

Tiurilate oni povas rimarki ke dum la lastaj jardekoj pozitive evoluis la pristudoj de tiuj ĉi lingvoj de Latina Ameriko, kiuj iras de pura priskriba etapo al pli vasta dokumentado; kaj laste oni starigis al si la taskon kolekti kaj arkivi tiun ĉi dokumentaron surbaze de la novaj teknologioj.

Temas pri laboro ne tro konata kiu alfrontas grandajn defiojn pro la fakto ke estas lingvoj de vasta parola tradicio sen referenco-materialo, sen strukturita skribado kaj en natura stato de dialekta varianto, t.e. ke ili malhavas antaŭan laboron normigan. Ĉio ĉi estas malfacile komprenebla por eŭropanoj, kutimiĝintaj al uzo de normigita lingvo kun longa skribo-tradicio.

La amerindianaj lingvoj estas ofte parolataj de nur centoj da miloj da personoj kaj iliaj strukturoj tre malsimilas al tiuj de la eŭropaj lingvoj. En pluraj kazoj oni ankoraŭ devas krei novajn terminologiojn por rakonti kiel ili estas kaj funkcias, kion ili diras pri la mondo-bildo de ties parolantoj. Tamen, la fakuloj samtempe rimarkas ke ili posedas propran gramatikon tiom kompleksan kiel ĉiu alia gramatiko, posedas riĉan kaj taŭgan vortaron por paroli pri siaj mondo kaj vivmanieroj; ili ankaŭ posedas riĉan parolan tradicion por interpreti la propran mondon, rakonti pri siaj revoj kaj realo.

Tiujn ĉi konojn la lingvistoj klopodas kapti kaj tial ili okupiĝas pri transkribo de la gramatiko, kolektado de vortaroj, sonregistrante tekstojn poste tradukatajn kaj detale analizatajn.

Distinga trajto pri la studado de la amerindianaj lingvoj estas ke dum multaj jaroj pri ili okupiĝis nur religiaj misiistoj, tradukistoj de la Biblio kaj inter ili ankaŭ lingvistoj konsiderataj pioniroj en tiu ĉi fako, aparte pri la amazoniaj lingvoj.

Oni ne povas preteratenti la grandan diversecon genetikan kaj tipologian de la lingvoj en la amerika kontinento, kio signifas ke pristudo de unu lingvo ne multe helpas por pristudi najbaran lingvon, kio ne okazas en aliaj kontinentoj kun malmultaj familioj kaj simileco de gramatikaj trajtoj kaj vortaroj.

## Lingva Ekologio

La termino Ekologio estas konceptita kiel studo pri la rilato ekzistanta inter la diversaj organismoj kaj ilia medio fizika kaj biologia. En la lingvistika kampo oni aplikas ĝin metafore kaj oni konsideras ĝin kiel sistemon en kiu “modifo de la kondiĉoj de unu sola lingvo ene de la lingva ekologio, havas sekvojn en la tuta sistemo” (Kaplan & Baldauf, 1997).

Oni ne povas forgesi ke kunvivado de lingvoj estas necese harmonia procezo, kiel same okazas en aliaj ekosistemoj, kaj cetere, ĝi posedas sociajn sekvojn kontribuontajn al pli da avantaĝoj por kelkaj lingvoj fronte al aliaj, kreante asimetrian potenco-rilaton.

En la amerika regiono kunekzistas tre diversaj lingvoj, ekde la landaj lingvoj kiel la hispana, angla, portugala kaj franca, ĝis la indiĝenaj, kaj ankaŭ fremdaj lingvoj.

Krome, oni scias ke enpenetro de lingvo certe kreas novajn ideologiojn por la parolantoj, tial ke ĝi konsistigas esencan faktoron je la identeco-nivelo, interalie, kaj cetere, la parolantoj de tiuj lingvoj samtempe ekperceptas novajn interesojn.

Oni povas konsideri la lingvistikan situacion de Latinameriko kun ĝiaj naciaj lingvoj, la minoritataj lingvoj kaj la fremdaj lingvoj nuntempaj, kiel ekologia sistemo, kiu ĉi-sence “transformiĝas neeviteble per la homa agado, kiu ligitas al la potenco-rilatoj.” (Terborg, 2000).

Oni povas ankaŭ supozi ke modifo en la potenco-rilatoj povus aliĝi al la pluraj faktoroj fortigantaj aŭ malfortigantaj la minoritatajn lingvojn, kaj pro tio, pli gravas konsciiga agado pri la lingva situacio de la regiono, kiu, laŭ multaj opinioj, malhavas lingvaj kaj komunikajn

problemojn, se juĝi la ŝajne unuformecon lingvan. Oni ne povas preteratenti ke ĉiutage kreiĝas novaj sintenoj kiuj influas la ekologion de la lokaj lingvoj. Ĉio ĉi povas konduki al tio, ke spite al konkretaj streboj en la edukaj politikoj dum la lastaj jaroj, la indiĝenaj lingvoj daŭre malfortiĝas fronte al la naciaj kaj fremdaj lingvoj, kiuj sukcesas atingi sufiĉe altan valoron kaŭze de la avantaĝoj materiaj kiujn ili alportas kiel allogaĵo por esti instruataj kaj lernataj.

Oni povas ekzempligi tiun realon per la fakto ke multaj indiĝenaj familioj instigas la infanaron lerni la hispanan kiel instrumenton por aliri la anglan lingvon aŭ alian fremdan lingvon kiu faciligas pli avantaĝajn laborpostenojn. Rezulte, la infanoj estas rekte aŭ nerekte devigataj forlasi la gepatran aŭ indiĝenan lingvon, ne ekzistas por ili libera elekto.

### **Lingva diverseco kaj alfabetigo**

En Latina Ameriko kaj Karibio la lingva diverseco kaj alfabetigo trovas, ĝenerale, pere de edukado kaj uzo de la amerindianaj lingvoj, eŭfemisman manieron sin reprodukti.

Eblas aserti ke unu el la plej kompleksaj manieroj de lingva ekskludo troveblas en la edukaj institucioj kaj ĝiaj konceptoj de alfabetigado ĉar tiu koncepto, samkiel diverseco, estas multflanka kaj dependas de la potenco-strukturoj. Dume oni ĝin aplikis pere de lingvoj prestiĝaj, kiuj ĝuas ekde la transformoj sociaj estiĝintaj dum la industriiga epoko, skriban korpuson. Krome, ili rolis kiel instrumentoj por plu konservi la dominantajn strukturojn.

En Latinameriko kaj Karibio, ekzemple, multaj socioj postkoloniaj, indiĝenaj kaj kreolaj, suferas ekskludon, ne nur lingvan, sed ankaŭ sociekonomikan, altruditan de la urbaj industriiĝintaj socioj pere de la alfabetigaj konceptoj (Rojas-Primus, 2002).

Ekzemple, en la latinamerika scenejo de la sepdekaj jaroj daŭre kreskis postuloj de indiĝenaj grupoj, jen en la kamparaj temoj jen pri kulturo, kiuj sukcesis atingi politikojn pli konkretajn subtene al siaj petoj. Evidentas ke de tiam ĝis nun oni sukcesis en pluraj latinamerikaj ŝtatoj atingi agnoskon de la kultura diverseco kaj evoluigon de indiĝena edukado interkultura, dukultura kaj dulingva ankaŭ konata kiel EIB. Komprenoble, ne mankas akraj kritikoj kontraŭ tiuj programoj, ĉar ili iamaniere montriĝas, kvankam pli subtile, kiel instrumentoj de asimilado kaj integriĝo de la indiĝenaj komunumoj pere de ties propraj lingvoj.

Oni tiel komprenas ke la ŝtataj elitoj alproprigas al si tre signifoplenan lingvo-uzon por la indiĝenaj komunumoj, tio estas, edukado interkultura, dukultura kaj dulingva, kiuj por ili reprezentas agnoskon kaj evoluon, aplikatan ekde ties diferenca identeco pere de tiuj edukaj programoj de EIB.

Ĝenerale oni povas diri ke nuntempe la situacio estas pli pozitiva en la senco ke tiuj grupoj aŭ komunumoj lingvaj kaj samtempe minoritataj en la regiono, ĝuas ian gradon de agnosko, respekto kaj protekto konstituciaj rilate al ties lingvaj kaj kulturaj rajtoj, kio ne estas io nova, tamen, tiu ĉi protekto al malplimulto ne estas esprimita same rilate al rajtoj je eduka memdetermino, kio igas ĉion tre konfuza kiam temas pri la rajto kiel grupo-nacio ene de difinita ŝtato. Tamen, menciindas ke ekzistas kelkaj minoritataj variantoj atingintaj pli bonan pozicion en la eduka sistemo kiel la kazo de la keĉua lingvo en Peruo fine de la sesdekaj jaroj.

### **La tezo de daŭripova evoluo: aspiroj kaj defioj**

La tezo de Daŭripova Evoluo, prezentita en la raporto *Nia komuna Estonteco* (1987) de la Monda Komisiono pri Medio kaj Evoluo, atingis grandan eĥon dum la lastaj jaroj, surbaze de la konsidero ke evoluo devas kontentigi la nuntempajn bezonojn sen kompromiti la kapablojn de la estontaj generacioj por kontentigi siajn proprajn bezonojn.

La koncepto de daŭripova evoluo prezentas evoluon kiel harmonian procezon, kie ekspluatado de la rimedoj, la mastrumado de investoj, orientiĝo de teknologiaj transformoj kaj instituciaj ŝanĝiĝoj devas kongrui kun la bezonoj de la generacioj nuntempaj kaj estontaj. Tiamaniere, evoluo prezentiĝas kiel procezo postulanta tutgloban progreson jen en la soci-ekonomia branĉo jen en la media kaj homa branĉoj.

Spite al la rapida akcepto kaj disvastiĝo kiel koncentrita esprimo de evolustilo pli homa kaj egaleca, la originala versio de tiu ĉi tezo havas limigojn, kiel konstateblas en la debatoj okazintaj en pluraj internaciaj forumoj pri la temo.

Surbaze de la antaŭa analizo, menciendas ke jen por Latinameriko jen por la Tria Mondo, ĝenerale, desegni skemojn realigeblajn por daŭripova evoluo devas teni en konsideron, interalie: taŭgan bilancon inter la neceso kontentigi la bezonojn de la nunaj kaj estontaj generacioj; rekonon pri la fakto ke elimini malriĉecon kaj protekti la medion estas streĉe ligitaj; kaj rilate demografiajn variablojn kaj ligojn inter loĝantaro kaj medio, oni devas atenti ke reduktiĝo de la loĝantaro-dinamiko, tio estas, kresko aŭ malkresko de la loĝantaro, estus logika rezulto de pli favoraj aŭ malfavoraj ŝancoj soci-ekonomiaj por la tuta civitanaro en la sferoj eduka, prisana kaj aliaj sociaj servoj; tial, oni devas analizi tiujn variablojn ne kiel unuopajn elementojn, sed kiel esencajn partojn de integralaj programoj por daŭripova evoluo.

Tiusence, la aliro al edukaj programoj kiuj iras preter alfabetigo, problemo nuntempe damaĝanta proksimume 30-40 milionojn da personoj en la amerika regiono, devas esti prioritato cele al kreado de novaj ŝancoj por skizi kaj ekfunkciigi integralajn skemojn por daŭripova evoluo en Latinameriko, kio konsistigas defion plena je obstakloj, kiuj estos plej multe venkataj en la sama grado kiel plifortiĝos kaj solidiĝos la povoj soci-politikaj vere interesiĝantaj reprezentanti la aspirojn kaj bezonojn de plej vastaj popol-sektoroj.

## Resume

Multaj latinamerikaj landoj posedas situacion de plurlingvismo kaj estas sciate ke tiuj landoj kreadis lingvajn politikojn kiuj, de antaŭ kelkaj jaroj, klopodas mildigi la altan lernejan fiaskon suferatan de siaj komunumoj indiĝenaj. Tamen, la rezulto neniel estas kontentiga, kio postulas reviziadon de tiuj politikoj kaj de la ĝenerala situacio de la amerindianaj lingvoj pro la sekvoj, kiujn fortiĝo aŭ malfortiĝo de unu sola lingvo povas provoki en la lingva ekologio de la regiono.

Estas fakto ke oni devas konsideri kiel startpunkton agnosko de multkultureco, multlingvismo kiel legitima fenomeno, sed samtempe oni devas scii kio efektive okazas rilate al interkultureco, vidi kiel oni devas konstrui pli egalrajtajn rilatojn; ĉi-sence ĉiuj lingvoj rolas tre grave.

Interkultureco estas kerna vorto ĉar la sociaj abismoj kelkfoje estas en niaj propraj landoj. Oni devas agnoski la kulturalan kaj lingvan diversecon kaj akcepti ke la plimulto kaj la malplimulto havas saman rajton je komunikado, sinesprimado, edukado en la propra lingvo.

Oni povas konstati ke feliĉe spite al pluraj jardekoj en kiuj regadis la angla, aŭ jarcentoj en kiuj regadis la hispana lingvo, la lingva diverseco restas vivoplena en Latinameriko.

Granda defio kaj respondecas evoluigi pli aktualajn leĝarojn, pli demokratiajn, kiuj garantiu la egalrajtan partoprenon de la diversaj sektoroj, etnoj aŭ regionoj de ĉiu lando en la edukaj programoj kaj agadkampoj de la soci-ekonomia vivo.

Aliflanke, la projekto nova kaj socie orientita de latinamerika integriĝo elmerĝanta en la regiono, ne povus esti efektivigata eksterkadre de kundividitaj identecoj kaj oni devas ĝin konsideri historia okazo ebligonta socian reakiron de la lingvoj diskriminaciaj kaj kreadon de plurlingva spaco, de plurobla kaj ne ekskluda interŝanĝo, kiu impulsos reciprokan riĉiĝon kaj trarompos la murojn de malsana unuformeco, ĉar gravas ke ni ĉiuj estu kapablaj alparoli por transpreni nian historion kun la celo revigligi niajn konojn kaj valorojn. Nur tiel eblos alpaŝi al integriĝo malferma kaj ne ekskluda.

Nur tiaspeca integriĝo povus eviti kaj la hegemonion de unu sola lingvo kaj la retiriĝon socian de aliaj en kulturalan geton. Defendi la identecon, propran kaj malpropran, signifas opozicii ne nur al estingiĝo de la lingvoj, sed eviti novajn fundamentismojn kies konsekvencoj estus katastrofaj por la lingvo-ekologio en la regiono, kaj finfine, por daŭripova evoluo sopirata, sed nur tiamaniere realigebla kaj profunda.



## **Bibliografíaj referencoj**

- Roland Terborg/Virna Velázquez Vilchis. Enseñanza de lenguas y su impacto en la ecología lingüística, 2005, Estudios de Lingüística Aplicada, julio, vol. 23, número 041, UNAM, México DF.
- Colette Grinevald (2003). Documentación de lenguas en peligro: El caso de las lenguas amerindias Universidad Lyon2 y DDL CNRS.
- Delicia Villagra-Batoux (2003). Profesora de Lingüística (Universidad Católica de Asunción). Consultora en Educación Bilingüe (Ministerio de Educación Cultural). Paraguay. Seminario Interamericano sobre la Gestión de las Lenguas.
- Pico, Josep (1999). La democracia implica el reconocimiento. Cultura y modernidad. Seducciones y desengaños de la cultura moderna. Madrid: Alianza Editorial.
- Silvio Aristizábal Giraldo. La diversidad étnica y cultural de Colombia: un desafío para la educación. Profesor Universidad Pedagógica Nacional.
- Kaplan, Robert y R. Baldauf Jr. (1997). Language Planning: From practice to theory. Clevedon, Philadelphia. Multilingual Matters.
- Phillipson, Robert (1992). Linguistic Imperialism, Oxford. Oxford university Press.
- Luis Enrique López. La diversidad étnica, cultural y lingüística latinoamericana y los recursos humanos que la educación requiere. Universidad Mayor de San Simón/Cooperación Técnica Alemana, en el Programa de Formación para la Educación Intercultural Bilingüe en los Países Andinos (PROEIB Andes), Bolivia.
- Constanza Rojas-Primus. Diversidad lingüística y alfabetización en América Latina y el Caribe. Revista Iberoamericana de Educación.
- Atlas UNESCO de las Lenguas en Peligro en el Mundo  
<http://www.unesco.org/culture/es/endangeredlanguages/atlas>.
- Sergio Valdés Bernal (2009). Antropología Lingüística. Editorial Ciencias Sociales.

## Kien la Esperanta didaktiko?



### Stefan MacGill

Naskiĝis en Nov-Zelando en 1948. Denaska esp-isto. Kunfondinto de Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando (1964). Studis en Universitatoj Victoria, Canterbury kaj Massey (1969-75), ĉefe geografion. Diplomiĝis instruisto en 1974. Oficisto de UEA (1976-86). Redaktoro de Jarlibro kaj teknika redaktoro de *Kontakto* (1978-86). Vicprezid. de TEJO (1977-79), prezidanto (1979-80). Direktoro de CO (1980-85). Redaktoro de *Juna amiko* (1986-96 kaj ekde 2000). Vicprez. de ILEI (1989-92), prezidanto (1992-94 kaj ekde 2009). Restariginto de la ekzamenoj UEA/ILEI kaj ĝia sekretario (1989-95). Profesie ekde 1989 verkas help-tekstojn por komputilaj programoj (i.a. optika karaktero-rekono). Esploras lingvo-didaktikon kaj preparas esperantajn instru-materialojn. Vivas en Hungario de post 1986. Havas tri filinojn: Karina (1990), Hajnal (1992) kaj

Sonja (2000) - denaskaj esp-istoj. Verkoj: lernila serio *Tendaraj tagoj, Najbaroj kaj boroj* (1991), *Nemave edifi* (2007) k.a.

### Resumo

Ekirpunto estas distingo inter formala kaj didaktika gramatiko – nome, kiel optimume strukturi instruaĵojn por efikigi la lernadon ĉe kiel eble plej multaj lernantoj. El tio fluas bezono por pluraj eĉ konkurencaj didaktikaj ŝtuparoj – kiuj enkorpu la fortigon de gramatikaj elementoj kaj ilian kombinadon en kiel eble plej vasta gamo da komunikaj situacioj.

Iusence, ĉiu instruisto kaj lernilo starigas propran ŝtuparon – ĉu konscie, ĉu ne. La konturoj de tiuj ŝtuparoj elformiĝas reage al la aĝoj, interesoj, prioritatoj kaj fonto-lingvoj de la lernantoj. Tamen, neeviteble kaj eĉ dezirinde, kelkaj plej utilaj ŝtuparoj fariĝos konataj kaj universale aplikataj. Eblas pretigi iun universalan didaktikon, kiu povas formi fonton por aliaj, precipe por tiuj kiuj pritraktas la unikajn malfacilaĵojn ĉe Esperanto por homoj kun difinitaj denaskaj lingvoj. Klare, unu universala didaktiko vastiĝis kaj gajnis grandegan influon. Tio estas la Cseh-metodo – la unua kohera modelo aŭtentike originala al Esperanto. Ĝi tiom popularas, ke ĝi kolorigas la kursoplanojn de multaj instruistoj, eĉ de tiuj, kiuj mem ne aplikas la Cseh-metodon. Tiu forta influo portas la bedaŭrindan sekvon ke multaj kredas ĝin la sola ebla aŭ inda ŝtuparo. Kvankam pionira kaj mult-rilate admirinda, ĝi ja havas kritikeblajn punktojn.

- Ĝi akcentas paroladon sen informmanko – tro ofte bazitaj sur konataj faktoj (tablo estas meblo, rozo estas floro...).
- Ĝi ne estas forte verbo-bazita, restante tro longe je ‘estas’.
- Tro da ‘ĉu’-demandado, kun emfazo je grupa ĥora respondado, ne unuopa aŭ etgrupa.
- Nepravigebla emfazo je korelativoj: prezentitaj skeme – ne teme.
- Tro mondpriskriba: laŭtema, ne situacia; malsufiĉe prezentanta komunike utilan materialon.

Necesas konscii, ke la granda fleksebleco de nia lingvo havigas grandan elekton en la ordigo de la instruaĵoj – eblas konstrui sukcesan kurson kun preskaŭ iu ajn komenc-punkto kaj plukonstrui ĝin kiel ajn. Tio ne validas por naciaj lingvoj, kiuj havas rigoran vicordigajn postulojn pro siaj komplikaj kaj/aŭ esceptoplenaj gramatikoj. Tio substrekas la limigitan utilon de naciaj didaktikoj, kiuj alportas solvojn por problemoj, kiujn ni simple ne havas. El tiuj multe pli abunde financataj instruprogramoj, ni povas ĉerpi freŝajn alirojn kaj teknikojn, sed al iliaj detalaj ŝtupoj ni rilatu kun skeptikemo.

Ni anstataŭe kreu kaj ekuzu proprajn ŝtuparojn – identigante la kerne malfacilajn partojn de la lingvo (ne kredu niajn pli ekstremajn varbilojn – tiuj ja ekzistas!) kaj konstruu nian didaktikon ĉirkaŭ tiuj – ne evitante, ĉirkaŭirante aŭ prokrastante ilin. Necesas agnoski la unikan rolo de la verbo en Esperanto, pro la fakto ke la transitiveco de ĉiu verbo estas unuope lernenda – tre gravas ke la verboj dekomence estu prezentitaj kaj ekzercataj ne kiel solstaraj vortoj, sed en sia minimuma funkciiga kunteksto. Ni studos mallonge teknikojn prezenti tiun verb-kondukon kaj skemon por prezenti la sufiksojn -ig- kaj -iĝ-, kiuj kerne dependas de kono de verba transitiveco.

Ni fermos la prezentaĵon per enrigardo en faratan analizon de la Esperantaj verboj, por kategoriigi ilin laŭ iliaj uzkutimoj. La ĉefa ĝisnuna esplorsurprizo estas ke plene 40% de niaj verboj estas kreitaj el radikoj, kiuj mem ne estas verbaj. Tamen, en la pluformado ni devas trakti ilin laŭ la reguloj por verboj. Malkonscio pri tio rezultas en multaj lingvaj misuzoj, kaj substrekas la fakton, ke nia Esperanta didaktiko estas ankoraŭ en sia infaneco kun longa kaj defia vojo antaŭ si!

## **New directions for Esperanto teaching**

### **Summary**

The starting point for this presentation is to clarify the distinction between the formal grammar and a didactic grammar, in other words, how to arrange the grammatical elements optimally so as to achieve the best possible progress for a wide range of students. From this stems the desire for multiple and even competing grammatical ‘stairways’ that include the need for reinforcement and the use and combining of elements in a wide range of communicative situations.

In a way, each teacher and each course establishes its own stairway – consciously or otherwise. The contours of such a progression are developed in response to the ages, interests, priorities and original language of the students. However, inevitably and even desirably, certain most useful stairways become known and widely used. It is certainly possible to develop a universally valid learning path, that can be adapted to the needs of people depending on their original language. The most well known such system is the Cseh method – the first coherent model based truly on the qualities of Esperanto itself. It has become so popular that even teachers who will never employ the Cseh method, still follow its precepts and ordering of topics. This strong influence has unfortunately bred the notion that no other schemes are possible.

It is important to recognize that the immense flexibility of our language gives us great leeway in ordering our material – successful courses can be arranged with just about any starting point – which is not true for most national languages. We must avoid the danger of importing the teaching structures developed for national languages without adapting them to the unique qualities of Esperanto. These structures include mechanisms for coping with difficulties that just do not arise in Esperanto.

On the other hand, not everything in Esperanto is easy! We must identify those elements in the language that present a challenge to students, whatever their background. One major such element is the use of verbs. Their conjugation is unbelievably easy and can be taught in minutes. But the transitivity of verbs is handled differently than in most other languages: these are declared as transitive or intransitive and this category must be learnt along with each verb itself, since it has implications for the ways they behave in sentences. While the tense of a verb is immediately apparent from its spelling or its sound, its transitivity is not. We therefore need to place the role of verbs at the centre of our learning programs and devote much energy to it. The presentation will focus on how certain grammatical constructions that are affected by this

transitivity issue can be well presented – this relates to the use of the accusative and the causative and resultative verb forms.

Finally the presentation draws some conclusions from an ongoing analysis of verb categories in Esperanto – both from a theoretical lexical viewpoint and from observations of current language use.

## Où va la didactique de l'espéranto?

### Résumé

Notre point de départ est la distinction entre grammaire formelle et grammaire didactique – c'est-à-dire comment structurer de façon optimale les objets enseignés pour rendre efficace l'apprentissage chez le plus grand nombre possible d'apprenants. De là découle le besoin de plusieurs «escaliers» didactiques, même concurrents – qui englobent le renforcement d'éléments grammaticaux et leur combinaison dans une gamme aussi vaste que possible de situations de communication.

En un sens, tout enseignant, toute méthode, met au point son propre «escalier» – consciemment ou non. Les contours de ces «escaliers» prennent forme en fonction des âges, intérêts, priorités, langues d'origine des élèves. Cependant, il est inévitable et même souhaitable que quelques-uns des «escaliers» les plus utiles finissent par être connus et appliqués universellement. Il est possible de mettre au point une didactique universelle qui puisse servir de base à d'autres méthodes, en particulier à celles qui traitent les difficultés spécifiques de l'espéranto pour les locuteurs de certaines langues maternelles. De toute évidence, une didactique universelle s'est répandue et a acquis une immense influence. Il s'agit de la méthode Cseh – le premier modèle cohérent authentiquement original à l'espéranto. Elle est si populaire qu'elle imprègne les plans de cours de nombreux enseignants, y compris de ceux qui n'appliquent pas eux-mêmes la méthode Cseh. Cette forte influence a pour regrettable conséquence le fait que beaucoup croient qu'elle est le seul «escalier» possible ou valable. Bien que pionnière et admirable à de nombreux égards, elle comporte pourtant des points critiquables.

- Elle met l'accent sur la prise de parole sans déficit d'information – trop souvent basée sur des faits connus (« la table est un meuble », « la rose est une fleur »...).
- Elle n'est pas fortement basée sur le verbe, restant trop longtemps sur « être ».
- Trop de questions fermées, avec insistance sur la réponse en chœur de tout le groupe, et non individuelle ou par petits groupes.
- Insistance injustifiable sur les corrélatifs: présentés de façon schématique et non thématique.
- Trop descriptive: par thèmes et non en fonction de la situation; ne présentant pas suffisamment de matériel utile pour la communication.

Il faut avoir conscience du fait que la grande souplesse de notre langue fournit un grand choix dans l'organisation des éléments enseignés – il est possible de bâtir un cours réussi avec pratiquement n'importe quel point de départ et de le poursuivre de n'importe quelle façon. Cela ne vaut pas pour les langues nationales, qui ont des exigences rigoureuses quant à l'ordre des apprentissages, du fait de leurs grammaires compliquées et/ou pleines d'exceptions. Cela met en évidence l'utilité limitée des didactiques nationales, qui apportent des solutions à des problèmes que nous n'avons tout simplement pas. De ces programmes d'enseignement beaucoup plus abondamment financés, nous pouvons tirer des approches et des techniques nouvelles, mais considérons leurs étapes détaillées avec scepticisme.

Créons et utilisons plutôt nos propres «escaliers» – en identifiant les parties foncièrement difficiles de la langue (ne croyez pas nos publicités les plus extrémistes: elles existent bien!) et

construimos nuestra didáctica alrededor de estas – sin evitarlas, rodearlas o retrasar su introducción. Hay que reconocer el rol único del verbo en esperanto, el hecho de que la transitividad de cada verbo debe ser aprendida individualmente – es muy importante que los verbos sean presentados desde el principio y sean el objeto de ejercicios, no como palabras aisladas, sino en su contexto funcional mínimo. Estudiaremos brevemente técnicas para presentar este comportamiento de los verbos y un esquema para presentar los sufijos –ig- y –ig-, que dependen fundamentalmente del conocimiento de la transitividad de los verbos.

Nos cerraremos la presentación con una mirada sobre el análisis de los verbos en esperanto, para clasificarlos según sus usos. El descubrimiento más sorprendente hasta ahora en nuestras investigaciones, es que al menos el 40% de nuestros verbos son creados a partir de raíces que no son ellas mismas verbales. Sin embargo, para la derivación debemos tratarlos según las reglas que se aplican a los verbos. El hecho de no tener conciencia de esto provoca numerosas errores de lenguaje, y resalta el hecho de que nuestra didáctica de esperanto es todavía en su infancia, con una larga vía llena de desafíos por delante!

## ¿Hacia dónde va la didáctica del Esperanto?

### Resumen

Un punto de partida es distinguir entre gramática formal y gramática didáctica – esto es, cómo disponer óptimamente los elementos enseñados de manera de hacer eficaz el aprendizaje para el mayor número posible de estudiantes. De esto surge la necesidad de escaleras didácticas múltiples, que incluso compitan entre sí, que incorporen el fortalecimiento de los elementos gramaticales y su combinación en un rango lo más amplio posible de situaciones comunicativas.

En cierto sentido, cada profesor y cada instrumento de aprendizaje establecen su propia escalera o progresión, de manera consciente o no. Los perfiles de esas escaleras se desarrollan de acuerdo a las edades, intereses, prioridades e idiomas de origen de los estudiantes. Sin embargo, en forma inevitable e incluso deseable, algunas de las escaleras más útiles llegarán a conocerse y aplicarse universalmente. Es posible establecer una didáctica universal, que pueda servir de fuente para otros, principalmente para quienes deben tratar con las dificultades específicas que el Esperanto presenta a personas de determinados idiomas maternos. De hecho, una didáctica así se difundió y adquirió gran influencia. Se trata del método Cseh – el primer modelo coherente y auténticamente endógeno del Esperanto. Es tan popular, que impregna los planes de curso de muchos profesores, incluso de aquellos que no lo aplican. Esta fuerte influencia tiene, como consecuencia que lamentar, el que muchos creen que es la única escalera posible o valiosa. Aunque pionera y admirable en muchos aspectos, tiene en realidad limitaciones y puntos criticables.

- Enfatiza el tomar la palabra no teniendo déficit de información – demasiado frecuentemente sobre hechos conocidos (“la mesa es un mueble”, “la rosa es una flor”...)
- No se basa con fuerza en el verbo, permaneciendo demasiado en “es/está”
- Demasiadas preguntas con “ĉu”, enfatizando la respuesta grupal en coro, no individual o en grupos pequeños.
- Un énfasis injustificable en los correlativos, presentados esquemáticamente – no en forma temática.
- Demasiado descriptivo: según temas, no situacional; sin presentar un material comunicativamente útil.

Es necesario tener conciencia de que la gran flexibilidad de nuestro idioma (Esperanto) proporciona una amplia variedad de opciones en el ordenamiento de los elementos a enseñar – es posible armar un curso exitoso a partir de casi cualquier punto de inicio, continuando de

cualquier manera. En contraste, los idiomas nacionales exigen una secuencia rigurosa de aprendizaje en función de sus gramáticas complejas y/o llenas de excepciones. Esto subraya la utilidad limitada de las didácticas nacionales, que proporcionan solución a problemas que simplemente no tenemos. De los programas de enseñanza que disfrutaban de mayor financiamiento, podemos recoger aproximaciones y técnicas frescas, pero escrutando con actitud escéptica sus peldaños en detalle.

Preferiblemente debemos crear y utilizar escaleras propias -identificando las partes esencialmente difíciles del idioma (¡que por cierto existen, a pesar de lo que sostiene nuestra propaganda más extrema!), y construir nuestras escaleras con ellas –no evitando, rodeando ni diferenciando esas partes. Es necesario reconocer el rol único del verbo en Esperanto, por el hecho que la transitividad de cada verbo debe aprenderse separadamente –es muy importante que los verbos se presenten y ejerciten no como palabras aisladas, sino que en un contexto funcional mínimo. Estudiaremos brevemente técnicas para presentar el comportamiento verbal y un esquema para introducir los sufijos -ig- e -iĝ-, que dependen esencialmente del conocimiento de la transitividad de los verbos.

Finalizaremos la presentación mediante una mirada a un análisis en curso de los verbos del Esperanto, que los categoriza según sus usos. Hasta ahora, la principal sorpresa de la investigación es que no menos del 40% de nuestros verbos fueron creados con raíces que no son verbales. No obstante, en la derivación debemos tratarlos de acuerdo a las reglas verbales. No tener conciencia de ello conduce a muchos errores en el uso del idioma, y subraya el hecho que nuestra didáctica del Esperanto está aún en su infancia, ¡con un largo y desafiante camino por delante!

## Kien la Esperanta Didaktiko?

### Formala kaj Didaktika Gramatiko

Nia formala gramatiko celas priskribi aŭ preskribi la lingvon, kaj ĝi vicordigas la materialon laŭ unu aŭ alia logiko kiun oni kreas laŭ la naturo de la gramatiko mem. Plejofte, la strukturo por prezenti la lingvon estas transprenita de tiuj uzataj por prezenti aliajn lingvojn, kun nur moderaj modifoj por ellasi tiujn partojn, kiuj traktas malfacilaĵojn, kiujn nia lingvo simple ne havas. Tra la lastaj jaroj gramatikistoj ĉiam pli klopodas krei kaj diskonigi strukturojn pli proksime ligitajn al la spirito kaj bezonoj de nia lingvo, kun malpli da insisto pri hereditaj terminoj kaj strukturoj.

Instruistoj kompreneble salutas tiun evoluon, precipe kiam ili devas lernigi la lingvon al homoj kun malmultaj gramatikaj antaŭscioj – kio validas por ĉiam kreskanta proporcio de la homaro. Sed por edukistoj, tiu formala gramatiko, kiom ajn rafinita, estas necesa sed ne sufiĉa. En la pedagogio, la instrupaŝoj devas esti aranĝitaj por krei **ŝtuparon**, laŭ kiu oni progresive levas sin, pasante de la konata al la nekonata, de la pli simpla al la pli kompleksa kaj de reproduktaj ĝis produktivaj tavoloj.

Kiel gramatika analizo de lingvo diferencas de didaktika?


Unue, ĝi eble volas alimaniere klasi iujn radikojn. Ekzemple, en la instruado oni volas klasi la radikojn ‘interes-’ inter adjektivoj: bona, bela, saĝa, interesa... kaj ‘surpriz-’ inter substantivoj: enigmo, mistero, revelo, surprizo. La gramatiko tamen, postulas ke ni respektu la ĉeeston de verboj por tiuj radikoj, do ilia loko kuŝas inter interesa grupo de verboj, kie la rekta objekto kaj ne la subjekto estas la ĉefa aganto: ‘Tio interesas min’, ‘Tio surprizas min’, ‘Tio ŝokas min’... kaj derive: ‘Mi interesiĝas pri...’, ‘Mi surpriziĝas pri...’ kaj ‘Mi ŝokiĝas pro...’. Tial, la funkciado de ‘interes-’ kaj ‘bon-’ ne estas simil-kategoriaj, ekzemple ĝustas la frazo: ‘Komence, la filmo estis malbona, sed poste ĝi boniĝis’, sed malĝustas: ‘Komence, la filmo estis malinteresa, sed poste ĝi interesiĝis’. Nia instruado devas klarigi la motivon por tiaj ŝajnaj anomalioj.

Due, ĝi eble volas emfazi elementojn kiuj estas aparte utilaj al la instrueloj kaj la interesoj de la lernantoj. Ĝi provos trovi kaj elstarigi kernajn elementojn, aŭ tiujn kiuj kaŭzas maksimumajn malfacilaĵojn al la lernantoj – kio grandparte (sed ne ekskluzive) dependas de la devenlingvo de la lernanto.

Trie, la didaktika ŝtuparo celas krei komunik-kapablajn lernintojn, dum la formala gramatiko deziras nur esti komprenata kaj respektata.

### La didaktika ŝtuparo

Tiu tria konstato implicas ke nia didaktika ŝtuparo devas inkluzivi ankaŭ ŝtupojn por perfektigo, por firmigo de lernitaĵoj, kaj majstrado de la unuopaj lernaĵoj ne nur en bazaj kazoj, sed en ĉiam pli kompleksaj kunteksto, kaj en kombino kun ĉiam pli da aliaj lernaĵoj. Ĉiu ajn povas instrui en minutoj la bazajn regulojn por formi verbo-tempojn en Esperanto, aŭ komprenigi la principojn de la akuzativa finaĵo. Sed por ke lernantoj plene majstru la uzadon de niaj verboj kaj iliaj ligitaj akuzativoj necesas investi longan iradon, kaj en kelkaj kazoj tio fariĝas senfina lukto. La sekva ilustraĵo el la *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, montras ĝuste kiel povas esti enkonstruita en nian ŝtuparon la firmigo kaj la malizoligo de niaj lernendaĵoj.



Evidente, en komenca prezentado de nova lernaĵo, gravas doni koncizajn, klarajn modelojn, kiuj ne estu dusencaj aŭ dubsencaj – sen la malhelpo de aliaj gramatikaj elementoj (eĉ jam instruitaj) en la sama baza modelo. Aliflanke, tre gravas, post la sukcesa enkapigo de tiu modela prezento, ne supozi la temon fermita kaj pluiri al la sekva. Necesas multa ekzercado, en malsamaj kaj progresive pli komplikaj kaj riĉaj kunteksto:

Mi salutas miajn amikojn.  
 Mi gaje salutas miajn amikojn.  
 Mi gaje salutas miajn karajn amikojn.  
 Mi kaj mia amata katido gaje salutas miajn karajn amikojn.  
 Mi kaj mia amata katido kutimas gaje saluti miajn karajn amikojn.  
 Mi kaj mia amata katido, kiun mi levas al la fenestrobreto, kutimas gaje saluti miajn karajn preterbiciklantajn amikojn... ktp. ktp.

La manlibro prezentas krome praktikajn ekzemplojn de la frazoj kaj rakontetoj prezentablaj per ĉiaj kombinoj de kvar elektitaj gramatikaĵoj:

**Temo A:** Transitivaj verboj  
**Temo B:** Posedaj pronomoj  
**Temo C:** Prepozicioj de loko  
**Temo D:** Esprimoj de tempo

Ekzemplofrazoj por tiu skemo estas la sekvaj:

1. **Temo A:** Mi havas farunon. Mi havas ses ovojn. Mi havas lakton. Mi miksas ilin. Mi bakas kukon.
2. **Temo B:** Jen mia ĉambro. Jen mia lito. Jen mia stud-tablo. Jen mia kato. Mia kato estas griza kaj bela.
3. **Temo A en alia situacio:** Mi prenas paperon. Mi trovas plumon. Mi skribas leteron. Mi malfermas koverton. Mi enmetas la leteron. Mi lekas la gluon de la koverto (Blahhh!). Mi fermas la koverton. Mi aĉetas



- poŝtmarkon. Mi lekas la poŝtmarkon (BLAHHH! denove). Mi gluas la poŝtmarkon. Mi skribas la adreson. Mi transdonas la leteron. Mi vizitas butikon. Mi aĉetas kovert- kaj poŝtmark- lekmaŝinon.
4. **Temo B en alia situacio:** Mia amiko estas Paŭlo. Lia biciklo estas flava kaj nova. Mia amikino estas Nikola. Ŝia biciklo estas verda kaj malnova. Iliaj bicikloj staras apud la mia. Ni ekskursos per niaj bicikloj al via urbo.
  5. **Temoj A kaj B en kombino:** Hierau Jan bakis kvar kukojn. Li rakontas: “Mi uzis farunon, ovojn, lakton, buteron kaj spicojn. Miaj amikoj vizitis min, kaj ni manĝis miajn kukojn kune. Nun ni prenos niajn biciklojn kaj ni vizitos vin en via hejmo. Ĉu vi bakis kukojn, hazarde?”
  6. **Temo C:** La poŝtoŝtanco estas en la mezo de la urbo, antaŭ la banko. La biciklo-starejo estas malantaŭ la domo, dekstre en la ĝardeno. Nia forno staras en la angulo de la kuirejo. La ovoj estas sur la tria breto en la fridujo. La lakto estas sub ili, apud la butero. La faruno estas sur la planko sub la tablo. Upps! Akcidenteto.
  7. **Temo A en alia situacio:** Mi ĵetis pilkon. Ĝi rompita fenestron. Mi vokis la ripariston. Li portis novan vitron. Li enmetis ĝin. Li diris la prezon. Mi ne kredis lian diron. Tamen, mi pagis lin. Mi eniris la domon. Mi serĉis la pilkon. Mi trovis ĝin. Ĝi rompita ankaŭ la televidilon. Ve!
  8. **Temo B en alia situacio:** Kanto: Mia amik’ estas via amik’. Modifu al: „Lia amik’ estas ŝia amik’” ktp.
  9. **Temo C en alia situacio:** Rusaj pupoj: La flava pupo estas en la ruĝa pupo, la verda pupo en la ruĝa... ktp.
  10. **Temo A kaj C en kombino:** Mi havas farunon en sako. Mi havas ovojn en skatolo. Mi havas lakton en botelo. Mi havas buteron en pako. Mi prenas pelvon de sur la breto. Mi miksas la kuirilojn en la pelvo. Mi preparas la fornon en la angulo. Mi prenas oleon de la breto super la forno. Ups! Mi faligas la farunon. Ĝi estas sur la planko, sub la tablo. Mi serĉu balailon. Kie ĝi estas? Malantaŭ la pordo? Ne. Sub la lav-kuvo? Ne. Inter la purigiloj? Ne. Ha, jen, mi vidas ĝin. Ĝi kuras en la ĝardeno apud la bicikloj.
  11. **Temo B kaj C en kombino:** Mia biciklo estas en la ĝardeno, apud du aliaj bicikloj. Kie estas la kukoj de Jan? Li diras: “Ili estas en la stomakoj de miaj amikoj. Morgaŭ mi iros al mia kuirejo kaj bakos dek kukojn por miaj amikoj, kaj ankaŭ por iliaj amikoj. Estos amika rondo en la ĝardeno, sub nia granda sun-ombrelo.”
  12. **Temo C revizite en alia kunteksto:** Mapo de urbo: La banko estas en la ĉefa strato, inter poŝtoŝtanco kaj benzinejo. La lernejo estas malantaŭ la banko. La kinejo estas supre en la butikum-centro... ktp.
  13. **Temoj A, B kaj C en kombino:** Mi prenis paperon de la stako. Mi trovis mian plumon malantaŭ la radiatoro. Mi skribis leteron al vi. Mi trovis koverton en la laborĉambro de mia Paĉjo. Mi enmetis mian leteron. Mi uzis mian koverto-lekan maŝinon. Ĝi lekis mian koverton kaj diris „Blahh!”. Mi trovis poŝtmarkon en la monujo de mia patrino. Mi skribis la adreson en la suba dekstra angulo de la koverto. Mi iris al la ĝardeno kaj prenis mian biciklon. Mi biciklis al la poŝtoŝtanco en la centro de mia urbo. Ĉu vi ricevis mian leteron? Jes? Do, malfermu ĝin kaj legu. Prave! Mi bakis kvar kukojn kaj faligis la farunon nur unufoje. Mi invitas vin kaj viajn amikojn. Vizitu min morgaŭ. Venu per viaj bicikloj. Estas spaco en la ĝardeno por via kaj iliaj bicikloj. Kune ni sidos en nia ĝardeno kaj manĝos miajn kukojn. Se forte brilos la suno, ni starigos sunombrelon kaj ni sidos en rondo sub ĝi. Kaj se pluvas? Nu, mi havas aliajn ombrelojn...
  14. **Temo D:** Antaŭ unu semajno... Postmorgaŭ... Post du tagoj... Pasint-jare... En la somero... ktp.
  15. **Temo D kun la aliaj temoj:** Vi povas jam imagi...

Rimarku, ke tiuj ekzemplofrazoj celas ne nur prezenti la gramatikon, sed krome kapti la intereson de la lernantoj (per humuro aŭ aliaj rimedoj), kaj plie, prezenti utilajn modelojn por aŭtentika komunikado.

Eĉ komplika temo kiel la refleksivo estas relative facile prezentibla per simplaj kaj klaraj ekzemploj. Sed kiam la refleksivaĵoj ennestigas sin en longaj frazoj kun pluraj diversformaj verboj kaj labirinto da sub-propozicioj, pri plur-homaj situacioj, oni devis esti findirinta la frazon multe pli frue ol oni povas malplekti la gramatikan korektecon. En tiaj kompleksaj kazoj, eĉ niaj plej eminentaj gramatikaj fontoj benas nin per malmulta iluminiĝo.

Arketipa frazo montras kiel Esperanto proponas klarecon kiu mankas en multaj naciaj lingvoj:

**Esperanto:** La grafo, amiko de la reĝo, petis al (sia/lia) servanto lavi (siajn/liajn) ŝtrumpetojn.

**Nacia lingvo:** The Duke, a friend of the King, asked his servant to wash his socks.

Esperante, la parolanto povas indiki kies servanto laboru, kaj kies ŝtrumpetoj puriĝu. En la nacilingva versio, neniel eblas scii tiujn informojn sen plia kunteksto. Tiu ekzemplo, kaj alia poste renkontota, permesas al ni fari utilan konkludon pri la naturo de nia lingvo, kiu apartigas ĝin disde la plimulto de naciaj lingvoj.

## Parolanto aŭ aŭskultanto – kiu portas la pezon?

Esperanto estas alispeca lingvo, ĉar ĝi ĵetas grandan respondecon sur la ŝultrojn de la parolanto, ĉar ĝi liveras al tiu potencajn ilojn por esprimi sin klare kaj malambigue. Plej evidentaj el tiuj helpiloj estas la markado de la gramatikaj funkcioj de vortoj en frazoj. Se la aŭskultanto nur lernis la regulojn (kaj espereble la spiriton) de la lingvo, tiu devas povi kompreni bone la intencatan signifon, sen la bezono fosi tra proksimaj kaj malproksimaj kunteksto por pritaksi verŝajnecojn de kelkaj eblaj signifoj por elimini la malpli kredeblajn kaj tiel detektive atingi la intencatan signifon. Se Esperanto efektive tiel pezigas la vivon de siaj parolantoj, niaj instruistoj devas honeste analizi niajn malfacilajn punktojn kaj kiel eble plej klare demonstri bonajn manierojn majstri ilin. Ni tion faros fine de ĉi tiu prezentaĵo.

## Ĉu ni havas didaktikajn gramatikojn?

Ĉu instruante Esperanton, ni simple transprenas la modelojn kiujn ni uzas por instrui naciojn lingvojn? Ĉe libroformaj lerniloj ni ja tradicie faris kaj eĉ faras tion – precipe se tiuj lerniloj estas dulingvaj. Same kiel ĉe enportitaj gramatikoj – la rezulto estas malnecese komplika por Esperanto kaj – pli grave – ĝi riskas neglekti gravaĵojn. Oni povas argumenti, ke la verkanto de ĉiu lernilo kreas sian propran didaktikan gramatikon.

La didaktikaj niveloj por precipe la pli grandaj etnaj lingvoj kutimas esti detale kaj eĉ rigide fiksitaj. Unue, tio fontas el la fakto, ke ili estas multe pli kompleksaj kaj esceptoplenaj ol Esperanto. Tio starigas devigojn, loki multajn temojn en pli strikta vicordo, ĉar ofte rego de unu temo estas antaŭkondiĉo por prezento de alia. Due, tio fontas el la ĉiam kreskanta bezono normigi instruprogramojn kaj ekzaminsistemojn, por ke dungontoj kaj aliaj interesatoj sciu kiel eble plej precize kiun nivelon kaj sciojn ili rajtas atendi. En tiuj lingvoj la epiteto ‘Super-meza lingva nivelo’ (*Upper Intermediate Level*) tipe donas tre precizan indikon pri tio kion oni rajtas atendi kaj ne atendi. Esperanto mem evoluas laŭgrade en tiu direkto, sed la ebloj de ĝia didaktiko estas multe pli flekseblaj. Ni havas, almenaŭ en teorio, senfinajn eblojn vicigi kaj reordigi niajn instrublokojn, dank’ al nia unike fleksebla lingva strukturo. Claude Gacond, ekzemple, evoluigis kurson por infanoj kun flanelfiguroj, per kiu li enkondukas la finaĵon -ig- en la unua leciono! IG kaj IĜ estas gravegaj elementoj en nia lingvo: nomi kaj trakti ilin nur unu plia sufikso bagateligas iliajn rolojn: ja ne ĉiuj sufiksoj naskiĝas egalvaloraj!

La situacio por tiu unua leciono estas cirko, kun leono, balerino, klaŭno kaj postulema vipoporta cirkesto:

La cirkestro dancigas la balerinon. Li saltigas la leonon. Li plorigas la klaŭnon... ktp.

Tiu kaŭzativa finaĵo -ig- estus en etna lingvoskemo, firme lokita je la stratosfera flanko de tiu ‘Super-meza’ nivelo.

Se Esperanto permesas tian riĉan eblon rearanĝi nian didaktikan ŝtuparon, kial ni ne vidas pli da vario kaj eksperimentemo en niaj lerniloj? Unue, ĉar multaj influigis de nacilingvaj didaktikoj. Due, ĉar surprize alta proporcio de nia instruado restas dulingva kaj ne cel-lingva, kiel por la plimulto de nuntempa lingvoinstruado. Trie, ĉar ni fakte havas nur unu klaran, vaste konatan, interne koheran didaktikan gramatikon. Tion ni ŝuldas al la instrupioniro Andreo Cseh. Multaj instruistoj, kiuj neniel pretus aŭ volus ekuzi la Ĉe-metodon kaj rifuzas veturi kursen kun valizpleno da stufitaj bestetoj, pupoj, veturiloj kaj centoj da bildoj, tamen (kaj ofte senkonscie), zorge aranĝas siajn lecionojn laŭ la vicordoj de Cseh. Tiu metodo, en la manoj de sperta instruisto, alportas bonajn rezultojn kaj enhavas multajn dezirindajn trajtojn – unuavice ĝian rigoran insiston uzi nur la cellingvon. Sed ĝi havas ankaŭ kritikeblajn trajtojn:

- Ĝi akcentas paroladon sen informmanko – tro ofte bazitaj sur konataj sed banalaj faktoj (tablo estas meblo, rozo estas floro...).
- Ĝi ne estas forte verbo-bazita, restante tro longe je ‘estas’.

- Tro da ‘ĉu’ demandado, kun emfazo je grupa ĥora respondado, ne unuopa aŭ etgrupa.
- Malfacile pravigebla emfazo je korelativoj – prezentitaj skeme – ne teme.
- Tro mondpriskriba: laŭtema, ne situacia; ĝi malsufiĉe prezentas komunike utilan materialon.

Tiu forta influo de Cseh bremsas la malkovron de aliaj pli utilaj vicordigoj kaj emfazoj.

## **Dulingvaj kursoj**

La dulingva aliro ne limigas sin al arĥaikaj enlandaj lerniloj, nesufiĉe atentante la unikan strukturon kaj spiriton de Esperanto. La Zagreba metodo, ekzemple, elpaŝis internacie kaj sukcese, firme bazita sur dulingva kaj traduka aliro. Ĝi ekspluatas la efikecon ĉerpeblan el la posedo de komuna lingvo firme regata de la instruisto kaj la lernantoj. Ĝi ja havas ŝancojn – en lertaj manoj – kreskigi komprenon kaj konscion pri Esperanto kiel alispeca kaj aŭtonoma lingvo, kaj plie senton de respekto por ĝiaj potencialoj. Sed en la manoj de instruisto samtempe mem lernanta la lingvon, sen granda fremdlingva sperto (ĝuste la metodo ebligas tion) la risko kreskas ke la studado restas ene de nacilingvaj katenoj.

La vort-trezora bazo de la metodo estas interesa – ĝi forte limigas la prezentitajn vortojn por koncentriĝi je la strukturoj, kontraste al la (same du-lingva) pirata metodo kiu inundas lernantojn per centoj da vortoj hore, multaj superflujaj. La vortaro de la Zagreba metodo baziĝas sur registraĵoj faritaj en unu junulara kongreso antaŭ dudeko da jaroj. Estus tempo altigi la kredindon de la metodo per aktualigo de tia registraĵo kaj aldono de vortostokoj el aliaj fonoj. Io komuna inter la zagreba kaj pirata metodoj estas ilia insisto preskaŭ tuj kombini gramatikajn strukturojn, por rapide progresi al la kombinigaj ŝtupoj de nia didaktika ŝtuparo. Por efektive komuniki oni ja devas kombini elementojn. La starigintoj de tiuj metodoj supozeble reagis kontraŭ la ekzistantaj lerniloj kaj rektaj metodoj, kiuj emis malrezisti la tenton bebumi la lernantojn, restante tro longe ĉe unuopaj strukturoj, ĉar eblis sen granda peno elpensi stokojn da modelaj frazoj verkeblaj per iu koncerna instruaĵo kaj ĝiaj strukturoj, sed kiuj sufiĉas por nur limigita kaj sekve artefarita komunikado.

Spite al ĉi tiu ekfloro de dulingvaj instrumetodoj, la fakto restas, ke la plimulto de fremdlingva instruado en la nuntempa mondo estas komunik-fokusita kaj situaci-bazita, kun uzo de grandparte cellingvaj lerniloj, internacie distribuataj. Strange, ke ĝuste nia internacia lingvo tiom malmulte sekvas tiun evoluon.

## **Mult-ŝtupara domego**

Por ke tiu evoluo maturiĝu, ni bezonas pli da esploroj pri potencialaj didaktikaj ŝtuparoj, por trovi novajn, eble pli optimumajn vicordigojn de la materialo. Grava faktoro en tio estas la komunikaj bezonoj de la lernantoj – tio ja devas esti la superrega celo de lingvo-lernado – kaj tiuj bezonoj ege varias, depende de aĝo, socia aparteno, aspiroj kaj bezonoj. Alia faktoro, kiu ne nepre devas esti tre evidenta al la lernantoj, estas la ekspluatado de la gramatika sistemo de la lingvo. Kun tiaj sistemeco, logiko kaj escepto-manko, ĝi nepre devas ludi ŝlosilan rolon. Tiu rolo povas esti kaŝita aŭ evidenta, sed ĝi devas ekzisti. La sekreto de sukcesa ŝtuparo estas la lerta kombino de situacioj kaj gramatikaĵoj. Por optimumigi tiun parigon, ni devas starigi duflanke demandojn. Unuflanke, kiuj situacioj estas plej utilaj kaj gravaj por la lernantoj – aŭ kiuj kaptos iliajn atentojn kaj pli bone motivigos ilin? Duaflanke, kiuj gramatikaĵoj postulas la plej grandan atenton?

## **Esperanto – facilega lingvo**

Ni havas belajn reklam-sloganojn, kaj ni riskas esti mem trompitaĵoj per ili. La fakto estas, ke partoj de nia mirinde logika lingvo starigas al ni unikajn malfacilaĵojn. Kio malfacilas en Esperanto? Tio ege varias inter unu individuo kaj alia, inter homgrupoj, ekzemple laŭ

edukiteco, kvanto de antaŭa sperto lerni lingvojn, kaj certe laŭ la denaskaj lingvogrupoj. Hungaroj sen okcidentlingva sperto devas strebi lerni la delikatan arton de prepozicia uzo. Slavlingvanoj havas grandajn luktojn majstri la artikolojn en Esperanto, dum ambaŭkaze al parolantoj de okcidentaj lingvoj pli malpli sufiĉas diri ‘faru pli-malpli kiel en via propra lingvo, kaj vi plej ofte sukcesos’. Parolantoj kun denaska lingvo kiu havas akuzativon facile kaptas ĝian esencon, kvankam ili ne ĉiam majstras ĝian uzadon en Esperanto. Parolantoj sen akuzativo propralingve havas multe pli krutan monton por grimpi.

Enlandaj instruistoj devas eksplicite aŭ implicite koncentriĝi pri tiuj stumbligaj punktoj kiuj ekzistas specife por ties propraj lernantoj. Ili povas prepari lecionojn kaj klarigojn en la nacia lingvo, aŭ pretigi ekzercojn per kiuj la lernantoj superu la obstaklojn. Instruante per cel-lingva lernilo, aŭ kun internacia grupo, oni malpli koncentriĝas pri tiuj lingvo-dependaj malfacilaĵoj, kaj devas anstataŭe turni la emfazon al tiuj punktoj de Esperanto kiuj estas vaste aŭ eĉ universale malfacilaj.

### **Transitiveco de verboj – kerna malfacilaĵo**

Argumenteble la plej universala malfacilaĵo estas la deviga transitiveco aŭ maltransitiveco de la verboj. Vane lernantoj scias la meĥanisman de la akuzativo kaj la funkci-regulojn por -ig- kaj -iĝ-, se oni ne instinkte sentas la transitivecon de la verboj. Tiuj scioj ne estas laŭ reguloj doneblaj – nur pro la reguleco de -as, -is, -os, -us, -u facilas niaj verboj. La gramatika aparteno de ĉiu verbo estas lernenda tuj je la unua renkontiĝo. Sekve niaj lerniloj devas ekde la komenco evidentigi la gravecon de tiu distingo, kaj prezenti ĉiujn verbojn en iu minimuma kunteksto. Same kiel oni tuj lernas la genron de vortoj en la franca kaj germana samtempe kun la lernado de la vorto mem, tiel devas okazi pri niaj verboj. Ni ne instruu nur ‘ĉasi, bati, sendi, ricevi’ ktp. Sed prefere ‘ĉasi muŝojn, bati pilkon, sendi leteron, ricevi donacon’.

En pluraj naciaj lingvoj, tiu tuja provizo de verba kunteksto ne tiom gravas, ĉar ili senŝanĝe plenumas kaj transitivajn kaj netransitivajn rolojn. Tio malpezigas la devojn de la parolanto (kiel ni jam diskutis), sed kreskigas la malfacilaĵojn por la aŭskultanto, kiu devas el malpli precizaj frazoj decidi la intencatan celon.

### **Skemo por -ig- kaj -iĝ-**

Supozante ke nia lerno-skemo jam preparas la lernantojn tuj scii la kategorion de la uzotaj verboj, restas ekspluati tiun scion por konvene prezenti la dependajn gramatikaĵojn. Jen konciza formo de skemo por prezenti la aplikadon de -ig- kaj -iĝ- al radikoj. Ĉi tiu temo gravas, ĉar malmultaj naciaj lingvoj havas precize analogan sistemon por esprimi la kaŭzativon kaj rezultativon. Ĉi tiu skemo aperas kun multe pli da ekzempligaj frazoj en la *Manlibro pri Instruado de Esperanto* (paĝo 109). Ĝia praktika apliko en lernilo estas videbla en la kajeroj du kaj tri de *Tendaraj tagoj*, kun la diversaj elementoj unue prezentitaj aparte, kaj nur poste, en ĉapitro 75, resumitaj kune. Ĉi tio donas praktikan ekzemplon, kiel du parencaj gramatikaĵoj povas esti apartigitaj al parado da pli fajnaj didaktikaj ŝtupoj. Rimarku, ke -ig- estas unue prezentita, ĉar ĝi estas la pli aktiva formo. Krome notu, ke la uzo de -ig- kun transitivaj verboj estas konsiderata temo por progresintoj; sekve ĝi aperas apud la librofino, eĉ post la resumoj.

|                      | Kategorio                      | Senco de -iĝ- | IĜ-formo   | BAZO                                      | IG-formo   |
|----------------------|--------------------------------|---------------|--|---|--|
| 1a<br>1b<br>1c<br>1ĉ | Radikoj sen aktiva verba formo | Simila al ek- | grand-iĝi.<br>soldat-iĝi<br>ar-iĝi<br>sur-tabl-iĝi | grand-a<br>soldat-o<br>ar-o<br>sur tabl-o | grandigi -on<br>soldat-igi -on<br>ar-igi -on<br>sur-tabl-igi -on |
| 2                    | Verboj de korpa teniĝo         | Simila al ek- | sidiĝi   | sid-i                                     | sidigi -on   |
| 3                    | Netransitivaj verboj           | -             | -  | fal-i                                     | fal-igi -on  |
| 4                    | Transitivaj verboj             | Kvazaŭ pasivo | trink-iĝi  | trinki -on                                | trink-igi iun je io  |

La suba tabelo indikas kie ĉiu ero de la skemo estas prezentita kaj resumita.

| Kategorioj IG      | Ĉapitro       |
|--------------------|---------------|
| 1a kaj 1b kun -ig- | TT2, ĉ. 45    |
| 1c kun -ig-        | TT2, ĉ. 46    |
| 1ĉ kun -ig-        | TT2, ĉ. 47    |
| 2 kun -ig-         | TT2, ĉ. 48    |
| 3 kun -ig-         | TT2, ĉ. 51    |
| 4 kun -ig-         | TT3, ĉ. 91    |
| Resumo pri -ig-    | TT2, ĉ. 49    |
| Firmigo pri -ig-   | TT3, ĉ. 62,63 |

| Kategorioj IĜ            | Ĉapitro    |
|--------------------------|------------|
| 1a kaj 1b kun -iĝ-       | TT3, ĉ. 68 |
| 1c kun -iĝ-              | TT3, ĉ. 69 |
| 1ĉ kun -iĝ-              | TT3, ĉ. 69 |
| 2 kun -iĝ-               | TT3, ĉ. 70 |
| 3 kun -iĝ- ne ekzistas   | --         |
| 4 kun -iĝ-               | TT3, ĉ. 71 |
| Resumo pri -ig- kaj -iĝ- | TT3, ĉ. 75 |

Pri kategorio 1, necesas atentigi, ke la testo ne estas ĉu temas pri verba aŭ malverba radiko, sed ĉu ekzistas entute aktiva verbo registrita por tiu radiko. Ekzistas radikoj kiuj estas substantivaj, kaj tamen havas aktivan verbon, ekz. ‘truo’, ‘diplomo’ kaj ‘loko’. Efektive, ekzistas transitivaj verboj ‘trui’ (fari truon), ‘diplomi’ (doni diplomon) kaj ‘loki’ (meti en lokon); sekve ili apartenas ne al kategorio 1 sed 4: Konduktoro truas bileton, lernejo diplomas studentojn kaj mi lokas pomon sur tablon. Se koncerna verbo ne estas aktiva, la radiko restas sub la reĝo de kategorio 1. Ekzemple, en la frazo: ‘La manĝo pretas’, la verbo signifas nenion pli ol ‘esti preta’, sekve manĝo pretiĝas, kaj iu pretigas ĝin. Formado de tiaj malaktivaj verboj, kvankam plej ofte malkutimaj, helpas montri kiel deriviĝas la aliaj formoj, ekzemple: La manĝo surtablas, sekve iu surtabligis ĝin, kaj ĝi surtabliĝis. Alia malsufiĉe klarigita fenomeno estas kiel la senco de -iĝ- varias depende de la kategorio: en ‘grandiĝi’, ‘sidiĝi’ ktp, la senco similas (sed ne identas) al ‘ek-’: ‘ekesti granda’, ‘eksidi’, sed ĉe transitivaj verboj, ĝi ne donas tiun signifon de ‘ek-’, sed funkcias simile (denove, ne idente!) al pasivo. En ‘Akvo trinkiĝis’ ĝi ne signifas ‘ektrinki’ sed similas al ‘Akvo estas trinkita’.

En la senlaca strebo krei ĉiam pli fajnajn didaktikajn ŝtupojn, indas esplori pli zorge la transitivecon de niaj verboj, kaj en la vortaroj, kaj en la reala uzo.

### Verbanalizado farinda

Materialo ja troviĝas pri ĉi tio, sed pli definitiva analizo restas ankoraŭ farenda. Ne eblas scii anticipe kiuj kategorioj de verboj estos troveblaj kaj kiuj pruviĝos valoraj, kaj ĝis kiu grado eblis klare enkategoriigi ĉiujn verbojn. Esploravenuoj estus:

- Verboj kun du-transitiveco: fumi, pasi (laŭ PIV transitiva uzo estas arĥaika, sed tio dubeblas), afekti, apologii ktp.
- Verboj kies transitiveco ŝanĝiĝis de post la kreo de Esperanto: apostati (ntr en PIV 1984, sen indiko kaj sen ekzempliga frazo en PIV 2002).

- Verboj kiuj naskiĝis en la lastaj 30 jaroj: ambli (ntr.) ne ekzistis en PIV 1984, ekzistas en 2002; abandoni (ne en PIV 1984, jes en PIV 2002 sen transitiv-indiko), asembli (komputika verbo, do ne en 1984, jes en 2002)
- Verboj luktantaj por ekzisti, ekzemple: arĉi instrumenton, azeni (ĉar notita estas azenigi), satiri iun, (ĉar neniu verbo entute ekzistas el tiu radiko oni havas neniun elekton ol satirigi prezidenton.)
- Verboj, kiuj fakte ekzistas en reala uzo, sed ne estas notitaj en PIV: aŭspicii -ion.
- Verboj foje aktivaj, foje stataj: kredi, scii, (ĉu fakto sciiĝas, aŭ mi sciiĝas pri ĝi?) kaj timi (Jen transitiva verbo, kiu ne kondukas same kiel pli aktivaj transitivaj verboj: Ekzemple, mi batas iun, sekve tiu batiĝas. Sed se mi timas iun, tiu ne timiĝas – male, mi timiĝas. Do timiĝi ≈ ektimi, kaj ≠ esti timata. La verbo kondukas kvazaŭ en kategorio 2 kaj ne 4.)
- Verbo-grupoj utilaj en instruado, (ekz. transitivaj: perdi, bezoni, serĉi, trovi... kaj netransitivaj: stari, sidi, paŝi, kuri, naĝi...).
- Verboj transitivaj sed ofte uzataj absolute aŭ prepozicie: ekz. helpi, abdiki, aludi, amori... ‘Tio ne helpas.’ ‘Mi helpos al vi’. Ktp.
- Verboj transitivaj kies rekta objekto estas deklarita nur en difinitaj kunteksto, ekz. ‘La infanoj ludas en la ĝardeno’ sed ‘Li ludas violonon’, ‘Ŝi ludas futbalon.’
- Verboj transitivaj kies rekta objekto estas preskaŭ ĉiam deklarita, ekz. bati -on... .
- Verboj ekzistantaj kun aktiva signifo, por neverbaj radikoj, ekz. ‘trui’, ‘diplomi’ kaj ‘loki’... Ekzistas surprize multaj el tiuj – eble la kvarono de ĉiuj verboj. Kiel jam dirite, tio gravas, ĉar la nura ekzisto de verbo superregas la regulojn por la radiko-klaso en la apliko de -ig- kaj -iĝ-.
- Verboj kun du samsignifaj formoj: apreci/aprezi, aboli/abolicii. Verboj kun du parencaj formoj, ne tute samsignifaj: pesi/pezi.
- Verboj netransitivaj, kiuj tamen havas registritan -iĝ- formon; ekz. mortiĝi, akordiĝi, antaŭiĝi, antaŭkuriĝi, kiujn la parol-komunumo malofte uzas, eble instikte sentante ke ili ne sekvas la kutiman verbo-skemon de la lingvo.
- Kontraŭatendaj transitivecoj, ekz. ‘bezoni’ por italoj, ‘komenci’ por hispanlingvanoj (kaj aliaj), ‘pasi’ por anglalingvanoj (krom se ili arĥaikemas), ‘ŝati’ por japanoj, ‘havi’ por hungaroj kaj ‘ruli’ por ĉiu krom certa fin-19-jarcenta fumeginto.

Tia analizo formas defion por estontaj gramatikemuloj, edukistoj kaj lerniloverkontoj.

## Resume

Ni komence distingis inter la formala gramatiko kaj la didaktika gramatiko; tio estas la pure gramatikaj elementoj aranĝitaj en optimume instruebla vicordo, en didaktika ŝtuparo, kiu inkluzivas eblojn ne nur kompreni la elementojn, sed kapabli uzi ilin – kio postulas multan ripetadon kaj uzadon en malsamaj komunikaj kunteksto. Ni konstatis ke tiu ŝtuparo devas dispecigi la materialon en digesteblajn unuojn, kun provizo por ekzercado, firmigo kaj la uzado de elementoj ne nur en izolo sed ankaŭ kombinitaj. Ni esploras didaktikajn ŝtupojn en aliaj lingvoj, kaj kiel ili formiĝis en Esperanto, konstatante ke ĉe nia lingvo oni havas vastan kaj malmulte ekspluatatan liberecon en la vicordigo de la materialo. Ni mallonge esploris dulingvajn lernmodelojn, konkludinte tamen, ke en la nuntempa grandmonda lingvoinstruado, cellingvaj situaci-komunikaj modeloj superregas. Ni konstatis, ke nia logika Esperanto tamen prezentas unikajn malfacilaĵojn kaj ni fine esploris du el tiuj. Kiel lasta paŝo, ni identigis avenuojn por estonta esplorado.

## Bibliografio

- Kalocsay K., Waringhien G., Plena Analiza Gramatiko, Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 1980.
- Bertilo Wennergren, Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, ELNA, El Cerrito. 2005. Rete alirebla.
- Irena Szanser, Teorio kaj Praktiko de Lingvo-Instruado, ILEI, Budapeŝto. 1992.
- Manlibro pri Instruado de Esperanto. 13 aŭtoroj. Espero / ILEI, Partizánske / Hago. 2006 (repr).
- Stefan MacGill, Tendaraj tagoj, volumoj 2 kaj 3, Budapeŝto, UEA/ILEI, 1994, 1997.
- Stefan MacGill, Artikolserio en *Eventoj* 138-146, dec 1997 – apr 1998: ‘Niaj lerniloj – kiaj?’. Unuopaj titoloj: Kial cel-lingvaj lerniloj?, Situacioj kaj temoj, Situacioj kaj gramatiko, Ĉu malfacila lingvo?, Verboj podio-centren, Verboj en siaj kuntekstoj, Kiaj lerniloj estonte?. Trovebla ĉe <[www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)>.
- Kovács Márta (red.) Esperanto de Nivelo al Nivelo. Lingva ekzameno *Origo*. ITK, Budapeŝto, 2009.
- Rudolf Rakuša, Metodiko de la Esperanto-Instruado, UEA, Roterdamo, 1991.
- Bernard Golden. Komplika Transitiveco en Esperanto. Tri-parta artikolo en Internacia Pedagogia Revuo, 1995.
- Christer O, Kiselman. Transitivaj kaj Netransitivaj Verboj en Esperanto, Prelego en Prago, 1994 ĉe la Kolokvo de la Akademio de Esperanto. 20 paĝoj.
- Marcel Leereveld, Transitiveco kaj netransitiveco de verboj. Reta artikolo ĉe <<http://members.fortunecity.co.uk/eskruco/022/13-10.html>>

# Neŭtrona difrakto: Aplikoj al esplorado de nanomaterialo



## Orlando E. Raola

Usonano (1955). Studis kemion kaj juron en Havano, Kubo. Elmigris al Usono en 1994, kie li daŭre studis kaj doktoriĝis pri Kemio en la Universitato de Kalifornio, Santa Barbara, 2005. Lia esplorkampo estas kemie produktitaj duonkondukaj nanomaterialoj per uzo de plej diversaj teknikoj, i.a. neŭtrona difrakto. Nuntempe instruas kemion ĉe Santa Rosa Junior College (du-jara universitato). Prelegis en IKU en la UK en Gotenburgo (2003).

## Resumo

Neŭtrona difrakto troviĝas inter la plej utilaj iloj por studado de la strukturo kaj ecoj de materialoj kaj per ĝi sciencistoj kapablas solvi problemojn tre malfacile aŭ neeble trakteblajn per konkurencaj teknikoj, specife ikso-radia difrakto. Ĉar neŭtronoj interagis ne nur kun atomoj sed ankaŭ kun ties magnetaj momantoj, studado de magnetaj materialoj estas aparte sukcesa per neŭtrona difrakto. Novaj multe pli intensaj neŭtronaj fontoj kaj rapidegaj komputiloj permesas nun apliki tiun ĉi teknikon al karakterizado de materialoj kun sufiĉe malmulta kristala ordo, ekzemple nanomaterialoj. Eksperimentoj plenumitaj ĉe la neŭtrona laboratorio de Los Alamos (Usono) ebligis al la aŭtoro eltrovi la distribuojn de distancoj apartenantaj al atomaj paroj en specimenoj de nanopartikoj. Tiaj distribuoj estas utiliaj por scii pri la grandeco de nanokristaloj kaj pri la influo de dopantaj jonoj sur la fizikaj ecoj de la studataj materialoj.

## Neutron and x-ray diffraction: application to the study of nanocrystalline materials

### Summary

Neutron diffraction is one of the most useful techniques in the study of the structure and properties of materials. It provides scientists with a tool capable of solving problems that prove extremely difficult or even impossible to tackle using competing methods, especially x-ray diffraction. Since neutrons interact not only with atoms but also with their magnetic moments, neutron diffraction is particularly suitable for the study of magnetic materials. The availability of new high-intensity neutron sources and high-speed computers opened up the possibility of applying this technique to the study of low-crystallinity materials, e.g. nanomaterials. Experimental work carried out by the author at the Los Alamos neutron diffraction facility (Los Alamos, NM, USA) yielded the pair distribution functions in samples of nanoparticles. These distributions can be used to calculate the size of the nanocrystals and the effect of doping ions on their physical properties.



## **La diffracción de neutrones: aplicaciones en la investigación sobre los nanomateriales**

### **Resumen**

La diffracción de neutrones constituye uno de los instrumentos más útiles para el estudio de la estructura y las características de los materiales y permite a los científicos resolver problemas muy difíciles o incluso imposibles de tratar con técnicas concurrentes, especialmente con la diffracción de rayos X. Debido a que los neutrones interactúan no solo con los átomos sino también con los momentos magnéticos de estos, el estudio de los materiales magnéticos mediante la diffracción de neutrones resulta particularmente fructífero. De nuevas fuentes de neutrones mucho más intensas y de ordenadores ultrarrápidos se permite ahora aplicar esta técnica a la caracterización de materiales con un orden cristalino suficientemente bajo, como los nanomateriales. Los experimentos realizados en el laboratorio de diffracción de neutrones de Los Alamos permitieron al autor descubrir la distribución de las distancias entre pares de átomos en muestras de nanopartículas. Estas distribuciones son útiles para calcular el tamaño de los nanocristales y la influencia del dopado con iones sobre las propiedades físicas de los mismos.

## **La diffracción de neutrones y de rayos x aplicadas al estudio de materiales nanocristalinos**


### **Resumen**

La diffracción de neutrones es una de las técnicas más útiles para el estudio de la estructura y propiedades de los materiales. Su uso permite a los científicos resolver problemas que resultan muy difíciles y hasta insolubles cuando se aplican otros métodos afines, especialmente, la diffracción de rayos x. Como los neutrones interactúan no solo con los átomos, sino también con los momentos magnéticos de los mismos, el uso de los neutrones para el estudio de materiales magnéticos es especialmente provechoso. Las nuevas fuentes de neutrones de alta intensidad y los ordenadores ultrarrápidos permiten aplicar ahora esta técnica a la caracterización de materiales con poco ordenamiento cristalino, por ejemplo, los nanomateriales. Los experimentos realizados en el laboratorio de diffracción de neutrones de Los Alamos (Nuevo México; EE.UU), permitieron al autor encontrar la distribución de las distancias entre pares de átomos en muestras de nanopartículas. Estas distribuciones son útiles para calcular el tamaño de los nanocristales y la influencia del dopado con iones sobre las propiedades físicas de los mismos.

# Neŭtrona kaj ikso-radia difrakto: Aplikoj al esplorado de nanomaterialoj

## 1. Enkonduke


Kadre de jam plurjarcenta serĉado de ĉiam pli profunda kaj akurata naturoscio, sciencistoj zorge klopodas plibonigi siajn ilojn. Fizikistoj kaj kemiistoj esploras la strukturon de materio je atoma kaj molekula skalo. Diversaj teknikoj evoluis dum la lastaj du jarcentoj, kiuj ade plibonigas niajn bildojn kaj modelojn rilatajn al la plej fajnaj detaloj de atomoj, molekuloj kaj iliaj tridimensiaj aranĝoj, solidaj kristaloj.



*Bildo 1: Grandeco-skalo de diversaj sistemoj nuntempe esplorataj de sciencistoj*

Inter la fizikaj fenomenoj plej uzataj tiucele troviĝas difrakto/disradiado de ikso-radioj kaj de neŭtronoj.

Ikso-radioj estas elektromagnetaj ondoj, samkiel videbla lumo, ultraviolaj kaj infraruĝaj radioj, kosmaj kaj  $\gamma$ -radioj, mikro- kaj radioondoj. Karakterizaj trajtoj de ĉiuj ĉi ondoj estas ondolongo ( $\lambda$ , la distanco inter du sinsekvaj suproj), frekvenco ( $\nu$ , kiom da ondoj trapasas punkton en tempunuo) kaj rapideco de veturado.




Bildo 2: Ondoj kaj ondolongo

Ĉiuj elektromagnetaj ondoj veturas samrapide en vakuo – temas pri fundamenta konstanto de naturo  $c$ . Ondolongo kaj frekvenco estas inverse proporciaj, kaj  $c$  estas ĝuste la proporcia konstanto:

$$\lambda = \frac{c}{\nu}$$


## 2. Interfero kaj difrakto

Kiam ondoj samlongaj kombiniĝas, depende de ilia relativa pozicio aŭ **faza diferenco**, ili povas interagi adicie aŭ subtrahe. La rezulto estas **interfero**.




Bildo 3: Fortiga kaj nuliga interferoj dependas de la faza diferenco

Kiam ondo renkontas obstaklon (ekzemple, fendetojn en la unua ekrano), la novaj ondoj kiuj formiĝas malantaŭ la fendetoj interagas interfare, kio kreas brilajn kaj malbrilajn striojn sur la riceva ekrano. Tiu ĉi fenomeno nomiĝas **difrakto**.



Bildo 4: Apero de difrakta konturo kiam ondoj renkontas obstaklon



Bildo 5: Geometria aranĝo de elementoj por trovi la distancon inter la obstakloj en difraktokrado

Necesa kondiĉo por difrakto estas ke la ondolongo devas esti similmesura kiel la distanco inter la fendetoj, ĝenerale inter la obstakloj trafitaj de la ondoj. Se ni konas la ondolongon, per mezurado de la distanco inter la ekrano kaj inter la brilaj kaj malbrilaj regionoj, ni povas akiri informon pri la distanco inter la fendetoj. Kiam ondojn realsendas obstakloj dismetitaj je distanco  $d$ , la ondoj trairas malsimilajn distancojn. Nur kiam la diferenco inter la distancoj estas integra oblo de la ondolongo la intenso de la ondoj kombiniĝas kaj oni vidas brillan punkton. Aliflake, la ondoj nuligas unu la alian kaj oni vidas malluman regionon.


En la ekzemplo montrita sur la bildo 5, se la ondolongo de la lasera radio estas  $\lambda = 532 \text{ nm}$ ,  $L = 1000 \text{ mm}$  kaj  $H = 302 \text{ mm}$ , oni povas kalkuli  $\sin \theta$  jene:

$$\sin \theta = \frac{H}{\sqrt{H^2 + L^2}} = 0.2891$$

El kio rezultas

$$d = \frac{n\lambda}{\sin \theta} = \frac{1 \times 0.532 \mu\text{m}}{0.2891} = 1.84 \mu\text{m}$$

(La fabrikanto reklamas  $d = 1.84 \mu\text{m}$ ).




Bildo 6: Bragg-kondiĉo por difrakto kreita de atomtavoloj en kristalo.

Similan matematikan traktadon ni povas apliki al elektromagnetaj ondoj realsenditaj de la zorgeme ordigitaj atomoj aŭ molekuloj de kristalo. La taŭga ondolongo por tia difraktado apartenas al ikso-radioj. Sur la bildo 6 oni vidas ke la diferenco inter la distanco traŭrita de radioj reflektitaj el apudaj atomtavoloj estas  $2d \sin \theta$ . Por ke okazu plene plifortiga interfero en difrakto, la jena rilato devas esti plenumita:

$$2d \sin \theta = n\lambda$$


Temas pri la Bragg-leĝo, malkovrita de du britaj sciencistoj (patro kaj filo) William Henry kaj William Lawrence Bragg en 1912 (Nobelpremio pri Fiziko 1915).

En kristalaj materialoj, la diversaj eblaj atomtavoloj produktas difraktajn maksimumojn, kio permesas eksperimente mezuri la distancojn inter ili. Krome, per studado de la relativa intenso de la maksimumoj, eblas dedukti la relativajn atomajn poziciojn en la kristalo. Bildo 7 montras la difraktan desegnaĵon de kristalo kolektita per aplikado de la Laue-metodo.




*Bildo 7: Laue-metodo kaj fotita difraktogramo de kristalo.*

Se la haveblaj specimenoj estas pulvorigitaj, ankoraŭ eblas kolekti sufiĉe utilan informaron pri la strukturo pere de ikso-radia difrakto. Estas tre malfacile en tiu kazo establi la relativajn poziciojn de la atomoj, sed la ceteraj karakterizoj de la kristalo estas facile dedukteblaj de la pulvora difraktogramo. La bildo 8 montras modernan difraktometron kun elektronika registrado de la difraktogramo kaj sekve troviĝas ikso-radia difraktogramo de natria klorido ( $\text{NaCl}$ ). Ĉiu maksimumo korespondas al aparta atomtavola familio, identigita per tri numeroj, la tielnomataj Miller-indeksoj de la familio.



*Bildo 8: Difraktometro kun aŭtomata registrado por pulvorigitaj specimenoj*



*Bildo 9: Ikso-radia difraktogramo de natria klorido*

### 3. Ikso-radioj kaj neŭtronoj

Ikso-radioj montras difinitajn avantaĝojn por la studado de la strukturo de kristaloj:

1.  $\lambda$  similgranda kiel la interatomaj distancoj.
2. Ege brilaj ikso-radiaj fontoj.

Sed ankaŭ troveblas malavantaĝoj:

1. Radiado estas absorbita.
2. Malfacile trovi pozicion de malpezaj elementoj, disradia potenco malfortiĝas por tiuj elementoj.
3. Damaĝo de specimenoj fare de la radiado.
4. La efiko de magneta ordo en la specimeno malfacile observebla.

Por eviti tiajn malavantaĝojn, oni ekuzis alitipajn radiojn. Fakte temas pri fluo de atomoj nomataj **neŭtronoj**. Neŭtronoj estas fojfoje elĵetitaj el atomkernoj kiam ili spontane disiĝas. Analizinte la rezultojn de eksperimentoj faritaj en la 1920aj jaroj, la brita fizikisto James Chadwick sugestis la ekziston de partiklo elektre neŭtrala, kun maso tre proksima de la maso de protono. La ekzisto de tia partiklo helpus grandskale klarigi rezultojn kiujn oni preskaŭ neniel kapablis ekspliki se tia partiklo tute ne ekzistus. Li vane serĉis ĝin dum deko da jaroj, sed en 1932 li fine sukcesis pruvi la ekziston de **neŭtronoj**.

Laŭ la hipotezo proponita de Louis de Broglie en 1924, ĉiuj partikloj veturantaj kun rapideco  $v$  estas ligitaj al ondo kun ondolongo  $\lambda$ . Ambaŭ kvantoj interrilatas laŭ la formulo


$$\lambda = \frac{h}{mv}$$

kie

$$h \quad \text{Plank-konstanto} \quad 6.626068 \times 10^{-34} \text{ J} \cdot \text{s}$$

$$m \quad \text{maso de la partiklo} \quad 1.674927211 \times 10^{-27} \text{ kg (neŭtrono)}$$

Se tiu ĉi hipotezo estas valida, tiam eblas observi interferon kaj difrakton inter materiaj ondoj. Unue, Clinton J. Davison kaj Lester Germer kaj samtempe kaj sendepende George P. Thomson observis difrakton de elektronoj traŭrantaj metalajn kristalojn en 1927. Ernest Wollan, R. B. Sawyer kaj Clifton Shull kolektis la unuan difraktan registradon de natria klorido (NaCl) ĉe la reaktoro Clinton Pile, en Oak Ridge (TN, Usono) 1946.



Bildo 10: Unua neŭtrona difraktogramo de natria klorido



La neŭtronoj produktitaj dum urania fisio en reaktoro havas energion proksimume 0.32 pJ. Ĉar temas pri kineta energio, ilia rapideco devas esti

$$v = \sqrt{\frac{2E_k}{m_n}} = 1.96 \times 10^7 \text{ m}\cdot\text{s}^{-1}$$

Laŭ la De Brogile esprimo, tio korespondas al ondolongo

$$\lambda = \frac{h}{mv} = 0.00202 \text{ pm}$$

Por esti utilaj por kristala difrakto neŭtronoj devas esti malrapidigitaj pere de kolizioj kontraŭ atomoj (grafito, akvo, likva hidrogeno) ĝis ilia rapideco generas ondolongon similgrandan kiel interatomaj distancoj en kristaloj, (proksimume 100 pm).

La ekvilibrataj neŭtronoj havas energion samgrandan kiel tiu de la atomoj en la moderato, kiu siavice dependas de ties temperaturo laŭ la esprimo

$$E = \frac{3}{2} k_B T$$

kie

$$k_B \quad \text{Boltzmann-konstanto} \quad 1.3806504 \times 10^{-23} \text{ J}\cdot\text{K}^{-1}$$

Pro tio, neŭtronoj de diversaj energiniveloj estas nomataj “varmaj”, “moderaj” kaj “malvarmaj”.


| Neŭtronoj | Energio (pJ) | Temperaturo (K) | $\lambda$ (pm) |
|-----------|--------------|-----------------|----------------|
| Malvarmaj | 0.016 – 1.60 | 1 – 120         | 400 – 3000     |
| Moderaj   | 0.80 – 16.0  | 60 – 1000       | 100 – 400      |
| Varmaj    | 16.0 – 80.0  | 1000 – 6000     | 40 – 100       |

#### 4. Ikso-radia kaj neŭtrona difrakto por studado de nanokristaloj

Nanokristaloj estas strukturoj kie kristala ordo etendiĝas proksimume inter 1 – 100 nm. Tia limigita kristaleco efikas mezureblan ŝanĝon sur la fizikaj kaj kemiaj ecoj de la substancoj, interalie ĉar la rilato inter la nombro de surfacaj atomoj kaj tiuj ene de la kristalo multe pligrandiĝas.

Se oni komparas la difraktogramon de nanokristaloj al tiu de bone kristalizita specimeno, oni tuj povas observi la plilarĝigon de la diversaj maksimumoj (Scherrer-larĝiĝo). Ju malpli grandaj la nanokristaloj, des pli larĝaj la maksimumoj, tiel ke oni povas praktike mezuri la grandecon de la nanokristaloj laŭ la larĝeco de la detaloj en difraktogramo.

La bildo 11 montras ikso-radian difraktogramon de zinka oksido en la formo de nanokristaloj. Evidentas, laŭ komparo kun la antaŭe montrita difraktogramo de larĝaj kristaloj, ke temas ja pri nanostrukturo. La diametro de la nanokristaloj kalkulita per prilaboro de tiu larĝeco estas 28 nm.




Bildo 11: Ikso-radia difraktogramoj de nanokristaloj el zinka oksido.

## 5. Distribuo de distancoj inter atomaj paroj

La utileco de la ĵus priskribita difrakto malkreskas kiam la tiel nomata “longdistanca ordo” malpligrandiĝas, tiel ke por nanokristalaj sistemoj pli konvenaj metodoj estas dezirindaj. La apero de rapidaj surtablaj komputiloj ekde la 80aj jaroj ebligis enkondukon de programoj kiuj aplikas sufiĉe komplikajn algoritmojn por eltiri pli da informoj el la difraktogramoj. Por apliki tiujn novajn metodojn, oni ja bezonas ege altkvalitajn difraktogramojn, ne haveblajn el laboratoriaj ikso-radiaj difraktometroj nek de neŭtrona difrakto uzanta reaktorajn neŭtronojn.


Multe pli intensa radiado estis bezonata, kaj ĝi estas havebla de sinkrotronoj por ikso-radioj kaj de diserigaj neŭtronaj fontoj por neŭtronoj.

En la diseriga neŭtrona generatoro protonoj estas akcelitaj en ciklotrono ĝis la bezonata energio kaj poste la protona fluo estas direktita al metala celo, kie ĝi amase disbatas neŭtronojn de la atomoj en la celo. Tiuj neŭtronoj aperas en pulsoj, male kiel tiuj de la reaktoroj, kiuj elfluas konstante. Post reduktado de la energio al konvenaj valoroj por la difrakta laboro, la neŭtronoj atingas la specimenojn kaj poste estas analizitaj de la ĉirkaŭantaj detektiloj. Bildo 12 montras skemon de la eksperimenta aranĝo en la Nacia Laboratorio de Los Alamos kie la rezultoj ĉi tie raportitaj estis akiritaj.




*Bildo 12: Altrezolucia neŭtrona difraktometro*

La specimenoj estis nanokristaloj el pura zinka oksido kaj el zinka oksido dopita je  $Mn^{2+}$  jonoj je du malsimilaj molfrakcioj, kaj ili estis komparitaj kun zinka oksido en formo de grandaj kristaloj. Unue oni akiras la difraktogramojn, kiuj poste estis ellaboritaj uzante la programojn GSAS+EXPGUI (Ĝenerala Sistemo por Analizo de Strukturoj kaj Eksperimenta Grafika Uzanto-Interfaco). La programoj legas la detalan difraktogramon, kaj uzante teknikojn de furiera transformo, eligas funkcion kiu rilatigas la probablecon trovi paron da atomoj kun ilia distanco internuklea, la tiel nomata par-distribua funkcio, aŭ PDF.



Bildo 13: PDF de zinka oksido (a) grandaj kristaloj; (b) nanokristala sen dopanto, (c) kun Mn dopado je niveloj  $x = 0.020$  (d) kun Mn  $x = 0.032$



Bildo 14: Ero de zinka oksido nanokristala montranta la plej oftajn atompairojn

El atenta ekzameno de la PDF en bildo 13, ni povas konstati, ke por kristaloj de zinka oksido, la probableco trovi atomojn je diversaj distancoj estas pli malpli la sama tra la tuta gamo de distancoj studitaj. Tamen, kiam ni analizis nanokristalojn, ni tuj observas, ke preter certa distanco, la probableco trovi atomojn je tiuj distancojn rapide falas. Tio estas indiko de la spacolimiĝo en la nanokristalo, malfacile observebla pere de aliaj teknikoj.


El tiuj rezultoj mi sukcesis konstrui modelon de la zinkaj nanokristaloj, kiu montras la plej oftajn parojn, montritan sur bildo 14.

## 6. Magnetaj ecoj de dopitaj nanokristaloj


Kroma avantaĝo de neŭtrona difrakto venas el la fakto, ke neŭtronoj havas kapablon interagi kun magnetaj strukturoj, ili ja kondukas kiel etaj magnetoj, aŭ alivorte, ili havas propran spinmomanton. Pro tiu kialo, kiam temperatura malpliigo kaŭzas ekeston de magnetaj ordigoj ĉe materialo, novaj maksimumoj aperas ĉe la neŭtrona difraktogramo.

Por tiu ĉi studo, ni enkondukis magnetajn jonojn (dopantojn) en nanokristaloj de zinka oksido. La PDF-oj kolektitaj el la dopitaj nanokristaloj sugestas ke dopado okazis per anstataŭigo kaj ne per inkludo en intersticoj, sekve el la fakto, ke ne aperas novaj distancoj en la PDF. Ankaŭ montriĝas ke nur maksimumoj kiuj korespondas al distancoj anjono-katjono estas aliigitaj en la dopitaj specimenoj, dum tiuj kiuj korespondas al distanco anjono-anjono aŭ katjono-katjono ne ŝanĝiĝis.

Kiam la specimenoj estis malvarmigataj ĝis 15 K, la neŭtronaj difraktogramoj ne montris aperon de novaj maksimumoj, kio ekskludas la aperon de magnetaj ordigoj. Similaj studoj ne povis trovi magnetan ordon eĉ je 5 K malvarmo.



Bildo 15: Neŭtrona difraktogramo de dopita zinka oksido nanokristala je normala kaj malalta temperaturo



Bildo 16: PDF de dopita zinka oksido nanokristala. La sagetoj signas la maksimumojn kiuj ne ŝanĝiĝas pro la enkonduko de dopantaj jonoj

## 7. Konkludo kaj plustudado

En tiu ĉi studo ni pruvis la eblecon apliki neŭtronan difrakton kaj pli specife altrezolucian totalan difraktan instrumenton (NPDF) por studado de la loka strukturo ĉe duonkondukiloj. La plej grava parto de mia doktoriga esplorado rilatis al nanokristaloj el kadmia selenido. Bedaŭrinde, mi ne povis apliki la evoluigitan teknikon pro tio ke en natura kadmio, 12.22% el la atomoj apartenas al izotopo Cd-113. Tiutipaj atomoj sorbas neŭtronojn 5000-oble pli efike ol zinko aŭ la ceteraj izotopoj de kadmio. La solvo ĉi-kaze estus la preparado de nanokristaloj el kadmio senigita je Cd-113, sed tiu propono postulis grandegan moninveston, ankaoraŭ ne pravigeblan por la studo de tiu ĉi materialo. Alia varianto pli favora estus apliki la PDF-teknikon al difraktogramoj produktitaj pere de ikso-radioj en unu el la disponeblaj sinkrotronaj maŝinoj dediĉitaj al difrakta laboro.

# Medicinaj sistemoj en interkultura dialogo: vojoj al plureco kaj tutmondiĝo



## **José Antonio Vergara**

Ĉiliano (1962), kuracisto, specialiĝinta pri publika sano/epidemiologio. Laboras kiel ŝtata fakulo en regiona Sanministeria oficejo kaj instruas historion de la medicino kaj antropologion de la sano en la Universidad San Sebastián (Puerto Montt, Ĉilio). Interesiĝas pri historio kaj sociologio de la scienco, interlingvistiko kaj daŭripova evoluo, kaj (kun)aŭtoris diversajn publikaĵojn pri sia fako. E-medicine li estas DM kaj estrarano (ekde 2007) de UEA pri faka kaj scienca agado. Prelegis dufoje en IKU (1998, 2007), kaj i.a. en la centjariĝa ISAE-festkonferenco (2006) kaj en Simpozio pri nur-angla scienco en multlingva mondo, organizita de Esperantic Studies Foundation kadre de la AAAS-jarkonferenco (Boston, 2008). Reĝisoris la kongresan temon en la UK Florenco (2006) kaj iniciatis la Serion “Sciencia Penso” aŭspiciatan de UEA.

## **Resumo**

Tra la homa historio, la diversaj socioj evoluigis siajn proprajn komprenojn pri tio kio estas sano kaj kio ne, kiuj estas la kaŭzoj de tiuj statoj/procezoj, kiel klasi la diversajn kondiĉojn de sanmanko kaj kiel diagnozi/kuraci la homojn, kiuj faru tion, per kiuj rimedoj.

Tiuj scioj kaj praktikoj, koheraj inter si kaj al la koncerna kulturo, estis ofte objekto de konfronto, reciproka influo aŭ adopto okaze de la diverstipaj renkontiĝoj kaj fluoj inter malsimilaj socioj, kun interesaj spertoj de interkultura dialogo kaj eĉ sintezo. Ekz. la tibeta medicina sistemo originis antaŭ pluraj jarcentoj surbaze de elementoj el la barata, greka, persa, ĉina kaj tibet-indiĝena medicinoj, kune kun budhisma filozofio; la islama civilizo ludis esencan rolon en la Mezepoka prezervado de la klasikgreka medicina tradicio per tradukoj en la araban kaj aliajn lingvojn; kaj dum la konkera epoko en Ameriko la hispanaj kuracistoj atente registris la kuracajn plantojn tiam uzatajn de la indiĝenoj.

La science bazita medicino aŭ biomedicino, unue evoluinta en Okcidento, disvastiĝis kune kun la koloniaj fortoj fine de la 19-a jarcento kaj plene tutmondiĝis dum la 20-a, ofte ekskludante aŭ influante aliajn sistemojn. Neatendite tamen, diversaj kompletigaj kaj alternativaj medicinoj fariĝis modaj eĉ en riĉaj okcidentaj landoj, kaj kompleksaj fenomenoj tiaj kia la amasa migrado de homoj al tute aliaj lingvaj kaj kulturaj medioj kreis la bezonon de antropologie konscia aliro, defende al la rajto je sano de ĉiuj homoj, en kulture plureca mondo.

## **Medical systems in an intercultural dialogue: ways to plurality and globalisation**

### **Summary**

Throughout human history, different societies have developed their own understanding of what health is, and what it is not, what the causes are of those states and processes, how to classify the various conditions of ill health, how to diagnose and cure people, who should do it, and with what means.

That knowledge and those practices, which are consistent with each other and with the culture concerned, have often been the subject of confrontation, mutual influence or adoption in the course of the various types of encounters and flows between different societies, with interesting experiences of intercultural dialogue and even synthesis. For example, the Tibetan

medical system originated several centuries ago, based on elements from Indian, Greek, Persian, Chinese and indigenous Tibetan medicines, together with Buddhist philosophy; Islamic civilisation played an essential part in the preservation during the Middle Ages of the classical Greek medical tradition through translation into Arabic and other languages, and during the conquest period in America Spanish doctors carefully recorded the medicinal plants used at that time by the natives.

Science-based medicine or biomedicine, first developed in the West, was disseminated along with the colonial forces at the end of the 19th century and was fully globalised during the 20th, often excluding or influencing other systems. Unexpectedly, however, various complementary and alternative medicines became fashionable even in rich Western countries, and complex phenomena such as the mass migration of people to completely different linguistic and cultural surroundings created a need for an anthropologically aware approach, in defence of everyone's right to health in a culturally diverse world.

## **Les systèmes médicaux dans le dialogue interculturel: voies vers la pluralité et la mondialisation**

### **Résumé**

A travers l'histoire humaine, les diverses sociétés ont fait évoluer leur propre compréhension de ce qu'est la santé et de ce qu'elle n'est pas, de ce que sont les causes de ces états et processus, de la façon de classer les différentes conditions du défaut de santé et de la façon d'établir un diagnostic et de soigner les gens, de qui doit le faire, et par quels moyens.

Ces connaissances et ces pratiques, cohérentes entre elles et avec la culture concernée, furent souvent l'objet de confrontation, d'influence réciproque ou d'adoption à l'occasion des rencontres de toutes sortes et des échanges entre sociétés différentes, avec des expériences intéressantes de dialogue interculturel et même de synthèse. Par exemple, le système médical tibétain s'est constitué il y a plusieurs siècles sur la base d'éléments issus des médecines indienne, grecque, perse, chinoise et tibétaine indigène, assortis de philosophie bouddhiste; la civilisation islamique a joué un rôle essentiel dans la préservation, au Moyen Age, de la tradition médicale de la Grèce antique grâce à des traductions en arabe et en d'autres langues; et pendant l'époque des conquêtes en Amérique, les médecins espagnols ont soigneusement répertorié les plantes médicinales alors utilisées par les indigènes.

La médecine basée sur la science, ou biomédecine, qui s'est d'abord développée en Occident, s'est ensuite répandue avec les forces coloniales à la fin du 19ème siècle et s'est complètement mondialisée au cours du 20ème, en excluant ou en influençant souvent les autres systèmes. De façon inattendue cependant, diverses médecines complémentaires et alternatives se sont popularisées jusque dans les pays riches occidentaux, et des phénomènes complexes comme la migration massive d'hommes vers de tout autres milieux linguistiques et culturels ont créé le besoin d'un accès anthropologiquement conscient, pour la défense du droit à la santé pour tous les hommes, dans un monde culturellement pluriel.

## **Los sistemas médicos en diálogo intercultural: caminos al pluralismo y la globalización**

### **Resumen**

A través de la historia humana, las diversas sociedades desarrollaron concepciones propias acerca de qué es la salud y qué no, cuáles son las causas de esos estados o procesos, cómo



clasificar las distintas condiciones de falta de salud y cómo diagnosticar y tratar a las personas, quiénes lo hacen, usando qué recursos.

Esos saberes y prácticas, coherentes entre sí y con la cultura correspondiente, fueron con frecuencia objeto de confrontación, influencia recíproca o adopción en los distintos tipos de encuentro y flujos entre sociedades distintas, con experiencias interesantes de diálogo intercultural e incluso de síntesis. Por ejemplo, la medicina tibetana se originó hace varios siglos en base a elementos de las medicinas india, griega, persa, china e indígena, incluyendo filosofía budista; la civilización islámica jugó un rol esencial en la preservación de la tradición médica griega clásica mediante la traducción al árabe y otras lenguas; y durante la época de la Conquista, los médicos españoles registraron cuidadosamente las plantas medicinales entonces usadas por los indígenas en América.

La medicina basada en la ciencia o biomedicina, desarrollada inicialmente en Occidente, se difundió junto a las fuerzas coloniales a fines del s. XIX y se hizo plenamente global durante el s. XX, a menudo excluyendo o influyendo sobre otros sistemas. Sin embargo, en forma inesperada, diversas medicinas alternativas y complementarias adquirieron popularidad incluso en países ricos de Occidente, mientras que fenómenos complejos, tales como la migración masiva de personas a medios lingüísticos y culturas totalmente distintos, crearon la necesidad de una aproximación antropológicamente consciente, en defensa del derecho a la salud para todas las personas, en un mundo culturalmente plural.

# Medicinaj sistemoj en interkultura dialogo: vojoj al plureco kaj tutmondiĝo

## 1. Medicinaj sistemoj kiel kultura diverseco

Medicino estas universalulo de la homaj socioj. La koncepto amplekse difinas la sciaron kaj praktikaron en ĉiu ajn tradicio kies celo estas kuraci aŭ mildigi tion kion la homoj kaj fakuloj taksas esti suferado bezonanta zorgon (Janzen 2002: 292). Fakte, en ĉiu kulturo eblas rimarki modelojn de kredoj pri la kaŭzoj de malsano, normojn kiuj regas la decidon kaj pritakson de kuracado, socie legitimigitajn rolojn, potencorilatojn kaj spacojn de interago, instituciojn pri tio (Kleinman 1980: 24). Kiel kultura sistemo, ĉe ĝi distingeblas diagnoza kategoriaro pri sano kaj malsanoj, kulture signifaj sindromoj, etiologiaj interpretoj kiuj legitimigas kuracajn agojn, fakaj roloj eĉ karieroj, kaj grandega diverseco de kuracrimedoj kombinantaj simbolajn kaj praktikajn agojn por trakti la simptomojn aŭ iliajn agnoskitajn fontojn (Kleinman 1993: 15).

Tra la historio de la homaro, la konkretaj formoj de tiuj unuopaj elementoj kaj ilia interliga kohereco estis treege variaj, laŭ la diversaj epokoj, regionoj kaj socioj. Fakte la esplorado pri tiu aparta kulturkampoj naskis specialan disciplinan branĉon de antropologio. Unu el la kernaj konceptoj de medicina antropologio estas ĝuste tiu kiu nun interesas nin, nome la

scioj, kredoj, teknikoj, roloj, reguloj, valoroj, ideologioj, sintenoj, kutimoj, ritoj kaj simboloj kiuj interligas sin por formi reciproke interfortigan kaj subtenan sistemon. Tiu ĉi “vasta komplekso” (...) konstituas “*medicinan sistemon*”. La termino ampleksas la tutaĵon de la prisanaj scioj, kredoj, lertoj kaj praktikoj de la membroj de ĉiu homgrupiĝo. (Foster kaj Anderson 1978: 36).

La bunta diverseco de la socioj kaj iliaj kulturoj esprimiĝis do sur tiu ĉi aparta tereno de la homa fenomeno, kompreneble. La ekologia, kulturgeografia spaco de funkciado/etendiĝo de la respektivaj medicinaj sistemoj estas unu el la aksoj per kiu eblas klasigi ilin. Tiel, distingeblas (1) lokaj medicinaj sistemoj, (2) regionaj medicinaj sistemoj, kaj (3) kosmopolita medicina sistemo (Dunn 1976: 135).

La unua kategorio (*lokaj medicinaj sistemoj*) rilatas al indiĝenaj kaj popolaj medicinaj tradicioj, kiuj ekestis kaj ekzistas ĉe ampleksa gamo de “simplaj”, nmodernaj socioj, de nomadaj triboj, tra agrikulturaj socioj ĝis iuj kamparanaj komunumoj en kompleksaj socioj. Temas pri tre diversa, neformaligita aŭ neenkodigita sciaro kaj praktikaro nescribe sed parole transdonata intergeneracie. Oni enkondukis la terminon *etnomedicino* kiel ĝeneralan nomon por ĝi, dum ne plu uzatas la pli frua, misgvida termino “primitiva medicino”. La kuracadon laŭ la indiĝena kaj popola medicino plenumas diversaj tradiciaj fakuloj, kiel ekz. herbistoj, ostogustigistoj, akuŝistinoj, spiritaj divenistoj, ŝamanoj ktp. Afrika Spertularo difinis ke:

tradicia medicinisto estas persono kiun la komunumo en kiu ŝli vivas agnoskas kiel kompetentan por provizi sanprizorgon uzante tiel herbajn, bestajn aŭ mineralajn elementojn kiel aliajn metodojn bazitajn sur la kultura kaj religia fono kaj scioj, sintenoj kaj kredoj ekzistantaj en la komunumo koncerne al fizika, mensa kaj socia bonfarto kaj al la kaŭzoj de malsano kaj dispoveco (WHO 1976: 4).

Siaflanke, per la termino *regionaj medicinaj sistemoj* oni aludas malnovajn, grandajn medicinajn tradiciojn, kelkaze kun tri- aŭ kvarmiljara evoluo, disvastigitajn en relative larĝaj areoj, inter kiuj sin trovas la Ĉina Tradicia Medicino, Aĵurvedo, la araba-persa medicina sistemo Unani Tibbi, la Tibeta Medicino kaj aliaj. Iuj el ili estas ligitaj al longhistoriaj civilizoj kiel hinduismo, islamo, budaismo ktp. Ĉe ili konstateblas ke jam de jarcentoj ekestiĝis procezoj de klerulara enkodigo de iliaj respektivaj teoriaj bazoj, organiza formaligo de ilia instruado kaj provizado, kaj profesiigo de iliaj fakuloj.

La ***kosmopolita medicina sistemo*** estas tiu kies ontologian kaj epistemologian fundamentojn disponigas la vivosciencoj ekevoluintaj unue en Okcidento kadre de la scienca revolucio en la 16-a kaj 17-a jarcentoj. Ĝi tamen iĝis plene kaj sisteme sciencigita ekde la dua duono de la 19-a jarcento. Anstataŭ uzi la terminojn “okcidenta medicino” aŭ “moderna medicino” en la faka literaturo oni nomas ĝin biomedicino, pro ĝia kerna rilato al la biologiaj sciencoj. Kvankam ĝi fakte naskiĝis en Okcidento, per diversaj historiaj procezoj, kiujn ni poste mencias, ĝi fariĝis mondscale hegemonia, fakte tutmonde praktikata kaj prilaborata. Krom tio, en Okcidento ankaŭ originis aliaj, pli malfruaj medicinaj sistemoj, kiel homeopatio kaj kiropraktiko en la 18-a jarcento, kaj naturopatio fine de la 19-a jarcento. Simile, ne ĝustas atribui nur al ĝi la ŝanĝemon aŭ kreemon ligitan al la moderno, kontraste al aliaj tradicioj kiujn oni komplete mise kaj kliŝe taksus stagnaj, senŝanĝaj. La termino biomedicino do pli taŭgas.

Laŭ iom similaj kriterioj, alia aŭtoro proponis distingi inter 1) ***akumulantaj medicinaj sistemoj***, kun formaligitaj instruoj kiuj sinsekve akumuliĝas, malferme instruataj kaj vaste praktikataj laŭ sistemaj proceduroj (ekz. Aĵurvedo, tradicia ĉina medicino, biomedicino k.a.), kaj 2) ***svagaj medicinaj sistemoj***, en kiuj la medicinistoj ne komunikas publike siajn sciojn nek dividas ilin kun samspecaj agantoj, kio igas la sciaron fragmentita, nesistema kaj ofte plutenata sekrete de la fakuloj (ekz. ŝamanoj, magiaj medicinistoj) (Young 1983, citita de Sobo 2004: 7).

El la perspektivo de la moderno, kutime oni distingas, laŭ iliaj respektivaj koncepta fundamento kaj praktikaro, inter la buntege diversaj formoj de historie longdaŭra ***tradicia medicino*** (TM, do indiĝenaj, popolaj kaj grandcivilizaj medicinaj sistemoj de Afriko, Suda kaj Orienta Azio, Okcidenta Pacifiko, Ameriko), unuflanke, kaj la moderna ***biomedicino***, aliflanke. La Monda Organizaĵo pri Sano difinas tradician medicinon kiel

la sumon de la scioj, lertoj kaj praktikoj bazitaj sur teorioj, kredoj kaj spertoj evoluintaj en diversaj kulturoj, ĉu elkompreneblaj aŭ ne, uzataj tiel en la tenado de sano, kiel en la prevento, diagnozo, plibonigo aŭ kuraco de fizikaj kaj mensaj malsanoj (WHO 2000: 1).

Ekde la 1990-aj jaroj iĝis necese enkonduki eĉ trian kategorion (kompletiga kaj alternativa medicino), reference al nuntempa fenomeno, kiun konsistigas vasta gamo de sanprizorgaj praktikoj pli kaj pli utiligitaj, ĉefe en okcidentaj landoj, kiuj ne apartenas al la koncerna medicina tradicio nek al la reganta sansistemo de la respektiva land(ar)o (WHO 2002: 7). Iuj el tiuj KAM-praktikoj estas tute novaj, ekestigitaj en la evoluintaj landoj mem, foje lige al esoteraj, mistikismaj aŭ aliaj sintenoj kiuj reklamas sin tutecaj (“holistikaj”), kritike opoziciaj al tio kion oni nomas la “reduktisma oficiala scienco” kaj ties “konvencia medicino”. Aliaj estas fakte importitaj praktikoj el diversaj neokcidentaj medicinaj tradicioj, kiel ekz. akupunkturo, laŭdevene elemento el la tradicia ĉina medicino, sed tial ke enkondukita en la okcidentajn landojn, oni povus tie konsideri ĝin paralela medicina praktiko. El tiu aparta KAM-vidpunkto, kompletiga medicino estas kunuzata apud la “konvencia”, ekz. aromoterapio por helpi la resanigon de kirurgiita paciento, dum oni uzas alternativan medicinon anstataŭ “konvencian”, ekz. dieton por kancero anstataŭ kirurgion, radiadon aŭ kemioterapion preskribitan de iu “konvencia” kuracisto (NCCAM 2007: 1).

Dum iuj aŭtoroj kungrupigas TM kaj KAM en unu tutajon, kaj parolas do pri tradicia, kompletiga kaj alternativa medicino TKAM (ekz. Bodeker kaj Burford 2007), persone ni opinias ke temas pri inter si draste distingendaj fenomenoj, laŭ iliaj respektivaj estiĝo- kaj evoluprocezoj, kaj aparte laŭ iliaj trajtoj esti jen kulture signifohava kaj solidare disponigata rimedo ĉe homaj komunumoj, jen elemento de postmoderna medicina konsumismo. El la vidpunkto de kultura diverseco kaj daŭropova evoluigo, en tiu ĉi eseo ni ĉefe interesiĝas pri TM kiel kultura, nemateria heredaĵo de la homaj komunumoj. Kompreneble, ni agnoskas ke ja estas similaj aspektoj kiujn TM kaj KAM kundividas, kompare al la ontologia, epistemologia kaj teknologia bazoj de biomedicino. Ekz., koncerne la kuracmetodaron, oni povas kategorii ĉe TM kaj KAM inter medikamentaj terapioj (per herbaj, bestaj aŭ mineralaj produktaĵoj), kaj nemedikamentaj terapioj (ekz. akupunkturo, permana terapio, korpoekzercado kiel *qigong*

(ĉigongo) kaj jogo, balneoterapio kaj aliaj fizikaj, mensaj, spiritaj kaj menso-korpaj terapioj (WHO 2002: 7). En la jena tabelo eblas kontroli la ĉefajn kuracmetodojn de apartaj medicinaj sistemoj:

**Tabelo 1. Ĉefaj kuracaj teknikoj ĉe iuj TM kaj KAM**

|                          | indiĝenaj<br>medicinoj | ĉina<br>tradicia<br>medicino | Ajurvedo | Unani Tibba | naturopatio   |
|--------------------------|------------------------|------------------------------|----------|-------------|---------------|
| herboj                   | ●                      | ●                            | ●        | ●           | ●             |
| dieto, vivstilo          |                        | ●                            | ●        |             | ●             |
| akupunkturo k.s.         |                        | ●                            |          |             | refleksologio |
| permana, tuŝa<br>terapio | ●                      | Tuina                        | ●        | ●           |               |
| spirit-terapioj          | ●                      |                              | ●        | ●           |               |
| ekzercado                |                        | qigong                       | jogo     |             | ●             |

*adaptita el WHO 2002: 8*

Oni povas rimarki ke en ĉiu medicino troveblas 1) *teoria sistemo pri malsano*, t.e. organizitaj nocioj pri tio kio estas la ecaro difinanta (mal)sanojn kaj iliajn kaŭzojn, kaj pri tio kio indas/utilas kiel kuracaj teknikoj, kaj 2) *sanprizorga sistemo*, kiu enkadrigas la manierojn per kiuj la socioj organizas sin por agi ĉi-rilate, kaj do la sociajn rilatojn inter la medicinisto kaj ŝlia paciento (Foster kaj Anderson 1978: 36-38). Laŭ la ĵus menciita, estas tre utile identigi ĉe la medicinaj sistemoj iliajn respektivajn kredojn pri la kaŭzoj de la malsanoj, ĉar sur tio sin bazas la tipoj de kuracado, resanigaj teknikoj, preventaj agoj kaj reciprokaj rilatoj inter tiuj elementoj. Tiel, etiologia taksonomio permesas distingi du principojn de kaŭzeco, ne reciproke ekskludajn. En la *persondamaĝa* tipo oni komprenas malsanon kiel rezulton de intencita ago de iu aŭ io, jen homa (ekz. sorĉisto), nehoma (ekz. fantomo, mortinta antaŭulo, malbona spirito) aŭ supernatura (ekz. dieca estaĵo). La malsanulo fakte estas viktimo kontraŭ kiun la volo de iu aganto direktas la punon aŭ agreson, kun aŭ sen motivigo flanke de la trafito. Kontraste, la sistemoj bazitaj sur *naturspeca* kaŭzeco klarigas la malsanon per nepersonaj, sistemaj elementoj, do tute ne per la damaĝa efiko de iu agaciĝinta estaĵo, sed per naturaj fortoj aŭ kondiĉoj kiel varmo, malvarmo, ventoj, humideco kaj precipe la ekvilibro de la korpaj elementoj, kiel la humoroj de la antikvepogreka kaj mezepokeŭropa medicino, *doŝa* de Ajurvedo kaj *jin-jang* de la tradicia ĉina medicino (Foster 1976: 775; 1983: 19). Fakte, la foja aserto ke “en pluraj kulturoj, la ideoj kaj praktikoj ligitaj al malsano estas plejparte nedisigeblaj de la tereno de religiaj kredoj kaj praktikoj” (Glick 1967: 32, citita de Foster 1976) aludas precipe la sistemojn de persondamaĝa etiologio, eĉ se en sistemoj de pli naturspeca kaŭzeco kiel la katolike kunteksta populara medicino de Latinameriko, oni postulas helpon kaj miraklojn flanke de la Virgulino Maria, diverspecaj sanktuloj ktp.

**Tabelo 2. Tipologio de medicinaj sistemoj laŭ etiologio**

| kaŭzo<br>malsano                                    | persondamaĝa<br>aktiva aganto<br>speciala malbonsorta kazo   | naturspeca<br>perdita ekvilibro<br>senrilata al alikampa malbona<br>sorto                             |
|---|--|---|
| religio/magio<br>preventado<br>respondeco<br>socioj | intime ligita al malsano<br>pozitiva faro<br>preter la povo de la paciento<br>bandoj, triboj k.s. teknologie<br>simplaj socioj | neligita al malsano<br>eviti nerekomendindajn farojn<br>ĉe la paciento<br>grandaj, antikvaj tradicioj |

*adaptita el Foster 1976*

Tre proksiman etiologian klasadon al tiu ĵus prezentita, proponis alia aŭtoro surbaze de tio ĉu la medicina sistemo igas la kaŭzojn esti internaj aŭ eksteraj al la malsaniĝinto. La **internecaj medicinaj sistemoj** enfokusigas sin pri enkorpaj mekanismoj, kia ajn estas la koncerna fiziologia modelo (ekz. humora ekvilibro, energiofluado), dum la **eksterecaj medicinaj sistemoj** priatentas fenomenojn ekster la malsana korpo/menso/spirito, diagnozante celitan atakon, ofte flanke de homaj aŭ homsimilaj fortoj (Young 1976/1986, citita de Sobo 2004: 6-7).

Tiu ĉi ĝenerala modelo permesis al la proponinto sugesti ke ju pli la socioj kompleksigis, des pli okazis transiro de internecaj al eksterecaj kredosistemoj pri malsano. La ekstereca kaŭzomodelo priatentas la sociajn kaj kosmologiajn rilatojn, streĉe sin ligas al aliaj kulturkampoj kiel religio, kaj havas malgrandan nocian memstarecon. Fakte en malgrand-skalaj socioj, ofte estas konekto inter la kredoj pri malsaniĝo kaj tiuj pri aliaj malbonsortaj trafoj, dum en eksterecaj sistemoj la unuopaj kampoj (jura, religia ktp) estas sufiĉe memstaraj. Young klarigas tiun kontraston per la grado de labordivido, kiu malaltas en malgrand-skalaj socioj, kie do estas vasta koincido inter kuracado kaj aliaj kulturaj kampoj, dum en grand-skalaj socioj la labor-divido iĝis altgrada, kompleksa, kun specialiĝo kaj nocia memstariĝo de la diversaj kulturaj kampoj. Ĉi tio kondukas nin al la dua parto de nia eseo.

## 2. Medicina plureco en kompleksaj socioj: historie evoluinta fenomeno

La medicina kampo en la diversaj kulturoj do ĉiam kerne akompanis al kaj estis ĉefe adapte estigita de la makrohistoria disolviĝo de la koncernaj socioj kaj iliaj ekzistokondiĉoj. Plie, la ekestiĝo, evoluo kaj enhavo de la medicinaj sistemoj ĉiam estis sub determinado de la ŝanĝiĝantaj malsano-profiloj kiujn la respektivaj socioj devis alfronti tra sia historio. Ekz. la malsano-kategorioj klopodis komprenocele interpreti kaj klasi la fenomenojn kiujn oni agnoskis esti malsanoj, laŭ la disponeblaj spertoj, ideoj, mondbildo kaj ceteraj kulturaj rimedoj.

Tiel ke la homo estas biologia, socikultura kaj politika estaĵo, la ĝenerala, pluraspekta evoluvojo de la socioj, kun ĉiuj siaj longdaŭraj procezoj kaj foje radikalaj, rapidaj rondiroj, profunde efikis sur ilian demografian kaj epidemiologian historion, kaj sekve sur iliajn medicinajn sistemojn. Ekz. la neolitika revolucio estiĝinta proksimume en 10 000 ANE per la malkovro de agrikulturo kaj esprimiĝinta per la establo de la unuaj nenomadaj komunumoj kaj vilaĝoj, la domigo de hundoj kaj bredobestoj kaj aliaj ligitaj procezoj, kreis la ekologiajn kondiĉojn por la ekdisvastiĝo kaj plioftiĝo de parazitaj kaj aliaj infektaj malsanoj (Kiple 2006).


Estas necese utiligi larĝperspektivan hipotezon por bildigi al si la ligojn de la sansituacioj kaj medicinaj kulturoj kun la granda historia itinero de iliaj respektivaj socioj. Tra la jarmiloj, la historio de interagoj inter malsimilaj gentoj kaj migradoj profunde elformis la mondon, kaj foje esprimiĝis per kolizioj tiaj kiaj konkerado, epidemioj kaj genocido (Diamond 1999: 16). Ĉi-terene, eblas demandi sin ekz. kial la grandtradiciaj, korpusaj medicinaj naskiĝis ĝuste kadre de urbaj civilizoj evoluintaj en regionoj tiaj kiaj la barata subkontinento kaj Orienta Azio, sed ne ĉe la amerikaj indiĝenoj aŭ oceaniaj praloĝantoj, nek en Afriko sude de Saharo? Ĉu la rimarkinde malsimila itinero de la homaj socioj dum la lastaj 13 000 jaroj (post la lasta glaciepoko), kiun oni konstatas ĉe vasta komparado mondskala, spegulas fakte kernajn malsimilojn inter la gentoj, nome genetikajn aŭ psikajn?

En sia verko *Armiloj, mikroboj kaj ŝtalo* (1997) profesoro Jared Diamond larĝskale esploris la kaŭzojn de tiuj malegalaj vojoj, konkludante ke la frapaj malsimiloj inter la longdaŭraj historioj de la gentoj el malsamaj mondopartoj ne atribueblas al esencaj, biologiaj diferencoj inter la homoj, sed al malsimileco inter iliaj naturmedioj. Laŭ li, en tio radikas la startaj, malproksimaj faktoroj kiuj tra kompleksaj kaŭzoĉenoj kondukis al la proksimaj faktoroj (ekz. ĉevaloj, teknologiaj rimedoj, politika organizo) kiuj permesis al iuj gentoj konkeri aliajn. La jena skemo resumas lian hipotezon:

**malproksimaj  
faktoroj**



**proksimaj  
faktoroj**



el Diamond 1999: 87

Kompleksaj socioj, kun antaŭeniĝinta teknologio (ekz. skribsistemo), centraliĝintaj ŝtatoj, socia hierarkio kaj aliaj trajtoj, ekaperis ĉe densaj malnomadaj populacioj kapablaj akumuli surpluson de manĝaĵo, do agrikulturaj socioj. Tiaj socioj naskiĝis ĉe la loĝantoj de iuj areoj kies avantaĝo konsistis en tio ke la sovaĝaj specioj de plantoj kaj bestoj kiuj povus esti domigeblaj estis distribuitaj malegale tra la mondopartoj. Do, en la malmultaj areoj kie tiuj rimedoj estis disponeblaj, la tieaj loĝantoj gajnis avantaĝon ekde la starto, kio finfine kondukis al iliaflanka dispono de armiloj (t.e. milita supereco), mikroboj (t.e. plurjarmila sperto kun amasaj malsanoj, neniam spertitaj de la konkerotoj) kaj ŝtalo (t.e. teknologio), favorigantaj ilin okaze de interagoj kun aliaj gentoj. Krome, la migrado de homoj kaj la disvastiĝo de teknologiaj novigoj okazis pli facile kaj rapide tra la orient-okcidenta akso de Eŭrop-Azio, kun relative mildaj geografiaj kaj ekologiaj baroj (Diamond 1999: 405-408). Ĉi-esee indas enfazi ke el la domigitaj bestoj venis la mikroboj de malsanoj kiel variolo kaj tuberkulozo, kiuj poste faciligis la konkeradon de aliaj gentoj per ekstermado (samverke, p. 207).

Ĝuste do ĉe kompleksaj, urbaj socioj, en la civilizoj de la t.n. antikva mondo (ĉina, sudazia kaj mediteranea) klerulaj medicinaj sistemoj evoluis sendepende inter si. Oni foje nomas ilin grandtradiciaj, por substreki la fakton ke ĉe hierarkiaj socioj naskiĝis klerula elito kiu prilaboris sian respektivan medicinan tradicion, eble en interago kun la malgrandtradiciaj socioj kaj praktikoj de malaltaj sociaj tavoloj, kiuj i.a. utiligis simpligitajn versiojn de la klerulaj medicinaj. Krome, malgraŭ ŝajna kontinueco de la medicinaj tradicioj, fakte okazis gravaj ŝanĝoj tra la jarcentoj, kun apero de diversaj skoloj de interpretado de la teoriaj principoj, tekstoj ktp.

Tiuj tri grandtradiciaj medicinaj evoluis laŭ paralelaj vojoj kaj konservis siajn apartajn trajtojn, eĉ se ili havis ŝancojn de kontakto kaj reciproka interago, aparte pri la t.n. *materia medica* (herbaj medikamentoj ktp). Ili kundividis kelkajn ĝeneralajn aspektojn de socia organizo kaj teorio. Ekz. ĉiu el ili fariĝis profesia sciobranĉo dum la jarmilo inter la 5-a jarcento

antaŭ nia erao kaj la 5-a jarcento, kun korpuso de aŭtoritatecaj tekstoj (ekz. la verkoj de Galeno, Ĉaraka kaj la Nei Ĉing). Ĉiu sin bazis sur naturspeca etiologia teorio, kun nociaro pri la konsisto de la homo kaj pri ekvilibro de humoroj: kvar en la mediteranea tradicio (flava galo, nigra galo, flegmo kaj sango), tri en la sudazia (*kapha*, *pitta* kaj *vayu*) kaj ses en la ĉina (*ĉii*, en la balanciĝo de *yin* kaj *yang*). Tiuj ligis sin kaj al la konsistigaj elementoj de la mondo (tero, akvo, aero ktp), kaj al malaj kvalitoj (varma-malvarma, seka-malseka, vireca-ineca, luma-malluma, forta-malforta, aga-malaga ktp). Malsanon kaŭzis perdo de ekvilibro, kiun nuancigis elementoj tiaj kiaj aĝo, sekso, temperamento rilate al loĝloko, klimato, sezono, nutrado k.a. La diagnozado do implicis lertojn en observado de la fizikaj simptomoj en la media kunteksto, dum kuracadon konsistigis fizikaj proceduroj per aŭ sur la korpo, dieto, ŝanĝoj de la ĉirkaŭa medio, kaj medikamentoj (Leslie 1976: 1-4).

Tiuj ĉi klerulaj medicinaj sistemoj, kune kun aliaj kulturaj elementoj, ofte prunte disvastiĝis trans la landlimoj. Tiel, la ĉina tradicia medicino estis ero el la plurjarcente daŭra kaj kerne influa etendiĝo de la ĉina klasika civilizo al Koreujo, Japanujo kaj Vjetnamujo, socioj en kiuj iom post iom evoluis unuopaj, propraj medicinaj el ĝi, dum la sudazia tradicio (Aĵurvedo, t.e. scienco pri la vivo) havis fortan influon en Tibeto, Birmo kaj Sudorienta Azio. Siaflanke, la mediteranea tradicio, sisteme formulita de Galeno en antikva Grekujo, kreskis kaj daŭris dum Mezepoko en kristanaj kaj islamaj socioj, kaj estis kunportita de la etendiĝo de Islamo al Centra Azio, Barato kaj Sudorienta Azio. Sub la araba nomo Unani Tibba (t.e. ionia, greka medicino), tiu laŭdevene Galena-Hipokrata tradicio daŭre restas uzata en Pakistano, Barato, Nepalo, Srilanko kaj aliaj sudaziaj landoj. En iuj regionoj kreiĝis medicinaj tradicioj kiuj sintezis elementojn el diversaj fontoj. Ekz. la tibeta medicino kunigis erojn el Aĵurvedo (per la etendiĝo de budaismo el Barato), ĉina tradicia medicino kaj Unani el la Persa imperio, kune kun ŝamanaj praktikoj el Siberio kaj Mongolujo kaj Bön-elementoj el prebudaisma Tibeto (Steiner 2003: 85).

Ĉar interese eĉ el interlingva vidpunkto, menciendas la rolo de la islama medicino en la disvastigo kaj transkultura tradukado de medicinaj tekstoj. Okazis ondoj de traduka movado, en malaj direktoj. Unue, kiel ero el pli ĝenerala enkonduko de la antikvagreka kulturo kaj scienco en la islama mondon, dum la 9-a jarcento okazis amasa tradukado el la greka, foje tra la siria, en la araban, kiu estis la scienca lingvo en la islama mondo. Post la jaro 1000 oni ankaŭ ektradukis en la persan. Multaj el la tradukistoj estis kristanoj, kiel la fama Hunayn ibn Ishaq el Bagdado (809-873), kiuj ĝuis protekton flanke de la kalifoj. Poste, la greka klasika medicino estis reenkondukita en Okcidentan Eŭropon el la tiam araba Iberujo, pere de nova traduka movado, ĉi-foje en la latinan, kies centro estis dum la 12-a jarcento en Toledo. Tie laboris homoj kiel la judo Juan Avendahut Hispano, kiu tradukis el la araba en la hispanan, kaj la ekleziulo Dominicus Gundisalvus (Domingo González), kiu tradukis el la hispana en la latinan. Ankaŭ la verkoj de Aviceno atingis tiel Eŭropon (López Piñera 1990: 40-41).

Indas denove substreki ke tra la longdaŭra historio de kontaktoj inter iuj socioj, en kelkaj kazoj ne nur temis pri kulturaj interagoj aŭ reciprokaj influoj inter la medicinaj tradicioj, sed apud tio okazis intensaj procezoj de biologia interŝanĝo, foje kun drastaj sekvoj. Tiel, la procezo de konkerado de Ameriko flanke de diversaj eŭropaj gentoj, kiu startis fine de la 15-a jarcento, kaŭzis la plej grandan demografian katastrofon en la historio de la homaro, kun rapida ekstermado de 90-95 % el la prosimume 60-milionhoma loĝantaro de amerikaj indiĝenoj, kiom laŭ pritakso ekzistis ĉirkaŭ 1492. Tio, plejparte pro epidemiaj malsanoj kiel variolo, morbilo kaj tuberkulozo, kies disvastiĝon ankaŭ faciligis la ekstreme perfortaj agadoj sklavigo, amasmurdado ktp. Tiel, en la insulo La Española (nunaj Haitio/ Dominika Respubliko), el 1 milion indiĝenoj fine de la 15-a jarcento, en 1548 restis ne pli ol 500 (Tudela 1992: 202). Aliflanke, en la Latinamerika kulturo kiu ekde tiam ekestiĝis tie, simpligita formo de la klasika mediteranea kaj persa humora medicino, kunportita de la hispanaj kaj portugalaj konkerintoj, fariĝos la bazo de la popola medicina tradicio, eĉ se iuj aŭtoroj tre dubinde argumentas favore al ia endogena origino en la Nova Mondo mem (Foster 1987). La konkerintoj siaflanke interesiĝis pri la plantoj uzataj de la indiĝenaj medicinistoj kaj detale studis kaj ekuzis ilin.

La ekesto de medicinaj tradicioj kaj ilia kunekzisto en situacioj de medicina plureco estas do historie malnova fenomeno, kies radikoj kuŝas en la kreskantaj procezoj de socia tavolo kaj hierarkio en kompleksiĝantaj socioj. En Okcidento, kadre de la naskiĝo de la komerca kapitalismo, la scienca revolucio de la 16-a kaj 17-a jarcentoj ekestigis novajn metodojn de esplorado, komence pri anatomio kaj fiziologio, kiuj subfosis la aŭtoritatecon de la antikva medicina tradicio. Tiel, la Galena humormedicino iĝis tie pli kaj pli eksmoda jam dum la 18-a jarcento, lasante sian lokon al tio kio jam dum la dua duono de la 19-a jarcento plifirmiĝos kiel science bazita medicina paradigmo. La kolonia ekspansio de Eŭropo en tiu jarcento venke portis ĝin al aliaj mondopartoj kaj igis ĝin vera simbolo de la projekto de la moderno, kun ties kriterioj de racieco kaj efikeco. Ĝiaj politika kaj/aŭ simbola potenco baldaŭ submetis la ceterajn medicinajn sistemojn, kaj ekz. en Japanujo ekde 1870 la Meiji-registaro enkondukis la prusan sistemon por medicinaj studoj, postulante al la japanaj studentoj lerni kaj uzi la germanan lingvon, dum oni intence malfortigis la *Kanpo*-medicinon, kiu spertis gravan falon de siaj prestiĝo kaj uzo ekde tiam.

La specifa historio de la vakcinado kontraŭ variolo estas interesa kazo kiu permesas bildigi pli ĝeneralajn trajtojn de la konfliktoplena hegemoniigo de la imperia medicino. Pluraj fontoj permesas supozi ke la praktiko de inokulado por variolo (variolado), do preventocele meti sanulon en kontakto kun pustula krusto kaj tiel kaŭzi pli mildan sed protektan malsaniĝon, unue ekestis en Ĉinujo dum la Nordĉina Sung-dinastio (960-1279) (Hopkins 2002: 109-110), sed probable ĝi aperis tute sendepende ankaŭ en diversaj lokoj de Eŭrop-Azio kaj Norda Afriko (Arnold 1988: 49). Konstatinte tiun praktikon en la Otomana Imperio, oni enkondukis ĝin en Britujon en la unuaj jardekoj de la 18-a jarcento, el kie ĝi poste disvastiĝis al aliaj landoj de Eŭropo kaj kolonia Ameriko. Siaflanke, ĝi eniris Baraton probable pere de la Islamaj invadoj. Tie, variolado estis akcepte inkludata en la jam ekzistantan kulton al Sitala por eviti la malsanon *masurika*, ĝuis do religian sankcion, kaj ekhavis sian apartan popolfakulon (*tikadar*), kio sugestas ke la tradiciaj sciosistemoj ja estis malfermaj al efikaj novigoj.

Britoj enkondukis vakcinadon en Baraton jam en 1802, do tre frue post la malkovro flanke de Jenner (1798) de la kontraŭvariola protekto kiun la bova pokso havigis al anglaj kamparanoj. Eĉ se ĝi estis multe malpli riska ol variolado kaj nekontaĝa, en Barato vakcinado ne anstataŭis ĉe la popolo la antaŭan praktikon, malsimile al tio kio okazis en Eŭropo. La kredo je variola dieco donis klarigon pri la malsano kaj preskribis ritajn agojn, dum variolado estis alirebla al la popolo kaj ĝuis ĝian fidon. La brita kolonia registaro tamen leĝe malpermesis varioladon jam en 1865, malgraŭ tio ke ĝi ne kapablis establi amasan nek teknologie taŭgan vakcinan servon, do vakcinado ne atingis publikan akcepton sed devis alfronti fortan, daŭran rezistadon. Malgraŭ kelkaj kooptaj iniciatoj, anstataŭ eduki la *tikadar*-ojn pri vakcinado en atmosfero de interkultura respekto kaj tiel atingi ilian kunlaboradon (ke ekz. ili vakcinus dum kantas himnojn al Sitala), la britoj komplete subpremis kaj detruis tiun tradicion (Marglin 1990: 140). La tuta afero spegulis la kolonian situacion, en kiu la fremda administrantaro staris politike kaj kulture tute for de la lokuloj (Arnold 1988: 61-62).

### 3. Medicina plureco, tutmondiĝo kaj daŭripova evoluigo

Oni povas preskaŭ ĉie konstati ke en la nuntempaj kompleksaj socioj funkcias diversaj medicinaj sistemoj, arbitre distingeblaj laŭ lokaj, regionaj kaj kosmopolita medicinaj sistemoj (Baer 2003: 43). Fakte, diversgrada kaj diverstra medicina plureco estas malnova situacio regule rimarkebla en plej diversaj regionoj de la mondo, aparte sed ne nur en la evolulandoj landoj. Ekz. en la kazo de Nepalo la sanservoj estas liverataj de tiuj tri sektoroj, jen paralele, jen konkurence inter ili, eĉ konflikte: indiĝenaj tradiciaj medicinistoj kaj profesiaj fakuloj de la grandtradiciaj medicinaj (*vaidja*-oj de Aĵurvedo kaj *hakim*-oj de Unani)) unuflanke, kaj tiuj de la *angrezi dvai* (t.e. “angla medicino”), aliflanke, kies tiulandajn evoluigojn kaj kreskantan



influan forte subtenis internaciaj helpagentejoj, per publiksanaj projektoj por limigi malarion, tuberkulozon, lepron, naskokvanton ktp (Subedi kaj Subedi 1993: 110-118).

Tiel, la modeloj de medicina plureco diversmaniere spegulas la hierarkiajn rilatojn en la koncernaj socioj, laŭ klaso, kasto, raso, etno, religio, genro, loĝ- aŭ devenregiono k.a., kun reganta pozicio de iu medicino, subtenata de la elito (Baer 2004: 111). Kiel jam menciite, la biomedicino fariĝis hegemonia kadre de la tutmonda kapitalisma ekspansio kaj ofte agis kiel ilo de la imperiismo, sed en pluraj periferiaj socioj ĝiaj servoj ĉiam estis alireblaj nur de la elitoj, dum restis tre nesufiĉe aŭ neniom disponeblaj al la plejmultaj, malaltaj tavoloj de la socio. Tial, en Afriko proksimume 80% el la loĝantaro uzas formojn de tradicia medicino por plenumi siajn sanbezonojn (WHO 2002: 1), dum en aliaj subevoluintaj landoj la situacio estas iom simila. Interese, en diversaj pluretnaj aŭ plurtavolaj socioj la homoj emas utiligi la servojn jen de iuspeca jen de tute alispeca sistemo, laŭ apartaj decidokriterioj aŭ ŝancoj. Ekz. la indiĝenoj de la mapuĉa etno en Ĉilio povas suferi tiel de blankulaj malsanoj (*wingka kutran*), kiel de nurmapuĉaj malsanoj (*mapuĉe kutran*), kaj do la kuracadon oni serĉas ĉe la respektivaj fakuloj.

Lastatempe iĝis eble paroli pri “nova medicina plureco” (Cant kaj Sharma 1999: 1-3), rilate al la nuntempa fenomeno je kompletigaj kaj alternativaj medicinoj (KAM), eksplode disvastiĝinta dum la lastaj tri jardekoj, kiu fakte spegulas pli vastan procezon de socia ŝanĝo. Ekde la fino de la 19-a jarcento kaj dum granda parto de la 20-a, biomedicino rolis hegemonie en la provizado de sanservoj en pluraj socioj, lige al iliaj procezoj de moderniĝo kaj industriiĝo. Tio atribueblas ne nur al ĝia efikeco, sed ankaŭ al la fakto ke ĝi ĝuis legitimigan agnoskon kaj aktivan subtenon flanke de la ŝtatoj. Tamen, ekde fine de la 1960-aj jaroj, en la kadro de diversaspekta kontraŭkultura movado (ekz. enmodiĝo de diversaj orientaj aŭ orientecaj religioj), okazis tute neatendita KAM-renaskiĝo en Okcidento.

La kreskanta interesiĝo pri la diversaj formoj de KAM (ekz. en Usono 38% el la plenkreskintaro uzas iu(j)n, laŭ landa enketo pri sano farita en 2007) rilatigas sin al kulturaj kaj sociaj evoluoj de la nuna “malfrua moderno”, laŭ la termino de la brita sociologo Anthony Giddens, kun pli aktivaj konsumantoj laŭ plureco de vivstiloj, pli flekseblaj ideoj pri sano/malsano, medicino kaj hierarkioj, skeptikeco pri la valoro de la scienco, diversiĝo de kredosistemoj kaj ekaperado de novaj, ofte memproklamitaj spertuloj pri sano. Pluraj formoj de KAM sukcesas komerce prezentante sin kiel naturajn, agantajn pere de iu mistika energio aŭ spirita tekniko ktp.

Neniel direblas ke ĉiu KAM estas produkto de iaspeca prinatura scio evoluanta dum pluraj jarcentoj en la homkomunumoj. Fakte, krom la antaŭ nelonge aperintaj versioj por internacia konsumado de Ajurvedo, ĉina tradicia medicino k.s., pluraj el ili estas tute novaj el longdaŭrhistoria perspektivo. Ekz. la permanente tuŝa *Reiki* ekestis fine de la 19-a jarcento en Japanujo sed atingis Okcidenton en la 1980-aj jaroj, dum la Bach-floroj estas kuracosistemo inventita de la brita homeopatia kuracisto Edward Bach dum la 1930-aj.

Malsimile al la tradicia medicino kiel komunuma rimedo, la diversaj formoj de KAM funkcias strikte en la kadro de la merkata kapitalisme stirata procezo de tutmondiĝo, kaj paralele al la biomedicina industria komplekso, KAM ankaŭ fariĝis plurmiliondolaro negoco. Fakte la malriĉaj amasoj de la mondo restas ĝenerale ekskluditaj (aŭ forpelitaj, kompare al antaŭa tempo) el la servoaliro al ambaŭ sektoroj. Dum multaj AIDS-malsanuloj ne havas ŝancon ricevi medikamentojn, la kreskanta varigo kaj tutmondiga moderniĝo de Ajurvedo- kaj Unani-praktikoj forigas ilian iaman rolon de malmultekosta alternativo alirebla de la malriĉaj sociaj tavoloj (Bode 2006).

La supraĵa diverseco en la kadro de unuformiga merkata tutmondiĝo ankaŭ starigas aliajn minacojn al kutura diverseco kaj biodiverseco. Temas kaj pri la perdo de la tradiciaj sciosistemoj de la indiĝenaj popoloj, inkludante ilian medicinan branĉon, kiel de la malriĉiĝo de biodiverseco pro klimata ŝanĝo, troa ekspluatado ktp. Biodiverseco estas forte ligita al la sannecesoj de la indiĝenaj popoloj kaj malriĉaj komunumoj. Fakte, en la neevoluinta mondo, granda proporcio el la kamparanoj dependas de biodiverseco por siaj vivtenado, nutrado kaj

sano. La ekspansio de agrikulturo povas konduki al la malapero de kuracaj plantoj kaj kreas ŝanĝojn en la ekosistemoj eble kondukantaj al la risko de novspecaj infektaj malsanoj. Tra la neindustriiĝinta mondo, en centoj da milionoj da hejmoj oni uzas kuracajn plantojn, laŭ memprizorga praktiko aŭ rekomendo de tradiciaj fakuloj. Ekz. en Barato, proksimume du milion tradiciaj medicinistoj utiligas pli ol 7500 plantospeciojn. Tamen la rapida transiro de lokaj vivtenaj praktikoj al nedaŭripova varigo de tiu rimedo, kondukas al danĝeraj situacioj de troa, komerce orientita rikoltado kaj detruado de antaŭe sanaj arbaroj, dum la larĝa merkata ĉeno lasas tre malgravan pagon al la lokaj rikoltantoj. Jam en 1988, la Chiang Mai-deklaracio emfazis la gravecon de la medicinaj plantoj en la unuagrada sanprovizado, kaj alvokis al la lanĉo de programoj por ilia konservado (Bodeker kaj Burford 2007: 145-147).

El daŭripova perspektivo gravas substreki interesajn spertojn de interkultura dialogo inter medicinaj sistemoj, por la bono de la homoj kaj komunumoj. Unu el tiuj spertoj estas la trejnado en evolulandoj de la tradiciaj akuŝistinoj (filipina *hilot*, barata *dai*, sieraleona *bundo*, meksika *partera* ktp), inkludeme agnoskante kaj utiligante iliajn sciaron/praktikaron kaj socian legitimecon, cele al limigo de la mortorisko de akuŝintinoj kaj ĵusnaskitoj (Cosminsky 1983). Alia tre interesa sperto estis kunlabora programo por profiti el la helpo de tradiciaj medicinistoj el Ŝona-etnolingvaj grupoj (Ute, Ndau, Manika kaj Sena) por preventado de AIDS en la provinco Manika, centra Mozambiko (Green 1999). Per etnografia rapida esploro oni rimarkis ke tiuj medicinistoj agnoskas du larĝajn kategoriojn de sekse transdonitaj malsanoj (STM): *siki* kaj *njoka*. La specifaj *siki*-malsanoj (*ĉimanga*, *ĉikazamentu*, *mula*, *songeia*, *ĉikeke* kaj *gobela*), kaŭzita de malgranda, nevidebla agento (*khoma*) kaj akiritaj per tuŝo de iu malpuraĵo (ekz. seksorgana sekrecio), ŝajnis korespondi al biomedicine difinitaj STM (sifilizo, gonoreo, klamidio kaj ĉankroido, kiuj estas kunfaktoroj de HIV-infekto). Aliflanke, la polurrilataj malsanoj atribueblaj al agaciĝo de la nevidebla, enkorpa, protekta serpento *Njoka*, temis pri *njoka kundu* ĉe viroj kaj *njoka dzoni* ĉe inoj, reciproke transdoneblaj, kaj lastkaze, ankaŭ al nenaskitaj filinoj. El biomedicina vidpunkto, ŝajne temis pri diversaj simptomoj kaj situacioj, kiel ekz. prostataj kaj malsuprabsdomenaj. La dialogon, faritan per la Ŝona lingvo, faciligis tiel la atribuo al naturspeca kaŭzo, laŭ la etnomedicina etiologia tipologio de Foster, kiel ankaŭ la fakto ke iuj establitaj praktikoj ankaŭ estis kuraĝigindaj el biomedicina vidpunkto, ekz. eviti seksajn rilatojn ekster la geedza opo (kiom ajn nombra ĝi estas) kaj dum menstruado. Oni informis la tradiciajn medicinistojn pri AIDS utiligante la nociojn de *khoma* kaj *Njoka* (“imuna sistemo”) klarigante tamen ke ĉi-kaze la transdono povas okazi ankaŭ tra aliaj vojoj kaj ke oni devas eviti kontakton kun sango, kie povas troviĝi la AIDS-*khoma*, cetere akceptebla ideo por ili. Engaĝante la tradiciajn medicinistojn oni celis al kompromisaj solvoj, kiel ekz. atingi estimon flanke de la mozambikaj sansistemaj laboristoj, kaj ke en difinitaj kondiĉoj la tradiciaj medicinistoj rajtu plusendi malsanulojn al la klinikoj.

Koncerne la sanrilatajn praktikojn de la homoj, oni povos neemfazi la gravecon de ilia kultura dimensio. Ekz., koncerne la teoriojn pri individua kondutŝanĝiĝo sur kiuj sin bazas iuj preventaj intervenoj koncerne al HIV kaj AIDS, videblas la malkonveneco preteratenti, kadre de prisana komunikado, saninstigado kaj edukado por sano, la efikon sur la celitajn individuojn de iliaj kulturoj, lingvoj kaj medioj (Airhihenbuwa 2007: 167). Ĉar oni ofte vualas la influon de kulturo komprenante la kondutojn celatajn por ŝanĝo nur kiel individue motivitajn, indus ĝuste enfokusigi sur kuntekstaj elementoj kiel kulturo, kiuj igas la kondutojn de intereso signifohavaj (samverke, p. 173). Kontraste al la kutima preventa starpunkto en saninstigado kaj sanedukado, kiu celas influu la decidojn de la individuoj al pozitivaj sankondutoj sed foje kulpigas la viktimojn mem (ekz. aidosuloj), pri kulture zorga mempoviga metodo prenas en konsideron la manieron laŭ kiu la prisana scioj, kredoj kaj agoj estas produktataj kaj interpretataj sur la mikro- (individuo, familio, komunumo) kaj makroniveloj (landa socio ktp). La decidoprocezo de la individuoj kaj familioj estu ĝuste komprenata laŭ ilia politika, historia kaj kultura kunteksto, dum oni situigu la formuladon kaj adaptadon de saninstigaj programoj en kulture taŭga kadro, agnoskante tiel la historiecon de la valoroj, kredoj kaj praktikoj de la homoj

(Airhihnbuwa 1995: 26-27). Laŭ tiu starpunkto de kultura taŭgeco eblas diri ke, tial ke la tradiciaj medicinistoj fundamente rolas en la sanprizorgado en nevoluintaj landoj, ignori la tradician medicinon egalas ignori la kulturajn aspektojn de sano/malsano en tiuj socioj, kaj do nepras kunlaboremaj atento al kaj komunikado kun ties fakuloj (Airhihnbuwa kaj Harrison 1993: 131-132).

Sano por ĉiuj plu restas alstrebenda rajto/espero en mondo tamen profunde maljusta kaj ekskluda. Por atingi tion, la plurala, multkultura karaktero de la homa civilizo, kiu ankaŭ sin esprimas sur la medicina kampo, estas rimedo survoje al daŭripova evoluigo kaj alispeca, egaleca tutmondiĝo: tiu de la homaj rajtoj kaj solidareco.

## **Bibliografio**

- Arnold, David (1988). "Smallpox and colonial medicine in nineteenth-century India". En: Arnold, David (eld.). *Imperial Medicine and Indigenous Societies*. Manchester University Press.
- Airhihnbuwa, Collins O. kaj Ira E. Harrison (1993). "Traditional Medicine in Africa: Past, Present, and Future". En: Conrad/Galagher 1993, p. 122-134.
- Airhihnbuwa, Collins O. (1995). "Developing Culturally Appropriate Health Programs". En: Airhihnbuwa, Collins O. *Health and Culture. Beyond the Western Paradigm*. Sage Publications, Inc.
- Baer, Hans A. (2003). "Contribution to a critical analysis of medical pluralism: an examination of the work of Libbet Crandon-Malamud." En: John D. Koss-Chioino, Thomas Leatherman, Christine Greenway (eld.). *Medical Pluralism in the Andes*. Routledge. p. 42-60.
- Baer, Hans A. (2004). "Medical Pluralism". En: Ember, Carol R./ Ember, Melvin (eld.), *Encyclopedia of medical anthropology - health and illness in the world's cultures*. Springer Science+Business Media, p. 109-116.
- Bannerman, Robert H./Burton, John/Ch'en Wen-Chieh (1983). *Traditional medicine and health care coverage*. World Health Organization.
- Bode, M. (2006). "Taking traditional knowledge to the market: The commoditization of Indian medicine", *Anthropology & Medicine* 13: 225-236.
- Bodeker, Gerard/ Burford, Gemma (eld.) (2007). *Traditional, complementary and alternative medicine: Policy and public health perspectives*. Imperial College Press.
- Cant, Sarah/ Sharma, Ursula (1999). *A new medical pluralism? Alternative medicine, doctors, patients and the state*. UCL Press.
- Conrad, Peter/Galagher, Eugen B. (eld.) (1993). *Health and Health Care in Developing Countries: Sociological Perspectives*. Temple University Press.
- Cosminsky, Sheila (1983). "Traditional midwifery and contraception". En: Bannerman/Burton/Ch'en 1983, p. 142-162.
- Diamond, Jared (1999). *Guns, Germs, and Steel. The Fates of Human Societies*. W. W. Norton & Company.
- Dunn, F.L. (1976). "Traditional Asian Medicine and Cosmopolitan Medicine as Adaptive Systems". En: Leslie (eld.) 1976, p. 133-158.
- Foster, George M (1976). "Disease Etiologies in Non-Western Medical Systems": *American Anthropologist* 78: 773-782.
- Foster, George M. (1983). "An introduction to ethnomedicine". En: Bannerman/Burton/Ch'en 1983, p. 17-24.
- Foster, George M. (1987). "On the Origin of Humoral Medicine in Latin America". *Medical Anthropology Quarterly* 1 (4): 355-393.
- Foster, George M./Anderson, Barbara G. (1978). *Medical Anthropology*. John Wiley K Sons.
- Glick, Leonard (1967). "Medicine as an Ethnographic Category: The Gimi of the New Guinea Highlands". *Ethnology* 6:31-56.
- Green, Edward C. (1999). "Engaging Indigenous African Healers in the Prevention of AIDS and STDs" En: R. Hahn (eld.), *Anthropology in Public Health: bridging differences in culture and society*. Oxford University Press. p. 63-83.

- Han, Gil-Soo (2002). "The Myth of Medical Pluralism: A Critical Realist Perspective. *Sociological Research Online*, Vol. 6, n-ro 4. <http://www.socresonline.org.uk/6/4/han.html> (kontrolita 08.07.2010)
- Hopkins, Donald R. (2002). *The Greatest Killer: Smallpox in History*. University of Chicago Press.
- Janzen, John M. (2002). *The Social Fabric of Health – An Introduction to Medical Anthropology*. The McGraw-Hill Companies Inc., New York.
- Kiple, Kenneth F. (2006). "The History of Disease". En: Roy Porter (eld.). *The Cambridge History of Medicine*. Cambridge University Press, p. 10-45.
- Kleinman, Arthur (1980). *Patients and Healers in the Context of Culture*. University of California Press.
- Kleinman, Arthur (1993). "What is specific to Western medicine?". En : W. F. Bynum/Roy Porter (eld.). *Companion Encyclopedia of the History of Medicine*. Vol 1. Routledge. p. 15-23.
- Leslie, Charles M. (eld.) (1976). *Asian Medical Systems – a comparative study*. University of California Press.
- López Piñero, José María (1990). *Historia de la Medicina*. Historia 16.
- Marglin, Frédérique Appfel (1990). "Smallpox in Two Systems of Knowledge". En: Marglin, Frédérique Appfel/Marglin, Stephen A. (eld.). *Dominating Knowledge. From Development to Dialogue*. Oxford University Press. p. 102-144.
- National Center for Complementary and Alternative Medicine (2007). *CAM basics*. <http://nccam.nih.gov/health/whatiscam/D347.pdf> (kontrolita 11.07.2010).
- Sobo, Elisa J. (2004). "Theoretical and Applied Issues in Cross-Cultural Health Research. Key Concepts and Controversies". En: En: Ember, Carol R./Ember, Melvin (eld.), *Encyclopedia of medical anthropology – health and illness in the world's cultures*. Springer Science+Business Media, p. 3-11.
- Steiner, Robert W. P. (2003). "Cultural Perspectives on Traditional Medicine". En: Selin, Helaine. *Medicine across cultures: history and practice of medicine in non-Western cultures*. Kluwer Academic Publishers, p. 85-113
- Subedi, Janardan kaj Subedi, Sree (1993). "The Contribution of Modern Medicine in a Traditional System: The Case of Nepal." En: Conrad/Galagher 1993, p. 109-121.
- Tudela, Fernando (1992). "El encuentro entre dos mundos: impacto ambiental de la conquista". *Nueva Sociedad* n-ro 122, nov.-dic. 1992, p. 198-209.
- World Health Organization (1976). *African traditional medicine: report of an expert group*. WHO Regional Office for Africa (AFRO Technial Report Series, n-ro 1).
- World Health Organization (2000). *WHO Traditional Medicine Strategy 2002-2005*.
- Young, A. (1976/1986). "Internalising and externalising medical belief systems: An Ethiopian example". En C. Curren & M. Stacey (Eld.), "Concepts of health, illness, and disease" (p. 139–160). [Originale: 1976, *Social Science & Medicine*, 16, 43–52.]. Berg.
- Young, A. (1983). "The relevance of traditional medical cultures to modern primary health care". *Social Science and Medicine*, 17 (16), 1205–1211.